

408.920

V8162v VIRGILIO

ENEIDO

TRADUKIS

D^{ro} VALLIENNE



STANFORD UNIVERSITY LIBRARY

FRANCUJO. — HACHETTE et C^{ie}, *PARIS*.

ANGLUJO. — « REVIEW of REVIEWS », *LONDON*.

DANUJO. — ANDR.-FRED. HÖST & SÖN, *KJOBENHAVN*.

GERMANUJO. — MÖLLER & BOREL, *BERLIN*.

HISPANUJO. — J. ESPASA, *BARCELONA*.

ITALUJO. — RAFFAELLO GIUSTI, *LIVORNO*.

POLUJO. — M. ARCT, *WARSZAWA*.

AL SINJORO CARLO BOURLET

PREZIDANTO DE LA GRUPO PARIZA

KAJ

160287

AL SINJORO PAUL FRUICIER

ĈEFREDAKTORO DE LA « LINGVO INTERNACIA »

KAJ DE LA

« INTERNACIA SCIENCA REVUO »

Tiun ĉi verkon danke dediĉis

VALLIENNE

D^{ro} VALLIENNE.

ANTAŬPAROLO

Kiam, en cirko, ekvilibristo mirigas la ĉeestantojn per siaj forto kaj malrigideco, oni tuj opinias ke tiu ĉi viro, kvankam simila je viroj ceteraj, diferencas tamen de ili per sia fleksebleco, kaj oni estas konvinkita ke, por atingi tiun rezultaton, li, de sia infanaĝo, devis komenci tiujn ekzercojn.

Estas same pri Esperanto.

Dum la maljunaj lingvoj naciaj, rigidaj ĝis en siaj malbonformaĵoj, povas nur provi kelkajn movetojn mallargajn, la juna Esperanto kontraŭe kurbiĝas, restariĝas, sin refaldas sur sin mem, sin formetas per saltego kaj fine refalas belmore kun gesto fleksebla. Kontraŭ la malmola materio de Eŭropaj lingvoj, ĝi kontraŭmetas sian molan materion, kapablan modeliĝi al ĉiuj reliefoj, por registri kaj fiksi ĉiujn impresojn.

Tia lingvo estas do bonega tradukilo : ĉar ĝi ne nur ebligas trakonduki la sencon de fremda teksto tra la reto de ĝiaj vortoj kaj frazoj por tien ĝin fiksi, sed ankaŭ ĝi eniras profunden en la intimecon mem de tiu lingvo, kaj rebriligas ĝiajn harmonion, sonoradon, movadon, unuvorte ĝian genion mem. Tial, dank'al ĝi, ĉiu homo povas koni ne nur la sencon de ĉio, kio estas skribita diverslingve en la tuta mondo, sed ankaŭ, se li estas artisto, poeto, aŭ nur nemetiisto instruita, li povas ĝui tiun delikatan plezuron : legi, sur la teksto mem, lingvon kium li ne konas.

Tion, kion aliaj verkistoj faris pri la lingvoj greka, angla, rusa, k. t. p. mi provas hodiaŭ pri la latina.

Sed, laŭ la vortoj antaŭdiritaj, mi volis kompreneble esti nur la tradukanto de Virgilio kaj ne lia komentariisto : malpli ankoraŭ mi kuraĝis fariĝi lia kunlaboranto, korektante opiniojn kosmogoniajn, religiajn, filozofiajn, pri kiuj oni hodiaŭ scias ke ili estas eraroj, sed kiuj, en la epoko de la poeto romana, estis akceptataj kiel veraĵoj nedisputeblaj. Tio aperigas, en kelkaj lokoj, mallumecon neeviteblan. Leginte frazon regule konstruitan, la leganto miros : ĉar li ne komprenos sufiĉe la sencion kaŝitan sub tiu frazo. La kaŭzo de tiu malfacileco estas jena : la ideo esprimita ŝajnas tiel fremda al niaj nunaj opinioj, ke ni povas ĝin kompreni nur neperfekte. Tiuj kiuj tradukis Virgiliajn versojn proze evitis tiun rifon, doninte en la apuda teksto mem de ilia verko la klarigon necesan. Sed tiu procedo estis al mi nebligita. Ĉar mi tradukis Eneidon laŭverse, por pli bone sentigi ĝian tutan harmonion, la loko mankis por klarigoj, kiuj estis senutilaj por la samtempuloj de Virgilio, sed kiuj estas kontraŭe necesegaj por la nuntempaj homoj. Mi do sendas tiujn kiujn interesas tiuj detaloj al la sciigoj kaj komentarioj skribitaj de scienculoj, kiuj, de kvin jarcentoj, disputadas pri tiuj punktoj mallumaj, kaj malofte, venas al ia konsento.

Nun unu vorton nur pri la versregularo uzita en tiu ĉi traduko.

Le heksametro latina uzas tri specojn da piedoj : la spondeo (du silaboj longaj), la troĥeo (unu longa kaj unu mallonga), la daktilo (unu longa kaj du mallongaj).

Ĉar en Esperanto ne estas silaboj longaj kaj mallongaj, oni povas ilin austataŭigi per silaboj akcentaj aŭ neakcentaj. Sed tiam malfacileco

okazas. En latina verso, spondeo kaj daktilo egalvaloras, ĉar unu longa egalas du mallongajn. Sed, ĉar en Esperanto du silaboj akcentaj ne povas apudestiti, tial al mi ŝajnas ke la spondeo estas tute neebla : sekve oni devas ĉiam ĝin austataŭi per daktilo, neniam per troĥeo. Ĉar, kiel oni vidas en la versregularo latina, la troĥeo estas uzebla nur en la fino, sed neniam interne de verso.

Jen estas do la unua regulo kiun mi ĉiam altrudis al mi. Sekve la versoj de tiu ĉi traduko, faritaj je kvin daktiloj kaj unu troĥeo, havas ĉiam dek-sep silabojn.

Nun restas la demando pri la unusilaboj. Ĉu ili estas akcentaj, aŭ ne? Ĉu oni estas prava, akceptinta iujn kiel akcentaj, kaj ceterajn ne? Kaj se tiu propono estas akceptita, ĉu fundamento troviĝas sur kiun oni povas sin apogi por fari tiun elekton? Tiuj demandoj ŝajnas nesolveblaj. Mi do opinias ke la unusilaba akcentiĝo, ne ekzistanta per si mem, naskiĝas laŭ la loko mem okupata de la vorto en la frazo.

Ĉe la komenco de la verso, la unusilabo estas kredeble akcenta. Post du silaboj neakcentaj, ŝajnas ke estas neeble daŭrigi la legadon kaj ne akcentigi pli aŭ malpli forte la silabon kiu postiras.

Jen estas do la dua regulo kiun mi proponas : la unusilabo mem estas neŭtra. Ĝi estas akcenta nur en la komenco de la verso kaj post du silaboj neakcentaj : sed en ĉiuj ceteraj okazoj ĝi restas neakcenta.

Jen estas la versregulara fundamento de la traduko kiun mi prezentas hodiaŭ al miaj esperantistaj samideanoj.

Kompreneble mi ne estas tiel malhumila ke mi pretendas efektiviĝi mian programon : mi tro konas de kiaj ecoj mi estas senigita por trafi tian celon.

Sed mi estos tute feliĉa, se mi povos nur esti

montrinta, ne tion kion mi faris, sed tion kion mi volis fari; kaj mia ĝojo estos tute perfekta se tiuj kiuj min honoros per la legado de mia verko retrovos eĥon malfortan de tiu Virgilio legita de ili dum ilia juneco. Al Esperanto nur apartenos la gloro de tiu eĥo; kaj nur la tradukinto estos kulpigota, se li malfortigis tiun eĥon, se li ĝin ne resonigis en ĝia tuta amplekso.

Tamen mi opinias ke se mia ekzemplo estos imitata, mi estos farinta, por la estonteco, agon utilan. Ĉar, ju pli la jarcento antaŭeniros, des pli la lernadoj literaturaj estos forlasitaj pro tempmanko, kaj austataŭitaj de sciencaj lernadoj necesegaj. Iam la tuta have spirita de viro bonsocieta konsistis el la kono tre plena de literaturaĵoj. Ne estas tiel hodiaŭ: kaj oni facile povas antaŭvidi epokon ne malproksiman en kiu la senco de ĉefverkoj antikvaj estos proksimume tute perdita. Sed mi kredas fervore ke, en tiu momento, Esperanto estos plene akceptita kiel universala lingvo, kaj estos konata de ĉiuj. Tiam la malsatuloj de belaj literaturaĵoj povos facile sin nutri je tiuj verkoj, kiujn la batalado por la vivo ilin malhelpis lerni en la originala teksto.

Jen estas mia celo. Kaj se, kiel mi timas, mi ĝin ne povis trafi, mi lasas mian heredon al aliaj pli inteligentaj kaj pli lertaj: ili do prenu mane la direktilon, kaj plenumu tute tion kion mi nur montris.

Pri mi,

Ĉar mi jam spacon longegan tra kampoj senhalte trairis, Estas bezone nun kolojn ŝaumantajn maljungi ĉevalajn.

D^{ro} VALLIENNE.

E N E I D O

KANTO UNUA

Iam mi kiu sur fluto kampara malpezajn kantadis
Versojn, kaj poste, lasinte arbarojn, en verkoj poetaj
Donis konsilojn por ke rikoltisto de sia laboro
Grandan ricevu kompeonson; hodiaŭ de Marso terurajn

Armojn mi kantas kaj viron, unua el bordoj Trojanaj 1
Kiu elvenis, fatale puŝita, kaj ĝis Lavinujo,
Lando Itala, longtempe tra tero kaj maro vagadis,
Dia de volo; ĉar lin persekutis Junona kolero.
Grandajn batalojn li ankaŭ suferis, dum urbon konstruis, 5
Kaj al Latujo alportis diaĵojn; el kie latina
Raso, kaj Albaj prapatroj kaj altaj de Romo muregoj.

Kaŭze al mi memorigu, o Muzo, pro kia ofendo
Dia reĝino dolora, al viro, pri lia pieco
Tiel laŭdinda, sennombre laborojn kaj ofte danĝerojn 10
Trudis. Ĉu tia kolero en diajn eniĝas animojn?

Estis antikva grandurbo de Tiraj fondita migrantoj
Kiu, Kartago nomita, Italian kaj Tibran, tra maro,
Bordon rigardas, batalon amanta fervore, kaj riĉa.
Tiun Junono pli amis ol ĉiujn ceterajn sanktaĵojn; 15
— Samo mem estis lasita; — ĉar tie ŝi siajn armilojn
Havis kaj ĉaron. Al ĝi do aldoni deziris diino
Regnon tutmondan, al tio penante, se volus Fataloj.

Tamen ŝi aŭdis ke raso naskiĝos el sango Trojana,
 20 Kiu de nova Tirurbo altaĵon renversos, kaj plie
 Naskos popolon batale timindan kaj mondon regontan,
 Kiu Libujon detruos : ĉar tion decidis la Parkoj.
 Tion timante, kaj tro memorante antikvan militon,
 Kion, por karaj Arganoj, ĉe Trojo, ŝi Saturnidino
 25 Paris, ŝi kaŭzojn kolerajn, kruele dolorajn, ankoraŭ
 Havas : ĉar staras profunde, en ŝia animo, Parisa
 Juĝo, kaj malestimata insulte beleco, kaj raso
 Malamegita, kaj al Ganimedo rabita honoroj.
 Ŝi do, pri tio kolera, Trojanojn sur ondoj skuatajn,
 30 Kiuĵ de glavoj Danaaj kaj manoj foriris Aĥilaj,
 El malproksima Latujo forpelis : kaj, multon da jaroj,
 Ilin Fatalo ludema el maro vagigis en maron.
 Tiel do malfacilega fariĝis la Roma naskiĝo.

Ili, apenaŭ insulon lasinte Sicilan, per veloj
 35 Trafis ĝojantaj maralton, kaj akvon per kupraj ŝipnazoj
 Fendis, jen kiam Junono, senmortan en brusto kovanta
 Vundon, ekdiris : « Ĉu lasi projekton mi devas, venkita?
 Ĉu al Trojreĝo aliron Italan mi fermi ne povas?
 Tion ne volas Fataloj. Ĉu ŝipojn Argujajn Palaso
 40 Ne ekbruligis, kaj ilin devigis en maron dronegi,
 Kriman koleron de sola Ajakso Ojlido punante?
 Ŝi mem, Jupitran rapide el nuboj ĵetinte fajreron,
 Ŝipojn dispelis, per ventoj senĉenaj renversis ondegojn,
 Lin mortigantan, flamegojn blovantan el brusto borita,
 45 Kaptis en akva turniĝo, kaj najlis sur akran ŝtonegon.
 Kaj mi, potenca reĝino de dioj, Jupitra fratino
 Kaj eĉ edzino, mi kontraŭ nacio, dum tiom da jaroj,
 Sola batalas! Kaj kiu nun nomon amegos Junonan?
 Aŭ sur altaron, preĝante, honoran alportos oferon? »
 50 Tiun pensadon en koro flamanta volvante, diino
 En Eolujon alkuras, patrujon de ventoj. Ĉi tie
 Loĝas Aŭsteroj koleraj; kaj tie, en larĝa kaverno,
 Reĝo Eolo plorantajn ventegojn kaj sonajn blovegojn
 Dresas potence, kaj ilin ligitajn en kavon enfermas.
 55 Ili, indigne muĝantaj, montegon bruege tremigas
 Ĉirkaŭ bariloj. Sur alta ŝtonego ripozas Eolo,

Sceptron tenante. Li korojn kvietaj, kolerojn trankvilaj
 Igas : sen tio, tuj maron, kaj teron, kaj larĝan ĉielon
 Ventoj forportus rapide, kaj ilin tra spacoj balaus.

Tion timante do, Patro la ĉiopotenca, en nigrajn 60
 Ilin enfermis kavernojn, sur ilin montegan masegon
 Pezan surmetis, kaj donis reganton, kun firma kontrakto,
 Kiu ordone aŭ premas aŭ ĉenojn kontraŭe ellasas.

Tiel parolis potenca Junono, petanta dieton :

« Al vi, Eolo, la Patro de dioj kaj Reĝo de homoj 65
 Ondojn permesis renversi, kaj fari ventegojn kvietaj.

Malamegita nacio sur maro veturas Tirena,
 Al Italujo Iliajn Penatojn portanta venkitajn.
 Ventajn ekscitu kolerojn, kaj ŝipojn englutu dronintajn;
 Tiujn dispelu Trojanojn, kaj ilin disjetu tra maro. 70

Apud mi estas du sepoj da nimfoj, je korpo belegaj :
 Deiopeon, pro skulptaj formajoj pli belan ol ĉiuj,
 Mi al vi ligos per certa edzigo, kaj donos proprece,
 Por ke ŝi, tiu de servo premio, dum jaroj sennombraj,
 Kun vi kuniĝu, kaj faru vin patro de bela idaro. » 75

Tiam Eolo respondis. « Vi sola, reĝino, pripensi
 Povas laboron; mi devas nur vian ordonon obei.
 Vi al mi tiun potencon, kaj sceptron, kaj amon Jupitran
 Donis; dank'al vi, al diaj festenoj kuŝiĝi mi povas,
 Plie komandi ventegojn, kaj nubojn ordoni potence. » 80

Tion dirinte, per rando de lanco li montan kavernon
 Frapas al flanko; kaj ventoj, tuj kiam li pordon malfermas,
 Kiel amaso densega, rapidas, kaj teron balaas.
 Maron turnakvoj renversas ĝis ĝiaj plej kavaj profundoj.
 Eŭro, kaj Noto, kaj fine Afriko, la patro ventega, 85
 Kune alflugas, kaj bordojn skuadas per ondoj larĝegaj.

Bruas samtempe sibladoj ŝnuregaj kaj viraj kriegoj.
 Antaŭ okuloj Trojanaj, ĉielon kaj lumon subite
 Nuboj ekkaŝas, kaj nokton nigregan disverŝas sur maron.
 Tondras polusoj, kaj brilas aero je fulmoj multegaj. 90
 Ĉio al viroj vidaĵon prezentas minace mortigan.

Kuras subite tra membrojn Eneajn glacia teruro.
 Li do, ĝemante, kaj manojn al astroj levante tremantajn,
 Tiujn ekdiras parolojn. « Trifoje, kvarfoje feliĉaj,

- 95 Tiuj, ve! kiuj, ĉe altaj de Trojo muregoj, pereis
 Antaŭ gepatraj okuloj. Tidido, vi, la plej kuraĝa
 El la Danaoj, oh! kial vi ne min mortigis per via
 Mano, ĉe kampoj Iliaj animon verŝinte kun sango?
 Tie Hektoron kruelan kaj grandan Sarpedon traboris
- 100 Sagoj Aĥilaj; kaj tie Simoo, sub ondoj kaŝantaj,
 Multon da viraj kiraso, kaj ŝildo, kaj korpoj ruladas. »
 Tiel parolis li, dum Akvilona ventego siblante
 Velon kontraŭen ekfrapas, kaj akvon sublevas al astroj.
 Estas rompataj remiloj; rondiras velŝipo, kaj ondoj
- 105 Flanken ĝin premas de kruta monteto amase fluida.
 Tiuj ĉi supre al ondoj pendiĝas; al tiuj marfundo,
 Inter kavajaj turnakvoj, aperas; kaj sablo bolegas.
 Noto fortiras tri ŝipojn kaj rulas sur rifojn kaŝitajn,
 Kiujn, en mezo de ondoj, Italoj alnomas: altaroj;
- 110 — Maron ĉar dorso larĝega eliras; — el alte, tri ŝipojn
 Eŭro alpuŝas al Sirtoj ŝtonegaj, — malĝoja vidaĵo! —
 Ilin disrompas sur rifojn kaj volvas sub sablan amason.
 Tiun sur kiu veturis Licianoj kaj brava Oronto,
 Antaŭ okuloj Eneaj, grandega turnakvo, el supre
- 115 Flanken ekfrapas, ŝipestron ŝancelas, kaj lin elfalintan
 Rulas, je kapo antaŭa: trifoje sur si mem turniĝas
 Ŝipo, kaj dronas, de akva turniĝo rapide manĝita.
 Estas vidataj, en profundegaĵo, maloftaj naĝantoj,
 Viraj armiloj, kaj traboj, kaj Trojaj riĉaĵoj, tra maro.
- 120 Ilionean jam ŝipon fortikan, kaj tiun de Abo,
 Tiun de forta Akato, kaj de la maljuna Aleto,
 Venkis ondegoj: je flanko, tra traboj ŝiritaj, mortigan
 Ĉiuj englutas turnakvon, fendiĝas kaj dronas rapide.
 Tamen, aŭdante siblantan bruegon de maro kolera,
- 125 Sentis Neptuno ke elĉenigita ventego skuadis
 Maron ĝis ĝia profunda sidejo: en koro tuŝita
 Grave, li kapon kvietan el ondo eligas, rigardas,
 Kaj dispelitan tra maro ŝiparon ekvidas Enean,
 Poste Trojanojn prematajn de ondoj kaj falo ĉiela.
- 130 Frato Junonan koleron kaj ruzon rekonas facile,
 Eŭron alvokas, kaj ankaŭ Zefiron, kaj tiel parolas:
 « Ĉu do de via deveno sufiĉan vi havas konfidon?

Ĉu vi kuraĝas ĉielon kaj teron, sen mia volado;
 Ventoj, kunmiksi, kaj tiujn grandegajn sublevi amasojn?
 Vin do mi.... Sed kvietigi kolerajn nun urĝas ondegojn. 135
 Se vi ankoraŭ petolos, pli grave mi certe vin punos.
 Iru eksteren rapide, kaj diru al via reganto :
 Ne all li regnon de maro kaj grandan tridenton donacis
 Sorto, sed al mi. Li regas nur tiujn multpezajn ŝtonegojn,
 Vian loĝejon, o Eŭro : en tiu ĉi domo, Eolo 140
 Sin do enfermu, kaj ventojn regadu, en kavo fermita. »
 Tiel li diris : kaj ondojn ŝvelintajn tuj li kvietigas,
 Nubojn dispelas densegajn, kaj sunon alvokas ĝojigan.
 Kune penadon kunigas Kimoto kaj Trito, kaj ŝipojn,
 Akraj de rifoĵ, disigas : li mem per tridento sublevas 145
 Ilin, kaj Sirtojn malfermas vastegajn, dum maro platiĝas :
 Fine sur radoj malpezaj li supron tuŝetas fluidan.
 Same, en granda nacio, tuj kiam ribelo krevegas,
 Kiam popola amaso malnobla, freneze flamanta,
 Ŝtonojn kaj fajrojn elĵetas, (ĉar donas kolero armilojn;) 150
 Tiam se viro tre grava pro sia pieco kaj indoj,
 Montras okaze sin, ĉiuj silentas, atentan orelon
 Levas : li regas parole, animojn dolĉigas kaj korojn.
 Tiel do, ĉiu ondega foriĝis bruego, tuj kiam
 Maron rigardis la Patro : nun li sub ĉielo veturas, 155
 Gvidas ĉevalojn sen brido, kaj flugas sur akvo trankvila.
 Sed Eneanoj lacegaj al lando proksima rapide
 Penas alnaĝi, kaj bordon Libujan surrampas, savitaj.
 Tie, en rodo profunda, ĵus kuŝas insulo, kaj ĝiaj
 Flankoj kurbetaj fariĝas haveno, kaj rompas ondegojn, 160
 Kiuj de alte alkuras, du fluojn igante kontraŭajn.
 Staras ĉi tie kaj tie grandegaj ŝtonegoj; duopaj
 Rifoj ĉielon minacas, kaj, tiu sub larĝa rifuĝo,
 Ondoj silentas ŝirmataj : pli supre, arbaro altiĝas
 Amfiteatre; kaj kovras havenon per ombro terura. 165
 Inter pendantaj ŝtonegoj, ĉe flanko kontraŭa, kaverno
 Fonton enhavas puregan, kaj seĝojn en ŝtonaj kavaĵoj :
 Estas sidejo de Nimfoj. Kaj tie neniel bezonas
 Ŝipoj lacegaj ligilojn, nek kurban de ankro dentegon.
 Rekolektinte sep ŝipojn nur, inter la tuta ŝiparo, 170

- Tien aliras Eneo : de amo fervora al tero
 Ekinstitaj, marbordon savantan okupas Trojanoj,
 Poste tuj membrojn, de ondo malsekajn, sur sablon eten-
 Tamen silikon frapinte, fajron sprucigas Akato, [das.
- 175 Fajron ricevas sur muskon, kaj sekajn cirkaŭe foliojn
 Metas, dum flamo el ligno nutranta rapide eligas.
 Tiam Cereson, de akvo putrantan, kaj ilojn Ceresajn
 Kaptas Trojanoj malsataj, kaj grenon trovitan en ŝipoj
 Flame sekigi komencas, kaj poste per ŝtono dispremas.
- 180 Tamen Eneo ŝtonegon surrampas kaj vidon direktas
 Tre malproksimen sur maron, serĉante ĉu tien li vidus
 Eble Anteon, de ventoj ĵetitan, remŝipojn Frigujajn,
 Eble Kapinon, aŭ eble armilojn de ŝipoj Kaicaj.
 Estas vidata ŝiparo nenie. Sur bordo tri cervojn
- 185 Tiam li vidas vagantajn : kaj tuta anaro, malantaŭ
 Ili, sekvadas, dum granda cervaro tra valo sin paŝtas.
 Haltas Eneo kaj prenas pafarkon kaj sagojn rapidajn,
 Kiujn kunportis Akato fidela; kaj ĉefojn unue
 Li ekmortigas, en kapon altkreskan, ĉe kornoj branĉformaj,
- 190 Ilin frapante; kaj poste ceterajn, kaj tutan cervaron
 Li persekutas per sagoj, tra ombro de arboj branĉhavaj.
 Fine li ĉesas nur, kiam, venkinte, sep korpojn plej gran
 Teren li ĵetis : ĉar nombro egalas al tiu de ŝipoj. [dajn
 Tiam havenon li trafas por inter amikoj dividi
- 195 Iian ĉasajon, kaj vinon; — ĉar je ĝi bonkora Acesto
 Iam, ĉe bordoj Sicilaj, ŝiparon plenigis ironan. —
 Poste, per tiuj paroloj, li korojn konsolas ĉagrenajn :
 « Karaj kunuloj, memoru : ni ĉiuj pli grandajn dange-
 Iam suferis : sed tiujn ĉi finos ankoraŭ diaĵo. [roj
- 200 Scilan koleron, kaj ĝiajn ŝtonegojn profunde bruantajn
 Iam proksime vi vidis : vi ankaŭ Ciklopan kavernon
 Estas konintaj. Nu! korojn relevu kaj pelu malĝojan
 Timon; ĉar eble pri tiu memoro vi estos feliĉaj.
 Ni, tra diversaj laboroj, tra ankaŭ malhelpoj sennombraj,
- 205 Trafas Latujon, sed tie ripozon rezervas Fataloj;
 Tie Fataloj Trojanan permesos renaski potencon.
 Do, pacience; kaj tagojn feliĉajn atendu kuraĝe. »
 Tiel li diris : dum lia vizaĝo esperon ŝajnis,

Koron malĝojan disŝiras kaj premas kruela ĉagreno.
 Ili ĉasaĵan akiron preparas por manĝo estonta, 210
 Haŭton de ripoj disigas, kaj tubon malkovras intestan.
 Tranĉas unuaj viandon tremantan, ĝin poste trapikas;
 Vazojn sur bordon surmetas aliaj, kaj zorgas pri fajro.
 Tiam do fortojn per manĝo bonigas Trojanoj, glutante
 Vinon malĵunan kaj grasan ĉasaĵon, sur herbo kuŝantaj. 215
 Kiam malsaton ĉesigis manĝaĵo, formetas Trojanoj
 Tablojn, kaj longe parole perditajn memoras amikojn.
 Korojn espero kaj timo ŝancelas : ĉu ili ankoraŭ
 Vivas? ĉu male alvokon ne povas aŭskulti malvivaj?
 Pia Eneo precipe pri sorto de forta Oronto 220
 Ĝemas; kaj tial Amikon, kruelan de Liko fatalon,
 Grandan Kloanton kaj Gion kuraĝan fundkore li ploras.
 Kiam do finis Trojanoj, Jupitro, de alta ĉielo, [fine
 Maron kun ŝipoj, kaj landojn kuŝantaj, kaj bordojn, kaj
 Grandajn rigardis popolojn : li tiam sur supra Olimpo 225
 Haltis, kaj tie al regno Libuja direktis okulojn.
 Siajn pensadojn dum li en animo potence ruladas,
 Tute malĝoja, kun larmoj en siaj beletaj okuloj,
 Tiel parolis Venuso : « O Estro, vi kiu aferojn
 Diajn kaj homajn eterne regadas, kaj tondre timigas, 230
 Kia kulpego farita do estas de mia Eneo,
 Kiu Trojanojn, post tiom da gravaj suferoj, malhelpas,
 Pro Italujo, kaj fermas por ili la mondon ceteran?
 Tamen el ili, post multe da jaroj pasontaj, Romanoj
 Devos naskiĝi, el sango Trojana iĝinta pli juna, 235
 Kiuj al maroj, kaj landoj tutmondaj potence komandos.
 Tion vi, Patro, promesis : nun kio do ŝanĝis projekton?
 Tial, pri Trojo falinta kaj ĝia ruino plorinda,
 Mi min konsolis; ĉar kontraŭ estinto mi metis estonton.
 Sama Fatalo Eneon, post tiom da malprosperegoj, 240
 Nun persekutas. Ĉu baldaŭ, ho reĝo, finiĝos laboro?
 Seĉ Antenoro, el manoj savita Aĥajaj, sukcesis.
 Li Illirujan landlimon, sen ia danĝero, kaj regnon
 Povis penetri Liburnan profunde, kaj fonton Tirmavan
 Ankaŭ transiri; — ĉi tiu, per naŭ enfluoj, kun ĝranda 245
 Bruo, el monto eliras, kaj ĝeme tra kampoj verŝiĝas. —

Tiam li urbon Patavan konstruis, nacion Trojanan
 Tien loĝigis, kaj, genton nominte, Trojanajn armilojn
 Pendis : nun li mem ripozas trankvile en paco kvieta.

250 Tamen ni, via idaro, al kiu vi domon ĉielan
 Iam promesis, ni perdas ŝiparon; kolero de unu
 Ĉiam nin premas, kaj el Italuja eljetas patrujo.
 Tiel nin piajn ĉu vi rekompencas? ĉu metas en regnon?»

Patro de dioj kaj homoj ridetis, per tiu vizaĝo

255 Kiu ĉielon kaj grandajn ventegojn tuj igas kvietaj.

Fronton filinan li kise tuŝetis, kaj tiel parolis :

« Timon forpelu, Citera : pri via naskito, Fataloj

Estas senmovaj. Vi urbon kaj murojn de la promesita

Vidos Lavino : ĝis astroj ĉielaj vi povos altigi

260 Vian Eneon grandkoran : neniel mi ŝanĝis projekton.

Tion mi ankaŭ konfesos, — ĉur tiu vin zorgo okupas, —

Kaj eĉ fatalajn malkovros sekretojn pri longa estonto.

Grandan batalon li en Italujo farinta, kruelajn

Gentojn rompegos, kaj murojn kaj leĝojn li donos al viroj.

265 Post tri someroj, dum kiuj li regos en lando Latuja,

Kiam tri vintroj forpasos post lasta malvenko Rutula,

Tiam Askano, — al kiu alnomo Iulo donata

Estas, ĉar Ilo li estis dum staris Ilia potenco, —

Dum amasigos monatoj fluantaj tridekon da jaroj,

270 Regnon daŭrigos, kaj poste, el urbo Lavina portinte

Tronon ĝis Albo la Longa, li tiun fortege konstruos.

Tie, tricenton da jaroj, potence Hektora idaro

Regos, ĝis kiam reĝina pastrino, de Marso amita,

Nome Ilio, du Marsajn naskitojn per nasko eligos.

275 Poste, fiera pri felo brunruĝa de tiu lupino

Kiu lin nutris, Romulo popolon potencos, kaj Marsan

Muron konstruos, de nomo mem propra nominte Roma-

Povon ilian nek tempe nek space mi volas limigi. [nojn.

Regnon senfinan al ili mi donos. Kruela Junono, .

280 Kiu nun maron, ĉielon kaj teron pro timoj lacigas,

Aŭdos kaj sekvos pli bonajn konsilojn, kaj kun ni protektos

Estrojn de mondo, potencajn Romanojn, per togo vestitajn.

Tiel mi volas. Post multa daŭrigo de jaraj kvinopoj,

Iu, naskita el sango potenca de Asaracidoj,

Venkos Mikenon kaj Ftion, kaj Argon regados venkitan. 285
 Estas naskota Cezaro, Trojana de glora deveno;
 Ĝis Oceano kaj astroj li regnon kaj famon etendos.
 Nomo Julio elvenos el tiu de granda lulo.
 Iam ĉielen lin, de Orienta akiro ŝargitan,
 Vi mem trankvile ricevos : kaj homaj lin preĝoj alvokos. 290
 Tiam jarcentoj kruelaj finiĝos, finiĝos bataloj.
 Fido antikva, kaj Vesto, kaj Remo kun frato Kvirino,
 Leĝojn alportos, dum feraj katenoj kaj fortaj ligiloj
 Pardon Bellonan fermados : interne malpia Furoro
 Sidos sur feraj armiloj kruelaj : cent kupraj katenoj 295
 Ligos ŝin dorse, kaj buŝo sangruĝa freneze kriegos. »
 Tiel li diris : kaj filon Maian li sendas el supre,
 Por ke, en lando kaj inter Kartagaj novmuroj, gastamon
 Koran ricevu Trojanoj : ĉar Dido ne konas Fatalon;
 Urbon ŝi eble ekfermus. Li flugas tra vasta aero, 300
 Dank'al flugiloj, kaj bordon Libujan rapide aliras.
 Jam li ordonon plenumis; humoron sovaĝan forlasas
 Penoj : ĉar tion deziras diaĵo : reĝino unua
 Sentas pri ili trankvilan animon kaj pensojn amikajn.
 Tamen la pia Eneo, multege dum nokto pensinte, 305
 Kiam la lumo viviga montriĝis, eksteren aliras.
 Lokojn li novajn esploras : ĉar kien lin puŝis ventego?
 Kiaj loĝantoj? ĉu viroj? ĉu bestoj? ĵus lando dezerta
 Ŝajnas. Li vidi deziras, por siajn sciigi amikojn.
 En internigon arbaran li kaŝas ŝiparon, sub rifo 310
 Kava; kaj arboj ĝin kovras ĉirkaŭe per ombro terura.
 Poste li antaŭeniras, de sola Akato sekvata,
 Mane portanta du sagojn, de fero larĝega armitajn.
 Kontraŭ li, lia patrino sin montras, en mezo de arboj,
 Veston, vizaĝon, armilon havante de Sparta knabino, 315
 Al Harpalico Tracuja simila, ŝi kiam lacigas
 Kure ĉevalojn, kaj Eŭron flugantan antaŭen rapidas.
 Siaj al ŝultroj kutiman pafarkon belmove pendigis
 La ĉasistino, lasante tra ventoj flugeti hararon :
 Nudan genuon vidigis la vesto, per ligo levita. 320
 « Haltu, junuloj, ŝi diris unue; ĉu vi do ne vidis
 Iun fratinton okaze en tiu ĉi loko vagantan?

Ŝi, per sagujo kaj felo makula de linko zonita,
Eble de apro ŝaŭmanta kun kriroj alsekvas kuradon. »

325 Tiel parolis Venuso; kaj filo Venusa respondis :

« Iun el viaj fratinoj mi aŭdis kaj vidis nenie,
O virgulino; vin kiel mi nomos? Ĉar via vizaĝo
Iloma ne ŝajnas, nek voĉa sonado. Vi certe diino
Estas, ĉu Feba fratino, ĉu Nimfa de sango naskita.

330 Estu favora, vi, kiu ajn estas, kaj helpu laboron.
Diru sub kiun ĉielon, en kiun nin landon ventego
Puŝis : nek virojn, nek lokojn konantaj, ni ĉie eraras,
Tien per ventoj kaj vastaj ondegoj mizere ĵetitaj.
Antaŭ altaroj, ni multajn, je danko, buĉados oferojn. »

335 Tiam Venuso : « Je tiu honoro mi estas ne inda.
Ĉiam kutimas Tiranaj knabinoj kunporti sagujon,
Ĉirkaŭ piedoj kaj kruroj purpuran zoninte boteton.
Regnon vi vidas Penujan, Tiranojn kaj Agenorurbon :
Estas sed lando Libuja, ĉe gento batale kruela.

340 Regnon potencas nun Dido. Ŝi patran Tirurbon forkuris,
Fraton lasinte. Pri ŝiaj suferoj malluma kaj longa
Estus rakonto : nur ĉefajn mi volas tuŝeti fariĝojn.
Edziniĝinta ŝi estis Sikeon, plej riĉan el ĉiuj
Fenicianoj; kaj ŝi, malfeliĉa, lin amis fervore.

345 Virgan, de patro donitan, unuaj promesoj ŝin al li
Ligis. Sed estis Tirurbo al frato jam apartenanta
Pigmaliono, pli krime kruela ol ĉiuj aliaj.

Kontraŭ ŝi baldaŭ naskiĝis malamo : kaj tiu malpia,
Antaŭ altaro, Sikeon, pro blinda amego de oro,

350 Buĉas sekrete per glavo, zorgante neniel pri granda
Amo de sia fratino. Longtempe li, krimon kaŝanta,
Ruzojn elpensis kaj trompis vidvinon per vana espero.
Tamen, en ŝia dormado, de edzo ne entombigita
Ombro aperis, kun pala vizaĝo, — vidaĵo terura! —

355 Sangan altaron, kaj bruston per fero boritan li montris
Nude; kaj krimon li tute rakontis, en domo faritan.

Tiam li provi forkuron admonas, kaj lasi patrujon.
Ŝian por helpi vojaĝon, antikvan en tero kaŝatan

360 Nun nekonatan. Forkuron preparas kun siaj kunuloj

Dido tremanta. Sed multaj kruelan malamas tiranon :
 Ili timantaj alkuras, velŝipojn okaze armitajn
 Kaptas, je oro plenigas, kaj Pigmalionajn riĉaĵojn
 Portas sur maron : por tion plenumi nur ĉefis virino.
 Ili alvenas al loko ĉi, kie vi vidis muregojn 365
 Grandajn, kaj, supre starantan, altaĵon de nova Kartago.
 Poste ŝi tiom da tero aĉetis, — pri tio, ŝi nomis
 Birso ĝin, — kiom ŝi povus per ledo ĉirkaŭi bovvara.
 Tamen, vi, kiaj vi estas? El kiuj elvenas vi bordoj?
 Kien vi iras? Mi petas. » Al tiu demando respondis 370
 Ĝeme Eneo; kaj voĉo profunde el brusto eliris :
 « Se, de deveno, mi devuŝ, diino, pri ĉio paroli,
 Se vi dezirus de mia laboro aŭskulti rakonton,
 Tagon antaŭe kaj pordon Olimpan ekfermus Vespero.
 Nin, el antikva Trojurbo, portitajn tra maroj diversaj 375
 Ĵetis hazarde sur bordon Libujan terura ventego.
 — Nomo Trojurba ĉu venis okaze al viaj oreloj? —
 Pia Eneo mi estas, ĝis astroj famege konata.
 Miajn Penatojn mi, de malamikoj rabitajn, en ŝipoj
 Portas; Italian patrujon mi celas, kaj rason Jupitran. 380
 Dudek velŝipojn armite, mi dian obeis ordonon;
 Vojon ĉar montris diina patrino, sur maro Friguja.
 Ve! sep apenaŭ indulgis nun Eŭro, kaj ondo kolera.
 Mi nekonata, mizera, Libujan trairas dezerton;
 Ĉar min Eŭropo, Azio forpelas. » Sed tiam Venuso, 385
 Plie ne aŭdi povanta, rakonton en mezo haltigis :
 « Kiu ajn estas vi, kredu min : vin per okuloj malamaj
 Dioj ne vidas; ĉar urbon Tiranon vi trafis, savita.
 Vojon nur sekvu, kaj domon reĝinan aliru trankvile.
 Poste vi trovos kunulojn kaj ŝipojn, en loko ŝirmata, 390
 Baldaŭ : mi tion certigas : ĉar estas venkita ventego;
 Certa se estas divena scienco, de patro lernita.
 Vidu dekduon da cignoj ĝojantaj, amase flugantaj.
 Birdo Jupitra, el alta ĉielo falinta, tra vasta
 Ilin forpelis aero : nun, longa laŭ vico, ĉi tiuj 395
 Sajnas, ĉu teron aliri, ĉu lokon serĉadi favoran.
 Kiel sin ili kolektas, flugilojn ludante agitas,
 Kaŝas je aro nubetojn, kaj kantojn sendadas ĝis astroj,

- Tiel do via ŝiparo kaj viaj kunuloj, ĉu staras
 400 Jam en haveno, ĉu, plena je velo, en rodon eniras.
 Vi do, rapidu; kaj kien vin vojo kondukos ekiru. »
 Diris ŝi, poste foriris, dum kolo rozeta brilegis;
 Dum ambrozian kaj dian odoron elspiris hararo.
 Vesto ĝis ŝiaj glitetis piedoj: ŝi, dank'al irado
 405 Vere aperis diino. Li tiam patrinon rekonas,
 Dum ŝi forkuras: je tiuj paroloj li ŝin persekutas:
 « Kial, patrino kruela, min, filon, per vanaj ŝajnigoj,
 Tiel vi ofte trompadas? Ĉu manon kunigi kun mano
 Estis neeble? Ĉu verajn aŭskulti kaj diri parolojn? »
 410 Tiun riproĉon farinte, muregon rapide li celas.
 Tamen Venuso iranton envolvas en nubo malluma:
 Poste nebulan vualon ĉirkaŭe dikigas diino,
 Por ke neniu lin povu rigardi, lin tuŝi, nenian
 Kaŭzi prokraston, kaj de aliranto ekpeti klarigon.
 415 Tiam ŝi Pafon, tra spaco reiras; kaj sian loĝejon
 Tute ĝojanta revidas, kaj templon: ĉar Saba aromo
 Sur cent altaroj bruladas, dum freŝaj parfumas girland-
 Tien do, kien lin vojo kondukas, aliras Eneo. [doj.
 Kontraŭ Kartago starantan jam krutan li monton surram-
 420 Ĝi fortikaĵon kaj muron superas de alta supraĵo. [pis:
 Kie dometoj kuŝadis, nun staras belegaj palacoj.
 Tion admiras Eneo, kaj pordon, kaj stratan pavimon.
 Kore kaj brue laboras Tiranoj: dum unuj longigas
 Murojn, altaĵon konstruas, kaj ŝtonojn sublevas per mano;
 425 Lokon por domo okupas aliaj, sulketon ĉirkaŭe
 Faras, kaj gravan senaton, juĝistojn, urbestrojn elektas.
 Fosas ĉi tiuj havenon, dum tiuj teatran fondaĵon
 Zorge preparas profunde, kaj grandajn kolonojn en masoj
 Tranĉas ŝtonegaj, belegan ornamon por scenoj estontaj.
 430 Same abeloj, dum nova somero, tra kampoj florantaj,
 Faras sub suno laboron: idaron unuaj edukas
 Junan, nacian esperon; puregan mielon densigas
 Zorge aliaj, kaj ĉelojn plenigas je dolĉa likvoro.
 Tiuj kunulojn de ŝarĝo senigas, kaj, aron farinte,
 435 Tiuj, el domo abela, frelonan forpelas amason.
 Ĉiuj klopodas, kaj jam timiana parfumus mielo.

« Kiom feliĉaj, ĉi tiuj! Jam muroj iliaj stariĝas! »
 Diris Eneo; kaj tiam li urbajn rigardas tegmentojn,
 Poste, de nubo kaŝata, — mirinda rakonto! — aliras
 Mezen de urbo; kaj, inter pasantoj, neniu lin vidas. 440

Sankta arbaro troviĝis en mezo de urbo, agrable
 Ombra : de ondoj kaj ventoj al tiu ĉi loko ĵetitaj,
 Penoj kaposton de bela ĉevalo el tero eltiris.

Tio, embleme montrita de sankta Junono, signifis :
 Forta batale fariĝos popolo, kaj granda riĉece. 445

Tie, por Tira Junono, grandegan preĝejon konstruis
 Dido : ĝin riĉaj plenigas donacoj kaj Eco diina.

Estas el bronzo la sojlo, al kiu ŝtuparo kondukas :
 Rulas sur traboj de bronzo pordhokoj de bronzaĵ porde-
 Tiam unue de tiu arbaro mirinda vidaĵo [goj]. 450

Timon forpelis : unue Eneo kuraĝis esperi
 Savon, kaj fine al ĝoja estonto pli bone konfidi.

Ĉar dum de tiu preĝejo belaĵojn li zorge rigardas,
 Dum li reĝinon atendas, kaj urbajn admiras riĉaĵojn,
 Kaj laboristan lertecon kaj ankaŭ belecon laboran, 455

Tiam li vidas Trojanajn batalojn, laŭ vico pentritajn,
 Tiujn militojn pri kiuj la famo tutmonde koniĝis,
 Reĝon Priamon, Atridon, Aĥilon pri ambaŭ kruelan.

Tie li haltas, ploranta, kaj : « Kiu nun loko, li diris,
 Kiu nun lando je niaj agadoj ne estas jam plena? 460
 Vidu Priamon, Akato, ĉi tie li trovis justecon.

Estas suferoj plorataj, kaj korojn kortuŝas doloroj.

Timon forpeli; ĉar tiu ĉi famo fariĝos savado. »
 Tiel li diras, kaj nutras animon je vana pentraĵo,
 Multe ĝemante, dum larmoj sennombraj fluadas sur van- 465

Ĉar, en bataloj ja ĉirkaŭ Pergamo faritaj, li vidas [gojn.
 Grekojn venkitajn, dum ilin Trojanaj premezas junuloj,
 Poste Friganojn, dum ilin sur ĉaro mortigas Aĥilo.

Rezan tendaron, kun blankaj vualoj, proksime Eneo
 Tiam rekonas, plorante; li vidas Tididon kruelan 470

Kiu ĝin rabas, en dormo unua, per sanga buĉado,
 Poste vivegajn ĉevalojn kondukas al tendoj, Trojanajn
 Antaŭ ol ili gustumos pastaĵojn kaj trinkos en Ksanto.
 Flanke, Troilo forkuras, lasinte armilojn, plorinda

- 475 Knabo : li kontraŭ Aĥilo batalon ne faris egalan.
 For veturilo malplena pendantan lin trenas ĉevaloj,
 Bridon ankoraŭ tenantan : treniĝas hararo kaj kolo
 Tere; kaj lanca pikilo sulketon sur sablo desegnas.
 Poste, al templo de tiu maljusta Palaso, Iliaj
- 480 Iras virinoj, kun haroj malpuraj; kaj portas vualon
 La preĝantinoj malĝojaj, kaj bruston per mano frapadas.
 Havas kontraŭa diino okulojn al tero fiksitaĵn.
 Ĉirkaŭ la Troja murego trifoje Aĥilo Hektoron
 Trenas, kaj korpon senvivan por oro li vendas al patro.
- 485 Tamen Eneo profunde eltiras el brusto ĝemadon,
 Kiam li ĉaron, armilojn kaj korpon de sia amiko
 Vidas, kaj sine Priamon du manojn senarme levantan.
 Li sin mem ankaŭ rekonas en mezo de reĝoj Aĥajaj,
 Kaj Orientajn armilojn, kaj sagojn de nigra Memnono.
- 490 Amazonian anaron, kun ŝildoj lunformaj, kondukas
 Penteseleo kolera, multegajn ĉefanta virinojn.
 Zonon de oro liginte sub mammo sen vesto, militas
 La soldatino; kaj virojn batali kuraĝas knabino.
 Dum Dardanida Eneo pentraĵojn rigardas belegajn,
- 495 Dum li admiras, senmova starante en miro sincera,
 Dido, majesta kaj bela virino, al templo aliras.
 Multa anaro junula ŝin sekvas, farante kortegon.
 Kiel, al bordo Eŭrota aŭ alta montaro de Cinto,
 Ĥorojn dancantajn Diano kondukas, dum mil Oreadoj.
- 500 Tie kaj tie ŝin sekvas amase : sur ŝultroj sagujon
 Portas diino, kaj nimfojn je kapo superas ludantajn :
 Koron Latonan sekrete batigas intima ĝojeco.
 Tiel do Dido aperas, kaj inter anaro aliras,
 Rapidiganta plezure laboron kaj regnon estontan.
- 505 Ŝi, sur la sojlo diina, en mezo de templa arkaĵo,
 Inter gardistoj, sur tronon altegan sidiĝas majeste.
 Juĝojn kaj leĝojn ŝi donis al viroj, laborojn farotajn
 Ĝustaj en partoj disdonis, aŭ ilin egale lotumis;
 Kiam subite Eneo, tra multa anaro, alpaŝi
- 510 Vidas Anteon, Sergeston, kaj fortan Kloanton, kaj poste
 Ĉiujn aliajn Trojanojn mem, kiujn ventego kaj ondoj
 Iam forpelis kaj puŝis al bordoj neniel proksimaj.

Miras Eneo kaj staras senmova; samtempe Akaton
 Ĝojo kaj timo tremigas : li manojn iliajn ekpremi
 Forte deziras; sed tiu fariĝo timigas animojn. 515

Ambaŭ ŝajnigas, kaj, densa en nubo kaŝataj, rigardas.
 Kio okazis kunulojn? Al kiu marbordo alnaĝis
 Ŝipoj? Ĉu estas senditoj? Jes: Ilin, por helpon petegi,
 Sendis ŝiparo; kaj templon kun krioj aliras Trojanoj.

Ili eniras : kaj Dido laŭtan permesas parolon. 520

Tiam do Ilioneo plej aĝa trankvile komencas :
 « Granda reĝino, al kiu Jupitero permesis konstrui
 Novan Tirurbon, kaj juste sovaĝajn potenci popolojn,
 Vin ni, Trojanoj mizeraj, per ventoj skuitaj tra maroj,
 Petas; el ŝipoj manĝeman kaj kriman forigu bruladon; 525

Pian popolon indulgu : unue nin konu pli bone.
 Tien ni venis, nek por ruinigi Libujajn Penatojn,
 Nek por akiron rabitan de lando forporti sur ŝipoj.
 Ne : fiereco ne taŭgas venkitojn, ne estas en koroj.
 Loko ekzistas, de Grekoj nomata nun lando Hespera, 530

Regno antikva, potenca batale kaj fruktoportega,
 Iam loĝita de viroj Enotraj. Nun famo ilian
 Nomas idaron : Italoj, el nomo de ĉefo nacia.
 Tien ni iris,

Kiam subite Orio nubega sublevas akvaron, 535

Vokas Aŭsteron koleran, al rifoj kaŝitaj alpuŝas
 Ŝipojn, tra ondoj, tra akraj ŝtonegoj nin persekutanta.
 Iuj ĝis bordoj Libujaj alnaĝis : ve! estis malmultaj!
 Virojn ni trovis; sed kiajn? Sed kia patrujo permesis
 Tian kutimon sovaĝan : gastamon de ripo rifuzi. 540

Ili batale minacas, kaj teren nin iri malhelpas.
 Certe homaron kaj virajn armilojn vi povas ne timi,
 Sed ne diaron; ĉar dioj memoras malbonon kaj bonon.
 Reĝo Eneo potencis nin : certe neniu pli justa
 Estis kaj pia, pli granda saĝeĉe, pli forta milite. 545

Tiun se viron Fatalo konservis, kaj se li ĉielan
 Spiras aeron, en ombro mortiga se li ja ne kuŝas,
 Vi, pri servado farita, ne pentos; mi al vi certigas.
 Estas en lando Sicila kamparoj kaj urboj; ni ilin
 Havas ankoraŭ, kaj faman Aceston el sango Trojana. 550

Ŝipojn, de vento rompitaĵn, al bordo altiri permesu,
 Kaj en arbaro trabaĵojn ektranĉi kaj fari remilojn.
 Se Italujon, kunulojn kaj reĝon trovinte, ni povas
 Celi, ĝin tiam kaj ankaŭ Latujon feliĉaj ni trafos;
 555 Sed, ve! se savo ne ebla fariĝas, se maro Libuja,
 Patro Trojana, vin glutis, se ĉiun esperon lulo
 Perdis, la bordon Sicilan, el kie ni ĉiuj devenas,
 Landon gastaman kaj reĝon Aceston aliri ni povu. »
 Ilioneo silentis; samtempe murmuris aprobe

560 Idoj Dardanaj.

Tiam vizaĝon mallevas kaj tiel mallonge parolas
 Dido : « Trojanoj, el koroj eligu ĉagrenon, kaj timon
 Skuu. Neceso maldoĉa kaj regna komenco min tiel
 Fari devigas; kaj zorge landlimon mi devas protekti.
 565 Kiu Enean nacion, kaj kiu de Trojo ne konis
 Viran kuraĝon, militon gloregan kaj sangan bruladon?
 Koron kruelan, animon malspritan, ni Penoj ne havas,
 Kaj malproksime de urbo ĉevalojn ne jungas sundio.
 Ĉu Hesperujon vi grandan kaj kampon deziras Saturnan?
 570 Ĉu regionon Eriksan aŭ regnon Acestan vi celas?
 Tie helpadon vi trovos, kaj al vi mi donos rimedon.
 Aŭ ĉu, en tiu ĉi regno, vi kun mi restadi preferas?
 Urbo ĉi, kiun mi fondas, fariĝos la via : retiru
 Ŝipojn : Trojanoj, Tiranoj, al miaj okuloj egalas.
 575 Estus feliĉe se, sama per Noto puŝita, Eneo
 Reĝo mem tien enirus! Por bordon esplori mi sendos
 Virojn fidindajn, kaj randon viziti de lando Libuja.
 Eble en urbon, aŭ eble arbaron, li vagas, ĵetita. »

Kiam ĉi tiuj paroloj animojn ekfaris kvietaj,
 580 Forta Akato kaj patro Eneo, el nubo deziris
 Forte eliri. Unue Eneon demandas Akato :
 « Filo diina, nun kiun projekton vi volas plenumi?
 Ĉio tre bone fariĝas : kunuloj kaj ŝipoj savitaj
 Estas, krom unu; ĉar tiun en ondon ni vidis dronantan;
 585 Ĉiu fariĝo al vortoj patrinaj ĵus bone respondas. »
 Tion apenaŭ li diris, tuj tiam subite ŝiriĝas
 Nubo ĉirkaŭa, kaj ĝi en vaporan solviĝas aeron.
 Tiam aperas Eneo : je lumo li brilas purega;

Sajnas vizaĝo kaj kresko diaĵaj : ĉar belan hararon
 Blovis sur filon patrino, kaj junan ruĝhelon sur vangojn : 590
 Liajn okulojn plenigas beleco kaj ĉarmo tre plaĉa.

Tiel do elefantoston artisto beligas, kaj ĉizas
 Ĉirkaŭ Parosa marmoro arĝentajn kaj orajn ornamojn.

Antaŭ reĝino kaj tuta anaro mirinta li tiam

Tiel parolis : « Jen estas mi, tiu mem kiun vi serĉas, 595

Reĝo Trojana Eneo, el ondoj savita Libujaj.

Dido, vi sola Trojanojn mizerajn kompate akceptis.

Al ni, savitaj el sagoj Danaaj, kaj kiuj suferis

Ĉiujn sur tero kaj maro danĝerojn, dum ĉio nin mankas,

Urbon kaj domon vi kore proponas : ni dankon sufiĉan. 600

Al vi prezenti ne povas, kaj same neniu el multaj

Viroj Dardanaj, hazarde vagantaj tra mondo vastega.

Ke al vi dioj, — se tamen piecon Diegoj honoras,

Ie se estas justeco kaj iu amanta verecon, —

Donu premion konvenan. Vin kiaj jarcentoj feliĉaj 605

Vidis naskiĝi! kaj kiuj gloregaj vin naskis gepatroj!

Tiel do longe ke kuros riveroj kuŝujon, ke montojn

Kovros je ombro arbaroj, ke nutros astraron poluso,

Ĉiam en koro restados honoro, kaj laŭdoj, kaj nomo,

Ĉien eĉ kien min vokos Fataloj. » Kaj, tiel dirinte, 610

Ilioneon li dekstren manprenas, maldekstren Sereston,

Poste aliajn, kaj Gion fortegan kaj fortan Kloanton.

Dido Sidona unue ekmiris, Eneon vidinte,

Kaj aŭskulkinte rakonton : kaj poste, ŝi tiel parolis :

« Kia do, filo diina, tra tiom da gravaj danĝeroj, 615

Vin persekutas Fatalo, al tiuj sovaĝaj puŝanta

Bordoj? Ĉu estas vi tiu Eneo mem, kiun Venuso

Naskis de patro Anĥizo, ĉe bordoj Friguĵaj Simoaj?

Teŭkron, mi certe memoras, Sidonen mi vidis venintan.

Landon patrujan lasinte, li novan, per helpo de Belo, 620

Regnon serĉadis; dum mia naskinto de Cipro riĉega

Faris ruinon, kaj tiun insulon venkinte potencis.

Tiu de tempo, mi konis Trojurbon kaj malfeliĉaĵojn

Ĝiajn, kaj kiel vi estas nomata, kaj reĝojn Pelasgajn.

Kvankam li Trojon malamis, li tamen Trojanojn laŭdadis 625

Multe, kaj esti naskita de raso antikve Trojana

Diris. Do, venu, junuloj; en niajn eniru loĝejojn.

Ĉar min mem ankaŭ, Fatalo, post multaj laboroj similaj,
Ĵetis en tiun ĉi landon, kaj tie min resti devigis.

630 Mi mem estinte mizera, mizerojn mi scias helpadi. »

Tiel ŝi diris, samtempe Eneon en sian kondukas
Domon; samtempe ŝi preĝojn en temploj diaĵaj ordonas.
Tamen ŝi sendas al ĉiuj kunuloj, sur bordo lasitaj, [regoj,
Dudek bovviroj, cent porkojn grandegajn kun longaj ha-
635 Plie cent grasajn ŝafidojn kun ĝiaj patrinoj : ĉar tagon
Devas ĝojigi donacoj.

Tamen interno palaca ĵe lukso brilegas reĝina,
Kaj prepariĝas en vasta ĉambraro festeno belega :
Arte faritaj tapiŝoj purpure koloraj; sur tablo,
640 Multe da vazoj argentaj; en oro ĉizitaj, agadoj
Grandaj de patroj, longega serio de faktoj faritaj,
De la deveno de gento antikva, de tiom da viroj.

Tamen Eneo, — ĉar patra amego neniel laciĝas
Kore, — al ŝipoj aliri rapide ordonas Akaton,

645 Por ke li filon pri tio informu kaj urben konduku.
Estas Askano de tiu ĉi patro la sola zorgado.

Plie, donacojn, el Troja ruino tra flamoj rabitajn,
Preni li sendas lin : veston desegne kaj ore brilantan;
Poste vualon de flava akanto, artege broditan,

650 Kiun Arguja Heleno surmetis, ŝi kiam Mikenon
Lasis, kaj trafis Pergamon por kriman kontrakti edziĝon :
Tiu ĉi estis mirinda donaco de Ledo patrino;
Plie la sceptron kaj la ĉirkaŭkolon de perloj, portitajn
Iam de Ilioneo, unua filino Priama :

655 Fine la kronon brilantan je oro kaj riĉaj juveloj.
Tiam rapide al ŝipoj fidela aliras Akato.

Tamen Citera aliajn projektojn kaj novan en koro
Ruzon pretigas : ŝi volas ke filo Cupido vizaĝon
Ŝanĝu, kaj ŝajnon; kaj, tiujn de dolĉa Askano preninte,

660 Venu, donacojn portanta, reĝinon bruligi, kaj fajron
Ĵeti en ostojn. Ĉar domon ŝi timas trompeman, Tiranojn
Lange duoblajn, Junonon kruelan : kaj nokte ŝin tiu
Zorgo turmentas. Al Amo fluganta ŝi tiel do diras :
« Filo, vi estas nun mia espero, potenco kaj forto.

Filo, vi kiu ridetis pri sagoj Tifeaj de Patro, 665
 Al vi mi tute rifuĝas; helpadon mi petas, preĝante.
 Vian frateton Eneon, tra ondoj, al ĉiuj marlimoj
 Ŝetas maljuste malamo Junona, kaj lin persekutas.
 Tion vi scias; kaj ofte doloron vi mian konsolis.
 Dido Fenica haltigas kaj tenas, per vortoj amindaj, 670
 Lin; sed mi timas gastigon donitan je helpo Junona.
 Tiu en grava momento, ŝi certe neniel ekdormos.
 Tial mi volas reĝinon en retojn ekkapti, en ŝian
 Koron bruladon enigi; kaj tiel neniu diaĵo
 Povos ŝin ŝanĝi, dum amo Enea ŝin tutan flamigos. 675
 Eblan por fari ĉi tion, nun mian aŭskultu konsilon.
 Reĝa infano, vokita de patro amanta, kaj mia
 Zorgo karega, al urbo Sidona sin iri preparas,
 Donojn portanta, el maro kaj Troja brulado rabitajn.
 Tiun, per dormo profunda senmovan, en altan Citeron 680
 Aŭ Idalujon, sankteĝajn preĝejojn, mi metos, por ke li
 Ruzon ne konu, kaj nin ne malhelpu per lia ĉesto.
 Lian vizaĝon vi prenu, dum hokto nur unu, ne plie.
 Knabo, de tiu ĉi knabo konatan surmetu figuron.
 Kiam do Dido feliĉa vin prenos sur siajn genuojn, 685
 Dum la reĝina festeno, Liean trinkanta likvoron,
 Kiam en brakoj ŝi premos kaj dolĉe vin kisos, vi tiam
 Flamon sekretan, perfidan venenon, en koron enigu. »
 Amo de sia patrino amata obeas ordonon,
 Kaj, sen flugiloj irante, Iulan imitas marŝadon. 690
 Tamen Venuso en membrojn Askanajn kvietan enverŝas
 Dormon : sur bruston lin prenas diino, kaj portas ĝis altaj
 De Idalujo arbaroj : kaj tie de bona aromo
 Floroj parfumas, Iulon kovrante je ombro dolĉega.
 Jam, obeinte patrino, aliras Kupido al Tiroj, 695
 Reĝajn portanta donacojn, kaj sekvas ridante Akaton.
 Kiam li venas, reĝino, en ĉambro belega, sur lito,
 Kiun ornamas kurtenoj de oro, jam, meze de tablo,
 Sidis : jam patro Eneo, jam ĉiuj Trojanaj junuloj
 Ĝoje alvenis, kaj kuŝas sur litoj el ŝtofoj purpuraj. 700
 Akvon sur manojn disverŝas servistoj, el korboj tirante
 Donon Ceresan, kaj lerte teksitajn alportas buŝtukojn.

- Kvindek virinoj, longvive starantaj en mezo de ĉambro,
 Zorge preparas manĝejon kaj fajron konservas Penatan;
 705 Dum cent aliaj, kaj tiom da sklavoĵoj samaĝaj, sur tablon
 Metas manĝaĵojn, kaj orajn al ĉiuj prezentas kalikojn.
 Tamen Tiranoj al tiu festeno amase alvenas
 Ĝoje, kaj estas petataj kuŝiĝi sur litojn pentritajn.
 Ili admiras donacojn Eneajn, admiras Iulon,
 710 Dian vizagon ruĝvangan kaj dolĉan mensoge parolon,
 Veston kaj ankaŭ vualon broditan de flava akanto.
 Dido precipe, ve! — ĉar ŝin minacas estonta danĝero, —
 Koron satigi ne povas : ŝi brulas, vidante Iulon,
 Dum ŝin egale ekscitas kaj knabo kaj liaj donacoj.
 715 Tiu, tuj kiam Eneon kisadis, al kolo pendinte,
 Amon de patro malvera tuj kiam li grandan satigis,
 Celas reĝinon. Ŝi al li alligas okulojn kaj koron
 Tutan; kaj dum li sur ŝiaj ripozas genuoj, ne scias
 Dido de kiu diaĵo ŝi estas kisata. Sed Amo,
 720 Kiu memoras pri Acidalia patrino, Sikean
 Iom post iom memoron forigas, kaj amon vivegan
 Penas enmeti en koron, de tempo jam longa trankvilan.
 Kiam manĝado finiĝis, tuj tablojn deprenis servistoj,
 Grandajn alportis kalikojn, kaj ilin je vino plenigis.
 725 Bruo eksonas, kaj voĉoj tra larĝaj aŭdiĝas vestibloj.
 Lampoj, el oraj plafonoj pendantaj, kaj ekbruligitaj,
 Brilas; kaj torĉoj flamantaj de nokto paligas mallumon.
 Tiam reĝino kalikon, je oro kaj riĉaj juveloj
 Gravan, postulas, je vino plenigas; — ĉar tiel kutimis
 730 Fari Belidoj kaj Belo, — kaj post eksilento de ĉiuj,
 Diris : « Jupitero, vi kiu gastamon prezidas potence,
 Faru ke tiu ĉi tago por Tiroj kaj Trojaj migrantoj
 Estu feliĉa; ke niaj genepoj konservu memoron.
 Venu do, Bako, vi patro de ĝojo, kaj bona Junono.
 735 Kaj vi, Tiranoj, ĉe festo ĉeestu je koro favora. »
 Tiel ŝi diriŝ : sur tablon ŝi verŝas trinkaĵan oferon;
 Poste unua ŝi vinan likvoron tuŝetas per lipo. [kon
 « Trinku, Bitio, nun », diris ŝi : tiam ŝaŭmplenan kali-
 Tiu ĉi prenas sen timo, kaj trinkas plezure en oro.
 740 Tuj ĉeestantoj lin ĉefaj imitas. Harriĉa lopo

Citron oritan tuŝetas kaj himnojn de Atlo la majstro
 Kantas bonege; ĉu Lunon vagantan, ĉu Sunan laboron;
 Poste el kie devenas homaro kaj brutoj, el kie
 Pluvo kaj fajro, Arkturo, pluvemaj Hiadoj, duopaj
 Ursoj, kaj kial suboceaniĝi rapidas en vintro 745
 Sunoj, kaj kial alveno de nokto somere malfruas.
 Ĉiuj aplaŭdas Tiranoj, kaj ilin Trojanoj imitas.
 Tamen interparoladon daŭrigis longtempe tra nokto
 La malfeliĉa reĝino, kaj aman trinkadis venenon,
 Multe scivola pri reĝo Priamo, pri glora Hektoro. 750
 Kiaj do estis armiloj de filo Aŭrora? kaj kiaj
 La Diomedaj ĉevaloj? Kaj kiel altkreska Ahilo?
 « Kial prefere, ŝi diris, ho gasto, al ni, de deveno,
 Vi ne rakontus Danaajn insidojn, kaj vian malvenkon,
 Fine do vian kuradon : ĉar de sep someroj pasintaj, 755
 Maraj tra ondoj, kaj mondaj tra landoj, vi ĉiam vagadas. »

KANTO DUA

Ĉiuj silentis atente, kaj supren tenante okulojn.
 Tiam, el lito altega, Eneo parolis la patro :
 « Ne esprimeblan, reĝino, vi petas novigi doloron,
 Kiel Trojanan potencon kaj regnon multege plorindan 5
 Rompis Danaoj : malĝoja afero en kiu mi prenis
 Parton grandegan, kaj kiun mi vidis. Ĉar, tion aŭdante,
 Kiu, Mirmido, Dolopo, kruela soldato Ulissa,
 Larmojn retenus? Sed nokto malseka okupas ĉielon
 Tute rapide, kaj astroj malaltaj invitas dormadon.
 Tamen se amo fervora por niaj suferoj vin puŝas 10
 Koni, kaj lastan mallonge Trojanan aŭskulti laboron,
 Kvankam animo memoras terure kaj larmojn rifuĝas,

- Diros mi. Pro militado teditaj, de dioj pelataj,
 Ĉefoj Danaaj, post tiom da jaroj jame vane pasintaj,
 15 Kiel monteto, ĉevalon, laŭ arto de dia Palaso,
 Ekkonstruigas, kaj flankojn kovrigas per traboj abiaj.
 Ili ŝajnigas promeson revenan : ĝin famo konigas.
 Tien do korpojn lotitajn de viroj kuraĝaj sekrete
 Ili enmetas, en ventron malluman ; kaj grandan kavaĵon,
 20 Vastan uteron, tuj je militaro plenigas armita.
 Estas proksime vidata Tenedo, famege konata,
 Riĉa insulo kaj forta, Priama dum regno vivadis,
 Sed nur hodiaŭ rodeto, al ŝipoj haveno danĝera.
 Tien sin Grekoj transportas kaj kuŝas sur bordo dezerta.
 25 Certaj, post tiu eliro, ke ili veturas Mikenon,
 Ĉiuj Trojanoj do sin liberigas el longa timado.
 Oni malfermas pordegojn ; plezure tendaron Dorikan
 Ĉiu vizitas, kaj lokon dezertan kaj bordon lasitan.
 Tie Dolopoj, kaj tie kruela tendaris Ahilo,
 30 Tie lokiĝis ŝiparo, kaj tie batalo kutimis.
 Iuj, mirantaj pri dono mortiga al ĉasta Minervo,
 Tiun ĉevalon grandegan admiras : unua Timeto
 Ĝin enkonduki trans muron proponas kaj supren surloki ;
 Eble ĉu venkis perfido, ĉu eble Trojana fatalo.
 35 Tamen saĝuloj, prudente pensantaj, Kapiso precipe,
 Tiun insidon Danaan, suspektan donacon, en maron
 Ĵeti ordonas, aŭ tiun lignaĵon en flamoj bruligi,
 Fine trabori la kavan uteron, por sondi profundon.
 Tiam en malajn partiojn necerta sin aro dividis,
 40 Kiam, unua el ĉiuj, de multa anaro ŝekvata,
 Laokoono kolera de supra alkuŝas altaĵo ;
 El malproksime : « Urbanoj, nu ! kia grandega frenezo !
 Ĉu malamikan vi kredas foriron ? Ĉu donojn Danaajn
 Senartifikaj vi pensas ? Ĉu tiel aperas Ulisso ?
 45 Aŭ en lignaĵo kaŝiĝas Ahajoj, en ĝi enfermitaj ;
 Aŭ do ĝi estas maŝino farita por muron detruir ;
 Aŭ spionadi domaron, aŭ urben el supre konduki :
 Eble alia insido ! Ĉevalon ne fidu, Trojanoj ;
 Kio ajn estas, mi timas Danaajn eĉ donojn portantajn ! »
 50 Tiel li diris : longegan sagegon, per mano fortika,

Kontraŭ flankegon kaj ventron de monstro rondforme fa-
[ritan,

Forte li ĵetas : tremanta ĝi staris, uteron puŝanta ;
Kaj resonadis kavaĵoj, kaj brue profundo ĝemadis.
Tiam se dia fatalo, se blinda ne estis animo,
Li nin admonis per fero Argolan disrompi nestegon. 55
Kaj nun vi starus, Trojurbo ; Priama altaĵo vivadus !

Tamen jen estas junulo, kun manoj ligitaj al dorso,
Kiun paŝtistoj Dardanaj al reĝo, kun granda kriego,
Forte altrenas : ĉi tiu fremdulo al viroj venantaj,
Por perfidaĵon plenumi kaj Trojon al Grekoj malfermi, 60
Sin mem proponis, memfida kuraĝe, je ĉio kapabla,
Aŭ insidaĵon trouzi, aŭ morti je certa pereo.
Tiam el ĉie, scivolaj por vidi, junuloj Trojanaj
Ĉirkaŭirantaj rapidas, kaj penas insulti kaptiton.
Nun do Danaajn sciigu insidojn, per krimo de unu 65
Ĉiujn ekkonu ceterajn.

Ĉar, intermeze de ni, li, estante konfuza, senarma,
Staris, kaj liaj okuloj Frigujan rigardis anaron :
« Kiu nun lando, ekdiris li, kiu nun maro min povas
Ĉe si akcepti ; kaj kio nun restas al mi mizerulo ? 70
Ĉar ĉe Danaoj neniam mi havas rifuĝon, kaj plie
Mian Dardanoj venĝemaj punegon kaj sangon postulas ! »
Tiu ĝemado frontŝanĝas animojn kaj ĉiun haltigas
Movon : lin ĉiu demandas : « Vin kiu do naski nacio ?
Kion vi faras ? Respondu ; ni kredos vin kvankam kapti- 75
Fine, lasinte timegon, li tiel pertide parolas : [ton. »

« Ĉerte mi tutan verecon konfesi deziras, ho reĝo,
Kio ajn estas ; kaj mian nacion ne neos Argujan.
Tio unue : sed se malfeliĉo kruele Sinonon
Frapis, neniam mensoga kaj vanta li pro ĝi fariĝos. 80
Eble, per ia okazo, alvenis al viaj oreloj
De Palamedo Belido kaj nomo kaj famo glorega,
Kiun, per falsa denunco kaj multe malglora kulpigo,
Ĉiuj Pelasgoj, senkulpan, — ĉar li malpermesis militon, —
Sendis al morto : nun ili heroon ploradas malvivan. 85
Al li, parence ligita, alsendis min, kiel kunulo,
Patro malriĉa, dum jaroj unuaj, por ke mi batalu.

- Dum sendifekte li regis, kaj, reĝaj en konsilantaroj
 Ĉefis, mi iom da nomo kaj ankaŭ da glora potenco
 90 Ĝuis. Sed kiam ĵaluza perfido Ulissa devigis
 — Tio tre estas konata — lin bordojn forlasi superajn,
 Vivon malĝojan mallume mi trenis en larmoj senfruktaj,
 Kaj de senkulpa amiko fundkore mi sorton indignis.
 Mi ne silentis, malsaĝa! Se ia okazo ebligus;
- 95 Argon patrujan se eble mi iam venkinta revenus,
 Ĵure mi venĝos lin. Diroj teruran eknaskis malamon,
 Kaŭzon unuan de miaj doloroj! Ĉar poste Ulisso
 Ĉiam per novaj kulpigoj timigis min, ĉiam disversis
 En militaron parolojn dusencajn, serĉante armilojn
- 100 Kontraŭ mi : fine li haltis nur kiam Kalĥasa kunhelpo...
 ...Sed al vi tiujn malĝojojn nun kial mi vane rediras?
 Kial atendi? Se ĉiujn vi ŝatas egale Aĥaĵojn,
 Tion aŭskulti sufiĉas : rapide punegojn ordonu;
 Ilin deziras Itaka kaj multe vin dankos Atridoj. »
- 105 Tiam ni brulas la kaŭzon esplori kaj scii verecon,
 Ĉar ni insidojn kaj krimojn neniel suspektas Pelasgajn.
 Sed li daŭrigas tremante, kaj buŝo trompanta parolas :
 « Ofte Danaoj, Trojurbon lasante, forkuron deziris
 Sian prepari, kaj longan, teditaj, forlasi militon.
- 110 Kial ne tjo fariĝis! Sed vintro maldolĉa tre ofte
 Maron renversis, tre ofte Aŭstero timigis irontojn.
 Kiam precipe ĉevalo, farita per traboj lignajaj,
 Staris ĉi tie, en tuta ĉielo resonis nubegoj.
 Por orakolon de Febo demandi, tuj ni Eŭripilon
- 115 Sendas tremantaj; kaj li realportas malĝojan respondon :
 « Ventojn se vi kvietigis per sango de virga knabino,
 Kiam, Danaoj, unue vi venis al bordoj Iliaj,
 Sango ankoraŭ redonos revenon; Arganon oferu
 Vivan. « Tuj kiam parolo amasajn atingis orelojn,
- 120 Tremis animoj, glacia teruro profunden trakuris
 Ostojn : ĉar kiam al morto kondamnis Apolo fatala?
 Tiam Itaka Kalĥason divenan, kun granda kriado,
 Inter anaron kondukas kaj petas lin diri voladojn
 Diajn : kaj estis multegaj kruele jam antaŭdirantaj
- 125 Krimon de artifikulo, estontan ĝin mute vidantaj.

Li, dum duoble kvin tagoj silentas, sin kaŝas, rifuzas
 Iun per sia parolo malkovri, kaj sendi al morto,
 Fine bedaŭre, per grandaj Itakaj puŝita kriegoj,
 Rompas silenton, kaj min por altaro al morto difinas.
 Ĉiuj aprobis; kaj, sia pri vivo jam ĉiu timinta, 130
 Morton maljustan de unu mizera tutkore konsentis.
 Tago fatala jam venis : kaj pretaj montriĝis sanktaĵoj,
 Ĉirkaŭirontaj rubandoj tempiojn kaj sala faruno.
 Ĉenojn mi rompis por morton forkuri, mi tion konfesas :
 Kaj en kreskaĵojn de marĉo ŝlimhava, per nokto malluma, 135
 Mi min ekkas, dum veloj streĉiĝis okaze por iro.
 Vidi patrujon antikvan nun estas neniu espero,
 Miajn infanojn amatajn kaj miajn karegajn gepatrojn.
 Eble, pro mia forkuro, Danaoj sur ilin eljetos
 Punon, kaj morte senkulpajn kondamnos pro tiu kulpego. 140
 Nu ! je Superoj senmortaj, diaĵoj konantaj verecon,
 Kaj je purega justeco, — se tamen ĉe homoj nur estas
 Iom ankoraŭ da ĝi, — ha ! mi petas, kompatu suferojn
 Tiel grandajn, kompatu animon portantan indignon ! »
 Tiuj pro larmoj, ni lasas lin vivi kaj plie konsolas. 145
 Manojn de viro unua Priamo el ŝnuroj premantaj
 Poste malligi ordonas, kaj tiel parolas amike :
 « Kiu ajn estas — vi, Grekojn perditajn por ĉiam forgesu ;
 Nia vi estos : sed al mi petanta respondu verecon.
 Kion signifas ĉevalo grandega ? Ĝin kiu elpensis ? 150
 Kion li volas ? Ĉu estas ofero ? batala maŝino ? »
 Tiel li diris. Sed, lerta en ruzoj kaj arto Pelasga,
 Tiu Sineno, du manojn senĉenajn levante al astroj :
 « Lumoj senmortaj, puregaj diaĵoj, ekkriis li, vin mem
 Mi atestigas, kaj ankaŭ altaroj, kaj glavoj teruraj 155
 Kiujn mi lasis, rubandoj de dioj ofere portitaj :
 Sanktan ligilon, al Grekoj ligantan, nun rompi mi povas,
 Ilin mi povas malami kaj ĉiujn iliajn sekretojn
 Lume malkovri : nenio min ligas al mia patrujo.
 Vi nun promeson plenumu ; kaj de mi Trojurbo savita 160
 Estu dankema, se vere mi diras, se grande mi agos !
 Ĉiun Danaan esperon kaj ĉiun konfidon batalan
 Ĉiam vivigis Palasa protekto. Sed kiam malpia

- Filo de Tido, kaj la fabrikanto de krimoj Ulisso,
 165 La Palasajon fatalan el sankta preĝejo tiregi
 Penis, kaj, ekmortiginte gardantojn de tiu altaĵo,
 Ili figuron ekkaptis diinan, kaj virgajn rubandojn
 Malpurigegi kuraĝis, je manoj de sango kovritaj;
 Tiam komencis eliri, kaj iom post iom malkreski,
 170 Grekaj esperoj : fortaĵojn disrompis kontraŭa diino.
 Tion per miregindaĵoj sendubaj konigis Palaso.
 Mezotendare tuj kiam statuo ekstaris, brilantajn
 Flamojn elĵetis okuloj senmovaj, kaj sala ŝvitado
 Fluis sur membroj : trifoje el tero — rakonti mirinde! —
 175 Saltis diino, ŝvingadis pikstangon, kaj ŝildon agitis.
 Tiam Kalĥaso konsilas eliron ekprovi tra maro.
 Estos nur eble al sagoj Argujaj detruu Pergamon,
 Se aŭspiciojn en Argo preninte, tuj Grekoj statuon,
 Kiun ĵus ili en ŝipoj forportis, tra maro reportos.
 180 Kaj nun patrujan per vento se ili aliras Mikenon,
 Estas por serĉi armilojn kaj diojn; kaj, retransirinte
 Maron, aperi subite ; jen kiel Kalĥaso parolas.
 Ili do, pro Palasaĵo kaj pro ofendita diino,
 Tiun konstruis ĉevalon, por malpiegaĵon elpagi.
 185 Tamen Kalĥaso ordonis ke traboj plektitaj fariĝu
 Maso grandega, kaj povu altiĝi ĝis nuba ĉielo,
 Por ke, nek pordojn trairi nek murojn eniĝi povante,
 Tiam ĝi, per religio antikva, ne genton protektu.
 Ĉar se donacon Minervan per manoj vi malrespektigus,
 190 Malfeliĉaĵoj grandegaj, — ke dioj unue sur lin mem
 Tion elĵetu! — Friguojn premigus, kaj regnon Priaman.
 Tamen se manoj Trojanaj en urbon ĝin suprenirigus,
 Grandan militon alportus Azio ĝis muroj Pelopaj.
 Tiun alvenon Fatalo rezervas al niaj genepoj. »
 195 Tiu parolo insida kaj arto de ruza Sinono,
 Kaptis konfidon : kaj venkis falsadoj kun larvoj malveraj
 Tiujn ve! kiujn neniam venkadis Tidido, Aĥilo
 La Larisana, kaj deko da jaroj, kaj milo da ŝipoj.
 Tiam aperas vidaĵo terura kaj multe pli grava,
 200 Kiu subite mizerajn Trojanojn en koro tremigas.
 Laokoono, nomita per sorto ĉepastro Neptuna,

Apud altaro sanktega grandegan buĉadis boviron.
 Jen el Tenedo, tra ondoj trankvilaj, duopaj serpentoj,
 — Mi rakontante tremetas! — grandegajn sur maro longi-
 Ringojn, kaj ambaŭ samvice al bordo sin ili direktas. [gas 205
 Inter ondegoj stariĝas du brustoj, kaj krestoj sangruĝaj
 Maron superas; dum parto alia tuŝetas ondaron
 Pli malantaŭe, dum vosto longega per tordoj kurbiĝas.
 Bruas ŝaŭmanta salakvo. Jam ili marbordon atingis.
 Estis flamantaj okuloj, de sango kaj fajro koloraj, 210
 Dume du langoj vibrantaj buŝegojn siblante lekadis.
 Tion vidante, ni kuris sensangaj. Laŭ certa direkto,
 Ili aliras al Laokoono; kaj ĉiu serpento
 Ĉirkaŭ du liaj naskitoj unue volviĝas, envolvas
 Ilin, kaj membrojn mizerajn kruele per mordo disŝiras, 215
 Poste ekkaptas lin, — kiu alkuris por ilin helpegi,
 Sagojn portante —, kaj ligas per volvoj grandegaj : dufoje
 Ili lin meze kunpremas, dufoje per skvama vostego
 Kolon ĉirkaŭas, je kapo kaj brusto lin superegante.
 Dume per manoj tirantaj li penas disigi vivligojn, 220
 Kiu ĉi difektas rubandojn per kraĉa kaj nigra veneno,
 Li mem samtempe kriegojn terurajn ĵetadas al astroj.
 Tiel blekegas vundita boviro, altaron lasinta,
 Kiu hakilon malbone puŝitan el kolo ekskuas.
 Poste duopaj serpentoj, al supra preĝejo rampante, 225
 Kuras, ĉe alta sanktejo kruelan aliras Minervon,
 Kaj al piedoj diinaj, sub ŝilda rondaĵo, sin kaŝas.
 Tiam, en ĉiujn animojn, pli nova kaj pli tremiganta
 Timo eniĝas, kaj oni certigas, ke, pro atencego,
 Estis ĉefpastro tre juste punita, li, kiu per sago 230
 Vundis lignajon sanktegan, kaj kriman feraĵon enpuŝis
 Dorsen. « Ni Domen konduku ĉevalon oferan, ekkrias
 Ĉiu, kaj preĝu figurojn diinajn! »
 Murojn ni fendas kaj urban remparon fortikan disĵetas.
 Ĉiu fervore laboras, kaj, radan glitigon metinte 235
 Sub la piedojn, al kolo kanabajn streĉigas ŝnuregojn.
 Tiam ŝancele moviĝas kaj iras fatala maŝino,
 Arme graveda; dum, ĉirkaŭ ĝi knaboj kaj virgaj knabinoj
 Kantas sankthimnojn, kaj ĝojas, tuŝante per mano ŝnuregon.

- 240 Iras ĝi, kaj minacanta en mezon de urbo penetras.
 Kara patrujo, Ilio, ho domo de dioj, Dardanaj
 Muroj milite gloregaj, kvarfoje ĉe sojlo pordega
 Haltis ĝi, kaj en utero armiloj kvarfoje sonadis.
 Tamen loĝigas ĝin ni, senmemoraj kaj blindaj freneze,
- 245 Kaj en sanktegan altaĵon ni monstron enmetas mortigan.
 Tiam Kasandro fatalon estontan malkovri, sed vane,
 Penis; pro dia volado, neniu ŝin kredis Trojano.
 Ni malfeliĉaj, dum tiu ĉi tago estonta la lasta,
 Festajn preĝejojn de dioj en urbo verdaĵe vualas.
- 250 Tamen ĉielo turniĝas kaj el Oceano leviĝas
 Nokto, per ombro densega vindante poluson kaj teron,
 Kaj artifikojn Mirmidajn : tra urbo Trojanoj vagadas,
 Poste silentas; kaj membrojn lacetajn penetras dormado.
 Kaj militaro Arguja samvice sur ŝipoj elvenis
- 255 Jam el Tenedo, vidata sub luno amike silenta :
 Bordon ĝi iris konatan. Dum flamon levigas ĉefŝipo
 Reĝa, Sinono, de diaj fataloj savita maljustaj,
 Trabojn malfermas abiajn, Danaojn en ventro kaptitajn
 Liberigante. Tuj ilin al lumo redonas ĉevalo
- 260 Monstra; kaj, multe feliĉaj, eliras el kava lignaĵo
 Ĉefoj precipaj, Tesandro, Stenelo, kruela Ulisso,
 Kiuj per ŝnuro el supre ĵetita ekglitas, Toaso,
 Neoptolemo Pelido, Akamo, unue Maĥao,
 Kaj Menelao kaj, la elpensinto de ruzo, Epeo.
- 265 Ili okupas Trojurbon pro dormo kaj vino senmovan,
 Poste mortigas gardantojn, kaj, tra malfermitaj pordegoj,
 Ĉiujn ricevas amikojn : kunkulpaj kuniĝas anaroj.
 Estis momento ĉi kiam unua dormeto komence
 Donon dankindan de dioj en homojn enigis mizerajn.
- 270 Jen al mi, antaŭ okuloj, subite Hektoro aperas
 Songe, fortege malĝoja, kaj larmojn verŝanta multegajn;
 Tiel li estis do, kiam duopaj lin trenis ĉevaloj,
 Sanga je polvo kovritan, per liaj piedoj ŝvelitaj,
 Kiujn rimeno traboris. Ve! Kiun mi vidis? Ĉu estis
- 275 Tiu Hektoro glorega, Aĥilajn kaptinta armilojn,
 Kiu en ŝipojn Danaajn Frigujan enĵetis bruladon?
 Barbon malpuran havante kaj harojn per sango gluitajn,

Vundojn li portis de li ricevitaĵn sennombre, patruja
Ĉirkaŭ murego. Kaj, mi ĉe flanko, plorante, mi ŝajnis
Viron demandi, kaj tiun malĝojan esprimi parolon : 280
« Lumo Dardana, fidela espero de ĉiuj Trojanoj,
Kiu prokrasto vin longe retenis? El kiuj marbordoj
Vi atendita revenas? kaj kial, post morto de multaj
Viaj amikoj, post homaj kaj urbaj laboroj diversaj,
Lacaj ni vidas vin? Kiu malinda tialo kvietan 285
Fronton vundegis? kaj kial mi tiujn ekvidas cikatrojn? »
Sed li silentis, kaj vanan demandon neniel respondis.
Poste li, pene el brusto profunda tirante ĝemadon,
Diris : « Forkuru, naskito diina, kaj flamojn forlasu.
Murojn okupas Danaoj; elfalas el alte Trojurbo. 290
Estis sufiĉe helpita Priama patrujo. Se estus
Ebla defendo de Trojo, ĝi estus de mi defendita.
Vin komisias Pergamo sanktaĵojn kaj siajn Penatojn.
Tiujn estontajn kunprenu kunulojn; por ili konstruu
Muron fortikan, post via irado tra maro vastega. » 295
Tiel li diris; kaj manoj, interne de dia sanktejo, [can.
Prenis rubandojn, senmortan fajreron, kaj Veston poten-
Tamen samtempe diversaj kriegoj en urbo resonas.
Pli kaj pli, — kvankam prapatra domego Anhiza de strato
Malproksimiĝis, ĉar kaŝis vidaĵon arbara vualo, — 300
Bruoj klariĝas, kaj ĉie pliiĝas armila tumulto.
Dormon skuante, rapide mi rampas al suprekuŝanta
Alta tegmento, kaj ĉirkaŭrigardas, levante orelojn.
Same do kiel flamantan rikolton bruligas kolera
Vento, aŭ kiel rapida torento per montaj ondegaj [ron, 305
Kampojn detruas, kaj semon ĝermantan, kaj bovan labo-
Poste malsupren fortrenas arbarojn : sur alta ŝtonego,
Bruon aŭskultas, serĉante tialon, senmova paŝtisto.
Tiel aperas reala nunajo kaj ruzoj Danaaj.
Jam Deifoba domego brulanta fariĝis ruino, 310
Kiun vulkano superas; proksime jam la Ukalega
Flamas; kaj larĝan markolon Sigeon briligas brulado.
Bruas samtempe sonadoj trompetaj kaj viraj kriegoj.
Mi batalilon freneze kunprenas, sen ia espero.
Sed por milito korpuson kolekti, kun tiuj kunuloj 315

Supren alkuri, jen estas deziro : kolero terura
Forte min kaptas, kaj gloire mi volas armita perej.

Tiam aperas ja Panto, el sagoj savita Ahajaj,
Panto Otrido, ĉefpastro de Febo kaj supra preĝejo.

320 Sanktajn objektojn, kaj diojn venkitajn, kaj nepon malgran-
Mane li portas ; al sojlo kondukas lin kuro freneza, [dan
« Kie batalo plej forta? Kaj ĉu ni altaĵon okupas? »

Tion apenaŭ mi diris, kaj Panto respondas ĝemante :
« Venis la lasta momento kaj tago la neevitebla

325 De Dardanujo! Trojanoj ni estis, kaj estis Ilio,
Kaj kun ĝi granda Trojana glorego! Jupitero kruela
Ĉion transportis sur Argon. En urbo flamanta Danaoj
Regas. En mezo de muroj staranta, ĉevalo minaca
Vomas armitojn. Venkanta Sinono, bruladon iganta,
330 Ĉiujn insultas. Nun, ĉe malfermitaj duoble pordegoj,
Unuj staradas, ne malpli multnombraj ol kiam el granda
Ili elvenis Mikeno : aliaj per sagoj mallarĝajn
Stratojn sieĝas kontraŭe : leviĝas brilantaj kaj nudaj
Glavej, mortigon donontaj. Apenaŭ pordegaj gardantoj

335 Provas unuan militon, kaj blinde en ombro batalas. »

Tiu Otrida parolo kaj dia volado min puŝas,
Tra batalantoj kaj flamoj, ĝis kie min vokas Erino
La mortiganta, tumulto, kaj krioj ĉielen flugantaj.
Kiel kunuloj, alvenas Ripeo, Epito armita

340 Grande, pro luno vidataj : Hipano kaj Dimo al flanko
Nia alkuras, kaj tiu junulo kuraĝa, Korebo,
Filo de Migdo. En tagoj pasintaj, li venis Trojurbon
Oste, fundkore per amo freneza Kasandron amanta,
Kaj al Priamo kaj Trojo kunhelpon bofile oferis.

345 Malfeliĉulo! Ĉar li fianĉinon ne volis aŭskulti
Antaŭdirantan.

Ilin tuj kiam mi vidis cirkaŭe, batale flamantajn,
Tiujn mi vortojn parolis : « Junuloj, vanege kuraĝaj
Koroj, se ĉefon treege sentiman vi sekvi deziras,

350 Kien fatala nunajo nin puŝas vi vidas kruele.
Ĉiuj foriris, altarojn kaj sanktajn lasinte preĝejojn,
Tiuj diaĵoj, de nia patrujo gardantoj; brulantan
Urbon vi helpas; ni mortu, nin ĵetu en mezon batalan.

Sola savado nun estas, neniu esperi savadon! »
 Tiam kolero junulajn ekkaptas animojn. Je raba 355
 Lupo ni estas similaj, vaganta en nigra mallumo,
 Kiam malsato kruela ĝin pelis el kavo, dum idoj,
 Seka kun gorgo, atendas : ni, tra malamikoj, tra sagoj,
 Kuras sendube al morto, kaj mezon de urbo ni trafas.
 Sia per densa ombraro envolvas nin nokto nigreta. 360

Kiu parolo de tiu ĉi nokto mortigajn malvenkojn
 Povus rakonti, penante per larmoj traduki laborojn.
 Urbo antikva pereas, dum jaroj reginta multegaj;
 Korpoj sennombraj ĉi tien kaj tien kuŝiĝas malvivaj,
 Stratojn kaj domojn kaj diajn preĝejojn jam obstrukci- 365
 Solaj ne estas Trojanoj por sangon liveri verŝitan; [gante.
 Ĉar kelkafoje en korojn venkitajn kuraĝo revenas,
 Tiam Danaoj pereas, venkantaj. Nun ĉie funebraj
 Ĝemoj, kaj ĉie teruro, kaj ĉie buĉada vidaĵo.

Grandan korpuson Danaan ĉefante, unua Androgo 370
 Al ni prezentas sin; kaj, nesciante, pensante ke estas
 Ni kunidaro, aliras nin, tiuj per vortoj amikaj :
 « Viroj, rapidu! Ĉar kia detenas vin mallaboremo?
 Rabas aliaj kaj ankaŭ flamantan detruas Pergamon :
 Kaj nur vi senenergiaj eliras el altaj velŝipoj. » 375

Tiel li diris : subite, — ĉar nia respondo neniel
 Estis fidinda, — li inter fremduloj sin sentis falintan.
 Li malantaŭen piedon kun voĉo timanta eligis.
 Kiam sur kruta vojeto, premegis pasanto serpenton
 Tere kuŝantan, subite tremanta li beston forkuras, 380
 Dum ĝi kolere leviĝas, kaj kolon ŝveligas lazuran :
 Tiel, nin ĉiujn vidante, eliris Androgo timanta.
 Forte atakas ni; ilin densegaj ĉirkaŭas armiloj :
 Tien kaj tien, ne lokon konantaj kaj tute tremantajn,
 Ilin ni frapas : kaj ŝanco unuan favoras laboron. 385

Tiam **Korebo**, pri tiu sukceso fundkore ĝojega,
 Diris : « Amikoj, vojeton savontan ekmontras Fatalo;
 Dekstre ĝi estas vidata : min kredu, ni sekvu konsilon.
 Ŝildojn ni ŝangu, kaj poste Danaajn ni prenu samsignojn.
 Ĉar por malamikon mortigi, kuraĝo kaj ruzo egalas. 390
 Ili armilojn liveros. » Li diris, kaj poste Androgan

- Kaskon** haraĵan kaj ŝildon brilantan, artege faritan,
Kaptas, kaj glavon Argujan al flanko rapide alligas.
Ripo kaj Dimo kaj ĉiuj kuraĝaj junuloj simile
 395 **Agas** ĝojantaj, kaj novan akiron samtempe surmetas.
Ni, kun Danaoj mikŝataj aliras, sen niaj diaĵoj,
Kaj, kuniĝintaj, en nokto malluma, sennombrajn batalojn
Faras, per kiuj ni multajn al **Orko** dissendas Danaojn.
Unuj kuradas al ŝipoj rapide kaj ~~borderon~~ senriskan
 400 **Trafas;** aliaj, hontinde tremantaj, denove ĉevalon
Grandan altrampas kaj en la konatan sin kaŝas kavajon.
Sed, ve! al dioj kontraŭaj neniel ni devas konfidi!
Per malligita hararo, Kasandro, Priama filino,
Ekster sanktega preĝejo Minerva ĵus estis trenata,
 405 **Ŝiajn** okulojn kolerajn ĉielen vanege levante,
Sed nur okulojn; ĉar manojn malfortajn detenis ligiloj.
Tiun vidaĵon ne povis suferi Korebo. Sin ĵetas
Li furioze en mezan amason por tie pere.
Ĉiuj lin sekvas kaj kuras antaŭen kun densaj armiloj;
 410 **Kiam** subite, el alta tegmento domega, amikaj
Sagoj sur nin elfalegas, teruran kaŭzante buĉadon,
Pro la vidaĵo trompanta de kaskoj kaj Grekaj armiloj.
Tiam Danaoj ĝemantaj, kolere knabiniĝon savitan
Ankaŭ vidantaj, el ĉie alkuras kolekte, Ajakso
 415 **Forta,** kaj ambaŭ Atridoj kaj ĉiu popolo Dolopa.
Tiel kontraŭaj ventegoj samtempe turniĝojn blovantajn
Puŝas, Zefiro kaj Noto kaj la orienta rajdanta
Eŭro : muĝadas arbaroj; per sia tridento, ŝaŭmanta
Frapas. Nereo, kaj ondojn fortege renversas profundajn.
 420 **Tiuj eĉ,** kiujn, per nokto malluma, ni pelis tra ombro,
Dank'al insido, kaj ni persekutis en tutan Trojurbon,
Ĉiuj revenas : unuaj armilojn kaj ŝildojn mensogajn
Ili rekonsas, kaj fremdan de lingvo signalas resonon.
Tuje de multo ni estas premataj : unua Korebo,
 425 **Apud** altaro de armopotenca diino pereas,
De Peneleo frapita; kaj Ripo, plej justa ol ĉiuj
Viroj, fidela gardanto de ĵuroj, simile mortiĝas.
Dioj alie decidis ! Pereas Ipano kaj Dimo,
De samlandanoj boritaj : kaj, Panto, nek via pieco

Granda, nek krono Apola, el morto vin povis eltiri. 430
 Cindroj Iliaj kaj lasta brulado de mia patrurbo,
 Mi vin certigas, en via ruino mi sagojn Danaajn,
 Flamojn, aliajn danĝerojn, neniam evitis. Se volis
 Ke mi pereu Fataloj, mi morton kuraĝe meritis.
 Poste ni estas pelataj, Ifito, Pelio kaj mi mem; 435
 Aĝe sin kurbas unua, kaj dua pro vundo Ulissa.
 Tuj al Priama palaco per krioj ni estas vokataj.
 Tie regadis grandega batalo; aliaj kompare
 Ŝajnis neniam kaj ne mortigantaj en urbo cetera. 440
 Tie Danaoj haj Marso fortega tegmenton surrampas,
 — Tion mi vidis, — kaj sojlon siegas, farante testudon.
 Nun ŝtupetarojn al flanko metinte, jam ili, ĉe pordoj,
 Rampi ŝtupetojn klopodas; ĉar ŝildoj maldekstre tenataj
 Sagojn repuŝas, dum pinton ekkaptas soldatoj per dekstra. 445
 Sed aliflanke, Dardanoj tegmentajn kaj turajn disjetas
 Suprojn, ĉar ilin premezas neceso : per tiuj ĵetaĵoj,
 Ili sin kontraŭ mortigo minaca defendi penadas.
 Orajn trabetojn, antikvan ornamon de patra loĝejo
 Ili eljetas; ceteraj kun glavoj seningaj okupas
 Pordojn, kaj ilin protektas per sia amaso densega. 450
 Mia animo palacon de reĝo deziras helpadi,
 Virojn ekzemple eksciti, kaj rekuraĝigi venkitojn.
 Estis pordeto kun nigra vojeto komunikiganta
 Ĉiujn Priamajn loĝejojn interne, sekrete kaj poste;
 Kaj Andromako la tre malfeliĉa, dum regno vivadis, 455
 Ofte tra ĝi, sen servistoj, bopatron viziti kutimis,
 Astianakson infanon al avo per mano tirante.
 Supran domegon mi rampas kaj altan tegmenton, el kie
 Sagojn eljetis mizeraj Trojanoj, per mano kolera.
 Turo sur supro elstaris kun alta tegmento, al astroj 460
 Altegiĝanta, el kie Trojurbo kaj kampoj videblaj
 Estis, kaj ŝipoj Danaaj kaj tendoj Aĥajaj. Ĝin tiam
 Fero ĉirkaŭe subfosas, en loko ĉi kie trabaĵoj [gante
 Supraj kunigojn prezentas mankhavajn, kaj, ĝin tire-
 Ĝiaj el grandaj fondaĵoj, ni puŝas antaŭen : subite 465
 Sonas bruege falanta ruino; kaj aron Danaan
 Ĝi malproksimen premezas. Sed ilin postvenas aliaj;

Ŝtonoj kaj sagoj diversaj sur ilin pluvadas.

Antaŭ vestiblo, sur sojlo unua, samtempe saltegas

470 Piro kuraĝa, brilanta pro sagoj kaj helo kupraja,
Kiel serpento en lumo, venenajn manginta herbajojn,
Kiun sub tero malvarma ŝvelintan nebulo enfermis.

Haŭton vestinta renovan, nun ĝi, je juneco brilanta,
Voston glitigan malvolvas, stariĝas al suno, sublevas

475 Bruston, kaj langon el buŝo eligas trifoje pikilan.
Kune Perifo grandkreska, kaj Aŭtomedono, Aĥila
Ĉeval-kaj-armiligisto, kaj ĉiuj Sciriaj junuloj, [menton.
Rampas altajon, kaj fajron sur supran kunjetas teg-
Li mem unua, preninte hakilon dufoje tranĉantan,

480 Pordojn disrompas kaj fostojn eltiras el ĝia pordhoko.
Jam li trabaĵon difektis, kaj kverkan kavigis lignaĵon,
Kaj tra tabulo profundan kaj larĝan trahakis fenestron.
Tiam aperas interna palaco kaj grandaj vestibloj;
Tiam aperas Priama kaj reĝa domego antikva :

485 Plie vidiĝas armitoj starantaj en ĉambro unua.

Sed, en interna loĝejo, ĝemadoj kun granda tumulto

Tuj enmiksiĝas : tra altaj arkaĵoj profunde sonadas

Plendoj virinaj : ĝis astroj orataj leviĝas bruego.

Tiam patrinoj tremantaj tra larĝaj kuradas ĉambraroj,

490 Ĉirkaŭprenante kolonojn, kaj ilin freneze kisadas.

Piro, kun patra forteco, klopodas : gardantoj nek baroj

Povas haltigi lin : li, per ŝafviraj batadoj, ŝancelas

Pordojn ; kaj fostoj rompitaĵoj falegas, lasinte pordhokojn.

Ago fariĝas perforta. Danaoj eniron disrompas,

495 Morte ekfrapas gardantojn, kaj lokon milite okupas.

Tiel do, kiam, rompinte digegojn ŝaŭmanta rivero

Iras el lito, kaj kontraŭstarantajn deĵetas barilojn ;

Ĝi sur plugaĵojn disverŝas ondegojn, trenante tra kampo

Stalojn kaj brutojn. Buĉade ebrian mi Neoptolemon

500 Vidis, kaj ankaŭ, sur sojlo palaca, duopajn Atridojn ;

Vidis Hekubon kun cent bofilinoj, Priamon per sango

Malpurigantan flamantan altaron de li dediĉitan.

Kvindek edziĝaj ĉambraroj, espero de multa idaro,

Pordoj belegaj kovritaj per ŝtofoj kaj oro Barbara,

505 Falis : kaj lokon de fajr' indulgitan okupas Danaoj.

Eble Priaman fatalon estintan vi koni deziras.

Urbon tuj kiam li vidis kaptitan, kaj de malamikoj
Enpenetritan domegon ĝis ĝiaj sekretaj ĉambraroj,
Li, maljunulo, armilojn, de tempo tre longa senuzajn,
Vane sur ŝultrojn surmetas tremantajn, kaj, feron zonante 510
Ve! senutilan, al densaj venkantoj alkuras, mortonta.

Meze de domo, sub nuda arkajo de vasta ĉielo,
Estis altaro tre granda, flankata de laŭro antikva,
Super ĝin kiu kliniĝis, Penatojn per ombro kovrante.

Tiun altaron ĉirkaŭis Hekubo kun siaj filinoj, 515
Vane; kaj, kiel kolomboj de nigra ventego jetitaj,
Ili premataj kunsidis, kaj diajn kisadis figurojn.

Kiam ŝi vidis Priamon je belaj vestitan armiloj,
Kiel junulo : « Ha! kia malsaĝa pensado, plendinda 520
Edzo, vin puŝis ekkapti armilon? Kaj kien vi iras?

Diris ŝi : helpo malforta vi estas, povante neniel
Urbon defendi : pri tio ne estus kapabla Hektoro
Li mem. Sed tien alvenu : aŭ tiu altaro nin savos,

Aŭ do ni ĉiuj pereos. » Ŝi tiel parolis, kaj, reĝon
Al si grandaĝan vokinte, lin lokis en zonon sanktejan. 525

Tamen alvenas Polito, el Pira buĉado savita,
Filo Priama : tra sagoj kaj tra malamikoj li kuras,
Longajn pordaĵojn kaj ĉambrojn dezertajn vundita irante,
Persekutata per glavo minaca de Piro kolera.

Tiu ĉi mane lin tenas kaj premas per sia pikstango. 530
Fine li, antaŭ okuloj de siaj gepatroj starante,
Falas, kaj vivon malfortan kun multa sangfluo disverŝas.

Tiam Priamo, lin kvankam minacas tro certa mortigo,
Tamen ne tenis sin, nek moderiĝis koleran parolon :

« Al vi do, kriis li, tia pro krimo, pro tia malgloro, 535
— Se en ĉielo nur estas justeco, pri tiaj zorganta, —
Justan premion diaĵoj elpagu; al vi rekompencan
Donu ŝuldatan, vi kiu min vidi devigi mortantan

Filon, kaj patran rigardon funebre nun malpurigegas.
Tiel ne estis Aĥilo, — de kiu vi false naskiĝis, — 540

Pri malamika Priamo; li de mi petanta respektis
Rajton kaj fidon, sensangan Hektoron malvivan al tomo
Vole redonis, kaj min mem ĝentile resendis en regnon. »

- Tiel parolis maljuna Priamo, kaj vanan li sagon
 545 Ĵetis malforte, de kupro sonora tuj ekrepuŝitan.
 Ĝi senutile el ĝiba supraĵo de ŝildo pendetis.
 Tiam do Piro : « Al patro Pelido vi estu sendata
 Por al li tion rakonti : kaj ĉiajn agadojn hontindajn
 Diri memoru, pri Neoptolemo la degenerita.
 550 Sed nun pereu. » Kaj, tion dirante, li al la altaro
 Trenis Priamon tremantan, sur sango de filo glitantan;
 Harojn kaptinte per mano maldekstra, li dekstra per mano
 Glavon svingegis, kaj ĝin ĝis tenilo trapuŝis en flankon.
 Tiel finiĝis Priamo ; kaj tiel fatale pereis,
 555 Trojon flamantan vidinte kaj ankaŭ falintan Pergamon,
 Iam reginte sur tiom da landoj kaj gentoj Aziaj,
 Tiu monarĥo potenca. Sur bordo nun kuŝas altkreska
 Trunko, kapo de ŝultroj tranĉita, kaj korpo sen nomo.
 Tiam min unuafoje ĉirkaŭis maldolĉa teruro.
 560 Al mi tremanta aperis figuro de patro amata,
 Kiam mi reĝon ekvidis samaĝan per vundo kruela
 Vivon elverŝi ; aperis rabata domego, kaj hejme
 Kreŭso edzino lasita kun filo malgranda lulo.
 Mi min deturnas, ĉirkaŭe ĉu estas ankoraŭ kunuloj
 565 Serĉas ; sed ĉiuj lacegaj mortigis ; ĉar unuj al tero
 Korpon mizeran per salto ekĵetis, aliaj en flamojn.
 De nun mi estis do sola : subite mi antaŭ sanktejo
 Vesta, silentan kaj en rifuĝejo sekreta kaŝitan,
 Tindaridinon ekvidas : ĉar al mi vaganta, kaj ĉien
 570 Rigardadanta, lumigon aldonas helega brulado.
 Ĉar ŝi, unue Trojanojn venĝontajn pri Trojo falinta,
 Due, koleron de edzo lasita kaj punon de Grekoj,
 Forte timanta, pro Trojo pro Grekoj komuna Erino,
 Apud altaron sidiĝis, kaj tie en ombro sin kaŝis.
 575 Flamas animo kolere : min puŝas indigno venkitan
 Venĝi patrujon, kaj krimon pagigi al la kulpigata.
 « Tiel do, ŝi sendifekta patrujan Mikenon kaj Sparton
 Morgaŭ revidos, kaj iros reĝine ĝuadi triumfon ;
 Edzon kaj domon ŝi vidos, gepatrojn kaj ankaŭ naskitojn,
 580 Akompanata de sklavoj Friguaj kaj multaj Trojanoj !
 Fero Priamon mortigus ! Trojurbon flamigus brulado !

Sangon Trojanan ŝvitadus kamparoj kaj tuta marbordo!
 Tio, neniam! Nu, kvankam virinon mortigi neniun
 Gloron alportas, ĉar tiu venketo ne viron honoras,
 Tamen detruo de monstro kaj puno de kulpa virino 585
 Estos laŭdindaj; ĉar ĝojos animo vengeman fervoron
 Tuj kvietigi, kaj cindrojn de miaj satigi prapatroj. »
 Tiel mi diris; kaj forte kolero forportis animon,
 Kiam, pli brila ol iam mortemaj ŝin vidis okuloj,
 Lumon puregan tra nokto jetante, aperis subite 590
 Mia sanktega patrino, diecon montrante, kaj kiel
 Ĉielloĝantoj ŝin vidi kutiĝas. Ŝi, dekstran preninte,
 Tuj min haltigis, kaj tiel parolis per buŝo rozeta :
 « Kia, naskito, senliman koleron ekscitas doloro ?
 Kial do tian frenezon? Ĉu do vi ne zorgas plu pri ni? 595
 Ĉu vi unue ne serĉos ĉu patro maljuna Anĥizo
 Aĝe lacega, ĉu Kreŭso edzino, ĉu filo Askano
 Estas ankoraŭ vivantaj? Ĉar ĉiuj Danaaj anaroj
 Ilin ĉirkaŭas : se mia zorgado ne estus aginta,
 Ilin jam flamoj manĝegus aŭ glavo traborus kruele. 600
 Tindaridino, la tre malaminda Lakona, Pariso
 La kulpigita, aŭtoroj ne estas de tiuj aferoj.
 Dioj kaj dia kolero nur Trojon faligas el alte.
 Vidu : kaj nubon densegan, nun kiu morteman okulon
 Kovras, kaj ĝin mallumigas, malseke vin ĉirkaŭante, 605
 Tute mi solvos : vi do ne patrinan aŭskulti konsilon
 Timu, kaj ĉiujn diinajn ordonojn obeu volonte.
 Tie ĉi, kie vi masojn rompitaĵajn kaj ŝtonojn el ŝtonoj
 Vidas ŝiritajn, kun fumo flugantaj je polvo miksataj,
 Murojn Neptuno per granda tridento ŝancelas, fondaĵojn 610
 Fosojn, kaj tutan Trojurbon detruas ĝis ĝia sidejo.
 Tie Junono kruela unua pordegon okupas
 Scean, kaj ŝi, furioza, el ŝipoj kunulan anaron,
 Glavon zonante, alvokas.
 Vidu : sur alta supraĵo jam ido Tritona Palaso 615
 Sidas, tra nubo brilanta, kun sia kruela Gorgono.
 Patro li mem de Danaoj ekscitas animojn, kaj virojn
 Helpas, kaj kontraŭ Dardanaj armiloj dissendas diaĵojn.
 Mia naskito, forkuru rapide kaj finu laboron.

- 620 Kun vi mi restos, por hejmen al patro vin sanan konduki. »
 Diris ŝi : kaj ŝi fandiĝis en ombron de nokto malluma.
 Tiam aperas koleraj vizaĝoj de dioj potencaj
 Kiuj malamas Trojurbon.
 Tiam mi tutan ekvidas Ilion falantan en flamojn,
- 625 Trojon Neptunan ĝis en fundamento tuj renversiĝantan.
 Tiel do, kiam, ĉe montaj supraĵoj, fraksenon antikvan,
 Kiun atakis hakilo dufoje tranĉanta, faligi
 Vete penadas hakistoĵ; ĝi, longa dum tempo, minacas,
 Kaj, tremegante je ĉia skuado, klinetas hararon.
- 630 Verdan; sed, iom post iom, per vundoj lacega, ĝi lastan
 Puŝas ĝemadon, kaj falas ruine el monta altejo.
 Ĉar min diino kondukis, mi iras malsupren tra flamoj
 Kaj malamikoj: min sagoj respektas; sin flamoj malfermas.
 Tamen, tuj kiam mi domon prapatran, antikvan loĝejon,
- 635 Estis veninta, naskinto, ve! kiun unue al monto
 Alta mi volis kunporti, kaj kiun unue demandis,
 Trojon falintan rifuzis forlasi, kaj, ekster patrujo,
 Ĉiam ekzilon suferi : « Vi, kiu junulan enhavas
 Sangon, li diris, kaj sanon fortikan kaj viran kuraĝon,
- 640 Vi do forkuron preparu.
 Mian se Ĉielloĝantoj dezirus daŭrigi vivadon,
 Tiujn domegojn ne ili detruus. Sufiĉas, tro estas,
 Tian ruinon vidadi kaj urbon postvivi kaptitan.
 Patron kuŝantan salutu fundkore, kaj poste forkuru.
- 645 Morton per mano mi trovos, aŭ eble rabisto kompatos,
 Mian petante vestaron : mi tombon facile seniĝos.
 Longa de tempo min dioj malamamis, kaj jarojn mi vivis
 Ve! senutilajn, de tago ĉi, kiam la Patro de dioj,
 Reĝo de homoj, per fulmo min frapis, kaj tuŝis per fajro. »
- 650 Tiel persiste parolis la patro, kaj fikse restadis;
 Dum ni kontraŭe, verŝante larmegojn, kaj Kreŭso edzino,
 Juna Askano, kaj ĉiuj domanoj : « O patro, ne kun vi
 Perdu nin ĉiujn, kaj ne pligrandigu fatalan minacon! »
 Sed li rifuzas, fiksata sur seĝo kaj en decideco.
- 655 Ree mi serĉas armilojn kaj morton malĝoje deziras.
 Kiun aŭskulti konsilon? Kaj kion promesas fatalo?
 « Vi do esperis, naskinto, ke mi, vin lasinte, forkuros?

Tiun malpian konsilon ĉu patro per buŝo parolis?

Tial, se dioj deziras de urbo grandega nenion
Lasi; se via volado persistas vin kaj nin engluti 660

Inter Trojurban ruinon, malfermas sin pordo mortiga.

Piro alvenas, kovrita je sango Priama: li filon

Antaŭ la patro kaj patron li apud altaro trapikis.

Ĉu vi, sanktega patrino, el sagoj, el flamoj min savis,
Por al mi montri, en mezo de domo, per glavoj Danaaj, 665

Filon Askanon, kaj patron amatan, kaj Kreŭson edzinon

Ĉiujn buĉitajn, kaj korpojn banantajn en sanga miksaĵo?

Viroj, vin armu! Venkitojn alvokas la lasta mateno!

Min al Danaoj redonu; denove komenci batalon

Lasu min; kaj se hodiaŭ ni mortos, ni mortos vengintaj! » 670

Tiam mi ree ferglavon ekzonas, en mano maldekstra

Ŝildan ekkaptas tenilon kaj ekas el domo eliri:

Sed min haltigas, ĉe sojlo, piedojn kisante, edzino;

Dum ŝi al patro naskiton malgrandan prezentas Iulon:

« Se vi forkuras mortonta, nin prenu kaj kun vi kunportu: 675

Aŭ el armiloj se via sperteco esperon akceptas,

Tiun unue protektu domegon. Ĉu vi do forlasos

Filon, kaj patron, kaj min mem, ve! iam nomitan: edzino? »

Tiel kriante, ŝi tutan loĝejon je ĝemoj plenigis:

Kiam subita kaj dire mirinda montriĝas fariĝo. 680

Filon dum manoj kaj lipoj gepatraj plorante alpremis,

Estas vidata, iranta el verto Iula, flamanta

Lango malpeza: ĝi poste per dolĉa tuŝeto moletan

Lekas hararon, kaj ĉirkaŭ tempioj belmove ludetas.

Ni, tremetantaj kaj palaj, klopodas por skui brulantajn 685

Harojn, kaj sanktan per akvo verŝita estingi fajreron.

Tiam Anĥizo la patro okulojn ĝojege al astroj

Levas, kaj manojn kaj voĉon direktas al alta ĉielo:

« Ho vi, Jupitero potenca, se preĝoj vin malseverigas,

Iom rigardu nin; se, pro pieco, ni tion meritas, 690

Helpon vi donu, ho Patro, kaj tian certigu signegon. »

Sed maljunulo apenaŭ parolis, jen tondro subita

Bruas maldekstre, kaj, ekster ĉielo falinta tra ombro,

Stelo, flamegon portanta, kun multa lumego trakuras.

Flugas ĝi supren, kaj altan de domo tuŝetas tegmenton, 695

- Tion ni vidis! — En Idan arbaron sin lumo ekkaŝas,
 Vojon montrante, kaj longan ellasas de fajro sulkajon,
 Dum malproksime ĉirkaŭaj kamparoj sulfure fumigas.
 Tiam, plenege venkita, naskinto sin levas, ĉielon,
 700 Diojn preĝante, rigardas, kaj astron adoras sanktegan :
 « De nun, neniu prokrasto. Mi sekvos vin kien vi iros!
 Dioj patrujaj, savadu domanojn kaj nepon savadu!
 Tiun miraklon vi sendis; vi Trojon ankoraŭ protektas.
 Filo, mi cedas; vin sekvi kunule nun mi ne rifuzas. »
- 705 Tiel li diris : jam inter muregoj flambruo pli forte
 Estas aŭdata; proksime turnflamojn malvolvas brulado.
 « Iru do, patro amata; sur miajn surloku vin ŝultrojn;
 Mi men vin portos. kaj tiu laboro ne estos laciga.
 Kio ajn estos, ni solan kaj saman suferos danĝeron ;
 710 Sama savado nin ambaŭ protektos. Malgranda Iulo
 Flanke kunmarŝos, kaj poste iradon sekvados edzino.
 Kaj vi, servistoj, en viajn spiritojn enigu parolojn.
 Staras proksime. trans urbo, monteto kun templo malnova,
 Kiun Cereso forlasis, kaj flanke antikva cipreso,
 715 Kiun prapatra pieco de jaroj multegaj respektis.
 Tien, tra vojoj diversaj, al sama ni celos kunveno.
 Patro, vi prenu en manoj sanktaĵojn kaj diojn patrujajn ;
 Ĉar, elirinte el sanga batalo kaj nova buĉado,
 Ilin mi tuŝi ne povas, ĝis kiam en akvo klarega
 720 Mi min purigos. »
 Tiel dirinte, mi ŝultrojn larĝegajn kaj kolon mallevas,
 Ilin kovrinte per vesto kaj felo de flava leono ;
 Mi min kurbigas sub ŝarĝo, dum dekstran malgranda Iulo
 Prenas, kaj patron per paŝoj nenie egalaj kuniras ;
 725 Poste min sekvas edzino. Ni iras tra vojoj mallumaj :
 Kaj nun min, kiun neniam timigis ĉu sagoj ĵetitaj,
 Ĉu mem Danaoj amase armitaj, kontraŭe starantaj,
 Ĉiu tremigas bloveto; eĉ ĉiu haltigas brueto
 Movon : ĉar pri kunuleto kaj ŝarĝo mi same tremetas.
 730 Jam ni trapasis pordegojn; kaj ĉiu danĝero de vojo
 Ŝajnis finita : subite oreloj ekaŭdis proksime
 Oftan sonadon de paŝoj : naskinto tra ombro rigardas,
 Poste ekkrias : « Forkuru, naskito, forkuru; ĉar ili

Alproksimiĝas : mi ŝildojn brilantajn kaj kupron lumantan
 Vidas. » Mi tiam ne scias ĉu malamikema diaĵo 735
 Mian forprenis konfuzan animon ; ĉar dum nekonatan
 Vojon mi sekvas kurante, for landoj irante kutimaj,
 Kreŭso edzino sin perdis, ve ! Ĉu ŝin haltigis fatalo,
 Ĉu ŝi eraris en vojo, ĉu eble ŝi laca defalis ?
 Tion ne scias mi : sed ŝin neniam revidis okuloj. 740
 Tiun mi perdon eksciis kaj al ĝi atentis nur kiam
 Ni al Ceresa monteto antikva kaj sankta preĝejo
 Estis venintaj ; kaj tie nur al forkurantoj savitaj
 Mankis virino, lasinta kunulojn, naskiton kaj edzon.
 Ĉiujn diaĵojn kaj virojn freneza kulpigis ĉagreno ; 745
 Ĉar por mi kio en urbo falinta pli estis kruela ?
 Patron Anĥizon, Iulon, Trojanajn Penatojn al miaj
 Mi komisias kunuloj, kaj, ilin en valan kaŝinte
 Kavon, mi urben eniras, per brilaj vestita armiloj.
 Mi renovigi deziras okazojn, kaj tutan transiri 750
 Trojon, kaj kapon al ĉiuj danĝeroj prezenti denove.
 Muron kaj sojlon malluman de pordo, per kiu mi iam
 Iris eksteren, mi trafas unue ; kaj mi malantaŭajn
 Sekvas postsignojn, rigardas, serĉadas ĉirkaŭe tra nokto.
 Ĉie mallumoj kaj ĉie silento tremigas animon. 755
 Poste en domon, — ĉu tien ŝi paŝojn okaze direktis, —
 Mi tuj eniras. Ĝin kaptis Danaoj, kaj tute okupas.
 Fajro terura, per vento puŝata, jam supre volviĝas,
 Ĉirkaŭ tegmento : turniĝas flamegoj, ĉielen flugantaj.
 Pli malproksime, mi vidas altaĵon kaj domon Priaman. 760
 Nun, sub pordejoj dezertaj de templo Junona, Fenikso
 Kaj kruelega Ulisso, nomitaj gardantoj, akiron
 Zorge observas : ĉar tien la tutan riĉecon Trojanan,
 Kiun el temploj flamantaj Danaoj forprenis, diaĵajn
 Tablojn, kalikojn el oro masiva, vestaĵojn kaptitajn, 765
 Ili almetis : patrinaj kaj knaboj tremantaj longvice
 Staras cirkaŭe.
 Laŭte mi kriis tra ombro kaj voĉon laŭtigis kuraĝe :
 Stratojn plenigis plendadoj ĝemantaj ; mi, tute malĝoja,
 Kreŭson denove, ankoraŭ denove, alvokis, sed vane ! 770
 Kaj dum, tra domoj de urbo, mi tute freneza sensfine

- Serĉas, subite fantomo terura, de Kreŭso mem Ombro,
 Antaŭ okuloj aperas, figuro pli granda ol home.
 Tremis mi, haroj stariĝis, kaj voĉo ekhaltis en gorĝo.
- 775 Tiam parolis ŝi, tiuj per vortoj pelante timegon :
 « Kial do vane ekkaptas vin-tiu freneza doloro,
 Edzo ĝentila? Ne tiu fariĝo sen dia volado
 Certe alvenis. Sed Kreŭso ne devas vin kiel kunulo
 Sekvi; ĉar tion ne volas reganto de supra Olimpo.
- 780 Longan ekzilon fininte, kaj maron sulkinte vastegan,
 Al Hesperuja kamparo vi venos, al Tibro Lidia,
 Kiu tra landoj popolaj kviete derulas ondegojn.
 Tie afero feliĉa, kaj regno, kaj reĝa edzino,
 Estas donotaj. Al Kreŭzo amita ne sendu plu larmojn.
- 785 Ĉar mi neniam Mirmidan domegon kaj belan loĝejon
 Vidos Dolopan, nek Grekajn patrinojn mi sklave servados,
 Mi, bofilino de dia Venuso kaj Dardanidino :
 Sed min potenca Patrino de dioj en tiuj detenas
 Bordoĵ. Adiaŭ. Komunan naskiton de amo konservu. »
- 790 Tiel ŝi diris, kaj poste, plorantan kaj multe volantan
 Ĝemojn esprimi, min lasis, flugante en fluan aeron.
 Kolon amatan ĉirkaŭi per brakoj trifoje mi penis,
 Vane! for manoj fantomo prenita trifoje foriris,
 Kiel malpeza venteto, simila al sonĝo flugila.
- 795 Tiam nur, nokton finitan, mi miajn revidas amikojn.
 Tie, mirinde! tre grandan anaron da novaj kunuloj,
 Kiuj al ni sin kunigis, mi trovas, patrinojn kaj virojn,
 Kiujn kolektis ekzilo, mizera amaso ploranta.
 Ili el ĉie elvenis, kuraĝaj kaj devon sentantaj,
- 800 Por min al lando ekzila tra maro bonvole sekvadi.
 Super supraĵo de Ido jam stelo matena leviĝis,
 Tagon montranta. Blokatajn Danaoj okupas pordegojn;
 Kaj nun, por savi Trojurbon, nenia ekzistas espero.
 Mi do ekstaris; kaj, patron portanta, aliris al monto.

KANTO TRIA

« Kiam Priaman popolon kaj regnon Azian detruis
 Dia dekreto maljusta, kaj grandan faligis Ilion,
 Kiam Neptuna Trojurbo fariĝis ruino fumanta ;
 Tiam, por serĉi diversajn ekzilojn kaj landon dezertan,
 Kaj por obei Fatalan ordonon, ni, apud Antandra 5
 Urbo kaj Ida montaro Friguja, konstruas ŝiparon.
 Kien Fatalo nin puŝos kaj fiksos neniel sciante,
 Virojn ni poste kolektas. Apenaŭ printempo naskiĝis :
 Velojn prezenti al ventoj ordonis Anĥizo la patro.
 Bordon patrujan ni lasas plorante, havenon, kaj fine 10
 Kampojn en kiuj eksestis Trojurbo. Ekzilen ironte,
 Filon, kunulojn, Penatojn kaj diojn mi kun mi kunportas.
 En malproksimo, ĉe lando Mavorsa, troviĝas kamparo,
 Kiun kulturatas Tracanoj : ĝin iam kruela Likurgo
 Regis, antikva amiko kun gastaj Penatoj, dum Trojo 15
 Estis prospera. Mi tien aliras : sur bordo kurbeta,
 Mi, instigita de dioj maljustaj, konstruas unuan
 Muron, kaj poste de nomo mem mia ĝin nomas : Enoso.
 Dionidinon patrinon kaj diojn gardontajn de nova
 Urbo mi pie laŭ rito honoris, kaj grasan boviron 20
 Buĉis sur bordo al reĝo reganta la Ĉielloĝantojn.
 Estis okaze monteto proksime : ĝin densa korneo
 Kronis, kaj branĉoj sennombraj de mirto pikile starantaj.
 Mi ĝin alpaŝis, kaj verdajn arbetojn el tero tiregi
 Penis, por kovri altaron per tiuj branĉetoj foliaj ; 25
 Kiam aperis vidaĵo terura kaj dire nebla.
 Ĉar, dum mi arbon el tero tiregas, ŝirante radikojn,
 Gutoj de sango nigrega el vundo unue elfluas,
 Kiuj al tero malpure verŝiĝas. Glacia teruro
 Min senmovigas, dum sangon en vejnoj haltigas timego. 30

- Ree alian trunketon flekseblan mi penas elŝiri,
 Kaŭzon kaŝitan de tiu mistero kompreni volante,
 Sango nigrega elfluas denove el ŝelo rompita. [rajn,
 Multojn en koro movante, mi Nimfojn preĝegis kampa-
- 35 Kaj la gardanton de lando Getana, la patron Gradivon,
 Por ke favora li faru miraklon, kaj signon bonigu.
 Tamen, tuj kiam, pli forte penante, mi trian trunketon
 Prenas, sur teron fiksinte genuojn por tiri pli bone,
 — Ĉu mi parolos, aŭ ĉu mi silentos? — ploranta ĝemado
- 40 Estas aŭdita en monto; kaj voĉo ekfrapas orelojn :
 « Kial Eneo min ŝiras mizeran? Vi, tombon respektu;
 Kaj ne krimigu de mano piecon. Trojido mi estas,
 Sekve ne fremda: kaj sangon amikan verŝadas radiko.
 Landon kruelan forkuru, kaj bordon forkuru avaran.
- 45 Ĉar Polidoro mi estas : kaj tie, tra korpo borita,
 Sagoj densegaj radikojn en tero rikolte kreskigis. »
 Tiam subite animon plenigis terura timego;
 Tremis mi; haroj stariĝis, kaj voĉo ekhaltis en gorgo.
 Ĉar Polidoron, kun ora amaso tre granda, sekrete
- 50 Iam Priamo al reĝo Tracuja, por ke li lin nutru,
 Sendis. Jam malfeliĉulo Trojanajn armilojn ne tute
 Estis fidanta, vidante sieĝon ĉirkaŭi Trojurbon.
 Tiu, tuj kiam rompiĝis feliĉo kaj regno Trojanaj,
 Agamemnonajn armilojn kaj sorton sekvinte venkantajn,
- 55 Sanktan forgesas promeson : li gaston mortigas, kaj oron
 Kaptas perforte. Al kio mortemajn kondukas animojn
 Ora malsato malpia! Sed kiam timego forlasis
 Ostojn, mi ĉefojn demandas precipajn kaj patron unue,
 Dian miraklon rakontas, kaj petas de ĉiu konsilon.
- 60 Unuanima ekkrio proponas el krima forkuri
 Lando, sur ŝipoj rapidaj, malpuran lasinte gastigon.
 De Polidoro ni do enterigon elfaras en tombon
 Grandan, el tero faritan : stariĝas altaroj por Ombroj;
 Ilin funebraj vualas rubandoj kaj nigra cipreso.
- 65 Ĝin Trojaninoj ĉirkaŭas kun malalligita hararo :
 Laŭ la kutimo, ŝaŭmplenajn de sango ofera kaj lakto
 Varma ni verŝas kalikojn; kaj poste, animon en tombon
 Plore metinte, ĝin laŭte ni vokas, je lasta memoro.

Tiam, tuj kiam ni povas al ondoj konfidi, dum ventoj
 Maron promesas kvietan, dum voĉo Aŭstera blovetas 70
 Dolĉe, ŝiparon ekflosas kunuloj kaj bordon plenigas.
 Ni el haveno eliras, dum landoj foriĝas kaj urboj.

Kuŝas en mezo de maro sanktega insulo : ĝin amas
 De Nereidoj patrino kaj dio Egea Neptuno.
 Arkoportanto dankema, el bordo vagintan al bordo, 75
 Iam ĝin fiksis, ĵus inter Mikono kaj alta Giaro,
 Por ke ĝi estu loĝita kaj ventojn malŝatu, senmova.
 Tien ni naĝas : kaj ĝia nin lacajn akceptas haveno,
 Tute trankvila. El ŝipoj, ni urbon salutas Apolan.

Reĝo Anio, samtempe reganto de homoj, kaj Feba [gan, 80
 Pastro, portante sur frunto rubandojn kaj laŭron sankte-
 Nin alkurinte, maljunan Anĥizon rekonas amikon.
 Manoj gasteme kuniĝas; kaj poste ni trafas loĝejon.
 Dion mi preĝas en templo farita el ŝtono antikva :
 « Firmajn loĝejojn nun donu, Timbreo ; laculoj ricevu 85
 Murojn, idaron kaj urbon daŭreblan, alian Pergamon.
 Trojon konservu, savitan el Grekoj kaj forta Aĥilo.
 Kiun ni sekvos? Nin kien aliri kaj resti vi volas?
 Patro, vi signon prezentu; kaj niajn en korojn eniru. »

Tion apenaŭ mi diris, subite ekstremis ĉirkaŭe 90
 Ĉio, kaj monto moviĝis kaj pordo kaj laŭro diaĵa,
 Dum tripiedo ĝis en malfermita sanktejo blekadis.
 Teren ni falas, preĝante; kaj voĉo ekfrapas orelojn :
 « Ho senlaciĝaj Dardanoj, la lando unua, en kiu
 Estis naskitaj prapatroj, denove, kun mammo feliĉa, 95
 Vin revenantajn akceptos. Antikvan do serĉu patrinon.
 Tie la domo Enea potencos sur ĉiuj popoloj,
 Poste filidoj de filoj kaj fine iliaj naskitoj. »
 Diris ĝi : Feba parolo, kun granda tumulto, feliĉe
 Estas aŭdita; kaj ĉiu demandas al kiuj muregoj 100
 Febo alvokas vagantojn, kaj ilir reveni devigas.

Tiam naskinto de viroj antikvaj memoras estinton :
 « Ĉefoj, aŭskultu, li diris, kaj viajn eksciu esperojn.
 Kuŝas, en mezo de maro, grandega insulo Jupitra,
 Kreto, kun Ida montaro, lulilo de nia popolo. 105
 Grandajn cent urbojn de regno riĉega okupas loĝantoj.

- Patro prapatra Teukro, se estas fidindaj rakontoj,
Iam el tie unua alvenis al bordo Retea,
Kie de regno li lokon elektis. Ilio, nek alta
- 110 Staris ankoraŭ Pergamo; kaj valoj nur estis loĝataj.
Same el tie Cibelo elvenis patrino, kupriloj
De Koribantoj, kaj Ida arbaro, kaj mutaj misteroj
Sanktaj, kaj ĉaron diinan tirantaj leonoj jungitaj.
Nu do, kuraĝu; kaj kien nin dioj kondukas aliru.
- 115 Ventojn ni igu kvietaj, kaj regnon ni trafu Gnosian.
Longa ne estas vojaĝo: se granda Jupitero nin helpos,
Tria mateno ŝiparon ekvidos ĉe bordo Kretuja. »
Tiel li diris: kaj apud altaroj li buĉis oferojn,
Bovon al dia Neptuno, kaj bovon al bela Apolo,
- 120 Nigran ŝafinon al Vintro kaj blankan al dolĉa Zefiro.
Famo rakontas ke, patra el regno pelite, la reĝo
Idomeneo dezertan de Kreto forlasis marbordon.
Estas do de malamikoj malplenaj loĝejoj kaj urboj.
Tiam ni celas Ortigan havenon kaj flugas sur ondo.
- 125 Nakson ni vidas, kaj monton Bakantan, kaj verdan Donison,
Kaj Olearon, kaj neĝan Paroson, Cikladojn sur maro
Dissemaditajn, kaj fluojn markolajn tra multaj insuloj.
Ŝipa kantado laŭtigas kaj helpas maristan laboron:
«Nu do, kuraĝu, kunuloj: prapatrojn kaj Kreton ni trafas.»
- 130 Vento favora blovetas kaj puŝas rapide irantojn.
Fine al bordoj Kuretaj antikvaj ni ĝoje alnaĝas.
Murojn de urbo naskota mi tiam konstruas rapide,
Kaj ĝin mi nomas: Pergamo. Al gento, feliĉa pri nomo:
«Hejmon vi amu, mi diras; kaj tuj fortikaĵon komencu.»
- 135 Ŝipoj jam estis sur seka marsablo trankvile tiritaj;
Novan kamparon kulturis junuloj kaj ĝoje edziĝis;
Leĝojn kaj domojn mi donis: subite aero fariĝas
Tute putrinta; malsano tra membroj enfluas kaj frapas
Homojn, brutaron, rikolton naskotan kaj jaran esperon.
- 140 Dolĉan vivadon unuaj forlasas; kaj korpojn malfortajn
Trenas aliaj, dum kampon senfruktan bruligas Sirio.
Herboj sekiĝas; kaj renton rifuzas malsana rikolto.
Por orakolon Ortigan kaj Feban demandi, konsilas
Patro ke ree ni maron transiru kaj petu, preĝante,

Kiam finiĝos suferoj, kaj kiel li serĉi ordonas 145
 Helpan rimedon, kaj kien li volas direkti iradon.

Nokto fariĝis; sur tero spirantojn okupis dormado.

Sanktaj figuroj de dioj, kaj tiuj Pénatoj Frigujaj,
 Kiujn, en mezo de urbo flamanta, mi kun mi el Trojo
 Estis rabinta, tuj antaŭ okuloj en sonĝo stariĝas, 50
 Hela je lumo brilante; ĉar, tra malfermita fenestro,
 Luno rondforma, en meza ĉielo, al ili lumigis.

Ili per tiuj paroloj ĉagrenon subite forpelas :

« Kion Apolo sciigus, se eble Ortigon vi trafus,

Ni al vi diros : ĉar Febo bonvole nin sendis en domon. 155

Kiam Trojurbo brulegis, ni viajn sekvadis armilojn ;

Maron ventegan sur ŝipoj ni kun vi kruele suferis :

Same al astroj ni iam naskotan portados idaron,

kaj ni potencon al Urbo donados. Por grandaj genepoj
 Faru grandmurojn, kaj longan laboron ne timu tra vojo. 160

Ŝanĝu loĝejon ; ĉar tiun ĉi bordon ne al vi konsilis

Dela Apolo : en Kreta kamparo ne restu pli longe.

Loko ekzistas, de Grekoj nomata nun lando Hespera,

Regno antikva, potenca batale kaj fruktoportega,

lam loĝita de viroj Enotraj : nun famo ilian 165

Nomas idaron : Italoj, el nomo de ĉefo nacia.

Estas jen vera patrujo ; ĉar tie Dardano naskita

Estis kaj patro Ĵasio, de kiuj devenas nacio

Nia. Stariĝu : al patro maljuna feliĉe konigu

Tiujn parolojn kredindajn. Koriton kaj landon Aŭzonan 170

Li do ekserĉu ; ĉar kampon Diktean Jupitero rifuzas. »

Tiu vidaĵo kaj voĉo de dioj min forte mirigas.

Estis ne sonĝo ; mi kredis iliajn rekoni vizaĝojn,

Kun vualita hararo, kun vere reala figuro.

Ŝvito glacia el membroj tremantaj senĉese fluadis. 175

Korpon el lito skuinte, ĉielen mi tiam dankemajn

Manojn kaj voĉon direktas, kaj vinan oferon preĝante

Verŝas sur fajron. Post kiam mi tiujn prezentis donacojn,

Ĝoje Anĥizon mi trafas, kaj ĉion detale rakontas.

Rason necertan, duoblajn prapatrojn li tiam rekonas : 180

Nova eraro pri lokoj antikvaj lin tute trompadis :

« Filo, li diras, de Trojaj Fataloj vi persekutita,

- Sola Kasandro al mi antaŭdiris pri tiuj fariĝoj :
 Kaj, pri estonto de nia nacio, ŝi — mi nun memoras —
- 185 Landon Hesperan kaj regnon Italan tre ofte nomadis.
 Kiu sed estis kredonta ke iam al bordo Hespera
 Venus Trojanoj? Ĉu ŝajnis kredinda Kasandra parolo?
 Feban obeu sciigon, kaj vojon nun sekvu pli bonan. »
 Tiel li diris : kaj ĉiuj tutkore konsilon aprobas.
- 190 Ree ni lasas loĝejon, kaj, kelkajn lasinte kunulojn,
 Velojn ni streĉas : ekflugas ŝiparo sur maro vastega.
 Kiam maralton aliris ŝiparo, tuj kiam neniam
 Tero aperis, sed ĉie ĉielo kaj ĉie ondaroj,
 Tiam super ni densiĝas vualo el nuboj nigregaj,
- 195 Nokton kaj vintron portante : kaj ondo malluma bolegas.
 Ventoj senĉese renversas akvaron; ondegoj altiĝas
 Monte, kaj nin dispelitajn ruladas en profundegaĵojn.
 Tagon detruis nubegoj. Dum nokto malseka ĉielon
 Kaŝis, el nuboj rompitaĵoj rapidas bruantaĵoj fajreroj :
- 200 Nia el vojo ĵetite, ni vagas sur ondoj mallumaj.
 Tagon je nokto, en tuta ĉielo, ne scias distingi
 Mem Palinuro; kaj vojon tra maro li ne plu rekonas.
 Ni dum tri tagoj, kaj tiom samtempe da noktoj senastraj,
 Vagas necerte, en nigra mallumo, sur ondoj koleraj.
- 205 Fine, post kvara mateno, stariĝas kaj estas vidata
 Tero, kaj montoj, kaj tre malproksime fumeto fluganta.
 Veloj ekfalas; ni prenas remilojn; rapide maristoj
 Penas turmenti akvaron, kaj ondon sublevas lazuran.
 Nin, el ondegoj savitajn akceptas unue Strofada
- 210 Bordo. Ĉi tiuj insuloj, nomitaj de Grekoj : Strofadoj,
 Kuŝas en mezo de maro Iona. Terura Celeno
 Tie loĝadas kun ĉiuj Harpioj, de tago ĉi kiam
 Ili forlasis pro timo palacon kaj tablon Finean.
 Monstron danĝeran, kaj peston kruelan, kaj dian koleron,
- 215 Stiksaj ondegoj neniam elfaris pli gravan ol ilin :
 Kapo knabina sur korpo de birdo, kaj ventro malpura
 Ĉiam iganta sterkaĵojn, kaj manoj ungegaj, kaj frunto
 Kiun senĉese malsato paligas.
 Tien portitaj, tuj kiam ni trafis havenon, jen estas
- 220 Grasa brutaro da bovoj, tra kampo vaganta sur herbo :

Poste ni vidas amason da kaproj sen ia gardisto.
 Glavo rapidas : ni diojn, kaj lin mem Jupiteron, invitas
 Tiun akiron kunmanĝi : ni poste, sur borda kavaĵo,
 Litojn starigas, kaj tiun manĝaĵon gustumas bonegan. 225
 Tiam subite teruraj Harpioj ekflugas el montoj,
 Falas el alte kun granda bruego, flugilojn agitas,
 Nian formetas manĝaĵon : kaj ĉion sterkaja kontakto
 Malpurigegas, dum voĉo koleras tra malbonodoro.
 Ree en larĝan kavernon kaj sub kavigitan ŝtonegon,
 Kiun ĉirkaŭe protektas arbaro per ombro terura, 230
 Tablojn ni portas, kaj fajron remetas sur sanktajn altarojn ;
 Ree, el loko ĉiela alia, el nesto malluma,
 Brue alflugas birdaro, viandon per ungoj disŝiras,
 Fine difektas per spiro. « Ekprenu, kunuloj, mi diris,
 Sagojn, kaj tiun kruelan bestaron batalu fortege. » 235
 Ili volonte ordonon obeas, de herbo kovritajn
 Glavojn aranĝas, kaj ŝildojn preparas sub branĉoj kaŝantaj.
 Kiam sur bordon kurbetan kriante ekfalas Harpioj,
 Donas signalon Miseno, per kupra trompeto, el alta
 Rifo : rapidas kunuloj kaj, novan provante batalon, 240
 Tiujn birdegojn de maro malpurajn mortigi penadas.
 Sed ve ! plumaro ne estas tranĉebla : vundebla ne estas
 Brusto : kaj ili, al astroj rapide fluginte, manĝaĵon
 Lasas duone morditan, kovritan de sterko malpura.
 Sola, sur alta ŝtonego, stariĝis Celeno, profeto 245
 De malfeliĉoj : ŝi tiun parolon el brusto eligas :
 « Ĉu do malsaĝe, per bova mortigo, per buĉo bovina,
 Laomedidoj, vi volas hodiaŭ komenci batalon ?
 Plie el regno patruja senkulpajn forpeli Harpiojn ?
 Aŭdu, kaj tiujn en viajn animojn fiksadu parolojn. 250
 Kion al Febo la Patro potenca, kaj kion al mi mem
 Diris Apolo, al vi mi, maljuna Furio, sciigos.
 Landon Italan vi trafos celitan ; en rodon Italan
 Ventoj favoraj vin puŝos, kaj vian permesos eniron.
 Tamen vi urbon donotan neniam zonados per muroj, 255
 Aŭtaŭ ol, pune de buĉo malpia, vin akra malsato
 Tablojn per dentoj disŝiri kaj poste manĝegi devigos. »
 Tiel ŝi diris ; kaj fluge arbaron ŝi trafas kaŝontan.

- Tamen de niaj kunuloj glacia teruro frostegis
 260 Sangon; elfalas animoj. « Armiloj ne estas uzotaj,
 Diras nun ili, sed preĝoj, se pacon ni volas ricevi,
 Estu ĉu ili diinoj, ĉu birdoj sterkaĵe kruelaj. »
 Patro Anĥizo, sur bordo starante, kun manoj levitaj,
 Grandajn diaĵojn alvokas, kaj sanktajn ordonas oferojn.
 265 « Dioj, forigu minacojn; danĝerojn deturnu, diaĵoj.
 Pian savadu popolon. » Li tiam el bordo disigi
 Ŝnuron ordonas, kaj poste ŝnuregojn malvolvi falintajn.
 Veloj per Noto streĉiĝas : sur ondoj ŝaŭmantaj ni flugas,
 Kien iradon direktas kaj ventoj kaj estro de ŝipoj.
 270 Dume, en mezo de ondoj, aperas arbara Zacinto,
 Kaj Dulikio, kaj Samo, Nerito kun krutaj ŝtonegoj.
 Rifojn Itakajn kaj regnon Laertan ni zorge evitas,
 Dum ni malbenas insulon nutritan kruelan Ulison.
 Baldaŭ de monto Leŭkata altaĵon ni vidas nebulan;
 275 Kaj, de maristoj timata, aperas Apola sanktejo.
 Tien ni lacaj aliras, kaj tiun eniras urbeton.
 Ankro ferdekon forlasas; kaj bordon flankiĝas ŝiparo.
 Fine, pri tero feliĉe trovita, ni tute ĝojantaj
 Dankas Jupitron, nin lavas, kaj hejtas altaron ofere;
 280 Poste, sur bordo Aktia, ni ludojn glorigas Iliajn.
 Malsekigitaj de grasa oleo, batalojn patrujajn
 Nudaj referas kunuloj feliĉaj; ĉar urbojn Argujajn
 Ili evitis, kaj tra malamikoj tranaĝis multegaj.
 Dume sur rondo de jaro finiĝis irado de suno.
 285 Vintro glacia kaj Akvilonvento agitas akvaron.
 Tiam mi ŝildon el kupro, de granda Abaso portitan,
 Fiksas sur pordon de templo; kaj tion per verso signalas :
Tiun el Grekoj venkantaj armilon ekkaptis Eneo.
 Poste mi lasi havenon ordonas kaj preni remilojn.
 290 Vete kunuloj frapadas ondaron kaj maron balaas.
 Baldaŭ aeraj Feacaj altaĵoj ne estas videblaj.
 Landon Epiran sekvinte, ni poste Kaonan havenon
 Trafas, kaj urbon Butrotan alrampas altege starantan.
 Tie al niaj oreloj alvenas neniel kredinda
 295 Famo : ĉar, sceptron Eacan kaptinte kaj Piran edzinon,
 Filo Priama, Heleno, potencus en urboj Danaaj;

Kaj Andromako de edzo patruja fariĝus edzino
 Ree. Mi miras : en koro naskiĝas grandega deziro
 Reĝon demandi, kaj tiujn aferojn ekscii mirindajn.
 Ŝipojn kaj bordon lasinte, mi tiam forlasas havenon. 300

Sanktajn oferojn farante malĝojajn, proksime de urbo,
 Apud Simoo malvera, en sankta arbaro, okaze
 Cindrojn Hektorajn honoris vidvino kaj Ombron alvokis;
 Kaj ŝi du florajn altarojn starigis, okazon de larmoj,
 Apud tombejo malplena, el verda monteto farita. 305

Ŝi do, tuj kiam ŝi min ekrekonas sub Trojaj armiloj,
 Staras senmova, je tiu apero fortege timante.
 Ŝiaj okuloj freneze rigardas kaj ostoj frostiĝas;
 Fine ŝi svenas, kaj, longa post tempo, parolas malforte :

« Tiu vizaĝo... ĉu vera? Ĉu vera... de ĝi posedanto? 310
 Filo diina, ĉu vi do nun vivas? Se lumo vin lasis,
 Kie Hektoro? » Ŝi diras, kaj verŝas larmegojn, kaj tutan
 Lokon je krioj plenigas. Mi pene malmultajn parolojn
 Povas respondi, kaj, tre kortusita, balbuti mallaŭte :

« Certe mi vivas, kaj vivon mi trenas tra ĉiuj danĝeroj. 315
 Tial ne dubu : vi vidas veraĵon.

Kia fariĝo malsupren faligis vidvinon de edzo

Tia? Kaj kiajn suferojn al vi do Fatalo rezervis?

Ĉu Andromako Hektora de Piro ĝojigis kuŝejon? »

Frunton ŝi tiam mallevas, kaj voĉo mallaŭta respondas : 320

« Inter aliaj, ho kiel feliĉa Priama filino,

Kiun, ĉe tombo Danaa kaj altaj de Trojo muregoj,

Sorto kondamnis al morto : ŝi lotojn suferis neniujn;

Poste, kaptita, de estro venkanta ŝi liton evitis!

Mi, post patruja brulado, portita tra maroj diversaj, 325

Povon fieran de filo Ahila, kaj junan mi devis

Amon toleri, kaj naski sklavine. Li poste, sekvonte,

Kiel fianĉo, nepinon de Ledo ĝis Lakedemono,

Volis al sklava Heleno min sklavan premie donaci.

Tamen Oresto, kolera pri la fianĉino rabita, 330

Kiun li forte amegis, per krimaj puŝita diinoj,

Apud patrujaj altaroj lin ne malfidantan mortigas.

Neoptolema pereo faligis en manojn Helenajn

Parton de regno. Li nomis la landon : kamparo Kaona;

- 335 Urbon : la urbo Kaona, el nomo de Troja Kaono.
 Poste, sur monto, li Trojon refaris kaj novan Ilion.
 Kial nun tien vin ventoj alpuŝis? Per kia Fatalo?
 Kia diaĵo al tiu ĉi bordo vin naĝi devigis?
 Knabo Askano ĉu vivas? Ĉu vi lin ankoraŭ posedas?
- 340 Kiam lin naskis patrino, jam Trojo....
 Kvankam infano, ĉu li de patrino bedaŭras pereon?
 Ĉu lin instigas al vira kuraĝo, al virtoj antikvaj,
 Patro Eneo kaj eble memoro de onklo Hektoro? »
- Tiel en larmoj ŝi sin fluidigis kaj plendon senfinan
- 345 Vane kriadis, jen kiam el muroj samtempe eliras
 Filo Priama Heleno, de multaj sekvata kunuloj.
 Samajn landanojn li ĝoje rekonas kaj domen kondukas,
 Meze de ĉiu parolo sennombrajn verŝante larmegojn.
 Antaŭirante, mi vidas malgrandan Pergamon, al granda
- 350 Trojo similan, kaj, Kzanto nomitan, mallargan riveron :
 Fine de Scea pordego mi sojlon plorante kisadas.
 Kun mi de urbo amika samtempe ĝuadas Trojanoj :
 Ilin akceptas la reĝo en siaj pordejoj larĝegaj.
 Ili, en mezò de korto, al Bako trinkaĵojn oferis,
- 355 Antaŭ manĝaĵoj en oro metitaj, kaj tenis kalikojn.
 Tago jam fluis, kaj tago ĝin sekvis alia; kaj ventoj
 Velojn alvokas, dum ŝvelas linveloj per blovo Aŭstera.
 Tiam per tiuj paroloj mi reĝon kaj pastron demandas :
 « Troja naskito, vi kiu de dioj tradukas voladon,
- 360 Kiun inspiras Apolo, kaj laŭro de Klaro, kaj astroj,
 Kaj tripiedoj, vi kiu komprenas flugadon de birdoj,
 Diru : al mi orakoloj favoraj jam montris iradon :
 Ĉiuj diaĵoj konsilis al bordo Itala direkti
 Ŝipojn, kaj tiun serĉadi kamparon ve! tro malproksiman.
- 365 Sola Harpio Celeno, per vortoj minacaj, anoncas
 Novan miraklon, diaĵan koleron terure malgajan,
 Fine malsaton kruelan. Nun kiun danĝeron eviti?
 Kion mi faros por resti venkanto en tiuj laboroj? »
- Tiam Heleno, laŭ sankta kutimo, ekbuĉas unue
- 370 Bovojn, kaj petas bonvolon de dioj. Li poste el kapo
 Sankta rubandojn eligas, kaj, Febo, al via sanktejo
 Min mem, pro dia majesto tremantan, per mano kondukas.

- Tie, per buŝo de pastro, dekretojn konigas diego :
 « Filo diina, protekto potenca vin helpas tra maroj ;
 Estas sendube : ĉar Reĝo de dioj komandas Fatalojn, 375
 Ĉiujn preparas fariĝojn, kaj ordon direktas eterne.
 Al vi malmulte mi diros, sufiĉe por ke vi pli nepre
 Povu transiri tra maroj gastemaj, kaj fine havenon
 Trafi Aŭzonan : ĉar Parkoj ne volas ke ĉion estontan
 Sciu Heleno ; kaj min malpermesas paroli Junono. 380
 Landon Italan unue, ĝin kiun vi kredas proksima,
 Tiujn havenojn en kiujn vi baldaŭ eniri esperas,
 Malproksimigas el tiu ĉi urbo danĝera vojego.
 Viaj en maro Sicila faldiĝos remiloj ; ŝiparo
 Ondojn sulkados Aŭzonajn, kaj lagon inferan, kaj fine 385
 Ean insulon de Circo, antaŭ ol al vi diaĵoj
 Urbon en lando certega trankvile konstrui permesos.
 Signon mi donas : en via memoro ĝin zorge konservu.
 Kiam do, priokupata, vi apud sekreta rivero
 Trovos grandegan porkinon sub kverkoj de bordo kuŝantan, 390
 Blankan, kun tridek porkidoj blanketaj kaj nove naskitaj,
 Kiu sur sablo al mamoj patrinaj por suĉi rapidos,
 Tie do urbo stariĝos, kaj viaj finiĝos laboroj.
 Gravan pri tabloj manĝotaj ne timu fariĝon estontan :
 Trovos rimedo Fataloj, kaj helpos Apolo vokita. 395
 Tamen ĉi tiun kamparon, ĉi tiun marbordon Italan,
 Kiu ĵus kuŝas proksime de nia ŝaŭmanta akvaro,
 Zorge evitu : ĉar tiuj muregoj de Grekoj malbonaj
 Estas loĝataj. Ĉi tie domaron konstruis Naricaj
 Lokroj ; Salentan kamparon je siaj soldatoj plenigas 400
 Idomeneo Likšana ; proksime vidiĝas Petilo,
 De Filokteto, la ĉefo Meliba, malgranda urbeto.
 Kiam, post via irado trans ondoj, ripozos ŝiparo,
 Kaj sur altaroj, sur bordo starantaj, vi preĝe oferos,
 Kapon vuali per tuko purpura vi zorge memoru, 405
 Por ke, dum fajroj sanktegaj brulados por dia honoro,
 Malamikema vizaĝo oferon ne povu konfuzi.
 Tiun ĉi riton vi ĉiam kaj viaj kunuloj konservos :
 Ĉiam al tiu simbolo genepoj restados fidelaj.
 Kiam do ventoj vin forveturintan al bordo Sicila 410

- Puŝos, kaj kiam Pelora markolo pli larĝa fariĝos, [biĝo
 Teron maldekstran kaj maron maldekstran per longa kur-
 Celu, sed dekstrajn akvaron kaj bordon forkuru atente.
 Ŝanĝas naturajn aferojn longega daŭrigo da jaroj.
- 415 Iam, per granda kaj forta tremado tuj renversegitaj,
 Tiuj ĉi lokoj disiĝis : dum ambaŭ landaroj kuniĝis,
 Unu farante, fortega alkuris marego, kaj ondoj,
 Inter Hespera kaj bordo Sicila farinte markolon,
 Urbojn kaj kampojn disigis kaj limis per bordo duobla.
- 420 Scilo malluma sin dekstre, maldekstre kruela Karibdo
 Kaŝas : trifoje en ventron profundan ŝi, larĝa per trinko,
 Ondojn englutas multegajn, kaj ree, per movo alterna,
 Ilin ŝi vomas aeren ; kaj ondoj frapegas ĉielon.
 Scilo en flanko de kavo malluma sin tenas kuŝantan,
- 425 Kapon forigas, kaj ŝipojn al rifoj altiras perfide.
 Homa vizaĝo kaj brusto de bela knabino ĝis zono
 Estas montrata supere, sed korpo de fiŝo infere,
 Kiun daŭrigas delfena vostego kaj ventro lupina.
 Randon Pakinan de lando Sicila vi devos prefere
- 430 Ĉirkaŭiradi, kaj longan turniĝon prudente trairi ;
 Sed vi, eĉ unu fojon, ne vidu, en vasta kaverno,
 Scilon senforman kaj hundojn de maro tra rifoj bojantajn.
 Plie se pastro Heleno pri ia saĝeco fariĝis
 Tute fidinda, se vere animon plenigas Apolo,
- 435 Antaŭ aliaj, al vi mi rediros, naskito diina,
 Unu konsilon, kaj ĝin mi ripetos denove, denove.
 Preĝe unue de granda Junono adoru diecon ;
 Petu Junonon per multaj preĝadoj ; per riĉaj donacoj
 Vi senarmigu reĝinon potencan ; kaj, tiel venkinte,
- 440 Landon Italian vi trafos, insulon lasinte Sicilan.
 Tien veninte, tuj kiam vi kuman urbeton aliros,
 Lagon diaĵan Avernon, kaj ĝian arbaron bruantan,
 Tiam vi vidos pastrinon frenezan en kava ŝtonego.
 Vortojn ŝi kantas Fatalajn, kaj skribas sur palmaj folioj :
- 445 Nomojn kaj signojn versforme skribitajn ĉi tiu knabino
 Orde surmetas, kaj ilin kaŝitajn enfermas en groto :
 Ili senmove restadas, neniam je ordo ŝanĝante.
 Tamen se vento malforta, el pordo malbone fermita,

Blovas, kaj tiujn foliojn subite translokas malpezajn,
 Ilin flugantaj en kavo ŝtonega ŝi lasas, kaj orde 450
 Tiujn versaĵojn reloki kaj ligi neniel ŝi zorgas.
 Estas nenia respondo; kaj oni malbenas Sibilon.
 Tie restadu, kaj tempon ne timu elspezi sufiĉan;
 Kiam eĉ krius kunuloj, kaj kiam fortege al maro
 Veloj irontojn alvokus, per vento favora ŝvelintaj. 455
 Trafu pastrinon; kaj de ŝi per preĝoj petegu respondon,
 Por ke ŝi kantu, kaj buŝon kaj voĉon volonte malfermu.
 Ŝi al vi diros Italajn popolojn, batalojn estontajn;
 Kiel vi povos plenumi aŭ eble forkuri laboron;
 Kaj, por vin danki, ŝi vian iradon ebligos facila. 460
 Kiujn mi povas per voĉo anonci jen estas aferoj :
 Iru; kaj grandan Trojurbon ĝis astroj altigu glorege. »
 Kiam, per voĉo amika, Heleno parolis la pastro,
 Donojn, faritajn el elefantosto kaj oro masiva,
 Porti al ŝipoj li tiam ordonas, kaj ilin je multaj 465
 Ŝarĝas arĝentaj objektoj; jen estas do : vazoj Dodonaj,
 Poste kiraso trioble teksita el maŝoj orataj,
 Kasko kun brila plumfasko, kun bela hararo, armilo
 Neoptolema. Al patro li same prezentas donacojn.
 Reĝo aldonas ĉevalojn kun estroj, 470
 Kaj remistaron plenigas, al ĉiuj doninte armilojn.
 Tamen ŝiparon prepari ordonas Anĥizo, por povi
 Velojn al vento favora prezenti sen la prokrasto.
 Tiam ministro de Febo, kun granda respekto, parolas :
 « Granda Anĥizo, kaj edzo glorega de sankta Venuso, 475
 Zorgo de dioj, dufoje savita el falo Pergama,
 Estas Aŭzona kamparo proksima; ĝin trafu per veloj.
 Tamen ĝin estas necese tra maro longtempe konturi;
 Ĉar malproksime troviĝas la parto montrita de Febo.
 Iru, li diris, feliĉa pro tila pieco! Pli longe 480
 Kial paroli, kaj kial Aŭsterojn prokrasti blovantajn. »
 Sed Andromako, malgaja pro tiu foriro ĉiama,
 Vestojn el ora teksaĵo broditajn kaj jakon Frigujan
 Donas al filo Askano : ŝi edzon egalas per donoj,
 Knabon ŝarĝadas per ŝtofaj donacoj, kaj tiel parolas : 485
 « Tiujn objektojn, de mano mem mia faritajn, akceptu,

- Knabo; kaj de Andromako, Hektora edzino, nun ili
 Amon atestu fervoran : de viaj parencoj jen lasta
 Doĥo : ve! viva portreto vi estas de Astianakso.
- 490 Tiujn okulojn, kaj manojn, kaj buŝon li, mia fileto,
 Havis : li estis samaĝa, nun sekve li estus junulo! »
 Ilin mi lasis, kun larmoj en miaj okuloj, dirante :
 « Vivu feliĉaj, ĉar estas por ĉiam fiksata estonto
 Via : min puŝas Fatalo, dum sekvas danĝero danĝeron.
- 495 Ĉar nun vi povas ripozi : neniel vi devos sulkigi
 Maron, kaj kampon Aŭzonan serĉadi senĉese flugantan
 Antaŭ ŝiparo. Figuron de Kzanto kaj Trojon vi vidas,
 Kiujn vi faris de propra laboro, kun sorto pli bona :
 Ĉar ni esperu ke Grekaj atakoj ĝin malpli minacos.
- 500 Kiam mi Tibron aliros kaj kampon proksiman de Tibro,
 Muron de mia popolo se iam mi vidas, mi volas,
 Inter nacioj proksimaj kaj urboj amikaj, Hespera
 Lando kaj bordo Epira, ke ligo fariĝu : ĉar ilin
 Sama Dardano kaj samaj suferoj kunigis en koroj.
- 505 Trojon ni faros nun solan; kaj ĵuron respektos genepoj. »
 Tamen sur maro ni naĝas, proksime de montoj Keronaj:
 Vojo plej rekta por iri tra maro ĝis bordoj Italaj.
 Suno samtempe ekfalas, kaj montoj ombrigaŝ mallume.
 Apud akvaro, sur bruston de tiu serĉita kamparo,
- 510 Ĉiuj remistoj je l'trafo kuŝiĝas, sur seka marbordo,
 Fortojn riparas; kaj membrojn lacetajn penetras dormado.
 Nokto, de Horoj trenata, ne estis en mezo de iro;
 Sed Palinuro atenta el lito sin levas; li ĉiujn
 Ventojn esploras, kaj blovojn demandas per siaj oreloj.
- 515 Ĉiujn li astrojn rigardas tra spaco silente rulantajn,
 Ursojn duopajn, Arkturon, pluviajn Hiadojn, kaj fine
 Glavon rimarkas de hela Orio kaj oran armilon.
 Kiam li vidas ĉielon kvieta kaj pura aeron,
 Bruan signalon li donas el ŝipo : ni faldas tendaron,
- 520 Streĉas flugilojn de veloj, kaj vojon reprenas kuraĝe.
 Tamen ruĝiĝis Aŭroro, kaj astroj ĉiele paliĝis,
 Kiam ni en malproksimo montetojn mallumajn kaj landon
 Vidas Italian. « Itala! » unue ekkrias Akato.
 Ĝojaj kunuloj Italian tutkore per krioj salutas.

Tiam Anĥizo la patro kalikon verdaĵe kronatan 525
 Larĝe je vino plenigas, kaj diojn alvokas, dum li sur
 Alta ferdeko de ŝipo stariĝas.
 « Dioj de maro kaj tero, vi kiuj potencas ventegojn,
 Vojon kaj venton ekdonu facilan, kaj estu favoraj. »
 Vento vokata pliiĝas; haveno aperas proksime; 530
 Poste preĝejo Minerva montriĝas sur alta supraĵo.
 Velojn mallevas kunuloj, kaj ŝipojn al bordo direktas.
 Kontraŭ fluado de Eŭro kurbiĝas arkforma haveno;
 Rifojn antaŭajn ŝaŭmigas salakvo per frapo senĉesa;
 Ĝin du turformaj ŝtonegoj ĉirkaŭas je muro duobla, 535
 Kiel du brakoj, kaj kaŝas; dum templo foriĝas el bordo.
 Tie, je signo unua, mi vidas ĉevalojn en herbo,
 Kiuj kvarope, pli blankaj ol neĝo, en kampo sin paŝtis.
 Tiam Anĥizo : « Batalon vi portas, ho lando gastama;
 Ĉar por milito armiĝas ĉevaloj; kaj tiu brutaro 540
 Nin de batalo minacas. Sed tiri kaleŝojn kutimas
 Ofte ĉevaloj, dum ili toleras jungaĵon kaj bridon :
 Paca espero, li diris. » Ni preĝas diinan Palason
 Armilosonan; ĉar ŝi nin venkantajn akceptis unua.
 Antaŭ altaro mi kapon vualas per tuko Friguja, 545
 Kaj, laŭ la grava konsilo de pastro Heleno, laŭ rito
 Ni al Junono Arguja oferojn prezentas kutimajn.
 Kiam, laŭ ordo simbola fariĝis oferoj, rapide
 Longajn velstangojn kun veloj pendantaj ni turnas al maro,
 Grekajn loĝejojn lasinte danĝerajn kaj bordon suspektan. 550
 Tiam ni vidas golfegon de urbo Herkula Tarento,
 Vera se estas la famo; dum staras kontraŭe Laĉina
 Templo, Kaŭlonaj supraĵoj, kaj ŝippereiga Scilaco.
 Etno aperas, sed tre malproksime, en ondo Sicila.
 Grandan ni aŭdas ĝemadon de maro, de ŝtonoj ĵetataj 555
 Kontraŭ ŝtonegojn, kaj bruon teruran de ondoj muĝantaj.
 Ili bolegas, saltegas, kaj supren flosigas sablaron.
 Tiam Anĥizo la patro : « Ĉu estas ĉi tiu Karibdo?
 Tiujn ŝtonegojn kaj rifojn terurajn anoncis Heleno.
 Sekve, forkuru, kunuloj; kaj forte manprenu remilojn. » 560
 Tiun ordonon obeas maristoj : ŝipnazan ŝnuregon
 Tuj Palinuro al ondoj maldekstraj unua deturnas :

Tuta ŝiparo remile kaj vele lin sekvas maldekstren.
 Supren ni iras ĝis astroj, sur kurbo de akva monteto;
 565 Poste al Manoj inferaj nin suben faligas ondego.
 Inter ŝtonegaj kavaĵoj trifoje sonadis rifegoj;
 Ŝaumon trifoje ni vidis fluantan el astroj malsekaj.

Tamen nin lacajn bloveto de vento kaj suno forlasas.
 Vojon neniel sciante, ni bordon aliras Ciklopan.
 570 Larĝa haveno aperas, ŝirmata el venta aliro.
 Etno proksime resonas de faloj terure bruantaj.
 Nubon nigregan dum tiu vulkano forĵetas aeren, [ĝojn,
 Cindrojn brulantajn kraĉante kaj fumajn blovante turni-
 Globojn flamantajn ĝi sendas al astroj kaj lekas ĉielon :
 575 Aŭ kelkafoje ĝi rokojn ŝiritajn el ventro montega
 Vomias, kaj fluidigitajn ŝtonegojn, kun granda ĝemado,
 Rulas tra spaco larĝega, dum bolas profundaj kavernoj.
 La Encelada korpego, per fulmo duone frapita,
 Kuŝus, laŭ famo, sub maso pezega : ĝi tiam, per Etna
 580 Monto premata, de fornoj rompitaĵoj elspirus bruladon :
 Kiam ĝi laca sin turnas, ĝi tutan tremigas Sicilon ;
 Bruas kavaĵoj, kaj larĝa ĉielo je fumo kovriĝas.
 Tuta dum nokto, sub densa arbaro, ni tiun vidaĵon
 Mire rigardas, de bruado serĉante tialon, sed vane.
 585 Estis ĉar astroj eteraj sen brilo ; malluma poluso
 Stelon neniun posedis ; nebuloj densegaj ĉielon
 Kovris ; kaj luno en nubo sin kaŝis tra nokto profunda.

Tago sekvanta leviĝis apenaŭ el ruĝa Eoo,
 Kaj el poluso aeron malsekan forpulis Aŭroro,
 590 Kiam, el densa arbaro, subite neniel konita
 Viro aperas, kun korpo malgrasa, kun vestoj ŝiritaj,
 Mizeregulo : al bordo preĝante li manojn prezentas.
 Lin ni rigardas : malbela, malpura, kun barbo longega,
 Veston per dornoj liginte, li ploras : ni Grekon rekonas.
 595 Iam li venis al Trojo, de patraj vestita armiloj.
 Sed li unue armilojn Dardanajn kaj Trojajn vestaĵojn
 De malproksime ekvidas : lin tia vidaĵo ŝancelas ;
 Poste li haltas tremante : sed baldaŭ, al bordo kurante,
 Li nin petegas kun larmoj kaj preĝoj : « Per astroj, per dioj,
 600 Kiuj nin vidas, per tiu ĉiela aero spirebla,

Min elirigu el tiu ĉi loko, kaj ien konduku,
 Kien vi volos. Mi estis soldato en ŝipoj Danaaj;
 Kontraŭ Iliaj Penatoj mi faris batalon, mi tiun
 Krimon konfesas : se ŝajnas tro granda ĉi tiu ofendo, 605
 Korpon rompitan forĵetu en maron kaj poste dronigu ;
 Ĉar se mi mortos, mi volus pereĵi de mano de homoj! »
 Tiel li diris, kisante genuojn, premante piedojn,
 Tere kuŝante. Ni : kiu li estas, kaj kiu lin sango
 Naskis? demandas; kaj : « Kiel Fatalo vin frapis? Konfesu. »
 Patro Anĥizo al tiu junulo ĝentile prezentas 610
 Manon, kaj lian, per gesto protekta, fortigas animon.
 Tiam, lasinte timegon, li tiel trankvile parolas :
 « Ano Itaka, kunulo de malfeliĉega Uliso,
 Akemenido nomita, kaj de Adamasto malriĉa
 Filo, mi, tiel restinte, nun estus ankoraŭ feliĉa. 615
 Tie min Grekoj forgesis kaj lasis en vasta Ciklopa
 Groto, dum ili tremantaj ĉi tiun teruran forkuris
 Landon. Malluman kaj vastan loĝejon plenigas putrintaj
 Karnoj kaj sango. Li estas giganta kaj altajn repuŝas
 Astrojn. — Ho dioj, vi tian pestajon el tero forigu! — 620
 Vidi lin, kun li ĝentile paroli neniu kuraĝas.
 De mizeruloj kaptitaj viandon li manĝas kaj sangon.
 Iam, en mezo kaverna kuŝinte, de niaj kunuloj
 Li mem ekprenis du korpojn, kaj ilin, de mano premitajn,
 Kontraŭ ŝtonegon disrompis, kaj sangon ŝprucigis sur sojlon. 625
 — Tion mi vidis. — Kaj malpurigitajn de sango nigrega
 Membrojn manĝinte, li ostojn per dentoj krakigis pistitajn.
 Tamen pro krimo li estis punita : ne povis Uliso,
 Ĝin tolerante, lertecon forgesi en tia danĝero.
 Kiam giganto, de manĝo satita, de vino ebria, 630
 Kuŝis, kaj kapon kurbigis fleksitan, kavernon plenigis
 La grandegulo, kaj kraĉojn kun vino, kun sangaj karnaĵoj,
 Vomis per bruaj singultoĵoj : sed tiam, preĝinte potencajn
 Diojn, ni taskon al ĉiu disdonas; kaj kune, de ĉie
 Lin ĉirkaŭante, ni grandan kaj solan krevigas okulon 635
 Per stangopinto, okulon minacan, sub frunto kaŝatan,
 Forme similan al ŝildo Arguja, al Feba lampego.
 Fine, ĝojantaj, de niaj kunuloj ni venĝas fantomojn.

- Sed nun, forkuru, mizeraj, forkuru; el bordo ŝnuregon
 640 Rompu.
 Ĉar Polifemo grandega ne sola, en nigra kaverno, [mas
 Lanoportantan brutaron enfermas kaj mamojn kunpre-
 Sed cent aliaj Ciklopoj teruraj sur kurba marbordo
 Loĝas, kaj tie kaj tie ĉi vagas sur montoj altegaj.
- 645 Kornoj de luno trifoje jam brilis de lumo renova,
 Dum mi en tiu arbaro, tra bestaj nestegoj kaj domoj,
 Vivon trenadas : Ciklopoj grandegajn mi rampi sur rifoj
 Vidas, kaj tremas tuj kiam mi voĉon ekaŭdas kaj paŝojn.
 Berojn kaj ŝtonajn burĝonojn, manĝaĵon malbonan, branĉe-
 650 Donas; kaj elterigitajn radikojn mi manĝas herbajajn. [toj
 Ĉien mi rigardadante ekvidis ŝiparon, al bordo
 Kiu alnaĝis : mi, kio ajn estu, min al ĝi liveris.
 Estos sufiĉe feliĉe se genton mi lasos kruelan.
 Prenu min : ian alian mortigon mi certe pli amas. »
- 655 Li do apenaŭ parolis, subite, sur alta supraĵo,
 Inter brutaro, ni vidas movadon de maso vastega,
 De Polifemo paŝtisto : li bordon aliras konitan,
 Monstro terura, senforma, grandega kaj blinda por ĉiam.
 Trunko abia firmigas marŝadon kaj manon direktas.
- 660 Lanoportantaj lin sekvas ŝafinoj, nun sola plezuro,
 Sola konsolo de liaj suferoj.
 Kiam li bordon profundan alvenis kaj tuŝis ondaron,
 Sangon el sia okulo krevita li lavis fluantan,
 Ĝeme, kun dentaj grincadoj : li poste eniras en ondojn,
 665 Kiuĵ, en mezo, apenaŭ de brusto atingas altecon.
 Tiam ni, tute tremantaj, forkuron akcelas, preĝantan
 Malfeliĉulon akceptas, kaj tranĉas silente ŝnuregon.
 Vete, kurbataj sur ŝipaj remiloj, ni fendas akvaron.
 Tion li sentis, kaj flanken de bruo sin tiam direktis.
- 670 Sed li, sentinte ke ŝipo ne estas prenebla per mano,
 Ke li ne povas de maro Iona atingi profundon,
 Grandan ekpuŝas kriegon : ĝi maron kaj ĉiujn tremigas
 Ondojn, kaj landon Italian pro timo tremantan; kaj fine
 Kurbaj kavernoj de Etna montego profunde muĝadis.
- 675 Tamen Ciklopa anaro, el montoj kaj altaj arbaroj,
 Trafas rapide proksiman havenon, kaj bordon plenigas.

Etnajn ni fratojn ekvidas; per vane kruelaj okuloj
 Ili minacas, kaj kapojn altegajn direktas al astroj.
 Konsilantaro terura! Simile, sur monĉa supraĵo,
 Staras ĉu kverkoj aeraj, ĉu konoportantaj cipresoj, 680
 Alta arbaro Jupitra aŭ sankta Diana parkego.

Timo fortega nin streĉi instigas hazarde ŝnuregojn;
 Velojn ni penas al ventoj favoraj prezenti ŝvelintajn.
 Vane konsilis Heleno ke inter Karibdo kaj Scilo
 Ni ne transiros; ĉar morto ĉi tie kaj tie minacas 685
 Same, ni, retransirinte, unuan reigas iradon.
 Sed tuj, jen estas Boreo, sendita el monto Pelora,
 Kiu nin helpas: li nin transirigas ŝtonegan enfluan
 Pantagiasan, kaj golfon Megaran, kaj Tapson kuŝantan.
 Bordojn, konitajn dum iam li vagis, signalis denove 690
 Akemenido, kunulo de malfeliĉega Uliso.

Inter Sikana golfeto kaj urbo malseka Plemiro,
 Kuŝas insulo: ĝin viroj antikvaj alnomis: Ortigo.
 Tie Alfeo, Elida rivero, laŭ fama rakonto,
 Vojon sekretan sub maro sekvinte, aperas; kaj tie 695
 Kun Aretuso, Sicila rivero, kunmiksas ondeton.
 Grandajn diaĵojn tieajn ni preĝas ordone, kaj poste
 Vidas proksime senmovan Heloron kaj grasan kamparon.
 Rifojn Pakinajn ni tiam tuŝetas, kaj alte pendantajn
 Rokojn; kaj en malproksimo aperas kamparo Kamara, 700
 Kiun Fatalo por ĉiam fiksadis, kaj Gelaj pluglandoj,
 Fine grandega Gelurbo, de Gela rivero nomita.
 Pli malproksime, krutega Akrago fortikajn starigas
 Murojn; ĝi iam en kampoj vivegajn nutradis ĉevalojn.
 El vi min ventoj flugantaj repuŝas, palmuja Selino. 705
 Super rifaro Liliba kaj ŝtonoj kaŝataj ni naĝas.
 Fine Drepana haveno kaj bordo senfrukta akceptis
 Mian ŝiparon. Sed tie, post tiom da gravaj ventegoj
 Jam suferitaj, mi patron Anĥizon, konsolan subtenon,
 Perdas. En tiu ĉi loko, ho patro bonega, vi lasis 710
 Vian naskiton, el multaj danĝeroj ve! vane savitan.
 Tiun ĉagrenon anoncis nek pastro Heleno, pri multaj
 Malfeliĉaĵoj profeto, nek monstro kruela Celeno.
 Tie finiĝis laboro, kaj ĉesis tro longa irado.

- 715 Poste, el tie, al via marbordo min dio kondukis. »
 Tiel Eneo la patro de dioj klarigis agadojn
 Al ĉeestantoj atentaj, kaj ilin pri kuroj konigis.
 Tamen li fine silentis, kaj sian haltigis rakonton.

KANTO KVARA

- Tamen reĝino, de grava amego de longe boritā,
 Vundon nutradas en vejnoj, kaj fajron profunde kovantan.
 Granda kuraĝo de viro kaj lia glorega nacio
 Pensojn okupas : vizaĝo kaj vortoj en koro fiksitaj
 5 Restas, dum dolĉan ripozon el membroj elprenas timeto.
 Hele al tero lumigis lampego sekvanta de Febo,
 Kaj el poluso malsekan ombraron dispelis Aŭroro,
 Kiam al kara fratino ŝi tiel malsaĝe parolas :
 « Anjo, fratino, min kiaj teruraj turmentas songegoj?
 10 Kia do estas la gasto, en nia sidinte loĝejo?
 Kian belecon li havas vizaĝe, kaj kore fortecon!
 Certe li estas, mi kredas tre forte, de nasko diina.
 Timo malfortajn elmontras animojn. Lin kiaj Fataloj
 Premis : de kiaj bataloj li sangajn rakontis danĝerojn.
 15 Certe, se mia animo ne starus senmova kaj fiksa;
 Se mi denove dezirus min ligi per edzaj ligiloj;
 Kiam unuan amegon trompegis mortigo kruela,
 Al mi se edza lumingo kaj lito ne estus malgajaj;
 Eble nur tiu kulpeto min povus faligi venkitan.
 20 Anjo, mi tion konfesas; de edza fatalo mizera,
 Kiu per frata krimego Sikeajn sangigis Penatojn,
 Li nur sentaĵojn ekscitis kaj koron ŝancelis vidvinan.
 Ve! de maljuna brulado mi tute rekonas restaĵon!
 Tamen, sub paŝoj tuj malfermiĝante, min tero englutu,
 25 Min ĉiopova la Patro en ombrojn per fulmo forĵetu,
 Inter Erebaj fantomoj palegaj, en nokto profunda,

Antaŭ ol leĝojn, Hontemo, mi lasos kaj malrespektegos.

Tiu ĉi, kiu unue kun mi sin kunigis, kunportis

Amon : ĝin li do, pri tio zorgante, en toambo konservu. »

Tiel ŝi diris : kaj bruston plenigis fluanta larmaro. 30

Anjo respondis : « Fratino, pli kara ol lumo de suno,

Ĉu do malĝojan junecon vi sole vivadi deziras,

Ĉarmajn naskitojn kaj ĝuon Venusan neniam koninte?

Ĉu do vi kredas ke cindroj kaj Ombroj pri tio prizorgas?

Ĝis nun se edzo nenia de koro fleksigis malĝojon, 35

Ĉu en Libujo, ĉu iam en Tiro; se ĉefon Iarbon

Vi jam repuŝis kaj ĉiujn aliajn pri kiuj Afriko

Estas fiera, vi kial forpelus agrablan amegon?

Landon rigardu en kiu vi regnon starigis Kartagan :

Tie ĉi, urboj Getulaj, nacio ne arme venkebla; 40

Poste vin zonas senbridaj Numidoj kaj Sirtoj malhelpaj;

Tie kuŝadas dezerto, kaj pli malproksime minacaj

Barkoj : ĉu mi memorigos militon el Tiro venontan,

Fine minacojn de frato?

Certe mi pensas ke dia volado, Junono favora, 45

Tien, per vento, de ŝipoj Iliaj alpuŝis iradon.

Kian grandurbon kaj regnon ĉi tia elfarus edziĝo!

Tion vi vidas, fratino : kun Trojaj armiloj kunulaj,

Kiel glorege altiĝus estonto kaj famo Penujaj.

Helpon de dioj vi tamen petegu : post sanktaj oferoj, 50

Gastojn akceptu amike; prokrastajn elpensu rimedojn,

Kiam Orio kaj vintro malseka renversas ondegajn,

Kiam ĉielo minacas, dum estas rompita ŝiparo. »

Tiuj paroloj flamigis animon de amo brulantan,

Naskis esperon en koro dubanta, kaj pelis hontemon. 55

Ili unue preĝejojn vizitas, kaj apud altaroj

Pacon petegas, laŭ rito dujarajn buĉante ŝatidojn

Al leĝdonanta Cereso, al Febo, al patro Lieo,

Kaj al Junono precipe, zorganta pri edza jugado.

Dekstra per mano tenante kalikon, ŝi, Dido belega, 60

Verŝas likvoron en mezon de kornoj de blanka bovino.

Antaŭ figuroj diajaj ŝi rampas al grasaj altaroj,

Tagon komencas per donoj, sin klinas al brustoj de brutoj

Tuj malfermataj, kaj pulmojn demandas ankoraŭ spirantajn.

- 65 Ve! nescieco de pastroj divenaj! Al Dido malsaĝa
 Preĝoj kaj temploj neniel utilas. Interne ŝin dolĉa
 Fajro bruligas; kaj vundo sekreta pliiĝas en koro.
 Flamas malfeliĉulino : kaj ĉie en urbo vagadas
 Ŝi furioza, simila al cervo per sago frapita,
- 70 Kiun, en Kreta arbaro, paŝtisto surprizis, kaj boris
 De malproksime : dum kredas ĉi tiu ke fero flugila
 Estas perdita, ĝi kuras freneze tra arboj Dikteaj,
 Kanon mortigan en flanko vundita portante fiksatan.
 Nun ŝi Eneon en mezon de muroj kunule kondukas,
- 75 Montras fiere Sidonajŝ riĉaĵojn kaj urbon jam pretan.
 Ŝi ekparolas; sed meze de vorto ŝi haltas timeme.
 Kiam ekfalas la tago, ŝi novajn deziras festenojn;
 Kaj ŝi malsaĝa denove rakonton pri Trojaj mizeroj
 Petas, kaj pendas denove al lipoj de paroladanto.
- 80 Fine, post kiam li lasis ŝin, kiam malluma fariĝas
 Brilo de luno, kaj astroj malaltaj invitas dormadon,
 Sola en domo malplena ŝi ploras, kusiĝas sur liton
 De li lasitan, kaj vidas kaj aŭdas lin eĉ forestantan.
 Ofte sur brusto tenante Askanon, de patra vizaĝo
- 85 Ŝi similecon rigardas, kaj penas trompadi amegon.
 Haltas konstruo de turoj remparaj; armilajn ekzercojn
 Lasas junuloj; havenon kaj murojn milite farotajn
 Ĉiu haltigas; kaj interrompita pendadas laboroj,
 Grandaj muregoj timindaj, maŝinoj tuŝantaj ĉielon.
- 90 Kiam do kara edzino Jupitra ekvidis ke Dido
 Tian pestegon suferis kaj amon pli amis ol famon,
 Saturnidino per tiuj paroloj atakas Venuson :
 « Famon eternan kaj grandan akiron nun vi mem kaj via
 Filo kunportas : triumfo tre glora kaj tre memorinda!
- 95 Unu virinon per ruzo venkegas du dioj potencaj.
 Sed mi ne povas erari; vi miajn timegas muregojn :
 Domoj de alta Kartago nun al vi fariĝas suspektaj.
 Kiam do tio finiĝos, kaj kien nun celas batalo?
 Estus prefere, por paco eterna, edzigon elfari
- 100 Veran. Ĉar tutajn vi havas aferojn de vi deziritajn :
 Didon amantan bruligas en ostoj amega frenezo.
 Tiun do saman popolon ni regu per sama potenco.

Tiam reĝino toleros estrecon de edzo Friguja,
Dote en manojn de via dieco metinte Tiranojn. »

Tamen, insidon sentinte kaŝitan sub tiu parolo, 105

Kiu el lando Itala al bordo Libuja transportus
Regnon, Venuso singarde respondis : « De tiaj proponoj
Kiu ne estus kontenta kaj kontraŭ vi volus batali?

Tamen ĉu estos feliĉa edzigo pri kiu vi zorgas?

Ĉar mi ne konas Fatalojn : kaj eble Jupitero ne volos, 110

Sama en urbo, kun Trojaj migrantoj kunmeti Tiranojn,
Kaj ne permesos ke gentoj sin miksu kaj lige kunigu.
Provu vi, lia edzino, per petoj sondadi voladon.

Iru; mi sekvos. » Kaj tiam respondis reĝino Junono :

« Tiu min zorgo koncernas : nun, kiel ni povos plenumi 115
Tiun tre gravan aferon mallonge mi al vi konigos.

Kune Eneo kun Dido mizera, en densa arbaro,
Estas ĉasantaj, tuj kiam Titano vualojn unuajn
Morgaŭ sublevos, kaj nokton el tero radie forpelos.

Tiam, dum kuros ĉasistoj, per ŝnuro zoninte arbaron, 120

Nubon nigregan de hajlo miksatana, el supre sur ilin
Mi tuj ekverŝos, kaj tutan ĉielon movegos per fulmo,
Poste kunulojn dispelos kaj kovros per nokto malluma.

Dido kaj ĉefo Trojana rifuĝon en saman kavernon
Serĉos : sed tie mi estos. Se tion vi volas, mi tiam 125

Ŝin al li ligos per certa edzigo kaj donos proprece.

Tie fariĝos edziĝo. » Pri tiu projekto konsentis

Kore Citera diino, kaj ridis pri ruza elpenso.

Tamen Aŭroro sin levas kaj Oceanmaron forlasas.

Kiam mateno aperas, el pordoj eliras junuloj, 130

Kun ponardegoj longferaj kaj retoj larĝmaŝaj kaj toloj.

Kuras rajdantoj Masilaj, dum sekvas flarado de hundoj.

Ĉefoj Penujaj, sur sojlo palaca, atendas reĝinon

Malfruiĝantan en ĉambro : purpure kaj ore bridita

Staras ĉevelo; kaj ŝi enbuŝaĵon ŝaŭmplenan freneze 135

Mordas. Ŝi fine aliras, de multa sekvata anaro :

Vesto Sidona ŝin kovras, fiksita per zono pentrita :

Estas sagujo el oro; kaj oro alligas hararon;

Fine per buko el oro ŝi veston sublevas purpuran.

Tiam alvenas Friguja kaj kunuloj kaj gaja Iulo. 140

- Antaŭ aliaj, pli bela ol ĉiuj Trojanoj, Eneo
 Rajdas, kaj sian anaron kunigas kun Dida anaro.
 Kiel do, kiam malvarman Licujon kaj Ksantan riveron
 Lasas Apolo, kaj, Delon patrinan vidonte, revenas;
 145 Ĥorojn li tiam refaras, dum, apud altaroj starante,
 Kretoj, Driopoj kaj eĉ Agatirsoj kantante dancadas :
 Dio aliras al Cinta supraĵo; fluantan hararon
 Ligas kaj premas fleksebla florkrono per oro fiksita :
 Sagoj sur ŝultroj sonadas. Ne malpli fiere Eneo
 150 Iris, kaj sama majesto brilegis sur bela vizaĝo.
 Kiam ĉasistoj alvenis al krutaj nestegoj de montoj
 Altaj, jen estas sovaĝaj kaprinoj, el rokoj senherbaj,
 Kiuj eliras, pelitaj; dum aliaflanke tremantaj
 Cervoj tra kampoj forkuras amase, je kuro freneza :
 155 Polvon sublevas piedoj kaj monton forlasas arbaran.
 Knabo Askano, en mezo de valoj, ĝojeĝe ĉevalon
 Premas : jen unu jen poste alian jam li preterpasis :
 Ĉar li deziras, austataŭ timanta brutaro, ŝaŭmantan
 Apron, aŭ flavan leonon el monto malsuprenirantan.
 160 Tamen, en alta ĉielo, komence murmuris mallaŭta
 Bruo, kaj sekvas samtempe nubaro, de hajlo miksata.
 Tien kaj tien junuloj Trojanaj, Tiranaj kunuloj,
 Nepo Dardana de dia Venuso, tra kampo, timante
 Serĉis diversajn tegmentojn : el montoj rapidas riveroj.
 165 Dido kaj ĉefo Trojana rifuĝon en saman kavernon
 Trovas : kaj Tero diina kun edzofarista Junono
 Donas unuan signalon : ĉiele lumigis edziĝon
 Fajroj kunkulpaj; kaj Nimfoj blekegis sur montaj supraĵoj.
 Kaŭzo unua de morto, unua de ĉiuj suferoj,
 170 Tiu ĉi tago fariĝis; ĉar tute hontemon kaj famon
 Dido forgesis. Nun amon sekretan ŝi ne plu deziras;
 Ŝi edziniĝo ĝin nomas, kaj kulpon ŝi kaŝas sub vorton.
 Famo subite travagas tra grandaj domaroj Libujaj,
 Famo mem, kiu pli flugas rapide ol ĉiuj malbonoj.
 175 Vivon ŝi nutras per movo, per kuro fortigas fortecon :
 Eta unue pro timo, ŝi baldaŭ altiĝas al astroj :
 Tere marŝante, en nuboj ĉielaj ŝi kapon enkaŝas.
 Ŝia patrino, la Tero, venĝema pri dia kolero,

Laŭ la rakonto, al Ceo kaj al Encelado fratinton
 Lastan postnaskis, piede rapidan kaj fluge senlaca. 180
 Monstro terura kaj granda, sur korpo, sub ĉiu el plumoj,
 Viglan ĝi kaŝas okulon aŭ langon; — rakonto mirinda! —
 Buŝoj sennombraj parolas, kaj multaj aŭskultas oreloj.
 Nokte, ĝi, inter ĉielo kaj tero, en ombro, kriante
 Flugas; kaj dolĉa dormado neniam mallevas palpebrojn. 185
 Tage, ĝi sidas atenta sur supra tegmento de domoj,
 Ofte sur turaj altaĵoj, kaj, terurigante grandurbojn,
 Veron konigas, dum, sama en tempo, ĝi sendas mensogon.
 Ĝi, per paroloj sennombraj, popolojn informi penadis
 Gaje, kaj, verajn agadojn miksante kun agoj malveraj, 190
 Diris : « Alvenis Eneo, naskita de sango Trojana :
 Dido belega kun tiu ĉi viro kuniĝi bonvolas :
 Vintron dum ili pasigas en lukso kaj mallaboremo,
 Ambaŭ forgesas regadon, de amo hontinda kaptitaj. »
 Tion per buŝoj de homoj disverŝas mortiga diino 195
 Ĉien. Ŝi poste al regno larba direktas kuradon,
 Koron per diroj flamigas, kaj lian grandigas koleron.
 Tiu Amona naskito, de Nimfo kaptita en lando
 Garamantida, cent templojn Jupitrajn, en regnoj vastegaj,
 Kun cent altaroj starigis, kaj fajron bruligis eternan, 200
 Kiun sencese observis gardistoj : de sango brutara
 Tero grasiĝis ; kaj pordojn ornamis girlandoj el floroj.
 Tiam, fundkore freneza, kolera pro grava ofendo,
 Oni rakontas ke antaŭ altaroj kaj diaj figuroj,
 Multe Jupitron li prĝis, starante kun manoj plektitaj : 205
 « Ĉiopotenca Jupitro, al kiu Maŭrusa popolo
 Verŝas Lenean likvoron, sur litoj kuŝante pentritaj,
 Tion akceptu. Ĉu kiam, ho Patro, vi fulmon ekĵetas,
 Vane ni tremas ? Ĉu estas senfortaj fajreroj en nuboj,
 Kiuj animojn tremigas ? Ĉu vanan ni aŭdas bruegon ? 210
 Niaj en landoj vagante, virino konstruis per mono
 Urbon malgrandan; kaj mi, al ŝi bordon vendinte senfruktan,
 Faris pri loko kontrakton. Nun tiu virino edziĝon
 Mian rifuzas, kaj estron en regno akceptas Eneon.
 Tiu Pariso, kaj liaj kunuloj kaŝitaj, nun ĝuas 215
 Ŝtelon, dum ĉirkaŭ mentono kaj haroj malsekaj li ligas

Ĉapon Meonan : ĉu templojn je donoj ni ĉiam plenigis
Vane ? ĉu vane ni estis fieraj pro dia naskiĝo ? »

Tiujn dirinte parolojn, li preĝis, tenante altaron.

- 220 Ĉiopovulo lin aŭdis kaj turnis okulojn al muro
Reĝa, kaj al forgesemaj de famo pli bona amantoj.
Tiam Merkuron li vokas, kaj, tiel dirinte, lin sendas :
« Iru, forkuru, naskisto ; alvoku Zefiron ; flugilojn
Prenu. Nun ĉefo Dardana en Tira restadas Kartago :
225 Urbojn, de diaj Fataloj donotajn, li tute forgesis.
Al li parolu ; kaj portu rapide tra spacoj ordonon.
Tian naskiston ne iam promesis belega patrino.
Ŝi ne pro tio dufoje lin savis el Grekaj armiloj.
Landon Italian, je regnoj gravedan, batale bruontan,
230 Regi li devis, popolon daŭrigi naskotan de granda
Sango Trojana, kaj mondon ceteran sub leĝoj potenci.
Sed se lin gloro pri tia estonto neniel flamigas,
Se li, por famo, neniun deziras komenci laboron,
Kial pro filo Askano li Romajn dezirus fortaĵojn ?
235 Kion li faras ? kaj kial li restas ĉe fremda popolo,
Kampon Lavinjan, idaron Aŭzonan, ne plu memorante ?
Li marveturu ! Pri tiu ordono vi estas sendita. »

Tiel li diris. De Patro potenca por volon plenumi
Filo rapidas. Al siaj piedoj li ŝuojn oratajn

- 240 Ligas : ĉu super ondaro, ĉu super kamparoj, flugiloj
Supren lin portas aere, laŭ sama flugado rapida.
Poste li prenas vergeton : per ĝi li alvokas el Orko
Ombrojn palegajn, aŭ ilin en nigraĵen ĵetas Tartaron.
Dormon li donas aŭ prenas, malvivajn malfermas okulojn,
245 Maran ventaron haltigas kaj nuban traboras amason.
Tamen jam dio fluganta ekvidis de Atlo senlaca
Supron kaj flankon krutegan : ĉar portas sur kapo ĉielon
Atlo potenca, senĉese zonata de nuboj nigregaj,
Pinokronata ; lin frapas samtempe pluvegoj kaj ventoj :
250 Ŝultrojn kovradas amaso da neĝo, rapidas riveroj
El maljunula mentono, kaj barbon glacio starigas.
Tie do ido Cilena, flugilojn igante senmovaj,
Haltis, kaj korpon pli pezan el alte faligis al ondoj ;
Tute simila al birdo mem, kiam ĝi, ĉirkaŭ marbordo,

Ĉirkaŭ ŝtonegaj fiŝejoj, flugante tuŝetas ondaron. 255
 Same do, inter ĉielo kaj tero flugante, aliris,
 Ventojn tranĉante kaj sablan marlimon celante Libujan,
 Filo Cilena Merkuro, venante de avo patrino.

Li ĵus, tuj kiam flugilaj piedoj ektuŝis dometojn,
 Vidis Eneon, pri novaj sidejoj remparaj kaj domaj 260
 Zorge penantan. Sur flanko, pro flavaj ŝtonetoj iaspaj,
 Glavo brilegis ; kaj Tira mantelo purpure pentrita
 Pendis el ŝultroj ; ĝin Dido riĉega donace kudradis,
 Orajn fadenojn maldikajn artiste sur ŝtofo miksinde.

Dio aliras lin : « Vi nun sidejon de alta Kartago 265
 Lokas, kaj, edzinservema, vi ŝian belege konstruas
 Urbon, dum regnon kaj dian estonton vi tute forgesas.
 Al vi min sendas, el luma Olimpo, reganto de dioj,
 Patro mem, kiu ĉielon kaj teron potence movigas.
 Li mem komandis, por ke mi tra spacoj ordonon alportu. 270
 Kion vi volas ? Pro kia espero vi restas Libujon ?

Ĉar se vin gloro pri granda estonto neniel flamigas,
 Se vi por famo neniun deziras komenci laboron,
 Vidu Askanon kreskantan : ne de heredanta lulo
 Trompu esperon ; ĉar al li Fataloj Italian kaj Roman 275
 Landon promesis. » Kaj tiel parolis la filo Cilena :
 Poste li, meze de diro, mortemajn forlasis rigardojn,
 Kaj malproksime de homaj okuloj fandiĝis aeren.

Dion vidinte Eneo mutiĝis, de miro frapita.
 Harojn starigis teruro kaj voĉon haltigis en gorgo. 280
 Tiam li brulas forkuri kaj landon forlasi dolĉegan.
 Ĉar lin mirigas avizo ĉiela kaj dia ordono.

Kion ve ! fari ? Per vortoj reĝinon konvinki malsaĝan
 Kiel kuraĝi ? Per kiaj paroloj komenci klarigon ?
 Penso rapide ĉu tien ĉi flugas kaj poste ĉu tien : 285

Li ŝanceliĝas al malaj projektoj, sin turnas al ĉiuj :
 Fine ĉi tiu decido lin ŝajnas plej bona kaj saĝa.
 Li do Mnesteon, Sergeston alvokas kaj fortan Kloanton :
 Ili sekrete armilojn preparos kaj ŝipojn, kunulojn 290
 Apud marbordo kolektos, kaj kaŭzon de novaj agadoj
 Kaŝos. Li tamen, — dum Dido bonega, pri tiuj aferoj
 Kiu nescias, de tia amego ne finon suspektas, —

Penos ŝin vidi, por bone paroli momenton favoran
 Serĉos, kaj fine plej bonan elpensos rimedon. Rapide
 295 Ĉiuj ĝojantaj ordonon obeas, kaj faras laboron.

Tamen reĝino insidon, — ĉar ĉu amantino trompiĝas? —
 Sentis, kaj movojn estontajn unua komprenis; ĉar ĉion,
 Eĉ trankvilecon, ŝi timas. Pri ŝipaj armigoj ŝin sama
 Famo malpia instruas, kaj same pri kuroj farotaj.

300 Saĝon perdinte, ŝi tuj furiozas, tra urbo kuradas,
 Kiel Bakanto freneza : sin tiel ekscitas Tiio,
 Kiam, en sanktaj misteroj trijaraj, resonas kantado
 Baka, kaj kiam Citero ŝin brue alvokas en nokto.

Fine per tiuj paroloj Eneon ŝi petas sengardan :
 305 « Ĉu vi, perfida, min trompi esperis ? Ĉu estas farebla
 Tia krimego : el mia patrujo sekrete forkuri ?

Ĉu do nenio vin povas deteni, nek mano donita
 Iam de mi, nek amego, nek Dido mortonta kruele ?
 Kial, sub vintra ĉielo, vi vian preparas ŝiparon ?

310 Kial, tra Akvilonventoj, en maro vi naĝi deziras,
 Edzo kruela ? Sed, kion ? Se landojn aliajn, kaj domojn
 Novajn, vi trafi ne volus ; se Trojo staradus antikva ;
 Ĉu nun sur ŝipoj vi celus Trojurbon tra maro vastega ?
 Ĉu vi min lasus ! Per tiuj larmegoj, per mano premita,

315 — Estas nenia rimedo, krom tio, en mia malbono ! —
 Kara, per nia kuniĝo, per nia edziĝo ekita,
 Iam se de vi mi bone meritis, se en mi vi trovis
 Ion agrablan, pro domo falonta kompatu, kaj tian
 Pelu el cerbo projekton, se petoj ankoraŭ valoras.

320 Pro vi min gentoj Libujaj kaj reĝoj malamas Numidaj ;
 Pro vi, mi Tirojn ofendis ; al vi mi unuan oferis
 Gloron kaj faman hontemon, per kiu ĝis astroj mi estis
 Plialtigita. Min kial mortontan vi lasas, ho gasto.
 Tiu denomo ve ! estas de edzo nun sola restaĵo.

325 Kion atendi ? Aŭ Pigmaliono la frato detruos
 Murojn : aŭ sklave kun li min kondukos Getula larbo.
 De vi almenaŭ se, antaŭ forkuro, mi estus naskinta
 Idon ; en mia kortego se eta petolus Eneo,
 Kiu, simila al patro perfida, vizaĝon amitan

330 Rememorigus, mi certe ne kredus min tute lasita ! »

Tiel ŝi diris. Sed li, laŭ Jupitra ordono, okulojn
 Tenis senmovaj, de koro en brusto premante ĉagrenon.
 Tamen mallonge li diras : « Neniam mi certe forgesis
 Tiujn bonfarojn, pri kiuj, reĝino, vi multe parolis.
 Ĉiam Elisa memoro en koro restados karega, 335
 Dum mi konscios de mi mem, dum membrojn spirito vivigos.
 Mi pri afero mallonge parolos. Mi trompi ne volis,
 Kredu, nek ruze forkuri. Neniam mi pensis flamigi
 Torĉojn edziĝajn ; neniam mi venis por tion promesi.
 Certe se vivon direkti, laŭ mia deziro, Fataloj 340
 Al mi permesus, kaj fini zorgadojn laŭ volo intima,
 Urbon Trojanan unue, restaĵon de miaj parencoj,
 Ĝoje mi savus ; Priamajn tegmentojn mi alte starigus ;
 Fine al Trojoj venkitaj mi novan redonus Pergamon.
 Sed nun en landon Italian min sendas Apolo Grinea ; 345
 Nun Italujon min trafi Licujaj ordonas Fataloj :
 Tie amego kaj tie patrujo ! Se vian Fenican
 Koron ĝojigas Kartagaj fortaĵoj kaj urboj Libujaj,
 Kial do al ni Trojanoj vi landon enivus Aŭzonan ?
 Ĉu do ni rajte ne povas eksteran serĉadi patrujon ? 350
 Patro Anhizo, tuj kiam ombraro malseka de nokto
 Teron ekkovras, tuj kiam aperas astraro etera,
 Songe riproĉas min : kaj min timigas vizaĝo kolera ;
 Plie, ĉu knabo Askano meritis ke — kapo karega ! —
 Mi lin senigu je regno Hespera kaj kampoj Fatalaj. 355
 Fine kurjero de dioj, por volon sciigi Jupitran,
 — Niajn surkapojn mi ĵuras ! — ordonon portante, tra spaco
 Venis. Mi dion ekvidis en lumo brilega ; li inter
 Murojn eniris, kaj voĉon mi aŭdis per miaj oreloj.
 Ĉesu nin ambaŭ per tiuj senfruktaj ĉagreni plendadoj. 360
 Landon Italian ne vole mi celas. »

Sed dum li tiel parolis, minace lin Dido rigardis,
 Tien kaj tien frenezajn rulante okulojn : lin tutan
 Muta envolvas rigardo ; kaj fine ŝi krias kolere :
 « Filo diina neniel vi estis, nek ido Dardana, 365
 Viro perfida : vin naskis Kaŭkazo terura, en krutaj
 Rifoj malmolaj ; vin nutris per mamoj tigrinoj Hirkanaj.
 Kial mensogi ? Kaj kion pli gravan vi al mi rezervas ?

- Ĉu li ĝemadis pri mia doloro, ĉu turnis okulojn ?
 370 Ĉu li ploradis, venkita ? ĉu li min kompatis amantan ?
 Kion do plie mi diros ? Car nun min ne vidas favore
 Patraj okuloj de ido Saturna kaj granda Junono.
 Estas nenia bonfido ! Sur bordo ŝetitan, mizeran,
 Mi lin akceptis, kaj kun mi malsaĝe sur tronon sidigis :
 375 Ŝipojn savinte perditajn, kunulojn mi tiris el maro.
 Ve ! min brulantan kunportas Furioj ! Apola diveno,
 Kaj orakoloj Licujaj, kaj eĉ, de Jupitro sendita,
 Dia kurjero tra spacoj terurajn alportas ordonojn.
 Tiel, jen estas laboro de dioj ! jen ilin okupas
 380 Tiaj zorgardoj ! Vin mi ne detenas nek dirojn refutas :
 Iru, kaj landon Italian per ventoj tra maro celadu.
 Tamen mi al vi deziras, — se kelkon da povo posedas
 Piaj diaĵoj, — ke inter ŝtonegoj vi trovu punegon,
 Didon vokante, sed vane. Mi sekvos kun torĉoj venĝemaj,
 385 Apudestante ; dum via animo disiĝos el membroj,
 Ĉien sekvados vin mia fantomo. Vi punojn suferos,
 Malkuraĝulo ; kaj al mi ĉe Ombroj ĝin Famo konigos. »
 Tiel dirinte, ŝi rompas parolon kaj lumon forkuras,
 Tute malĝoja ; kaj, antaŭ okuloj tuj malaperinte,
 390 Viron ŝi lasas, pro timo senmovan kaj diri volantan [vas,
 Multojn. Svenantan ŝin kaptaservistoj, per membroj suble-
 portas en ĉambron marmoran kaj poste kuŝiĝas sur liton.
 Sed kvietigi plorantan virinon fortege deziras
 Pia Eneo, kaj Didan per vortoj forpeli ĉagrenon.
 395 Multe ĝemante, kaj kore premata de granda amego,
 Diajn ordonojn li tamen obeas kaj ŝipojn revidas.
 Tiam Trojanoj komencas laboron, kaj altajn el bordo
 Ŝipojn kondukas al maro. Eknaĝas ŝipŝelo ŝmirita.
 Kverkojn je branĉoj kaj trunkojn je korko, por fari remilojn,
 400 Ili apenaŭ senigas, pro urĝa forkuro.
 Multaj migrantoj alkuras el urbo, kaj ĉien rapidas.
 Tiel do kiam formikoj, — ĉar ili je vintro memoras, —
 Grandan amason da greno detruas kaj portas en neston :
 Nigra anaro tra kampoj aliras kaj trenas tra herboj,
 405 Kruta sur vojo, akiron : dum unuj per ŝultroj multpezajn
 Puŝas grenerojn, aliaj sekvadas anaron, punante

Malfruiĝantojn : kaj tuta vojeto labore moviĝas.

Kiaj do estis, ho Dido, je tiu vidaĵo, pensadoj?

Kiajn vi puŝis ĝemadojn, ve! kiam, el alta palaco,

Vi malproksiman sur bordo movadon ekvidis, dum maro, 410

Antaŭ okuloj, pro multaj kriadoj, samtempe resonis.

Amo kruela, al kio vi homajn devigas animojn?

Ĉar vi denove al larmoj alkuras, denove vi provas

Petojn preĝantajn, kaj indon oferas al amo venkanta.

Mortí vi volas, sed kiam nur ĉion vi estos provinta. 415

« Anjo, rigardu : sur bordo sin ĉiu preparas. Ĉirkaŭe

Ili de ĉie alvenas : jam veloj alvokas blovadojn ;

Kaj sur ŝipnazojn jam ĝojaj maristoj surmetis florkronojn.

Certe mi sciis ke iam ĉi tio fariĝos, fratino ;

Ĝin do mi devas suferi. Sed tamen nur unu konsolon, 420

Anjo, al mi malfeliĉa ekdonu : ĉar solan vin ŝatis

Tiu perfida, eĉ al vi li pensojn konfesis sekretajn,

Sola vi konas rimedon por lian ŝanceli volegon.

Iru, fratino ; al gasto fiera parolu ; lin petu.

Certe neniam, Aŭlisajn helpinte Danaojn, mi ĵuris 425

Ĝenton Trojanan ekstermi, kaj sendi ŝiparon Pergamen ;

Cindrojn de patro Anhizo kaj Manojn mi ne malrespektis.

Kial do ĉiam li miajn rifuzas aŭskulti parolojn?

Kien li kuras? Li lastan ekdonu nur al mi konsolon ;

Li pli facilan atendu forkuron kaj venton favoran. 430

Tiun edziĝon de li perfiditan mi ne memorigas ;

Kaj mi ne volas ke regnon li lasu kaj belan Latujon.

Tempon malplenan mi petas, necesan por amon mortigi,

Por ke min, kiel mi venkos ĉagrenon, konigu Fatalo.

Lastan mi petas servadon : pri via fratino kompatu. 435

Se li deziron plenumos, ĝis morto mi restos dankema. »

Tiel ŝi petis : kaj tiun ploradon mizera fratino

Portas kaj poste reportas : sed viron neniam kortuŝas

Larmoj : li ŝajnas senkora, neniam aŭdante parolon.

Dioj ne volas : Eneajn orelojn surdigis Fatalo. 440

Kiel do kverkon multjaran, pri ĝia fortego fieran,

Alpaj Boreoj ĉi tie kaj tie, per blovoj sennombraj,

Vete penadas renversi : jam bruas aero, kaj poste

Teron, el trunko skuíta, ŝiritaj kovradas folioj.

- 445 Ĝi sur ŝtonegoj krampiĝas kaj branĉojn altigas al astroj,
 Dum al Tartaro ĝi same sennombrajn direktas radikojn :
 Tiel ĉi tie kaj tie heroon atakas plendadoj :
 Koron senteman en brusto traboras ĉagreno ; sed tamen
 Restas senmova animo, dum vanaj fluadas larmegoj.
- 450 Tiam, fatale venkita, pereon alvokas mizera
 Dido ; ĉar sunon ĉielan fundkore ŝi tute malamas :
 Lumon ŝi volas forlasi ; kaj ĉio fortigas projekton.
 Iam ŝi vidis, dum metis donacojn ŝi apud altarojn
 Bonodorfumajn, — rakonto terura ! — ke akvoj fariĝis
- 455 Nigraj, ke vino verŝita ŝanĝiĝis en sangon malpuran :
 Ŝi al neniŭ, eĉ al la fratino, konigis vidaĵon.
 Plie ŝi iris en templon marmoran de edzo malnova,
 Kiun ŝi zorge konservis memore, kaj pie honoris,
 Ĝin ornamante per lanaj rubandoj kaj sanktaj girlandoj.
- 460 Tie ŝi kredis de edzo ekaŭdi parolojn, kaj voĉon
 Ŝin alvokantan ; dum nokto kamparon okupis malluman.
 Ofte sur turoj de strigo solema ŝi krion funebran
 Aŭdis, kaj voĉon plorantan de birdo ĝemade blekanta.
 Fine de multaj divenoj ŝin, kiel timindaj avertoj,
- 465 Antaŭdiradoj malnovaj tremigas. En songoj, frenezan
 Ŝin persekutas kruela Eneo ; li ĉiam ŝin lasas
 Sola ; ŝi ĉiam imagas ke longan, sen ia kunulo,
 Vojon ŝi iras, kaj serĉas Tiranojn sur lando dezerta.
 Tiel do Pento freneza anaron de Eumenidoj
- 470 Vidas, dum sunoj duopaj aperas kaj Tebo duobla ;
 Tiel Oresto Agamemnonido, teatre famega,
 Kiam patrino, armata de torĉoj kaj nigraj serpentoj,
 Lin persekutas, dum sidas sur sojlo venĝemaj Furioj.
 Tiam ŝi malesperanta, freneza, dolore venkita,
- 475 Morti decidas, rimedon kaj bonan trovinte momenton.
 Ŝi al fratino malĝoja parolas : sur sia vizaĝo
 Zorge ŝi kaŝas projekton, kaj frunton espere briligas :
 « Vojon mi trovis, fratino, — fratino, min bone gratulu ! —
 Kiu lin al mi redonos, aŭ min liberigos el amo.
- 480 Ĉe Oceano kaj suna kuŝejo troviĝas kamparo
 Etiopuja, la lasta marbordo ; kaj Atlo grandega
 Tie sur ŝultroj subtenas ĉielon kaj brilas astraron.

Tie, laŭ diro, ekzistas pastrino de gento Masila.

Ŝi, Hesperidan preĝejon gardante, disdonas al drako
Ĝian manĝaĵon, kaj zorgas branĉaron de arbo sanktega, 485

Dormodonantan verŝante papavon kaj dolĉan mielon.

Ŝi per kantadoj promesas ke koroj fariĝos kvietaj,

Kiam ŝi volas, aŭ donas kontraŭe malmolan ĉagrenon,

Ondojn haltigas riverajn kaj astrojn irigas returnen;

Noktajn ŝi Ombrojn alvokas : sub ŝiaj piedoj vi vidos 490

Teron muĝantan; kaj malsupreniros el monto fraksenoj.

Kara, mi prenas ateste diaĵojn, kaj vian, fratino,

Kapon dolĉegan, mi artojn magiajn ne uzas volonte.

Vi do sekrete ŝtiparon farigu, en domo interna,

Liberaere, kaj sur ĝin armilojn, en ĉambro lasitajn 495

De li malpia, surmetu, kaj vestojn, kaj liton geedzan,

Kie min amo mortigis : ĉar ĉiun detruu objekton

De pereiga Eneo konsilas kaj volas pastrino. »

Tiel ŝi diris : samtempe paleco vizaĝon okupas.

Anjo ne pensas ke Dido, per novaj sanktaĵoj, mortigon 500

Sian preparas; ĉar tian malsaĝon ŝi kredi ne povas,

Ĉon pli gravan ol morton Sikean neniel timante.

Ŝi do plenumas ordonon.

Tamen reĝino, ŝtiparon farinte, en domo interna,

Grandan kaj liberaeran, per pinoj kaj kverkoj plekitaj, 505

Lokon funebnan ornamas kaj kronas per verdaj girlandoj;

Poste sur liton ŝi veston, portreton kaj glavon lasitan

Metas; ĉar ŝi, malfeliĉa, kruelan tro konas estonton.

Staras ĉirkaŭe altaroj : kun haroj falantaj, pastrino

Vokas kriante tricenton da dioj, Erebon, Haoson, 510

Poste trioblan Hekaton kaj virgan Dianon trifruntan :

Ondon samtempe ŝi verŝas, al fonto Averna similan,

Serĉas kaj tranĉas per kupraj falĉiloj, sub luno brilanta,

Herbojn hasplenajn kaj lakte gutantajn de nigra veneno,

Fine elŝiras amaknon el frunto de ido ĉevala, 515

Kaj de patrino ĝin kaptas.

Apud altaro nun Dido farunon en mano purega

Tenas, kun unu piedo sen ŝuo, kun vesto sen ligo;

Kaj ŝi mortonta ateste diaĵojn alvokas kaj astrojn,

Kiuj ŝin vidas : se iu diaĵo protektas amantojn 520

Kiuj ne estas amataj, justecon ŝi petas kaj venĝon.

- Nokto fariĝis; kaj korpojn lacetajn kvieta dormado
 Teren kuŝigis : arbaroj ripozis kaj ondoj ventegaj :
 Astroj ĉiele turnantaj troviĝis en mezo de kuro.
- 525 Ĉio en lando silentis, brutaroj kaj birdoj koloraj.
 Tiuj, ĉe lagoj fluidaj, kaj tiuj, ĉe kampaj arbetoj,
 Kiuj loĝadas, pro dormo kuŝantaj sub nokto silenta,
 Tutajn laborojn pelinte, de koro forgesis ĉagrenojn.
 Sed malfeliĉan reĝinon neniam okupas dormado;
- 530 Ŝi per okuloj kaj brusto neniel akceptas ripozon
 Noktan : pliiĝas doloroj, kaj amo ŝin vekas kruela.
 Ree, dum naĝas animo en granda turniĝo kolera,
 Tiel ŝi pensas, kaj tiun en koro deziron agitas :
 « Kion ve! fari? Ĉu mi de unuaj fianĉoj toleros
- 535 Mokon, denove Nomadan per preĝoj petante edziĝon?
 Tiujn ĉi edzojn ve! miaj rifuzoj tro ofte malŝatis.
 Ĉu mi Ilian ŝiparon kaj volojn Trojanajn humile
 Sekvos? Pri helpo donita mi certe tre ĝojas; ĉar ili
 Rememoriĝos pro servo malnova kaj estos dankemaj.
- 540 Sed se mi tion dezirus, ĉu ili bonvolus en ŝipoj
 Malamegitan akcepti virinon? Ĉu vi, malfeliĉa,
 Genton ne konas de Laomedidoj, perfide trompeman?
 Tiam do, kion? Ĉu sola fierajn mi sekvos maristojn?
 Ĉu do kontraŭe, helpata de miaj Tiranoj, mi ilin
- 545 Trapersekutos? Mi tien amikojn, el urbo Sidona,
 Pene kondukis, kaj ilin al maro mi ree redonus?
 Ne! Ĉar vi morton meritis, per fero forpelu doloron.
 Kaŭzo unua de tiuj malbonoj vi estas, fratino;
 Ĉar vi, venkita de larmoj, al amo min ĵetis malsaĝan.
- 550 Kial vidvine mi tiam ne povis sen krimo pasigi
 Vivon, al bestoj simila, nek tiujn suferi ĉagrenojn,
 Zorge promeson gardinte faritan al cindroj Sikeaj. »
 Tiun plendadon ŝi do malespere el brusto eligis.
 Tamen Eneon, decide irontan, en ŝipo altega
- 555 Dormo okupis; ĉar estis aferoj jam pretaj por iro.
 Songe aperas diaĵa fantomo, kun sama vizaĝo,
 Kiu revenis, kaj ree ordonon tuj ekrenovigas.
 Tute simila al dia Merkuro, li voĉon, koloron,

Harojn flavruĝajn prezentas, kaj membrojn junece bele-
« Filo diina, en tiu momento ĉu dormi vi povas? [gajn : 560
Ĉu do vi de ĉirkaŭantaj danĝeroj ne vidas minacon?

Ho malsaĝulo! Zefirojn favorajn ĉu vi do ne aŭdas?
Morti volante, ŝi ruzon preparas kaj krimon teruran.

Timu; ĉar naĝas animo en granda turniĝo kolera.

Kial do vi ne forkuras, dum estas nun ebla forkuro? 565

Baldaŭ ĉar eble vi vidos, al ŝipoj sur maro naĝantaj,
Torĉojn brulantajn de ĉie aliri kaj bordon lumigi,
Se tro malfrue en tiu ĉi loko vin trovos Aŭroro.

Iru, rapidu : diversa kaj ĉiam ŝanĝema virino

Estas. » Dirinte, diaĵo sin miksis al nokto nigreta. 570

Tiam Eneo, tremante pri tiu ŝubita vidaĵo,

Korpon el dormo eltiras, kaj poste riproĉas kunulojn :

« Viroj, vekigu rapide; sur bankojn sidiĝu, remistoj;

Streĉu velaron; ĉar dio, sendita el alta ĉielo,

Min rapidigi forkuron kaj tordan ektranĉi ŝnuregon, 575

Duaj fojo, komandas. Vin, kiu ajn estas, ni sekvos,

Dio sanktega, kaj ĝoje ni vian obeos ordonon.

Venu, kaj estu favora, kaj astrojn en dekstra ĉielo

Montru. » Li diras kaj, glavon brilantan el ingo tirinte,

Ŝnuron li frapas, per fero rapida, kaj fine disrompas. 580

Sama fervoro okupas aliajn : preninte remilojn,

Ĉiuj el bordo eliras : sub ŝipoj ŝaŭmiĝas akvaro :

Maron turmentas maristoj kaj ondon sublevas lazuran.

Dume, por novan eklumon disverŝi sur teron, lasinte

Ruĝan kuŝejon Titonan, unua sin levis Aŭroro, 585

Kiam reĝino, de alta videjo, blankiĝi ekvidis

Lumon, kaj ŝipojn naĝantajn per veloj egale streĉitaj.

Kiam ŝi vidis malplenaj da ŝipoj havenon kaj bordon,

Tri kaj kvarfoje per mano ŝi bruston ekfrapis belegan,

Flavan ŝirante hararon : « Ho granda Jupitro, ŝi diris, 590

Viro eliras; kaj mokis fremdulo je mia potenco.

Ĉu mi ne uzos armilojn? Ĉu ilin ne sekvos Kartago

Tuta? Ĉu ŝipoj Tiranaj ne lasos havenon? Nu! iru;

Flamojn rapide alportu; remilojn puŝegu; kaj streĉu

Velojn. Sed, kion mi diras? sed, kie mi estas? sed, kia 595

Koron tremigas frenezo? Nun agoj vin tuŝas malpiaj,

- Dido mizera! Vi devis ne sceptron donaci. Jen estas
 Fido de tiu ĉi kiu, laŭ diro, kunportis Penatojn,
 Kiu sur ŝultrojn surŝarĝis naskinton, de jaroj premitan.
- 600 Kial do korpon rompitan mi ŝiri ne povis, dronigi
 Poste en ondojn, per glavo kunulojn kaj junan Askanon
 Buĉi, kaj filon prezenti manĝotan al patra festeno?
 Estis batala finiĝo kredeble necerta! kaj poste?
 Kion mi timis, mortonta? En ŝipojn ĵetinte bruladon,
- 605 Ilin je fajroj mi tute plenigis : kun patro, kun filo,
 Mi, detruinte idaron, min poste en flamojn ekĵetis.
 Suno, vi kiu lumigas al ĉiuj aferoj de mondo,
 Kaj vi, Junono, vi kiu ĉagrenojn konsolis kaj konis,
 Nokta Hehato tra strataj kruciĝoj vokata per bojoj,
- 610 Kaj vi, venĝemaj Furioj, mortantan kompatu Elison;
 Aŭdu min; miajn suferojn rigardu favore, ho dioj;
 Fine plenumu preĝadon. Se estas necese ke viro
 Malameginda, Italen naĝinte, havenon altuŝos;
 Volo se estas Jupitra ke tien li finos kuradon,
- 615 Li do almenaŭ, premita de gento batale kuraĝa,
 Estu el regno pelita, Iulajn ne ĝuu kizadojn,
 Fine, de siaj kunuloj teruran vidinte mortigon,
 Helpon petegu : li tiam, sub leĝoj de paco maljusta
 Estu kurbata, de regno kaj lumo neniam ĝuante;
- 620 Sed antaŭtempe lin oni enfosu en sablan sentombon!
 Tion mi petas, kaj lastan ĝemadon kun sango mi verŝas.
 Kaj vi, Tiranoj, nacion kaj tutan idaron estontan
 Vi persekutu malame; kaj tiun plezuron al cindroj
 Donu, ke inter popoloj nek amo nek fido fariĝos.
- 625 Iam de mia ostaro naskiĝu heroo venĝema,
 Kiu per fero, per fajro, Dardanan premegos anaron,
 Nuna, ĉiea, ĉiama, dum liaj daŭrados fortadoj :
 Bordon al bordo, kaj maron al maro, kaj glavon al glavo
 Kontraŭmetinte, jes! ili batalu ĝis siaj genepoj! »
- 630 Tiel ŝi diris, tra miloj da pensoj verŝante animon,
 Dum ŝi, por vivon tedegan eltranĉi, pripensas rimedon :
 Al nutristino Sikea, al Barko, ŝi diras mallonge :
 — Ĉar en patrujo antikva ŝi cindrojn de sia forlasis. —
 « Ho nutristino karega, vi Anjon alvoku fratinon;

Diru : ŝi korpon rapide purigu en ondo rivera, 635
 Kaj ŝi brutaron kaj piajn oferojn ĉi tien konduku;
 Poste ŝi venu. Vi, frunton ĉirkáuu per sanktaj rubandoj :
 Jam preparitan laŭ rito al Stiksa Jupitro mi sanktan
 Fini deziras oferon, por tiel forpeli ĉagrenon,
 Kapon Dardanan ŝetinte en flamojn de ŝtipoj brulantaj. » 640
 Tiel ŝi diris : kaj zorge rapidas maljuna virino.

Tamen kolera, freneza pro sia projekto kruela,
 Dido, kun sangaj okuloj rulantaj, kun vangoj tremantaj,
 Ruĝaj pro aknaj makuloj kaj palaj pro morto estonta,
 Sojlon de domo interna transiras rapide, kaj, altan 645
 Suprenirante ŝtiparon je movo freneza, eltiras
 Glavon Dardanan, pro uzo alia amike donitan.

Poste, tuj kiam ŝi vestojn Iliajn kaj liton konitan
 Vidas, en larmoj kaj pensoj ŝi restas iome fiksata :
 Kaj, kuŝiĝinte sur liton, ŝi lastajn ekdiras ĝemadojn : 650
 « Dolĉaj restaĵoj, ĉar tion permesis Fataloj kaj dioj,
 Mian animon akceptu, kruelajn forpelu dolorojn.

Nun do mi vivis kaj estas finita fatala vojaĝo :
 Mia fantomo nun povos sub teron aliri glorege.
 Belan mi urbon starigis kaj miajn mi vidis muregojn. 655
 Edzon mi venĝis, kaj fraton malhuman mi juste punegis.
 Kaj ve! mi estus feliĉa, tro certe feliĉa, se iam
 Malbenegata ŝiparo Dardana ne bordon ektuŝis. »

Diris ŝi, liton per buŝo kisante : « Senvenĝe mi mortos!
 Tamen mi mortu ; ĉar tiel ĉe Ombrojn min plaĉas aliri. 660
 Tiun bruladon kruela Trojano per siaj okuloj
 Trinkos el maro, kaj mian mortigon kunportos memore. »

Tiel ŝi diris : kaj ŝin kunulinoj ankoraŭ ĝemantan
 Vidas falantan sub fero ; dum glavo, el manoj mortantaj,
 Ruĝa de sango, foriras. En alta domego bruiĝas 665
 Krioj ; kaj famo sciigon kunportas tra urbo tremanta.
 Ĉie larmegoj, ĝemadoj virinaj, plendadoj, aŭdataj
 Estas en domoj ; kaj vasta ĉielo pro krioj resonas.
 Ŝajnas ke Tiro antikva, ke tuta Kartago elfalas,
 De malamikoj sennombraj premita, dum flamoj frenezaj 670
 Diajn kaj homajn bruligas tegmentojn en kuro rapida.

Tion aŭdante, fratino alkuras, terure tremanta,

- Pala, vizagon ŝirante per ungoj kaj bruston per pugnoj,
 Fendas senmovan anaron kaj vokas per nomo mortantan :
- 675 « Estas do vere, fratino; per ruzoj min trompi vi volis :
 Tiun mortigon preparis altaroj, ŝtiparo kaj fajroj.
 Kial unue mi plendus pro laso? Fratinon kunulan
 Ĉu vi mortanta malŝatis? De sama Fatalo vokitajn,
 Fero nin ambaŭ samtempe mortigis per sama doloro.
- 680 Tiun ŝtiparon ĉu manoj konstruis; ĉu diojn patrujajn
 Preĝoj alvokis, por ke vin, kruela, mi trovu malvivan?
 Kun vi, fratino, vi frapis popolon kaj patrojn Sidonajn,
 Kaj min, kaj urbon mem vian. Nun donu; kaj ondo klarega
 Vundon purigu, por ke, se vegetos malforta bloveto,
- 685 Buŝo ĝin spiru. » Ŝi, tiel dirinte, ŝtiparon ekrapis,
 Kisis sur brusto mortantan fratinon, kun multa ĝemado,
 Ŝin revarmigis, kaj viŝis per vesto sangajon nigretan.
 Ree, pezegajn okulojn sublevi penante, reĝino
 Falas; kaj sango eliras siblante el vundo profunda :
- 690 Sin apogante sur brakon, trifoje ŝi penis sin levi;
 Kaj ŝi trifoje sur liton refalis : okuloj vagantaj
 Lumon ekserĉis ĉielan; kaj ŝi, ĝin trovinte, ĝemadis.
- Tamen Junono la ĉiopotenca pri longa doloro
 Kaj malfacila pereo kompatis, kaj sendis Irison,
- 695 Por ke ŝi tiun animon disigu el korpaj ligiloj.
 Estis ĉar tiu pereo nek puno nek sorta dekreto,
 Sed antaŭtempa mortiĝo, kaŭzita de frapo subita,
 Ne Proserpino ankoraŭ tiregis el frunto flavruĝan
 Haron, nek kapon al Stiksa reganto ofere dediĉis.
- 700 Tiam Iriso, fluginte tra spacoj per ruĝajflugiloj,
 Kaj mil kolorojn diversajn el suno kontraŭa tirinte,
 Malsupreniras, kaj staras sur kapo : « Mi tiun al Dito
 Sanktan oferon alportas, kaj vin liberigas el korpo. »
 Tiel dirinte, per mano ŝi haron ektranĉas : subite
- 705 Varmo el korpo eliras, kaj vivo forflugas en venton.

KANTO KVINA

Dume Eneo, en mezo de maro, sur ŝipoj, iradon
 Certan daŭrigis, kaj tranĉis ondaron per vento ŝvelantan,
 Murojn vidante en kiuj jam brilis flamegoj de Dido
 Malfeliĉega. Sed kion signifas ĉi tiu brulado? 5
 Oni ne scias. Ĉar granda amego rompita doloras
 Insultegitan virinon, kaj agojn instigas malsaĝajn,
 Premas pro tio fundkore Trojanojn sentaĵo malgaja.
 Kiam maralton aliris ŝiparo, kaj kiam neniu
 Tero aperis, sed ĉie ĉielo kaj ĉie ondaro, 10
 Tiam vualo el nuboj nigregaj sur kapoj densiĝas,
 Nokton kaj vintron portante : kaj ondo malluma bolegas.
 Kaj Palinuro ŝipestro ekkrias, sur alta ferdeko :
 « Kial do tiom da nuboj ĉielon ekzonas malluman?
 Kion vi, Patro Neptuno, preparas? » Li, tiel dirinte,
 Velojn ordonas mallevi kaj preni kuraĝe remilojn, 15
 Poste velstangon al vento klinigas, kaj tiel parolas :
 « Grandà Eneo, eĉ se ĝin Jupitro promesus, mi nune
 Bordon Italan, sub tia ĉielo, ne trafi esperus.
 Ventoj ŝanĝitaj tro premas ŝipflankon, kaj de okcidento
 Nigra alkuras, dum alta aero densiĝas en nuboj. 20
 Kontraŭ ventego batali, kaj plie daŭrigi iradon,
 Sajnas neeble : ĉar estas Fatalo pli forta, ĝin sekvu;
 Kien ĝi vokas ni vojon direktu. De frato Erikso
 Kuŝas proksime fidinda marbordo kaj rodoj Sicilaj :
 Tion mi kredas, se astrajn movadojn mi bone observis. » 25
 Tiam do pia Eneo : « De longe nin ventoj komandas
 Certe, kaj kontraŭ ventego mi vidas vin vane batali.
 Flanken direktu velaron. Ĉu estas kamparo pli kara,
 Kien mi ŝipojn lacegajn pli bone konduki deziras,
 Ol regiono Dardana de reĝo amika Acesto, 30

Kiu de patro Anĥizo en brusto enhavas ostaron? »

Tiel dirinte, li celas havenon; kaj velojn Zefiroj
Streĉas favoraj : rapide sur ondoj eknagas ŝiparo;
Fine sur sablon konitan ĝojantaj aliras Trojanoj.

35 Dume, el malproksimaĵo kaj supra altega de monto,
Mire amikan vidinte ŝiparon, alkuras Acesto.
Sagoj kaj felo de urso Libuja lin vestas sovaĝe.
Iam patrino Trojana de patro Rivera Kriniso
Naskis lin : siajn prapatrojn antikvajn li ĉiam memoris.

40 Sekve do li revenantojn gratulas, al ili kamparan
Donas manĝaĵon, kaj lacajn konsolas per helpo amika.
Tagon morgaŭan, post kiam unuaj radioj de suno
Stelojn forpelis, kunulojn sur bordo aparte vagantajn
Vokas Eneo; kaj sur altaĵeto li tiel parolas :

45 « Idoj Dardanaj, nacio naskita de sango diaĵa,
Rondo de jaro finiĝis post dekdu monatoj pasintaj.
Jaron antaŭan, ni tie en teron enfosis restaĵojn
Diajn kaj ostojn de patro, altarojn farinte funebrajn.
Estas do tago, se mi ne eraras, en kiu ni ĉiam

50 Patron honoros kaj ploros : car tion ordonis diaĵoj.

Kiam eĉ mi ekzilita troviĝus en Sirtoj Getulaj,
Aŭ haltigita en maro Arguja, en urbo Mikena, [majn
Tamen mi jarajn promesojn kaj sanktajn oferojn kuti-
Zorge plenumus, kaj metus donacojn sur liajn altarojn.

55 Nu do, hodiaŭ, se apud ostaro kaj cindroj de patro
Ĉiuj ni estas, se ventoj nin puŝis en rodon amikan,
Certe ne tio fariĝis sen volo, sen helpo de dioj.
Venu; kaj ĉiuj ĝojantaj solenajn ni festu honorojn :
Ventojn ni petu. Tuj kiam mi urbon konstruos, mi al li

60 Templojn dediĉos, kaj mi ĉiujarajn prezentos oferojn.
Al vi du bovojn Acesto, naskita de sango Trojana,
Donas, laŭ nombro de ŝipoj : al viaj festenoj patrujajn
Voku Penatojn, kaj tiujn preĝatajn de gasto Acesto.
Plie, tuj kiam la naŭa Aŭroro sur virojn mortemajn

65 Lumon ekverŝos kaj teron varmigis per helaj radioj,
Tiam mi ŝipojn invitos Trojanajn por kura batalo.
Poste se iuj por kuro pieda valoras, se iuj
Estas pli lertaj por sagon alĵeti kaj lancon malpezan,

Iuj, en pugnoj fidante, malmolan pliamas boksarton,
Ĉiuj alkuru : vi venkajn donacojn premie ricevos. 70

Ĉiuj atente silentu; kaj fruntojn ekzonu verdaĵe. »

Tion dirinte, li kapon vualas per mirto patrina :

Tion imitas Helimo kaj reĝo maljuna Acesto,

Poste junaĝa Askano, kaj fine ceteraj junuloj.

Tiam Eneo, el loko kunvena, kun miloj da anoj, 75

Al altaĵeto aliras, sekvata de granda anaro,

Tie du vinajn kalikojn senakvajn, laŭ rito de Bako,

Verŝas sur teron, kaj tiom da lakto kaj tiom da sango,

Florojn purpurajn disĵetas, kaj fine li tiel parolas :

« Sankta naskinto, saluton denove, saluton, ho cindroj 80

Vane al mi redonitaj, fantomo kaj patra animo.

Limon Italian, kaj kampon Aŭzonan, kaj, kiun ajn estas,

Tibron, ve! al mi ne dioj permesis kun patro serĉadi. »

Tiel li diris : subite, veninte el tombo profunda,

Granda serpento sep ringojn longigas kaj volvas sep tor- 85

Ĝi altaĵeton ĝentile ĉirkaŭas kaj trafas altaron. [dojn.

Dorso aperas lazure kolora, dum vostaj makuloj

Ore brilegas, similaj al arko ĉiela en nuboj,

Kiu de suno kontraŭa diversajn eltiras kolorojn.

Tion vidinte, stariĝis Eneo : sed, longa per tordo, 90

Inter kalikoj kaj vazoj brilantaj aliras serpento,

Poste manĝaĵon gustumas, kaj, neofendema, denove

En altaĵeton reiras, manĝitajn lasinte altarojn.

Li komencitan al patro oferon plenumi deziras;

Ĉar li ne scias, ĉu estas Genio de loko, ĉu eble 95

Patra sendito : li buĉas laŭ rito kvin idojn ŝafinajn,

Tiom da porkoj kaj tiom da nigraj je dorso bovidoj.

Vinon li verŝas el sanktaj kalikoj, de granda Anĥizo

Vokas animon kaj Manojn lasintajn riveron Akeran.

Poste kunuloj rapidas, kaj ĉiu, laŭ sia riĉeco, 100

Donojn alportas, altaron plenigas kaj buĉas bovidojn.

Zorge kupraĵojn aliaj ordigas, kaj super karbaĵoj

Metas pikilojn, por rosti viandon, sur herbo kuŝante.

Tago alvenis la tre atendita : Faetaj ĉevaloj

Naŭan Aŭroron jam traveturigis tra lumo brilega. 105

Famo kaj nomo de glora Acesto najbarojn allogis.

Ili do. bordon plenigas je ĝoja kaj multa anaro :
Vidi Trojanojn unuaj, aliaj batali deziris.

Estas unue lokitaj, en mezo de cirko, premioj :

- 110 Antaŭ okuloj, jen la tripiedoj, jen kronoj verdajaj,
Branĉoj de palmo, donacoj al ĝojaj venkantoj, armiloj,
Vestoj purpure pentritaj, arĝenta kaj ora talento.
Fine, de alte, sciigas trompeto ke ludoj komencas.

- Oni elektis en tuta Ŝiparo kvar ŝipojn egalajn,
115 Pezajn remilojn portantajn : kaj ili komencas batalon.
Inter remistoj, Mnesteo rapidan kondukas Balenon :
Baldaŭ Itala, Mnesteo denomos la genton Memian.
Mason grandegan de granda Ĥimero Giaso komandas ;
Ĉar ĝin, al urbo similan, tri vicoj da Trojaj maristoj
120 Junaj movigas, dum sur tri etaĝoj leviĝas remiloj.

- Poste Sergesto, de kiu Sergioj eltiras alnomon,
Grandan direktas Centaŭron : kaj Scilon lazuran Kloanto
Regas, prapatro, Kluntoj, de via Romana idaro.

- Tremalproksime en maro, kaj kontraŭ saŭmanta marbor-
125 Staras ŝtonego ; ĝin ofte frapegas kaj kovras koleraĵ [do,
Ondoĵ, tuj kiam ĉielon ekkaŝas ventega Koruso :
En kvieteco, silente ĝi ondon eliras trankvilan,
Loko agrabla por maraj kolimboj sub suno starantaj.
Tien Eneo, per kverko folia, starigas verdaĵan

- 130 Limon, signalon por lertaj maristoj, el kie al bordo
Ili returnen devige aliros, per longa kurbiĝo.

- Tiam per sorto li lokojn konigas : sur altaj ferdekoj
Ĉefoj vidiĝas belegaj, purpure kaj ore brilantaj :
Frunton ceteraj junuloj vualas per poplaj folioj :
135 Ĉiuj sur ŝultrojn ekverŝis oleon kaj ilin briligis.

- Ili, sur benkoj sidante, per brakoj streĉante remilojn,
Tute atente signalon atendas : plezura timeto
Korojn batigas, ĉar ilin agitas deziro al gloro.

- Fine, tuj kiam sonoritis bruega trompeto, el limoj
140 Ĉiuj rapide foriras : ĉielon maristaj kriegoj
Frapas ; kaj brakoj streĉataj batitan ŝaŭmigis ondaron.
Maro, tranĉita laŭ sulkoj egalaj kaj tute ŝirita
Konvulsiĝas sub akraj remiloj kaj spronoj tridentaj.
Malpli rapide, dum ĉara kurado, kaleŝo veturas,

Kiam ĝi, barojn lasinte, tra kampoj flugante aliras : 145
 Malpli kuraĝe, sur jugojn fumantajn skuante rimenojn,
 Veturigisto antaŭen sin klinas por bati ĉevalojn.
 Tiam resonas, tra tuta arbaro, aplaŭdoj de viroj,
 Aŭ eĉ murmuroj, laŭ ĉia pliamo : en bordo interna
 Voĉoj eĥigas; kaj montoj frapitaj pro krioj tremetas. 150
 Antaŭ aliaj, flugante sur ondoj, unua Giaso,
 Inter anaro krianta, aliras; kaj poste Kloanto
 Sekvas : ĉar estas pli bonaj remiloj, sed lin malfruigas
 Pezo da ŝipo. Post ili, Baleno, Centaŭro penadas
 Kune, sur sama linio, sin loki al vico unua. 155
 Sed jen triumfas Baleno, jen ĝin preteriras venkante
 Granda Centaŭro : nun ambaŭ aliras je sama movado,
 Ondon salitan sulkante per kiloj akregaj de ŝipoj.
 Ili jam alproksimiĝis al rifo, kaj limon ektuŝis,
 Kiam Giaso, naĝante unua en mezo de vojo, 160
 Direktiston de ŝipo, Meneton, per voĉo alvokas :
 « Kial do tiel vi dekstren aliras? Ĉi tien direktu :
 Celu pli bordon; nu, rifon maldekstran tuŝetu remiloj :
 Naĝu aliaj maralton. » Li diris : sed rifojn kaŝitajn
 Timas Meneto; kaj tuj li deturnas ŝipnazon al maro : 165
 « Kien vi iras, erare? » Denove : « Ŝtonegon, Meneto,
 Celu! » kolere rekrias Giaso. Subite Kloanton
 Li malantaŭe ekvidas proksiman, al celo penantan.
 Inter ŝtonego bruanta kaj ŝipo Giasa, ĉi tiu
 Vojon maldekstran aliras interne : rapide unua 170
 Li preteriras, kaj, limon laŝinte, trankvile tra ondoj
 Naĝas. Sed granda ĉagreno junulon okupas en koro;
 Larmoj ekfluas sur vangojn : kaj savon de siaj kunuloj
 Ne prizorgante, nek indon, tuj li malkuraĝan Meneton
 Kaptas kolere, kaj ĵetas en maron el alta ferdeko. 175
 Li mem, preninte tenilon de la direktilo, komande
 Virojn admonas, kaj turnas al bordo ŝpinazon de ŝipo.
 Tamen, tuj kiam el mara profundo Meneto maljuna
 Peze eliris, kun vestoj malsekaj pro akvo fluanta,
 Li, rifsupraĵon trafinte, sidiĝis sur sekan ŝtonegon. 180
 Lin ekfalintan vidinte kaj poste naĝantan, Trojanoj
 Ridis, kaj ridis, vidinte el akvo lin supren reiri.

- Tiam espero sekreta Giason elvenki malfruan
 Korojn batigas de lasta Sergesto, de lasta Mnesteo.
- 185 Vicon unuan ektrafas Sergesto, proksime de rifo;
 Sed preteriri alian li tute ne povas : ŝipnazo
 Nur preteriras, sed premas ŝipvoston la sprono Balena.
 Tiam, kurante en mezo de ŝipo, tra karaj remistoj,
 Ilin admonas Mnesteo : « Amikoj, nun puŝu remilojn
- 190 Forte; Hektoraj kunuloj, vi, kiujn mi kore elektis,
 Kiam falegis Trojurbo, nun tiun uzadu fortecon,
 Tiun kuraĝon, per kiuj, en Sirtoj Getulaj, vi ĉiam
 Venkis, en maro Iona, en ondoj rapidaj Maleaj.
 Certe ne venki esperas Mnesteo, nek esti unua;
- 195 Kvankam... ĉar venkos nur tiu al kiu Neptuno permesos.
 Lasta alveni tro estus hontinde : do, venku, kunuloj;
 Tian evitu humilon. » Li diris : kun granda penado
 Ĉiu kurbiĝas; dum kupran ŝipŝelon tremigas frapadoj.
 Ŝajnas ke maro foriĝas : nun ofta spirego skuadas
- 200 Brustojn kaj brunajn vizaĝojn; kaj ŝvito fluadas rivere.
 Ŝanco al ili ekdonis honoron fervore petitan.
 Ĉar dum Sergesto maltime prezentas al rifoj internaj
 Nazon de ŝipo, kaj dum ĝi en spacon penetras mallarĝan,
 Ĝi malfeliĉe frapiĝas sur baron kaŝitan, kaj haltas.
- 205 Rifo moviĝas : en akra ŝtonego remiloj fiksitaj
 Estas rompita; kaj pendas remŝipo sur flanko ŝirita.
 Ĉiuj stariĝas maristoj kaj haltas, puŝante kriegojn.
 Ferajn levilojn preninte, kaj stangojn armitajn de akra
 Pinto, tuj ili kolektas remilojn sur ondo naĝantajn.
- 210 Tamen Mnesteo ĝojega kaj kuraĝigita pro ŝanco,
 Aron remistan rapide admonas kaj, ventojn vokinte,
 Trafas pli bonan marfluon, kaj naĝas sur ondo trankvila.
 Kiel kolombo, pelita subite el kavo ŝtonega,
 Kiu protektas loĝejon kaj neston kaj idojn amatajn,
- 215 Flugas rapide tra kampoj, kaj, forte timante, agitas
 Ĉirkaŭ nesteto flugilojn : ĝi baldaŭ, en spaco trankvila,
 Glitas sur vojo fluida, senmovajn streĉante flugilojn.
 Tiel Mnesteo kaj ŝipo Balena rapide akvaron
 Lastan ektranĉas, ĉar ŝipon irigas movado mem ĝia.
- 220 Kaj li unue ĉllasas, en alta ŝtonego, Sergeston,

Kiu batalas en rifoj, kaj vane, petante helpadon,
 Penas, per siaj remiloj rompitaĵ, daŭrigi iradon.
 Poste Giason kaj mason de granda ŝimero li sekvas,
 Fine ĝin trafas : ĉar estas de estro ĝi ĵus senigita.

Sola Kloanto, proksime de celo, nun lin antaŭiras; 225

Kaj, por lin venki, klopodas Mnesteo, per granda penado.

Tiam pliiĝas kriegoj; kaj ĉiuj deziroj sekvantan

ŝipon kuniras : ĉielo resonas pro kriaĵ bruegoj.

Unuj indignas; — ĉu venkan premion, ĉu famon triumfan

Ili nun perdis? — kaj gloron deziras per vivo aĉeti. 230

Tiun ĉi nutras sukceso; li povas, ĉar povi li kredas.

Eble Fatalo ekkronus du ŝipojn egale venkantajn;

Sed, direktante al maro du manojn plektitajn, Kloanto

Preĝojn ekverŝas, kaj diojn petegas per riĉaj promesoj :

« Dioj, vi kiuj potencas ondaron sur kiu mi naĝas, 235

Se vi plenumos deziron, sur bordo mi blankan bovviron,

Apud altaroj, huĉados; kaj poste mi aĵon internan

ĵetos en akvon salatan, kaj vinon verŝados rivere. »

Tuĵe en ondo profunda lin aŭdas la tuta anaro

da Nereidoj, kaj ĥoro de Forko, kaj virga Panopo : 240

Patro Portuno per mano fortika ekpuŝas iranton.

Tiam do, li, pli rapide ol Noto, ol sago flugila,

Ĝoje al tero alnaĝas, kaj rodon ektrafas profundan.

Tiam Anĥiza naskito, multegan vokinte anaron,

laŭte, per voĉo herolda, Kloanton proklamas : venkanto, 245

Poste lin kronas, kaj kapon ekzonas per laŭra verdaĵo.

Plie al ĉiu el ŝipoj li donas elekte tri bovojn,

Vinon, kaj grandan talenton arĝentan, por pagi remistojn.

Sed li por ĉefoj precipaj pli grandajn rezervas honorojn.

Estas do rekompensata venkanto per vesto orata, 250

Kiun purpure ĉirkaŭas duobla festono Meliba.

Filo de reĝo, sur ŝtofo brodite, en Ida arbaro,

Cervojn rapidajn per kuro kaj sagoj kuraĝe lacigas;

Forte ĉasisto spiregas : subite el Ida supraĵo

Birdo Jupitra flugante lin kaptas per kurbaj ungegoj. 255

Manojn direktas al astroj maljunaj gardantoj, sed vane;

Same ĉielen vanege resonas bojadoj de hundoj.

Donas Eneo al dua venkanto, pro lia lerteco,

- Belan kirason, el maŝoj orataj trioble teksitan,
 260 Kiun li estis kaptinta el Demoleono, lin kiam
 Apud rapida Simoo li venkis, ĉe alta Ilio :
 Kiel ornamon kaj kiel armilon ĝin same li donas.
 Ilon multmaŝan servistoj Segaro kaj Fego sur ŝultroj
 Povis apenaŭ sublevi ; kaj tamen ĝin Demoleono
 265 Vestis, dum iam kurante Trojanojn li frapis pelitajn.
Estas la tria premio du kupraj lavvazoj, kaj plie
 Tasoj **argentaj**, je belaj desegnoj tre lerte ĉizitaj.
 Ĉiuj do **rekompensitaj**, fieraj pri belaj donacoj,
 Kapon zoninte **per** ruĝaj rubandoj, ĝojege aliris,
 270 Kiam, savita el rifo **danĝera**, post granda penado,
 Unu nur vicon remilan **havante**, rompinte aliajn,
 Ŝipon rideblan al rodo **senglore** kondukas Sergesto.
 Kiel, en mezo de vojo, vidiĝas **serpento** kuŝanta,
 Kiun oblikve premegis rodkupro, aŭ kiun, per frapo
 275 Ŝtona, pasanto forlasis rompitan kaj **preskaŭ** malvivan ;
 Vane per longaj tordadoj de korpo ĝi penas **forkuri** :
 Parto antaŭa stariĝas, dum brilas okuloj, dum **buŝo**
 Siblas kolere ; sed posta, per vundo ŝirita, kuŝadas,
 Ringojn volvante ; kaj vane sur sin mem ruliĝas **artikloj** ;
 280 Tiel kun unu remvico pezege treniĝis la ŝipo.
 Tamen ĝi velojn etendas kaj trafas plenvele havenon.
 Tiam Eneo per kvara premio donacas Sergeston
 Ĝoje : ĉar ŝipon li savis, ĉar ĉiuj revenas kunuloj.
 Estas donata Foloo, **sklavino** de Kreta nacio :
 285 Lerta en artoj Minervaj, du idojn ŝi nutras samnaskajn.
 Tamen, post tiu batalo finita, al verda herbejo
 Pia Eneo aliras. De ĉie ĝin zonas arbaroj,
 Montojn kronante : en mezo de valo, natura teatro
 Kuŝas ĉirkaŭe ; kaj de ĝi, de multa anaro sekvita,
 290 Mezon trafinte, sur herban monteton sidiĝas heroo.
 Tiam, ĉu volus okaze per kuro rapida batali
 Iuj junuloj, premiojn kaj donojn li kore promesas.
 Multaj de ĉie aliras Trojanoj kaj anoj Sicilaj,
 Eurialo kaj Niso unue :
 295 Eurialo aminda pri formoj kaj verda juneco,
 Niso pro pia amego al knabo : post ili alkuras

Glora Dioro, naskita de gento de reĝo Priama,
 Poste Salio kaj Patro samtempe; unuan Akarna
 Naskis patrino, kaj duan Tegea, de sango Arkida.

Fine alvenis Helimo, Panopo, junuloj Sicilaj, 300
 Arbarloĝantoj, kunuloj de reĝo maljuna Acesto,
 Poste aliaj pri kiuj nenion konigis la Famo.
 Meze de ili, Eneo sin levas kaj tiel parolas :
 « Vortojn en korĉajn akceptu; al ĝojo malfermu animojn :
 El vi neniu eliris sen dono de mi donacita. 305
 Ĉiu ricevos du sagojn Gnosiajn, armitajn de fero
 Bele brilanta, kaj unu arĝentan hakilon ĉizitan.
 Estos premio komuna por ĉiu. Tri poste unuaj
 Donojn ricevos, kaj kapon zonados per branĉoj olivaj.
 Bele vestitan ĉevalon unua venkanto ricevos. 310
 Amazoninan sagujon al dua, je sagoj Tracujaj
 Plenan, mi donos, al flanko pendantan per ora rimeno,
 Kiun alligas hoketo, kovrata de riĉaj juveloj.
 Tria, pro tiu ĉi kasko Arguja, kontenta eliros. »
 Tiel li diris. Lokitaj kurantoj, tuj kiam signalo 315
 Estas aŭdita, barilon lasinte, tra spaco rapidas,
 Kiel fluganta nubaro, nur celon vidante trafotan.
 Antaŭ aliaj kurantoj aliras kaj longe saltegas
 Niso, pli certe rapida ol fulmo, ol venta flugilo;
 Sekvas proksime Salio, sed tamen post spaco tre longa. 320
 Tria, sed je interspaco mallonga, alvenas kurante
 Eurialo.
 Eurialon Helimo postiras; kaj poste Dioro
 Flugas, de antaŭiranto piede tuŝante piedon,
 Ŝultrojn klinante sur ŝultrojn : se daŭrus kurado pli longe, 325
 Salto lin igus unua; kaj venko fariĝus necerta.
 Estis jam baldaŭ finita batalo, kaj lacaj kurantoj
 Preskaŭ celfoston ektrasis, ĵus kiam en sangon glitigan
 Niso ekfalas mizere; ĉar junaj boviroj buĉitaj
 Teron okaze ĉi tie difektis kaj verdan herbejon. 330
 Tie junulo venkanta sufiĉe sur tero piedon
 Ŝanceliĝantan deteni ne povis, sed falis subite,
 Kapon antaŭan, en koton malpuran kaj sanktan sangajon.
 Tamen li Eurialon amatan ne tute forgesis :

- 335 Ĉar, stariĝante el koto, li kontraŭ Salion sin turnas
 Neatendite, lin poste ŝancelas kaj rulas sur sablon.
 Eurialo rapidas, venkante per helpo amika,
 Baldaŭ fariĝas unua kaj flugas tra multaj aplaŭdoj.
 Poste alvenas Helimo kaj tria venkanto Dioro.
- 340 Tiam Salio grandegan teatron per krioj plenigas :
 Antaŭ vizaĝoj de Patroj ĝemante, li petas kolere
 Ke al li oni redonu premion inside rabitán.
 Eurialon favoras anaro; ĉar larmoj petantaj
 Ĉiun kortuŝas, kun ĉarmo de virto en korpo beleta.
- 345 Forte lin helpas, kaj grande protestas per voĉo, Dioro,
 Kiu fariĝis venkanto, sed kiu postulus vanege
 Lastan premion, se ial unuan ricevus Salio.
 Tiam Eneo la patro : « Nun viaj donacoj, li diris,
 Tiel restados, junuloj; kaj ordon neniel mi ŝanĝos.
- 350 Tamen mi povas senkulpan amikon tutkore kompati. »
 Tiel li diris. Salio ricevas de granda leono
 Felon Getulan, je densa hararo, je ungoj orataj.
 Tiam do Niso : « Se tiaj, li diris, montriĝas premioj
 Kiuj konsolas venkitojn, nu! kiaj pro Niso donacoj
- 355 Estos sufiĉaj? Ĉar kronon unuan mi certe meritus,
 Se min, ve! kiel Salion, kruela ne venkis Fatalo! »
 Tiel dirinte, li montris vizaĝon kaj inembrojn, per koto
 Malpurigitajn densega. Sed patro, kun bona rideto,
 Ŝildon alporti ordonas, de Didimaono faritan,
- 360 Kiun formetis Danaoj el sojlo de templo Neptuna.
 Tiun premion belegan li donas al inda junulo.
 Kiam do estis finita kurado kaj rekompensita :
 « Nun, se en koro de iu kuniĝas kuraĝo kun forto,
 Li do alvenu, kaj manojn sublevu de ganto armitajn. »
- 365 Tiel dirinte, du donojn premiajn li tiam proponas.
 Havos venkanto bovviron, de oraj rubandoj vestitan :
 Glavon kaj riĉan kirason konsolè ricevos venkito.
 Tiam el aro eliras Dareso, je fortaj muskoloj,
 Grandan murmuron de viroj naskante pro kresko altega.
- 370 Kontraŭ Pariso li sola kutimis batali : li iam,
 Apud tombonto, en kiu nun kuŝas grandega Hektoro,
 Venkis Buteson je korpo fortega, ĉi tiun mem kiun

Naskis Amico, la reĝo de Brebiciano nacio,
 Kaj lin, danĝere frapitan, sur sablon kuŝigis, mortantan.
 Kapon fiere altigas Dareso, petante batalon, 375
 Ŝultrojn ekmontras dikegajn, kaj, brakojn streĉante, post
 Ŝetas alian ĉirkaŭe, de frapoj batante aeron. [unu
 Estas petita alia : en tiu sennombra anaro,
 Viron batali kaj ganton manvesti neniu kuraĝas.
 Tiam li ĝoja, kredante ke ĉiu rifuzas premion, 380
 Antaŭ piedoj stariĝas Eneaj, kaj, ne prokrastante,
 Kornon bovviran per mano maldekstra altiras, dirante :
 « Filo diina, se fari batalon neniu kuraĝas,
 Ĉu mi sensfine starados? Ĉis kiam mi devos atendi?
 Donon min preni ordonu. » Samtempe murmuris aprobe 385
 Ĉiuj Trojanoj, kaj petis ke viro kunportu premion.
 Tiam, per diroj koleraj, Acesto riproĉas Entelon,
 Kiu proksime sidadis sur lito el verda herbaĵo :
 « Vane, Entelo, vi iam plej estis heroo kuraĝa,
 Se vi permesas ke iu, sen ia batalo, kunportos 390
 Tiun premion : sed kie do estas la majstro, la dio,
 Vane rememorigita, Erikso? Ĉu via forflugis
 Famo en tuta Sicilo, kaj donoj en hejmo pendantaj? »
 Sed li respondas : « Ne amon al gloro, deziron al famo,
 Timo forpelis; sed sangon frostadis multego da ĵaroj : 395
 Pro maljuneco nun estas en korpo muskoloj malfortaj.
 Tiun junecon estintan, pri kiu la fanfaronulo
 Tiel vanteme sin gloras, se mi nur ankoraŭ posedus,
 Certe nek dono, nek bela bovviro kuraĝon ekscitus :
 Ĉar mi ne petas premion. » Kaj poste li, tiel dirinte, 400
 Ŝetas en mezon de aro du gantojn de bokso pezegajn,
 Kiujn kuraĝa Erikso kutimis, por grandaj bataloj,
 Porti sur manoj kaj ligi al brakoj per ledaj rimenoj.
 Sed ĉeestantoj miregas; ĉar ilin sep ledoj de bovo
 Faris, dum plombaj kaj feraj plataĵoj malglataj ĝin kovras. 405
 Miras unue Dareso kaj ilin li tute rifuzas.
 Ilin per mano subpezas Anhiza naskito grandkora,
 Tie kaj tie de gantoj grandegaj volvante rimenojn.
 Tiam maljuna heroo el brusto eligas parolojn :
 « Kio do estus se gantojn kaj ilojn vi vidis Herkulajn, 410

- Kaj sur ĉi tiu marbordo kruelan kaj sangan batalon?
 Iam de tiu armilo uzadis Erikso la frato :
 Sangon vi vidas ankoraŭ kaj cerbon disjete malpuran.
 Grandan Alcidon per ili li kontraŭbatalis; kaj kiam
 415 Sango pli bona nutradis fortecojn, dum blanka hararo
 Kapon ne kovris ankoraŭ maljunan, mi ilin uzadis.
 Tamen se tiun armilon rifuzas Trojana Dareso ;
 Tion se pia Eneo akceptas, se volas Acesto,
 Faru batalon egala. Mi ganton forlasos Eriksan ;
 420 Ion ne timu : vi ĵetu samtempe Trojanan boksilon. »
 Tiel li diris : duoblan mantelon li ĵetas el ŝultroj, [lojn
 Dikajn de membroj montrante muskolojn kaj ostajn artik-
 Fortajn : kaj staras fiere grandulo en meza areno.
 Tiam Anĥiza naskito, boksilojn preninte egalajn,
 425 Li mem al manoj de ĉiu similaĵn alligas armilojn.
 Ili subite sin levas, starante sur pinto pieda,
 Brakojn sentime en supra aero streĉante minacajn,
 Kaj malantaŭen metinte vizaĝojn por frapojn eviti.
 Ili tuj, manojn plektinte kun manoj, komencas batalon ;
 430 Tiu, pli bona pro movo pieda, pro lerta juneco,
 Tiu ĉi, membrojn havante kaj mason : sed tremas genuoj
 Aĝe rigidaj, kaj grandajn artiklojn skuadas spirego.
 Inter si multajn sed vanajn frapegojn sin donas boksantoj ;
 Flankajn kavaĵojn ĝemigas batadoj, dum brustoj profundaj
 435 Sonas samtempe, dum ĉirkaŭ oreloj kaj fruntoj cirkaŭas
 Oftaj fergantoj, dum vangoj kraketas pro vundoj malmolaj.
 Staras grandmasa Entelo senmove, en sama rekteco ;
 Viglaj okuloj kaj movoj de korpo fraparon evitas.
 Kiel soldato, batanta maŝine muregojn de ŭrbo,
 440 Aŭ sieĝanta armile fortajon sur monto starantan,
 Tiel Dareso ĉu tien rapidas, ĉu tien, kaj viron
 Tute ĉirkaŭas, dum multaj atakoj lin premas kolere.
 Pugnnon levinte, ĝin streĉas Entelo, kaj li ĝin etendas
 Supren : sed, frapon vidinte al kapo irontan, Dareso
 445 Tuj ĝin evitas, per flanka ekmovo de korpo rapida.
 Forto Entela vaniĝas kaj svenas en venton ; kaj korpo
 Peze sur teron ekfalas, per maso antaŭen tiritita.
 Tiel falegas maljuna kaj kava abio, sur Ida

Aŭ Erimanta montaro, putrintajn rompinte radikojn.
Tien alkuras scivole Trojanoj kaj anoj Sicilaj, 450
Kriojn ĉielen puŝante : unua rapidas Acesto.

Li kompatinde maljunan el tero sublevas amikon.
Nek prokrastite per falo kaj nek timigite, heroo
Ree batalon komencas; ĉar forton grandigas kolero :
Nun konscianta kuraĝo kaj honto flamigas fervoron. 455

Frapas Entelo Dareson kurantan, jen dekstra per ganto,
Jen per maldekstra, tra tuta areno lin persekutante.
Paco nenia, nenia ripozo : ĉar, kiel ventega
Hajlo krakigas tegmenton, nun tiel, per frapoj rapidaj,
Pugnoj Entelaj senĉese ruladas kaj batas Dareson. 460

Tiam Eneo la patro ne volis ke koro Entela
Estu pli longe kolera, kaj venĝon plenumu malhuman :
Sed li batalon finigas, kaj, lacan kaptinte Dareson,
Penas konsoli venkiton per tiuj paroloj amikaj :
« Malfeliĉulo! nu, kia frenezo eniĝas en koron? 465

Ĉu vi ne vidas ke homa ne estas forteco, sed dia?
Diojn obeu! » Li diras, kaj laŭte ĉesigas batalon.
Dume fidindaj kunuloj al ŝipoj lin pene kondukas.
Kapo ruliĝas sur ŝultroj malfortaj, tremetas genuoj;
Sango malpura eliras el buŝo kun dentoj rompitaĵ. 470

Ili, denove vokitaj, kirason ricevas kaj glavon.
Kronon kaj bovon, batalan premion, Entelo konservas.
Tiam venkanto, en koro flera pri bela bovviro :
« Filo diina, li diris, kaj ĉiuj Trojanoj, vi vidas
Kian grandegan, dum korpa juneco, mi havis fortegon. 475

Tute el morto tro certa sendube vi savis Dareson. »
Tiel li diris; kaj kontraŭ vizaĝo de bovo starante,
Kiun premie donacis Eneo, li dekstran sublevas,
Kaj, frapigante malmolan boksilon en mezon de kornoj,
Oston rompitan trapuŝas kaj cerbon dispelas ŝprucantan : 480

Falas bovviro kaj teren tremante kuŝiĝas malviva.
Poste Entelo el brusto profunde eligas parolojn :
« Tiun oferon, Erikso, pli bonan ol sangon Daresan
Al vi mi donas : nun bokson kaj arton mi lasas, venkinte. »

Tiam Eneo, ĉu volas per sago rapida batali 485
Iuj junuloj, premiojn kaj donojn tutkore promesas.

- Maston de ŝipo Seresta per mano li forte starigas,
 Poste flugilan kolombon, per ŝnuro ligitan, al pinto
 Alta pendigas; ĉar estas ĝi celo estonta por sagoj.
- 490 Viroj alvenas; kaj estas ĵetitaj en kaskon el kupro
 Nomoj : kaj, antaŭ aliaj, la nomo de filo Hirtaka,
 Hipokoonto, kun krioj favoraj eliras unue.
 Poste Mnesteo, la nova venkanto de ŝipa batalo,
 Sekvas, Mnesteo ankoraŭ kronata de verda olivo.
- 495 Trie, jen Eŭritiono, la frato de glora Pandaro,
 Kiu, por dian obei ordonon, ekrompis ĵuradon,
 Iam, tra vicoj Aĥajaj unuan ĵetante sagegon.
 Fine, en fundo de kasko, aperas maljuna Acesto,
 Kiu kuraĝas per mano junulan ekprovi laboron.
- 500 Tiam, fortege penante, flekseblan kurbigas pafarkon
 Probatalantoj, kaj sagon eltiras el siaj saguoj.
 Sago unua, ĵetita de filo Hirtaka, ĉielon
 Fendas, kaj, sonorinte ŝnureton, aeron bruigas,
 Flugas, kaj arbon renkontas kontraŭan por tien fiksiĝi.
- 505 Masto tremetas, kaj birdo ligita flugilojn agitas
 Time, dum grandaj resonas aplaŭdoj tra tuta anaro.
 Poste Mnesteo kuraĝa alvenas kaj streĉas pafarkon :
 Supron celinte okule, li sagon al celo direktas.
 Sed malfeliĉe li birdon per fero ne povis atingi :
- 510 Linan ligiton li solan traboris kaj ligotuberon,
 Kiu ĝin tenis piede ligitan sur pinto de masto.
 Noton kaj nubon nigretan flugante ĝi trafis subite.
 Tiam rapide, de longe pafarkon teninte streĉitan,
 Eŭritiono fundkore de frato alvokas helpadon,
- 515 Poste, flugantan kaj ĝojan atente celinte kolombon,
 Nigra en nubo ĝin trafas kaj boras en alta ĉielo.
 Birdo elfalas mortanta kaj vivon forlasas aere,
 Sagon portante malsupren tra korpo ankoraŭ fiksatan.
 Restis nur sola Acesto; kaj estis premio perdita.
- 520 Tamen ĉi tiu tra spaco aera sageton alĵetas,
 Arton lertegan elmontri volante kaj sonan pafarkon.
 Tiam aperas subite vidaĵo mirinda, kaj signo
 Vere terura, pri kiu nin malfeliĉego instruis
 Poste; sed ve! tro malfrue ĝin pastroj klarigis divenaj.

Kvankam flugante tra nuboj malsekaj la kano flamiĝis, 525

Vojon fajrere desegnis, kaj, estingiĝinte, tra vento

Svenis malpeza, simila al astroj, el alta ĉielo

Kiuj elfalas, kaj spacon trairas kun brila hararo.

Viroj Trojanaj kaj anoj Sicilaj per koro tremanta

Vidas miraklon kaj preĝas diegojn : sed granda Eneo 530

Signon akceptas ĉielan, kaj, ĝojan kisinte Aceston,

Donas belegajn donacojn, kaj tiel li poste parolas :

« Prenu, ho patro, ĉar reĝo de granda Olimpo deziris

Ke per ĉi tia miraklo vi havu pli grandan honoron.

Belan premion de patro maljuna Anĥizo ricevu, 535

Tiun kalikon desegne ĉizitan, ĉi tiun mem kiun

lam al patro Anĥizo donacis Tracuja Ciseo,

Kiel premion kaj garantiaĵon de amo fervora. »

Tiel li diras, kaj, kapon zoninte de laŭra verdaĵo,

Antaŭ aliaj unue Aceston proklamas : venkanto. 540

Eŭritiono bonkora ne tiun envias honoron,

Kvankam el alta ĉielo li birdon unue faligis.

Estas donata al viro rompinta ligilon premio

Dua, kaj tria al viro borinta per sago celmaston.

Tamen Eneo la patro, post kiam finiĝis batalo, 545

Filon Epitan, de juna Iulo kunulon, kaj same

Lian fidindan gardanton, alvokas, kaj diras orele :

« Iru rapide, kaj petu Askanon ĉu li jam pretigis

Knaban anaron, ĉu kuron ĉevalan li tute preparis.

Tiam li aron al avo konduku kaj arme sin montru. » 550

Tiel li diris, kaj, tutan amason en cirko vagantan

Poste pelinte, ordonas ke kampo fariĝu malplena.

Knaboj aliras kaj, antaŭ okuloj de patroj, samvice

Rajdas, brilantaj sur bele briditaj ĉevaloj, dum ilin

Viroj Sicilaj kaj Trojaj junuloj admiras sincere. 555

Zonas junaĝajn hararojn foliaj kronetoj kutimaj.

Ili du sagojn korneajn kunportas je fera pikilo.

Portas aliaj sur ŝultroj sagujon malpezan : el kolo

Ora ĉeneto eliras ĉirkaŭe kaj pendas sur bruston.

Nombre tri ĉefoj kondukas tri arojn da junaj rajdistoj; 560

Ili aliras, de dekdu infanoj tuj akompanataj.

Tiuj ĉi rajdas aparte, kaj ĉefojn riĉaĵe egalas.

- Aron unuan kondukas la juna Priamo, de avo
 Nomon portante gloregan, kaj via naskito, Polito,
 565 Genton Italan naskonte : li radjas sur Traca ĉevalo.
 Blankajn makulojn ĝi havas ; kaj estas antaŭaj piedoj
 Blankaj, dun kapo stariĝas fiere brilanta kaj blanka.
 Poste Atiso, de kiu naskiĝos Atioj Latujaj,
 Knabo malgranda Atiso, amata de knabo lulo.
 570 Fine, kaj antaŭ aliaj, lulo belega : junulo
 Rajdas Sidonan ĉevalon ; ĝin Dido fidema donacis,
 Kiel premion kaj garantiaĵon de amo fervora.
 Rajdas aliaj junuloj ĉevalojn Sicilajn, kaj ilin
 Pruntis maljuna Acesto.
 575 Knaboj timemaj ricevas aplaŭdojn, kaj ilin Trojanoj
 Ĝoje rigardas ; ĉar tiuj ĉi patrajn rekonas vizaĝojn.
 Tiam, tuj kiam rajdistoj tra tuta kamparo trakuris,
 Antaŭ okuloj de patroj, la filo Epita signalon
 Donas konitan, per krio kaj vipa krakigo sonanta.
 580 Ĉiuj duone disiĝas samnombre kaj faras tri arojn
 Apartigitajn ; kaj poste denove, vokataj de ĉefoj,
 Ili frontsangas iradon kaj sagojn antaŭen direktas.
 Ili, aliajn farinte movadojn, denove reiras
 Kontraŭ unuajn, dum rondoĵ alternas senĉese ŝanĝantaj.
 585 Ĉiu, vidante armilojn, nun kredus ekvidi batalon.
 Dorson montrante, jen ili forkuras ; jen sagojn minacajn
 Ili prezentas, kaj, pacon farinte, samvice aŭtras.
 Oni rakontas ke iam en Kreto, tra la labirinto,
 Intér du muroj mallumaj, troviĝis malrekta vojeto :
 590 Flanke aperis mil vojoj insidaj, trompontaj iranton,
 Kiu, sen signo direkta, tuj senripareble perdiĝis.
 Tiel do filoj Trojanaj, postsignojn miksante kuradajn,
 Ludon batalan kaj falsan forkuron belmove konfuzis ;
 Kiel delfenoj, en maro Karpata aŭ maro Libuja,
 595 Kiuj naĝante tranĉadas akvaron kaj ludas en ondoj.
 Tiun kutimon kaj kuron kaj sine batalon Askano,
 Kiam li murojn konstruis de Albo la Longa, unue
 Volis refari, kaj poste antikvajn instrui Latinojn.
 Tial, pri ludoj de ili faritaj kun Trojaj junuloj,
 600 Filojn instruis Albanoj ; kaj ilin de ili akceptis

Romo grandega, kaj ĉiam prapatran konservis kutimon.
Estas nun knaboj nomataj : Trojanoj ; kaj ludo : Trojana.

Tiel finiĝis bataloj faritaj pro patraj piaĵoj.

Tiam Fatalo, ŝanĝante direkton, sin turnis kontraŭen.

Antaŭ tombejo dum ludoj diversaj solene fariĝis, 605

Saturnidino Junono Irison al ŝipoj Iliaj

Sendas el alta ĉielo : ŝin vento favoras irantan.

Multe pensante, antikvan ankoraŭ ŝi sentas doloron.

Sed kurjerino forflugas sur arko miloble kolora,

Kaj, de neniŭ vidita, rapide ŝi teron aliras. 610

Grandan anaron vidinte, ŝi apud marbordo rimarkas

Rodon dezertan kaj ŝipojn lasitajn sen ia gardanto.

Tamen aparte, sur bordo malplena, Trojanaj virinoj

Ploris sekrete Anĥizon malvivan ; kaj ĉiuj malĝojaj

Maron rigardis, samvoĉe ĝemante : « Ve ! por ni lacegaj, 615

Tiom da rifoj kaj tiom da maroj ankoraŭ trafotaj ! »

Hejmojn deziras virinoj, ĉar ilin lacigis mariro.

Tiam, en mezo de ili, Iriso la malbonfaranta

Staras : diinan vizaĝon kaj veston ŝi zorge eligis ;

Kaj ŝi fariĝas Beroo, edzino de Traca Dorico ; 620

Iam ŝi genton kaj nomon kaj filojn posedis gloregajn.

Tiam sin turnas al Trojaj patrinoj la maljunulino :

« Mizerulinoj, ŝi diris, ve ! kial sub muroj patrujaj

Ne nin fortiris en morton armiloj Anĥajaj ? Ho gento

Tro malfeliĉa, al kiuj mizeroj vin sendas Fatalo. 625

Tute, de Troja ruino, jam pasis sep plenaj someroj.

Kiom da maroj, da landoj, da rifoj malhelpaj, da astroj

Malproksimegaj ni vidis, dum ĉiam, tra maro vastega,

Landon Italian ni celas flugantan kaj sulkas ondaron.

Tie, en lando de frato Erikso, de gasto Acesto, 630

Kiu nin murojn konstrui malhelpas, kaj urbon altigi ?

Kara patrujo, kaj vane rabitaj Penatoj el Grekoj,

Ĉu do neniŭ murego nomiĝos Trojurbo ? Simoon

Ĉu mi ne vidos ankoraŭ kaj Ksanton, riverojn Hektorajn ?

Venu do ; kion vi faras ? kaj ŝipojn bruligu malbonajn. 635

Songe Kasandran vizaĝon mi vidis : ŝi al mi ekdonis

Torĉojn flamantajn, dirante : « Vi devas tie ĉi Trojurbon

Serĉi kaj domon. » Jen estas veninta la tempo por agi.

Tiu miraklo ne volas prokraston. Jen estas Neptunaj
 640 Tie altaroj : kaj dio mem torĉojn direktas kaj korojn. »

Tiel dirinte, bruligon danĝeran ŝi prenas unua,
 Fajron balancas, agitas per mano, kaj ĝin malproksimen
 Ĵetas. Trojanaj virinoj, mirantaj kaj kore tremantaj,
 Haltas. Sed unu el ili, kaj la plej maljuna el ĉiuj,
 645 Pirgo, la mamnutristino de multaj infanoj Priamaj,
 Diras : « Patrinoj, ĉi tiu ne estas Beroo, ne estas
 Troja edzino Dorikla : sed signojn de dia majesto
 Vidu, kaj brilajn okulojn, kaj ŝajnon eteran, kaj plie
 Luman vizaĝon kaj voĉan sonadon kaj noblan iradon.
 650 Hejme, de tempo mallonga, Beroon mi lasis malsanan,
 Kaj indignantan ; ĉar porti oferojn ŝi sola ne povis,
 Kaj merititajn al patro Anĥizo prezenti honorojn. »
 Tiel ŝi diris.

Tamen patrinoj, unue ankoraŭ necertaj, sur ŝipojn
 655 Ĵetas malbonan rigardon ; dum ekŝanceliĝas animoj
 Inter kamparo amata haj lando Fatale vokanta.
 Tamen, tuj kiam diino, streĉinte flugilojn, ĉielon
 Trafis, kaj arkon koloran sub nuboj en kuro desegnis,
 Tiam, pri tiu vidaĵo mirantaj, kolere frenezaj,
 660 Krias virinoj, kaj fajron ekkaptas el sanktaj altaroj.
 Ilin unuaj senigas je branĉoj kaj verdaj herbaĵoj ;
 Fajrojn alĵetas aliaj : kaj manĝas brulado libere
 Benkojn, remilojn de ŝipoj kaj lignon de ŝeloj pentritaj.

Apud tombejon Anĥizan kaj amfiteatron Eŭmelo
 665 Kuras, kaj tujan de ŝipoj sciigas bruladon : Trojanoj
 Nigran turniĝon de cindroj ekvidas en nubo flugantan.
 Tion Askano, dum ĝoje li arojn kondukis ĉevalajn,
 Vidas unua, kaj trafas rapide ŝiparan tendaron :
 Ĉefoj timantaj koleran kuradon ne povas haltigi :
 670 « Kia frenezo vin kaptas ? li diris, kaj kion vi volas,
 Mizerulinoj ? Ne de malamiko tendaron Anĥajan
 Vi nun bruligas, sed vian ĉesperon. Jen estas Askano
 Via ! » Kaj antaŭ piedojn li kaskon ekĵetas vanegan,
 Kiu lin kovris en ludoj rajdartaj kaj ŝajnaj bataloj.
 675 Kuras samtempe Eneo, samtempe anaro Trojana.
 Tamen timantaj virinoj tra bordoj forkuras diversaj,

Rifojn serĉante kaj densajn arbarojn por tien sin kaŝi.
 Ili krimegon malamas kaj lumon, rekonas kunulojn,
 Tute ŝanĝitaj : ĉar fine el brustoj eliris Junono.

Tamen brulada perforto kaj flamoj ne ŝajnas venkeblaj : 680
 Ĉar dum, sub kverko malseka turniĝon vomante vaporan,
 Stupo bruletas inside, kaj dum malrapide el ŝipoj
 Fumo eliras, en tutan ŝiparòn vastiĝas brulado.

Viraj penadoj nek akvaj torentoj danĝeron haltigas.
 Tiam do pia Eneo, el ŝultroj ŝirinte vestaron, 685
 Dian helpadon petegas kaj manojn direktas al astroj :

« Ĉiopotenca Jupitero, se vi ne malamas Trojanojn
 Ĉiujn ; se via bonkoro antikva favore laborojn
 Homajn rigardas, permesu ke flamoj eliru el ŝipoj :
 Patro, malgrandajn provizojn Trojanajn el morto savadu. 690
 Sed, se mi tion meritis, tuj fulmo venĝema ekfrapu
 Trojajn restaĵojn, kaj ilin detruu per mano kolera. »

Tiel apenaŭ li diris ; subite freneza ventego,
 Amasiginta nubegojn, per tondraj bruegoj tremigas
 Montojn kaj kampojn : el tuta ĉielo rapidas pluvego. 695
 Onda turniĝo kaj nigra Aŭstero sur landon falegas,
 Ŝipojn plenigas je akvo, duone brulitan penetras
 Lignon, kaj fine bruladon estingas en tuta ŝiparo.
 Ĉiujn, escepte kvar, ŝipojn ĝi savas el certa ruino.

Tamen Eneon la patron ĉi tiu malĝoja fariĝo 700
 Tute ŝancelas ; li gravajn pensadojn agitas en granda
 Koro. Ĉu estus pli bone restadi en kampoj Sicilaj ?
 Ĉu, obeante Fatalon, Italian ektrafi kamparon ?

Tiam maljuna Naŭteso, — lin iam Tritona Palaso
 Zorge instruis kaj igis lin fama en multaj sciencoj, — 705
 Tiun parolas respondon : ĉar granda kolero de dioj
 Estas timinda, kaj ordo Fatala ne estas ŝanĝebla.

Tamen per saĝaj paroloj Eneon li penas konsoli :
 « Filo diina, ni kion ordonas Fataloj obeu.
 Kiujn ajn estas ni devas bonkore suferi fariĝojn. 710
 Kun vi troviĝas Dardana Acesto, de dia naskiĝo.

Inter vi interligiĝu, ĉar tion li forte deziras.
 Lasu do homojn senrifugiĝitajn pro ŝipa brulado,
 Aŭ malŝatantajn gloregon estontan kaj grandajn esperojn.

715 Viroj maljunaj, patrinoj je maro lacegaj, kaj ĉiuj,
 Kiuj, timante danĝeron, por vi mem malhelpo fariĝus,
 Restu, sin loĝu en lando tiea, kaj muron konstruu,
 Urbon nominte : Acesto, de nomo de reĝo bonvola. »

Pian Eneon per tiuj paroloj maljuna amiko

720 Rekuraĝigas; kaj zorgoj sennombraj okupas pensadon.
 Nokto nigreta polusen veturis sur ĉaro dujunga,
 Kiam li vidas vizaĝon de patro Anĥizo, lasinta
 Altan ĉielon, kaj tiujn subite diranta parolojn :

« Filo, pli kara ol vivo, dum vivo kuradis en vejnoj,

725 Filo, vi, kiun Fataloj lliaj senfine premadas,
 Tien min sendis Jupitra ordono : li ŝipojn el fajro
 Savis; kaj Patro, el alta ĉielo, vin fine kompatis.
 Tiun konsilon obeu, al vi de maljuna Naŭteso

Saĝe donitan : elektu junulojn je koro fortega ;

730 Hlin konduku Italen. Ĉar tie vi devos batali
 Kontraŭ nacio sovaĝe malmola. Antaŭe de Dito
 Domon vizitu inferan, kaj poste, trans lago Averna,
 Miajn ekpetu konsilojn, ho filo : ĉar min ne posedas
 Ombroj malĝojaj kaj nigra Tartaro; sed mi en Elizo

735 Loĝas kun piaj saĝuloj. Vin tien kondukos Sibilo
 Ĉasta, se sangon vi verŝis de multa brutaro nigreta.
 Tiam vi konos idaron kaj kion rezervas muregoj.

Kaj nun adiaŭ : jam nokto malseka en mezo de kuro
 Staras; kaj spiro de sunaj ĉevaloj min forte bruligas. »

740 Tiel li diris, kaj kiel vaporo, forflugis en alton.
 Tamen Eneo : « Nu, kantu do! Kien vi iras? li diris.

Kial forkuri? Kaj kio el kisoj vin tiel eligas? »

Tiel dirinte, li flamon ekvekas sub cindro dormantan,
 Laron Pergaman malfermas kaj ujon de Vesto antikva,

745 Kaj ĝin preĝante, plenigas je greno kaj sankta aromo.

Sed li, kunulojn vokinte, kaj, antaŭ aliaj, Aceston,
 Hlin informas pri volo Jupitra, pri patra konsilo,
 Kaj decidecon, en koro naskitan, al ili konigas.
 Estas neniu malhelpo : volonte obeas Acesto.

750 Estas skribitaj patrinoj por urbo; kaj teren li metas
 Aron bonvolan, pro kiu glorego ne estas bezona.

Benkojn aliaj riparas, lignaĵon de flamoj manĝitan

- Tute refaras, aranĝas remilojn kaj ŝnurojn alligas;
 Nombre malmultaj; sed vivas en koroj batala kuraĝo.
 Tamen Eneo plugile desegnas konturon de urbo, 755
 Domojn lotinte : li volas ke tie Ilio kaj tie
 Trojo stariĝu. Acesto Trojana, ĝojante pri regno,
 Placon ekmontras, kaj, leĝojn farinte, senaton elektas.
 Fine, proksime de astroj, sur monto Eriksa, preĝejo
 Estas farita por dia Venuso; dum sanktan arbaron, 760
 Kiu ĉirkaŭas tombejon Anĥizan, ĉefpastro zorgados.
- Jam, de naŭ tagoj, funebre manĝadis popolo; oferoj
 Estis finitaj, kaj ventoj kvietaj platisis ondaron :
 Fine Aŭstero, regule blovanta, invitis iradon.
 Estas ĝemadoj senĉese aŭdataj sur bordo kurbeta : 765
 Ĉiuj, ĉu tage, ĉu nokte, sin prenas per brakoj kaj kisas.
 Tiuj patrinoj kaj tiuj mem, kiujn vidaĵo de maro
 Iam timigis, kaj kiuj eĉ nomon aŭskulti ne povis,
 Volas foriri kaj ĉiun vojaĝan suferi laboron.
 Ilin bonega Eneo konsolas per vortoj amikaj, 770
 Kaj rekomandas plorante al sia samlanda Acesto.
 Poste li buĉi ordonas tri bovojn al dia Erikso,
 Ŝafon al ventoj koleraĵ; kaj ŝnurojn li orĉle malligas.
 Kapon zoninte per krono el verda olivo, Eneo
 Staras sur alta ferdeko : tenante kalikon, en salan 775
 Akvon li ĵetas inteston, kaj vinan ekverŝas likvoron.
 Vento, blovante al posta ŝipvosto, alpuŝas irantojn :
 Vete kunuloj frapadas ondegojn kaj sulkas akvaron.
- Dume Venuso, tedata de pensoj malĝojaj, Neptunon
 Baldaŭ aliras, kaj tiujn el brusto elĵetas parolojn : 780
 « Granda kolero Junona kaj koro senĉese venĝema
 Min nun devigas, Neptuno, humilajn ekuzi petegojn.
 Ŝin kvietigis nek tempo pasinta nek granda pieco :
 Volon Jupitran, Fatalajn ordonojn, ŝi neas egale.
 Urba detruo ĉe gento Friguja ne estis sufiĉa : 785
 Kulpa malamo tra ĉiuj doloroj fortrenas savitojn,
 Cindrojn kaj ostojn de Trojo malviva (plorindan restaĵon!)
 Persekutante. Pri tiu kolero ŝi sola nun konas
 Kaŭzon. Vi vidis, tra ondoj Libujaj, ventegon subitan,
 Kiun ŝi iam ekscitis. Ŝi maron kaj tutan ĉielon 790

Miksis, helpata, sed vane dank'al vi, de blovoj Eolaj.
Tion ŝi fari kuraĝis en regno Neptuna.

Fine, por krimon plenumi, ŝi Trojajn instigis patrinojn,
Kiu bruligis ŝiparon, kaj tiam, — ĉar mankis ŝiparo, —

795 Filon devigis forlasi kunulojn en fremda kamparo.

Nu, postvivantoj, mi petas, almenaŭ tra ondoj, per veloj,
Povu facile veturi, kaj Tibron trafadi Laŭrentan;
Justa se estas postulo, se Parkoj permesas muregon. »

Tiam parolis Neptuno, reganto de maro profunda :

800 « Prava vi estas, Citera, fidante al regno ondarā

Kiu vin naskis. Mi fidon cetere meritas; ĉar ofte
Ondojn kaj ventojn freneze kolerajn mi iĝis kvietaj.
Mi atestigas Simoon kaj Ksanĝton ke malpli ne estas
Kara al mi ol al vi mem Eneo : ĉar kiam Aĥilo,

805 Persekutante anarojn timantajn ĝis muroj Trojanaj,

Milojn da ili mortigis; dum ĝeme pleniĝis riveroj;
Kiam ne povis daŭrigi kuradon, nek flui al maro,
Ksanto; en nuba kavaĵo mi vian formetis Eneon,
Kiam lin, de Peleido premitan, potencaj kaj fortaj

810 Dioj atakis : mi tamen deziris elĵeti el alte

Murojn, de mi mem faritajn, de tiu trompema Trojurbo.
Koron nun sama bonvolo batigas : do timon forpelu.
Kiel vi petas, Avernan senriske li trafos havenon.
Unu nur viron, falintan en maron, li serĉos, sed vane.

815 Unu por ĉiuj nur pagos. »

Kiam per tiuj paroloj li koron ĝojigis diinan,
Patro ĉevalojn ekjungas al ora kaleŝo, kaj buŝojn
Per enbuŝaĵo ŝaŭmplena ligante, li bridojn ellasas.
Ĉaro lazura malpeze flugetas sur mara supraĵo.

820 Mallevigante ondegojn, ŝvelantan platigas akvaron
Akso bruanta; kaj nuboj forkuras el vasta ĉielo.

Estas diversa vidaĵo de akompanantoj : grandegaj
Dekstre balenoj, kaj ĥoro de Glaŭko maljuna, Palemo
Filo de Ino, kaj lertaj Tritonoj, kaj aro Forcisa :

825 Staras maldekstre Tetiso, Melito kaj virga Panopo,
Cimodoceo, Neseo, kaj Spio, kaj fine Talio.

Tiam el koro de patro Eneo agrablaj pensadoj
Pelas iaman ĉagrenon : kaj li tuj ordonas ke mastoj

Estu rapide streĉitaj, kaj veloj ligitaj sur brakojn.
 Ilin malsupren alligas maristoj, kaj ŝnurojn ĉu dekstren 830
 Streĉas, ĉu poste maldekstren; dum unuj al vento velstan-
 Turnas, deturnas aliaj; kaj flugas ŝiparo sur ondo. [gon
 Antaŭ aliaj, ĉefante ŝiparon naĝantan, jen ŝipo
 De Palinuro; kaj devas aliaj ĝin sekvi senpere.

Nokto malseka de meza ĉielo jam centron atingis. 835

Apud remiloj, maristoj, senmovaj pro dolĉa dormado,
 Membrojn lacetajn kviete kuŝigis sur benkoj malmolaj;
 Kiam la Dormo malpeza, veninte el astroj ĉielaj,
 Ombron forpelis eteran, malluman forigis aeron,
 Vin, Palinuro, celante, kaj al vi senkulpa danĝeran 840
 Songon prezentis: sur altan ferdekon sidiĝas diaĵo;
 Kaj, de Forbaso vestinte vizaĝon, li tiel parolas:

« Ho Palinuro Jacido, ŝiparon puŝadas ondegoj:
 Blovas egale ventetoj; por dormo nun estas momento.

Kapon faligu kaj fermu okulojn pro ago lacetajn: 845

Ĉom da tempo, mi vian laboron farados volonte. »

Sed Palinuro respondis, penege levante palpebrojn:

« Ĉu vi do kredas ke maro trankvila, ke ondoj kvietaj,

Trompas min? Ĉu mi konfidus al neordinara vidaĵo?

Mi ne forlasos Eneon; ĉar estas trompemaj Aŭsteroj; 850

Ĉar mi tro ofte eraris, vidinte l'aeron purega. »

Tiel li diris; kaj li direktilon fortege tenadis,

Al ĝi sin alkroĉadante, kaj astrojn senĉese rigardis.

Tiam diaĵo branĉeton, malsekan pro ondo Letea,

Skuis sur frunton; ĝin Stikso sorbigis de povo dormiga. 855

Vane batalas maristo; okuloj senvole fermiĝas.

Tiam, apenaŭ muskolojn inside faldigis dormego,

Dio lin kaptas kaj ĵetas en maron malsupre fluantan,

Kun direktilo kaj parto de alta ferdeko rompita.

Malfeliĉulo kunulan helpadon alvokas, sed vane. 860

Dio etera forflugas kaj trafas malpezan aeron.

Tamen iradon daŭrigas ŝiparo sur ondo trankvila:

Helpo de Patro Neptuno al celo sen timo ĝin puŝas.

Rifoj Sirenaj jam estas proksime sur maro vidataj,

Iam danĝeraj, kaj ĉiam kovrataj de blankaj ostaroj. 865

Bruaj ŝtonegoj sonadis per frapo de ondoj senĉesaj.

Kiam Eneop rimarkis ke ŝipo veturas sen estro.
 Tion vidinte, ĝin li mem direktis sur ondoj mallumaj,
 Multe ĝemante, amikon en koro plorante malvivan :
 « Ho Palinuro mizera, ĉielan kaj maran trankvilon
 870 Vi tro konfidis : nun nuda vi kuŝas sur bordo dezerta. »

KANTO SESA

Tiel li diras, plorante, kaj ŝipojn rapide naĝigas.
 Fine li Kumon aliras, fonditan de anoj Eŭbeaj.
 Oni direktas ŝipnazojn al maro, dum dentoj ancoraj
 Ŝipojn fortege haltigas, dum kurbaĵoj ŝipvostoj tuŝetas
 5 Bordon. Sur landon Hesperan fervore saltegas junuloj.
 Semon flamigan unuaj eligas, kaŝitan en vejnoj
 Ŝtonaj; aliaj en densaj arbaroj, nestego de bestoj,
 Hakas brulotan lignaĵon, kaj fontojn ekmontras trovitajn.
 Tamen Eneop surrampas altaĵon, sur kiu Apolo
 10 Sidas, kaj grandan kavernon sekretan en kiu pli fore
 Loĝas Sibilo timinda : en koro de sia pastrino
 Blovas Deldio spiriton, kaj al ŝi konigas estonton.
 Oran tegmenton kaj parkon Trivian jam ili aliris.
 Iam, laŭ famo, Dedalo forkuris el regno Minosa,
 15 Kaj li kuraĝis per iloj flugilaj ekprovi ĉielon :
 Poste, tra nova vojego fluginte al Arkto glacia,
 Li sur altaĵon Kalcidan malpezan haltigis iradon.
 Fine, tuj kiam li malsupreniris, li donis al Febo
 Ilon flugilan, kaj grandan preĝejon konstruis ofere.
 20 Morton Androgau li pentris sur pordon : por krimon elpagi,
 Devis idaro Cekropa, — mizere! — liveri sep filojn,
 Ve! ĉiujare : kaj urno vidiĝas por loti mortontojn.
 Staras kontraŭe, en maro altega, insulo Gnosia.

Tie kruela amego al bovo, kaj suba kuŝiĝo
 De Pasifao sekrete, kaj rasoj miksitaj, kaj ido 25
 Minobovvira duforma, naskita de krima kuniĝo,
 Kaj konstruaĵo mirinda kun nemalplekteblaj kurbiĝoj.
 Tamen al amo de juna reĝino Dedalo kompatis
 Fine; ĉar mikson insidan de vojoj li malkonfuzinte,
 Blindan iranton fadene direktis. Vi same, Ikaro, 30
 Havus en tiu laboro, se tion permesis doloro,
 Lokon tre grandan : dufoje li penis en oro suferojn
 Ĉizi, sed ilon dufoje faligis la patro. — Sendube
 Ili ankoraŭ rigardus : sed estas sendita Akato,
 Kiu alvenas kun Feba kaj same Trivia pastrino, 35
 Glaŭka filino, Dejfobo : al reĝo ŝi tiel parolas :
 « Estas ne tempo por tiujn atente rigardi pentraĵojn ;
 Estus pli bone se vi, laŭ kutimo, sep junajn bovvirojn
 Buĉus, el bela brutaro, kaj tiom da puraj ŝafidoj. »
 Tiel dirinte, — tuj viroj obeas ordonon, — pastrino 40
 Pian Eneon kaj ĉiujn Trojanojn kondukas al templo.
 Flanke de Kuma montaro troviĝas kaverno grandega :
 Al ĝi kondukas cent vojoj larĝegaj, cent buŝoj, de kiuj,
 Kiel cent voĉoj diversaj, eliras respondoj Sibilaj.
 Sojlon alvenas Eneo : subite pastrino : « Nun estas 45
 Tempo, ŝi diris, por sorton demandi : jen dio! jen dio! »
 Antaŭ pordejo ŝi staris : subite ŝanĝiĝas koloro
 Frunta kaj vanga, hararo stariĝas kaj brusto spiregas ;
 Koro kruela ekbatas freneze ; ŝi ŝajnas pli granda ;
 Estas ne homa kriego ; ŝin dia ĉeesto kaj povo 50
 Tute preme gas : « De donoj kaj preĝoj ofero malfruas,
 Troja Eneo, malfruas, ŝi diris : ne tamen antaŭe
 Pordojn malfermos timinda diaĵo. » Ŝi, tiel dirinte,
 Tiam silentis : glacia teruro tra ostoj Trojanaj
 Kuras ; kaj reĝo preĝadon eligas el brusto profunda : 55
 « Febo, vi kiu Trojanajn penadojn senĉese kompatis,
 Kiu al korpo de filo Eaca direktis Parisan
 Manon kaj sagon Dardanano, vi ĉefis min, kiam tra landoj
 Vastaj, tra tiom da maroj, mi vagis, tra bordoj Masilaj
 Malproksimegaj, kaj poste tra kampoj samlimaj kun Sirtoj. 60
 Ĉiam flugantan mi fine atingis kamparon Italian :

Tie ne devas plu min persekuti Trojana Fatalo.
 Genton Dardanano vi povas indulgi, diinoj kaj dioj,
 Ho vi, por kiuj Ilia potenco kaj gloro Pergama
 65 Estis ofendo. Pastrino sanktega, vi kiu estonton
 Konas, permesu ke mi nun en landon Latujan loĝigu
 Miajn Trojanojn, kaj diojn vagantajn, kaj Trojajn Penatojn
 Mare skuitajn, se mi nur ŝuldotan petegas promeson.
 Tiam al Febo kaj eĉ al Trivio mi firman konstruos
 70 Templon marmoran, kun tagoj solenaj je nomo de Febo.
 Al vi mi same belegan en regno rezervos loĝejon :
 Tie mi metos dekretojn kaj sortojn sekretajn, al mia
 Gento diritajn, kaj zorge elektos, ho virga pastrino,
 Virojn puregajn. Nur vi sur foliojn ne skribu kantaĵojn,
 75 Por ke, tra ventoj flugante rapidaj, sin ili ne miksu :
 Vi mem parolu, mi petas. » Li, tiel dirinte, silentis.

Tamen pastrino de Febo freneze kaj malpacience
 Sin en kaverno agitas, kaj penas el brusto eligi
 Dion timindan : sed li, per pli granda fervoro, ŝaŭmantan
 80 Buŝon lacigas, kaj koron sovaĝan dresegas potence.
 Sin propramove malfermas cent pordoj de granda domo,
 Por de pastrino, tra vasta ĉielo, disporti respondon :
 « Fine vi estas el maraj danĝeroj nun liberigita ;
 Tamen sur tero pli gravaj minacas. En regnon Lavinjan
 85 Venos Trojanoj ; vi tiun el brusto eligu zorgadon :
 Sed vi bedaŭros ĉi tiun alvenon. Mi vidas militon
 Grandan, militon teruran, kaj Tibron ŝaŭmantan de sango.
 Ksanto, Simoo, Aĥajaj tendaroj ne mankos : jam fine
 Kreis Latujo alian Aĥilon ; lin, kiel unuan,
 90 Naskis diino : neniam kolero Junona Trojanojn
 Lasos trankvilaj : pri tiuj malgajaj aferoj, vi petos
 Helpon de multaj popoloj Italaj, de urboj sennombraj.
 Kaŭzo de tiuj suferoj ja estos denove edzino
 Fremda, kaj nova edziĝo.
 95 Vi al malbonoj ne cedu ; sed kontraŭbatalu fervore,
 Tiom do kiom permesos Fatalo. Unua savonta
 Vojo, — vi tion ne kredus ! — elvenos el urbo Aĥaja. »

Tiel parolas la Kuma Sibilo en domo profunda :
 Muĝas kaverno, dum versojn terurajn ŝi kantas malklare,

Vortojn malverajn kun veraj miksante; ĉar Febo ekscitas 100
 Ŝian koleron malsanan, en koro turnante pikilon.
 Fine tuj kiam elfalis frenezo kaj buŝo silentis •
 Tute, heroo komencas Eneo : « Nun ia laboro,
 Ho virgulino, min ŝajnas nek nova nek neatendita :
 Antaŭvidinte l'estonton, mi ĉion en cerbo preparis. 105
 Unu nur servon mi petas : ĉar tie, laŭ famo, troviĝas
 Pordo de regno Infera, kaj lago malluma Akero,
 Al mi permesu ke patron mi trafu kaj karan vizaĝon
 Vidu: do vojon ekmontru kaj pordojn malfermu sanktegajn.
 Mi lin, tra flamoj kaj miloj da sagoj flugantaj, sur ŝultroj 110
 lam forportis, kaj el malamikaj formetis anaroj.
 Estis li mia kunulo en vojo; kaj ĉiujn kolerojn
 Marajn kaj landajn kaj fine ĉielajn li kun mi suferis.
 Kvankam maljuna, li fortojn enhavis pli grandajn ol home.
 Plie, por ke mi vin petu, preĝante, kaj sojlon aliru, 115
 Li mem komande parolis : al filo, al patro, pastrino
 Virga, ni preĝas, kompatu; ĉar ĉion vi povas; ĉar vin ne
 Vane virino gardanta de sankta arbaro Averna
 Faris Hekato. Se Ombron edzinan Orfeo atingi
 Povis, per Tracaj kantaĵoj kaj ĉarmaj sonoroj de liro; 120
 Fraton, per morto alterna, se ree vivigas Polukso,
 Kaj ĉiutage tra vojo trairas... : ĉu mi memorigos
 Grandan Alcidon, Tezeon? Min same pranaskis Jupitero. »
 Tiel dirante, li preĝis, sanktegan tenante altaron.
 Tiel do vice respondis pastrino : « Naskito diina, 125
 Kiu ajn, filo Anhiza, facile aliras Avernon;
 Nokte kaj tage de Dito malluma sin pordo malfermas.
 Sed malantaŭen reveni kaj lumon revidi ĉielan
 Malpli facile fariĝas. Sukcesis nur kelkaj herooj,
 Kiujn tre amis Jupitero favora, diidoj pro virtoj 130
 Plialtigitaj ĝis astroj. En mezo troviĝas arbaro,
 Kaj ĝin ĉirkaŭas, je kurba fluado, Kocito nigreta.
 Tamen se granda sciemo, se forta deziro vin puŝas
 Stiksan riveron dufoje transnaĝi, kaj vidi dufoje
 Nigran Tartaron, se agon malsaĝan vi volas plenumi, 135
 Kion vi devos ekfari unue sciigu. En arbo
 Densa kaŝiĝas trunketo fleksebla kun oraj folioj,

- Kiun posedas Junono Infera : ĝin tuta arbaro
 Kovras, kaj valo ĉirkaŭa vualas sub ombro malluma.
- 140 Malsupreniri en teran profundon sed estas neeble,
 Antaŭ ol oran naskiton vi ŝiros el arbo patrina :
 Ĉar Proserpino belega por si mem donace rezervis
 Tiun juvelon. Ŝiritan branĉeton alia simila
 Tuj anstataŭas, kaj branĉo rekreskas je sama metalo.
- 145 Zorge ĝin serĉu okuloj ; kaj manoj ĝin rompu trovitan ;
 Tion ordonas dileĝoj : ĝi falos facile kaj vole,
 Se vin alvokas Fataloj ; alie neniu fortego,
 Fero plej akra ne povus ĝin venki kaj ŝiri el arbo.
 Plie nun kuŝas amiko malviva, — vi tion ne scias, —
- 150 Kaj malpurigas ceteran ŝiparon de korpo putranta,
 Dum vi petegas konsilon kaj restas necerta sur sojlo.
 Tiun malvivan alportu al domo, kaj metu en tombon ;
 Nigran brutaron konduku ; ĝi estos unua ofero.
 Tiam nur Stiksan arbaron kaj regnon, al homaj vivuloj
- 155 Nealireblan, vi vidos. » Ŝi diris, kaj buŝo silentis.
 Sed, mallevante okulojn kaj frunton malĝojan, eliras
 Dia Eneo, lasinte kavernon, kaj cerbe pensante
 Al nekonita fariĝo : kunule fidinda Akato
 Lin akompanas, kaj samajn pensadojn li rulas en koro.
- 160 Ili, en interparoloj, diversajn supozas kunjektojn.
 Kian kunulon malvivan kaj korpon tuj entombigotan
 Montras pastrino? Sed ili, ĵus ekalveninte, Misenon
 Vidas, sur sablo de bordo, frapitan de morto kruela.
 Filo Eola, pli lerte ol ĉiuj li sciis eksciti
- 165 Virojn per kupra trompeto kaj kantoj batalaj. Miseno
 Estis kunulo de granda Hektoro : li apud Hektoro
 Glorre trompeton kaj lancon manumis en sangaj bataloj.
 Kiam Aĥilo venkinta je vivo senigis heroon,
 Forta kaj fama Miseno Dardanano kuniris Eneon,
- 170 Kiel kunulo ; ĉar ĉefon li sekvis ne malpli kuraĝan.
 Sed dum bruade resonas ondaro per kanto sonora,
 Dum li malsaĝe diaĵojn alvokas al kanta batalo,
 Triton, pri gloro ĵaluza, — se estas fidinda rakonto, —
 Viron en ondon ŝaŭmantan kaj akrajn ŝtonegojn dronigis.
- 175 Ĉiuj do ĝemis ĉirkaŭe kaj grandan puŝadis plendadon,

Pia Eneo precipe. Rapide Sibilan ordonon
 Ili plenumas, plorante : kaj lokon funebran plenigas
 Arboj hakitaj, dum granda ŝtiparo ĝis astroj altiĝas.
 Nun, en antikva arbaro, nestego de bestoj sovaĝaj,
 Falas abioj; de frapoj hakilaj verdkverkoj resonas ; 180
 Kojnoj en trabojn fraksenajn eniĝas fortege ; kaj kverkojn
 Oni krevigas ; dum ulmoj rompitaĵoj ruliĝas el montoj.
 Kaj partoprenas en tiuj laboroj unua Eneo,
 Kuraĝigante kunulojn, kaj ilojn uzante similajn.
 Tiun pripenson en koro malĝoja li rulas, vidante 185
 Tiun grandegan arbaron ; kaj laŭte li tiel ekpreĝas :
 « Se al mi ora branĉeto montriĝus sur arbo, en tiu
 Vasta arbaro, mi estus feliĉa : ĉar veraj fariĝis
 Ĉiuj paroloj pastrinaj, almenaŭ por vi mem, Miseno. »
 Tion apenaŭ li diris, okaze duopaj kolomboj, 190
 Antaŭ okuloj de viro, flugante alkuras el alte,
 Poste stariĝas sur verda herbejo. Sed granda heroo
 Birdojn rekonas patrinajn, kaj ĝoje li tiel ekpreĝas :
 « Estu vi ĉefoj ; se vojo ekzistas. el alta ĉielo
 Paŝojn direktu al densa arbaro, en kiu branĉeto 195
 Dia ombriga kamparon : kaj, tiuj en malfacilaĵoj,
 Helpu min, sankta patrino. » Li tiel parolas, kaj haltas,
 Signojn observas de birdoj faritajn kaj vojon trafotan.
 Ili unue herbaĵon manĝetas, kaj poste flugetas,
 Por ke okuloj ja povu facile sekvadi flugadon. 200
 Ili do baldaŭ alvenas al malbonodoraj Avernaj
 Faŭkoj, rapide surflugas, glitante tra spaco fluida,
 Poste stariĝas duope sur arbon fervore serĉitan,
 Kie vidiĝas branĉeto brilanta je ora koloro.
 Kiel, en vintra malvarmo, de novaj folioj verdiĝas 205
 Visko, kaj arbon ornamas kreskintan per semo alia,
 Ĉirkaŭ trunkego de fruktoj flavruĝaj volvante beraron ;
 Tia, sur kverko densega, de ora trunketo vidiĝo
 Estis, kaj tiel bruetis folioj per dolĉa bloveto.
 Ĝin do ekkaptas Eneo subite ; ĝin forte fiksitan 210
 Ĝoje li rompas, kaj portas en domon de Sibilpastrino.
 Dume Trojanoj, sur bordo starantaj, ploradis Misennon,
 Lastajn donante honorojn al korpo senmova por ĉiam.

- Ili unue, el kverko kaj ligno rezina faritan,
 215 Grandan konstruas ŝtiparon, per nigraj folioj funebraj
 Flankojn kovrinte : cipresojn antaŭe metinte malĝojajn,
 Ili per brilaj armiloj supraĵon ornamas altegan.
 Akvon puregan, bolintan en kupraj lavvazoj, unuaj
 Verŝas, kaj, korpon lavinte malvarman, ĝin zorge parfumas.
 220 Ĉiuj ĝemadas, kaj membrojn malsekajn pro larmoj surliton
 Metas, kun vestoj purpuraj, de li ve! kutime vestitaj.
 Grandan portilon portante sur ŝultroj, — malgaja laboro! —
 Torĉojn aliaj mallevas, kaj, sin deturninte, ŝtiparon
 Tuj ekbruligas, laŭ rito de patroj. Aromoj samtempe
 225 Brulas kaj aĵoj intestaj kaj multe fluanta oleo.
 Kiam finita brulado de cindroj mallevis amason,
 Oni restaĵon kaj cindrojn kolektis kaj lavis en vino :
 Fine en urnon el kupro ostaron enfermis Korino.
 Ĉirkaŭ kunuloj trifoje li sanktan transportis purakvon ;
 230 Gutojn malpezajn sur ilin skuante per branĉo oliva,
 Li ĉeestantojn purigis, kaj lastajn deklamis parolojn.
 Dume Eneo grandegan konstruas ŝtontombon, kaj en ĝin
 Metas de viro armilojn, remilojn kaj fine trompeton.
 Tiun monteton je nomo Misena ĝin nomas ankoraŭ
 235 Gentoj, kaj nomo tra jaroj estontaj restados eterne.
 Tion farinte, Sibilajn li penas plenumi konsilojn.
 Estis profunda kaverno kun larĝa malfermo ŝtonega,
 Kiun malluma arbaro kaj nigra ĉirkaŭis rivero.
 Super ĝi birdo neniuj, sen granda danĝero, flugante
 240 Povis transiri ; ĉar blovoj malpuraj el nigraj profundoj
 Supren haladzis senĉese, ĝis alta arkaĵo ĉiela.
 Tiu ĉi loko de Grekoj, pri tio, nomiĝis Averno.
 Tien unue kvar junajn bovovirojn pastrino kondukas
 Nigrajn, kaj vinan oferon ekverŝas sur fruntojn iliajn.
 245 Poste, sur verto, en mezo de kornoj, tranĉinte haregojn,
 Ilin ŝi ĵetas sur sanktan fajrujon, unua piaĵo,
 Laŭte vokante Hekaton, ĉiele kaj ankaŭ Erebe
 Same potencan. Tranĉilojn trapuŝas aliaj, kaj sangon
 Varman kolektas en vazojn. Nigretan ŝafidon per glavo
 250 Buĉas Eneo mem, jen por patrino de Eumenidoj,
 Jen por potenca fratino, kaj poste bovinon senfruktan

Por Proserpino. Al reĝo de Stikso keroo starigas
Noktajn altarojn ; en flamojn li tutan viandon bovviran
Ĵetas, kaj grasan sur karnojn brulantajn verŝadas oleon.

Tamen, tuj kiam unua montriĝis radio de suno, 255
Tero sub paŝoj ekstremis subite, sur montoj moviĝis
Supraj arbaroj, kaj hundoj tra ombroj ekbojis kolere :
Estis alveno diina : « Foriru, foriru, fremduloj,
Kriis pastrino, foriru el tiu arbaro sanktega.

Vi do aliru antaŭen, kaj glavon el ingo eligu. 260
Koro heroa nun estas necesa, nun brusto kuraĝa. »
Tiel dirinte, ŝi en malfermitan sin ĵetas kavernon ;
Kaj ŝin frenezan postiras Eneo, je paŝoj sentimaj.

Dioj regantaj sur regno Infera, Ĥaoso, Flegeto, 265
Ombroj senvoĉaj, vastega loĝejo de Nokto silenta,
Al mi permesu aŭditajn rediri parolojn ; permesu
Al mi de tero Infera kaj Ombra rakonti sekretojn.

Ili aliris, en ombroj mallumaj kaj nokto profunda.
Solaj tra domoj malplenaj de Dito kaj regno dezerta.
Tiel, sub lumo malklara de luno, tra densaj arbaroj, 270
Vojo montriĝas ; tuj kiam Jupitero ĉielajn densigis
Ombrojn, dum nokto je propraj koloroj senigis aferojn.

Antaŭ vestiblo kaj faŭkoj unuaj de Orko, venĝemaj
Zorgoj kaj Larmoj starigis kuŝejon ; ĉe ĝi Maljuneco
Loĝas malgaja, kaj pala Malsano, kaj Timo, kaj poste 275
Malbonkonsila Malsato kun la Malriĉeco hontinda ;
Monstroj vidaĵe teruraj : pli dekstre, Laboro kaj Morto :
Apud ĝi, Dormo, la frato de Morto, malbonaj de koro
Ĝojoj : maldekstre, sur sojlo, mortiga Milito, kaj feraj
Eumenidaj kuŝejoj, kaj fine Malpaco freneza, 280
Kiu alligas hararon viperan per sangaj rubandoj.

Ulmo densega kaj larĝa en mezo etendas jarcentajn
Branĉojn kaj brakojn : kaj oni rakontas ke tie ĉi lokis
Songoj malveraj ŝidejon, sub ĉiu folio ligataj.

Plie de monstroj diversaj, starantaj ĉe pordoj, vidiĝas 285
Formoj sovaĝaj : Centaŭroj kaj Sciloj duformaj ; pli fore
Granda Briaro centbraka, kaj Lerna bestego siblanta
Ĉiam terure, Ĥimero armata de flamoj brulantaj,
Fine Gorgonoj, Harpioj, kaj formo de Ombro trikorpa.

- 290 Glavon tirinte, Eneo, kaptita de timo subita,
 Pinton minacan kaj akran prezentas al ekalvenantoj :
 Se kunulino pli klera ne al li sciigus ke Ombroj
 Flugas malpeze sen korpo, kun ŝajno de formo imaga,
 Li tuj rapidus, kaj vane per glavo traborus ombraron.
- 295 Vojo kondukas al ondo Akera de nigra Tartaro,
 Profundegaĵo vastega, en kiu bolegas malpura
 Koto, kaj kiu vomadas sterkaĵon en sablan Kociton.
 Ondojn de tiu rivero Ĥarono terura pordiste
 Regas, malbela kaj ŝajne naŭzanta : kreskigas mentono
- 300 Barbon neniam kombitan : kaj flamojn alĵetas okuloj :
 Pendas el ŝultroj per ligotubero malpura mantelo.
 Barkon li mem per remilo direktas, dum vĉeloj ĝin puŝas ;
 Kaj en boato rustita li korpojn transportas malvivajn,
 Certe maljuna, sed de maljuneco diaĵa kaj verda.
- 305 Tuta anaro, sur bordo vaganta, rapide aliris :
 Viroj, patrinoj, herooj grandkoraj, post longa vivado
 Kiujn mortigis Fatalo, fraŭlinaj knabinoj kaj knaboj,
 Aŭtaŭ gepatroj junuloj metitaj sur altajn ŝtiparojn.
 Tiel ekfalas folioj, en densaj arbaroj, tuj kiam
- 310 Frosto aperas aŭtuna ; aŭ, tiel el alta ondaro
 Birdoj sennombraj rapidas kaj, landon lasinte malvarman,
 Ili tra maro forkuras kaj trafas pli varman kamparon.
 Ĉiuj, sur bordo starante, unuan petante trairon,
 Manojn prezentis, pro amo fervora al bordo kontraŭa.
- 315 Tamen malgaja pasisto ĉu tiun akceptas, ĉu tiun,
 Kaj, malproksimen de sablo repuŝas kaj pelas aliajn.
 Miras Eneo ; lin tiu kortuŝas senĉesa tumulto :
 « Kial do, ho virgulino, li diras, ĉi tiu kunkuro ?
 Kion petadas animoj ? Kaj kial malsame unuaj
- 320 Restas sur bordo, dum sulkas aliaj nigretan riveron ? »
 Tiel al reĝo respondas mallonge maljuna pastrino :
 « Filo AnĤiza kaj vera idaro de dioj senmortaj,
 Lagon Kocitan vi vidas profundan, kaj Stiksan riveron.
 Dioj mem, sur ĝin ĵurontaj, ektremas kaj timas mensogon.
- 325 Aron vi vidas de homoj sen tombo lasitaj : pasisto
 Estas Ĥarono mem : nur enterigitoj tra ondo veturas.
 Bordon teruran kaj bruon torenton transiri fariĝas

Eble, nur kiam ostaro ripozas, en tombon metita.
 Ili cent jarojn vagadas, ĉirkaŭe de bordo flugante :
 Tiam nur ili veturas, kaj bordon ekvidas petitan. » 330
 Haltis Anhiza naskito kaj krurojn senmove starigis,
 Multe pensante kaj kore plorante pri sorto maljusta.
 Tie li vidas malĝojajn, — ĉar ili ne ĝuis honorojn
 Tombajn, — Leŭkaspon kaj, ĉefon de ŝipoj Liciaj, Oronton,
 Kiujn samtempe, el Trojo vepantajn, tra maro ventega, 335
 Forta Aŭstero dronigis en ondojn kun ŝipoj kaj viroj.
 Sed Palinuro, la direktilisto, subite aliras.
 Antaŭ nelonge, en maro Libuja, li astrojn observis,
 Kiam; falinte el ŝipo, li dronis en mezon de ondoj.
 Kiam li vidas, en ombro, fantomon multege malĝojan, 340
 Tiel li diras unue : « Ve! kiu diaĵo vin kaptis,
 Ho Palinuro amata, kaj ĵetis en maron profundan?
 Diru, respondu : ĉar ĝis nun neniam mensogis Apolo.
 Sed nur, per unu respondo, animon li trompis fideman :
 Ĉar li certigis ke maron vi sane trairos, vidonta 345
 Landon Aŭzonan. Ĉu estas fidindaj nun liaj promesoj? »
 Tamen li : « Ne orakolo de Febo vin trompis, ho ĉefo,
 Filo Anhiza; neniam diaĵo min ĵetis en akvon.
 Mi direktilon, per forta skuego rompitan, al kiu
 Mi alkroĉiĝis, kaj kiun gardiste mi regis por iro, 350
 Kun mi falinta fortiris. Mi ĵuras sur maron teruran,
 Certe pro falo sendube mortiga mi malpli timegis,
 Ol por danĝero de ŝipo, frapita per ondoj multegaj,
 Kiu sen estro, sen armoj, kolerajn ricevis ventegojn.
 Noto fortega, tri noktojn mallumajn, tra vasta ondaro, 355
 Portis kaj skuis min : kiam sin levis la kvara Aŭroro,
 Landon mi vidis Italian, el alto de ondo ŝvelanta.
 Mi, malrapide al tero' naĝinte, jam estis savita,
 Kiam popolo sovaĝa min, pezan pro vesto malseka,
 Kiam per ungoj de manoj mi rifon krampiĝis malglatan, 360
 Boris kruele per glavo; ĉar ili esperis akiron.
 Nun min posedas ondegaj; sur bordo nun ventoj min rulas.
 Mi vin petegas, per lumo de ĝoja ĉielo, per astroj,
 Fine per patrio, per filo Iulo kredeble kreskonta,
 Miajn formetu suferojn; ĉar tion vi povas, heroo. 365

Korpon enfosu en teron, kaj serĉu havenon Velinan.
 Sed se vi povas transiri, se vojon diina patrino
 Montris; — ĉar vi ne kuraĝus kredeble, sen dia permeso,
 Ondon Inferan sulkadi kaj Stiksan transnaĝi riveron; —
 370 Helpu mizeran petanton; min kun vi kunportu trans ondoj,
 Por ke almenaŭ mi povu ripozi en loko trankvila. »

Tiel li diris plorante; sed tiel pastrino respondis:
 « Vi, Palinuro, nun tute malsaĝan ekmontras deziron:
 Stiksan riveron kaj ondon timindan de Eumenidoj
 375 Trafi vi volas sentomba, kaj bordon aliri inside.
 Ĉesu esperi ke dian dekreton vi ŝanĝos per preĝoj.
 Tamen memoru parolojn; kaj ili konsolu ĉagrenon.
 Baldaŭ, timonte pro multaj mirakloj ĉielaj kaj teraj,
 Urboj apudaj kuniĝos, kaj vian piigos ostaron,
 380 Tombon starigos, kaj, feston funebran ĉe tombo farinte,
 De Palinura alnomo eterne nomados kamparon. »
 Tiuj paroloj dolĉigas malĝojon; por iom da tempo
 Koro forpelas ĉagrenon: li ĝojas pri lando nomota.

Ambaŭ daurigas iradon kaj alproksimiĝas riveron.
 385 Kiam pasisto de Stiksa rivero ekvidis ke ili
 Noktan transiris arbaron kaj bordon piede trafadis,
 Tiam parole li ilin atakas kaj poste riproĉas:
 « Kiu ajn estas vi, kiu armata aliras riveron,
 Kion vi volas? parolu; sed haltu antaŭe, kaj vidu.
 390 Tie loĝejo de Ombroj, de Songoj, de Nokto dormiga
 Estas; kaj Stiksa boato ne povas toleri vivulojn.
 Iam mi estis malprava; ĉar mi sur la lago akceptis
 Grandan Alcidon irantan, Tezeon kaj eĉ Piritoon,
 Kvankam diidojn, kaj fortajn de forto neniel venkebla.
 395 Unu el ili Tartaran gardiston per ĉenoj alligis,
 Kaj ĝin tremantan el trono de reĝo eltiris fortege.
 Penis aliaj el lito de Dito formeti reĝinon. »

Tiujn parolojn mallonge respondas Amfrisa pastrino:
 « Tia insido ne estas en koroj; do, timon forpelu.
 400 Glavo ne portas perforton: sed povas per bojoj senfinaj
 Granda pordisto, en kavo, sensangan timigi Ombraron,
 Kaj Proserpino ĉastega loĝadi en onkla domego.
 Troja Eneo, glorega per granda pieco kaj armoj,

Malsupreniras tra ombra Erebo por patron viziti.

Sed se vin tia ekzempla pieco ne povas kortuŝi, 405

Tiun branĉeton rekonu. » Trunketon sub vesto kaŝitan

Tiam ŝi montras : kaj koro kolera sin tuj kvietigas.

Ĉiuj silentas : sed li respektindan admiras donacon,

Tiun Fatalan branĉeton de tempo tre longa viditan,

Turnas al bordo boaton malluman kaj alproksimiĝas, 410

Poste, aliajn Animojn sur bankoj amase sidantajn

Li repuŝinte, ferdekon balaas, kaj prenas samtempe

Grandan Eneon en barko. Sub pezo ekĝemas malforta

Ŝipo, kaj akvo marĉeja tra flankoj eniras fenditaj.

Fine pastrinon kaj viron li save pasigas trans ondo, 415

lin sur koton malpuran kaj herbojn metinte marverdajn.

Kuŝas ĉi tie, en kavo kontraŭa, grandega Cerbero,

Kaj resonigas subregnon Inferan per bojo triobla.

Al ĝi pastrino, rigidajn sur kolo vidinte serpentojn,

Kukon mielan ekĵetas dormigan, faritan el fruktaj 420

Drogoj : ĝi tuj tri buŝegojn malfermas, malsate frenezajn,

Kaptas manĝaĵon kaj, dorson grandegan malrigidiginte,

Teren kuŝiĝas, kaj tutan kavernon je korpo plenigas.

Kiam dormegis gardisto, Eneo trairas aliron,

Bordon rapide lasinte kaj ondon ne retransireblan. 425

Tiam li aŭdas plendadojn kaj grandan ĝemadon de voĉoj.

Estas infanaj Animoj, plorantaj sur sojlo unua,

Kiujn je vivo dolĉega kaj mamu patrino senigis

Dio kruela, por ilin en tombon ĵetegi malgajan :

Flanke, justuloj maljuste buĉitaj pro krimo malvera. 430

Tiuj loĝejoj ne estas sen sorto, sen juĝo, donitaj.

Urnon Minoso ĉefanta agitas : li Ombrojn alvokas

Al juĝistaro, kaj ilin pri vivoj kaj kulpoj demandas.

Poste, en loko proksima, sin tenas malĝoje ĉi tiuj,

Kiuj sin vole mortigis, senkulpaj, kaj lumon forkuris, 435

Siajn ĵetinte animojn. Nun, kiel, sub alta ĉielo,

Ili pli amus suferi laborojn kaj eĉ malriĉecon.

Tion ne volas Fatalo, kaj marĉo senmova alligas

Ilin, dum Stikso naŭoble ĉirkaŭas kaj malliberigas.

Ne malproksime de tie, kaj vaste kuŝante, aperas 440

Kampo de ploroj : ĉar oni ĝin nomas de tiu alnomo.

- Tiuj do kiujn veneno kruela de amo malsaĝa
 Mordis, vagadas tra vojoj sekretaj, — dum mirta arbaro
 Ilin ombrigas, — kaj eĉ post pereo konservas ĉagrenojn.
- 445 Tie vidiĝas samtempe Prokriso, kaj Fedro malgaja,
 Kaj Erifilo, — de filo kruela ŝi montras la vundon, —
 Kaj Pasifao, kaj poste Evadno; kun Laodamio
 Ilin kuniras Ceneo, virino nun, iam junulo,
 Kiu, per dia ordono, unuan revestis figuron.
- 450 Meze de ili, en granda arbaro, kun vundo sangruĝa,
 Dido Fenica vagadis : kaj kiam heroo Trojana
 Apud ŝi staris, kaj kredis rekoni tra ombro malluma,
 — Kiel en nova apero de luno, post unu monato,
 Vidas pasanto aŭ kredas ekvidi noktastron tra nuboj, —
- 455 Tiel li diris, plorante, kaj amon montrante fervoran :
 « Dido mizera, do estis tro vera malĝoja sciigo
 Kiu vin diris mortinta, kaj vivan tranĉinta fadenon.
 Kaŭzo mi estis de morto kruela ! Per astroj, per dioj,
 Dido, mi ĵuras, se estas bonfido sub tero profunda,
- 460 Malgraŭ mi bordon mi lasis Libujan, reĝino amita.
 Diaj ordonoj potence komandis : min ili devigas
 Iri hodiaŭ tra Ombroj malvivaj, tra nokto malluma,
 Kaj tra subtera dezerto : reĝino, mi kredi ne povas
 Ke forveturo Enea ve ! tian ebligis doloron.
- 465 Haltu, ho Dido, el miaj okuloj ne vin mem eligu :
 Kial forkuri ? ĉar, lasta por fojo, mi al vi parolas. »
 Didon, per tiuj paroloj, konsoli penadis Eneo,
 Larmojn verŝante : sed Ombro kolera minace rigardis,
 Sin deturnante, kaj teren okulojn tenante fiksatajn,
- 470 Malgraŭ paroloj de viro vizaĝon montrante senmovan,
 Kiel malmola ŝtonego, aŭ kiel marmoro Marpesa.
 Fine ŝi el li forkuras kaj, malamindulon lasinte,
 Trafas ombrigan arbaron ; ĉar tie Sikeo, unua
 Edzo, ĉagrenon prizorgas, kaj amon malŝparas fervoran.
- 475 Tamen Eneo, de granda sufero maljusta profunde
 Ekkortuŝita, longtempe ŝin sekvas, plorante tra ombro.
 Poste li iron daŭrigas antaŭen. Jam ili atingis
 Lastan herbejon, en kiu aparte militaj famuloj
 Loĝas. Al ili alkuras Tideo, kaj arme glorega

Partenopeo, kaj pala figuro de Ombro Adrasta. 480
 Tie flugetas, plorataj sur tero, batale mortintaj,
 Idoj Dardanaĵ : li, ilin vidante laŭ vico pasantaj,
 Ĝemas; ĉar li tuj rekonas Medenon, tri Antenoridojn,
 Kaj Tersilokon, kaj Glaŭkon, kaj pastron Ceresan Polifton,
 Fine Ideon, armilon kaj ĉaron ankoraŭ tenantan. 485
 Staras sennombraj ĉirkaŭe Animoj maldekstre kaj dekstre.
 Vidi lin unu nur fojon ne estas sufiĉe : lin ili
 Volas haltigi senĉese, por koni de iro tialon.
 Tamen Danaaj armestroj kaj Agamemnonaj samanoj,
 Viron vidinte tra ombroj, vestitan de brilaj armiloj, 490
 Tremas pro granda timego : ĉi tiu forflugas rapide,
 Kiel li iam forkuris al ŝipoj, kaj tiu malgrandan
 krimon ekprovas; sed haltas brueto en buŝa malfermo.
 Tiam li filon Priaman Dejfobon ekvidas, kun korpo
 Tute ŝirita, kun sanga vizaĝo kruele borita. 495
 Mankas al brakoj du manoj; per glavo oreloj el kapo
 Estis tranĉitaj; kaj nazon difektas vundego malbela.
 Li lin rekonas timantan kaj, sed malfacile, kaŝantan
 Vundojn terurajn, kaj, tiuj per vortoj, demandas amike :
 « Armopotenca Dejfobo, naskita de sango Trojana, 500
 Kiu kuraĝis per sanga punego vin tiel turmenti,
 Tiel vin malrespektegi? Se famon mi kredas, en lasta
 Nokto Trojana, lacega pro granda buĉado de Grekoj,
 Sur amasegon da korpoj malvivaj vi estus falinta.
 Tiam mi tombon starigis malplenan, sur bordo Retea; 505
 Kaj mi, laŭ rito, fantomon trifoje per voĉo alvokis.
 Lokon armiloj kaj nomo konservas : sed vin mem, amiko,
 Mi ne trovinte, ne povis en teron enmeti patrujan. »
 Filo Priama respondis : « Vi, kara, nenion forgesis :
 Ĉiujn funebrajn ricevis honorojn Dejfoba fantomo. 510
 Mia Fatalo kaj ruzo hontinda de krima Heleno
 Nur min malbone frapadis : jen estas de amo restaĵoj.
 Nokton en ĝojoj malveraj ni lastan pasigis Trojanan;
 Tion vi scias, ĉar estas necese ne tion forgesi.
 Kiam ĉevalo Fatala tra muroj aliris Pergamaj, 515
 Militistaron armatan portante en ventro profunda,
 Malnoblulino ŝajnigas dancadon, Frigujajn anarojn

- Ĉirkaŭ altaroj kondukas, kaj inter virinoj portante
Grandan flamingon, sur supra altaĵo alvokas Danaojn.
- 520 Tiam, de zorgoj premita, de laco venkita, sur liton
Mi malfeliĉe kuŝiĝis, kaj min senmovigis dormado
Dolĉa, profunda kaj tute simila al morta ripozo.
Tamen karega edzino el domo formetas armilojn
Ĉiujn, kaj glavon fidindan eligas el kapa kuseno.
- 525 Poste do ŝi Menelaon alvokas kaj pordon malfermas;
Ĉar ŝi esperas ke tia donaco al edzo unua
Plaĉos, estante la ebla estingo de krimoj malnovaj.
Kion mi diros? Al lito rapidas anaro; ĝin ĉefas
La fabrikanto de krimoj, Uliso. Ho dioj, al Grekoj
- 530 Tiun pagigu krimegon, se juste mi punon petegas.
Sed nun do kia okazo vin vivan en tiun kondukis
Lokon? Ĉu tien vi venas, puŝita de maro trompema?
Ĉu, de volado de dioj? Vin kia Fatalo minacas,
Kaj vin devigas de domo sensuna malĝojon aliri? »
- 535 Tiel dum ili parolis, Aŭroro, en mezo de vojo,
Rozan kaleŝon jam estis rulinta sur akso ĉiela.
Ambaŭ en interparoloj pasigus la tempon donitan
Eble, sed ilin Sibilo avertis, kaj diris mallonge :
« Nokto rapidas, Eneo; ni horojn pasigas en larmoj.
- 540 Tie aperas vojforko, kaj tie sin vojo dividas.
Dekstra al granda domo de Dito kondukas; ĝi estas
Vojo al kampoj Elizaj : maldekstra, punega sidejo
De malbonuloj, al nigra Tartaro sin rekte direktas. »
Tiam Dejfobo parolis : « Ne, granda pastrino, koleru :
- 545 Tuj mi forkuros kaj aron de Ombroj reiros malluman.
Iru, vi, nia honoro, kaj ĝuu pli bonan estonton. »
Tiel dirinte, rapide Dejfobo reiris en ombron.
Tamen Eneo subite rigardas : ĉe rifo maldekstra,
Vastan li vidas murzonon, de muro triobla zonatan,
- 550 Kiun ĉirkaŭas rapida rivero kun flamaj ondegoj.
Estas Tartara Flegeto, bruege rulanta ŝtonegojn.
Granda pordego kontraŭe, kun fortaj kolonoj el fero :
Vira forteco nenia, eĉ dia, levile sukcesus
Ilin sublevi. Jen turo el fero altiĝas aeren ;
- 555 Kaj Tisifono, de sanga vestaro vestita, vestiblon

Gardas, sendorma, tra fluo eterna de tagoj kaj noktoj.
 Tie ĉi estas aŭdataj ĝemadoj, dum sonas kruelaj
 Batoj, kun bruo de ĉenoj trenataj kaj feraj puniloj.
 Haltas Eneo timanta kaj bruon aŭskultas teruran :
 « Ho virgulino, de kiaj krimegoj ĝi estas punego? 560
 Kiuj do estas punataj? Pro kio senĉesaj plendadoj? »
 Tiel pastrino respondas : « Ho ĉefo Trojana glorega,
 lu senkulpa al krima loĝejo ne povas aliri.
 Kiam Hekato al mi komisiis arbaron Avernan,
 Ŝi min instruis pri punoj de dioj kaj ĉien kondukis. 565
 Jen Radamanto Gnosia, vestata de povo terura :
 Li malvirtulojn aŭskultas kaj punas, kaj ilin devigas
 krimojn konfesi : ĉar ili, ĝojante pro vana insido,
 Diojn Superajn trompinte, post morto remetis pagadon.
 Tiam senĉese, krimulon per vipo venĝema batante, 570
 Lin Tisifono insultas, per mano maldekstra serpentojn
 Montras terurajn, kaj aron alvokas de nigraj fratinoj.
 Tiam, kun bruo malbele sonega, Tartaraj pordegoj
 Nuĝ malfermiĝas. Vi vidas jen kia pordisto sidante
 Gardas vestiblon, kaj kia vizaĝo prizorgas pri sojlo. 575
 Hidro grandega kaj nigra kun kvindek buŝegoj kruelaj
 Loĝas interne de domo Infera : kaj vasta Tartaro,
 Tiom malsupre sub regno de Ombroj duoble kaŝadas,
 Kiom vidspaco altiĝas el tero al supro Olimpa.
 Tie nacio antikva de Tero, idaro Titana, 580
 Fulme ĵetita, senĉese sin rulas en kavo profunda.
 Tie mi vidis duopajn Alojdojn, je korpoj grandegaj,
 Kiuj, peninte ekrampi per manoj al alta ĉielo,
 Volis el trono supera potencan renversi Jupitron.
 Same mi vidis Salmonon, punitan de punoj kruelaj; 585
 Ĉar li fajreran Jupitran imitis kaj bruon Olimpan.
 Torĉon skuante brulantan, sur ĉaro kvarĉevaljungita,
 Li, intermeze de urbo Elida, tra Grekaj popoloj,
 Iris triumfe, kaj diajn por si mem petegis honorojn.
 Ilo frenezulo, li nubojn kaj fulmon la neimiteblan 590
 Penis ŝajniĝi, per ufoj ĉevalaj frapantaj kupraĵon.
 Patro sed ĉiopotenca, el nuboj densegaj, nek torĉojn
 Ĵetis, nek fajrojn apenatŭ fumantajn, sed unu nur sagon;

- Kaj lin, en granda turniĝo flamanta, ĵetegis malsupren.
 595 Estas jen apkaŭ videbla Titio, la filo de Tero
 Ĉiopatrina : li kovras je korpo naŭ kampajn mezurojn.
 Granda vulturo, per kurba bekego, hepaton senmortan
 Manĝas senĉese kaj ventrajn organojn, de puno kreantojn.
 Ĝi, sin supersatiginte de karnoj, loĝadas en brusto,
 600 Halton nenian al renaskiĝantaĵ donante viandoj.
 Ĉu Piritoon, Iksion, Lapitojn, mi rememorigos?
 Nigra ŝtonego senĉese falonta kaj alte staranta
 Ilin minacas, dum brilas de altaj kuŝejoj festenaj
 Helo orata, dum antaŭ vizaĝoj luksege stariĝas
 605 Reĝaj manĝaĵoj : sed la pli maljuna de nigraj Furioj
 Sidas apude : se iu deziras ekkapti manĝaĵon,
 Tuj ŝi sin levas, skuante flamingon kaj tondre kriante.
 Tiuj do kiuj malamis gefratojn, dum ili vivadis,
 Kiuj batadis gepatrojn kaj trompis inside klienton,
 610 Kiuj kuŝiĝis sur multajn riĉaĵojn, de ili trovitajn,
 Solaj, ne parton doninte al siaj, — multega anaro! —
 Kiuj pro krimo adulta pereis, kaj kiuj malpiajn
 Zonis armilojn kaj trompis sen timo de mastro konfidon,
 Tie punegon atendas. Ne serĉu per kia punado
 615 Ilin premeĝas Fatalo kaj justa dekreto de dioj.
 Unuj ŝtonegon ruladas grandegan : sur radaj radioj
 Pendas aliaj : jen sidas kaj sidos eterne Tezeo
 La malfeliĉa : Flegio, plej multe mizera el ĉiuj,
 Ilin admonas, kaj laŭte ekkrias senĉese tra ombroj :
 620 « Nu, avertitoj, vi diojn kaj sanktan respektu justecon! »
 Tiu ĉi vendis pro oro patrujon, kaj estron potencan
 Trudis : pro mono li faris leĝaron kaj poste malfaris.
 Tiu en lito filina malpian plenumis edziĝon.
 Ĉiuj krimegojn elpensis malnoblajn kaj ilin kuraĝis.
 625 Se mi cent langojn posedus, kaj tiom da buŝoj, kaj plie
 Voĉon el fero, pri tiom da formoj krimegaj paroli,
 Tiom da nomoj punegaj denombri, mi certe ne povus. »
 Tiam, tuj kiam parolis maljuna pastrino de Febo :
 « Iru, aliru, ŝi diris; kaj vi komencitan laboron
 630 Finu rapide : mi murojn, de arto Ciklopa faritajn,
 Vidas, kaj antaŭ ni pordan arkaĵon de kampoj Elizaj,

Kie nin sankta kutimo ordonas prezenti donacojn. »

Tiel ŝi diris : kaj ili, irinte tra vojo malluma,

Mezon de spaco transiras kaj pordon aliras proksiman.

Sojlon okupas Eneo, purigas per akvo klarega 635

Korpon, kaj poste sur trabon kontraŭan li fiksas branĉeton.

Tiun ofere al granda diino farinte donacon,

Ili alvenas en lokon belegan, ĝojigan ĝardenon,

Ĉiam printempan kaj verdan arbaron, feliĉan sidejon.

Tie pli larĝe vivigas aero kamparon, dum igas 640

Suno alia kaj astroj aliaj purpuran lumadon.

Membrojn sur herbo, per ludo de diskoj, fortigas unuaj,

Venkon disputas kaj ĝoje batalas sur sablo flavruĝa.

Teron aliaj piede frapante, en ĥoroj dancantaj

Versojn deklamas ; dum pastro Tracuja, kun longa vestaro, 645

Zorge vibrigas sep kordojn de liro oblikve tenata,

Kiun tuŝetas ĉu fingroj ĉu arĉo el elefantosto.

Tie genepoj de Teŭkro antikva, belega idaro,

Ĉiuj grandkoraj herooj, naskitaj en jaroj pli bonaj :

Jen Asaraco, Dardano fondinto de Trojo, kaj Ilo. 650

Sed malproksime li ombrojn armilajn kaj ĉarajn mirante

Vidas, kaj lancojn en tero fiksitajn ; tra kampoj libere

Belaj sin paŝtas ĉevaloj : ĉar tiuj, dum tera vivado,

Kiuj amegis kaleŝojn kaj glavojn, aŭ kiuj belmovajn

Paŝtis ĉevalojn, ĝuadas sub tero je samaj plezuroj. 655

Poste aliajn maldekstre kaj dekstre sur herbo manĝantajn

Vidas Eneo, dum ĥoro gojigan kantadas Peonon,

Apud arbaro el laŭroj odoraj, kaj kie, el supre,

De Eridana rivero ruliĝas ondego arbara.

Tiuj do kiuj batalis kaj estis vunditaj pro lando 660

Patra ; kaj pastroj ĉastege vivintaj, dum tera ekzisto ;

Sanktaj poetoj de kiuj versaĵoj tre plaĉis al Febo ;

Tiuj ĉi kiuj per artaj elpensoj bonigis homaron ;

Kiuj per agoj utilaj de ĉiu meritis dankecon,

Tie ĉi loĝas kaj zonas tempiojn per blanka rubando. 665

Tiel al Ombroj ĉirkaŭe starantaj parolas Sibilo,

Sed al Muzeo precipe : li, meze de aro starante,

De ĉeestantoj per ŝultroj altkreskaj altiris rigardon :

« Diru, feliĉaj Animoj, vi same, bonega poeto,

670. Kie do loĝas Anĥizo, en kiu kamparo? Ĉar por lin
 Vidi ni venis, kaj grandajn riverojn transnaĝis Erebaĵn. »
 Tiam heroo per tiuj paroloj mallonge respondas :
 « Domon ne certan ni havas : ni loĝas en densaj arbaroj ;
 Estas kuŝejo sur bordo rivera, en verda herbejo.
- 675 Sed se vi tion deziras, de tiu monteto postparton
 Trafu ; kaj mi vin, per vojo facila, plezure kondukos. »
 Tiel dirinte, li marŝas antaŭen, montrante malsupren
 Riĉan kamparon : kaj tie supraĵon forlasas irantoj.
 Dume Anĥizo la patro, sidante en verda valetto,
- 680 Zorge rigardis Animojn ĉi tie estantajn, kaj poste
 Lumon ĉielan vidontajn ; dum nombron de tuta idaro
 Post si venonta li ame kalkulis, de karaj genepoj
 Sortojn vidante, kaj virajn Fatalojn, armilojn kaj agojn.
 Sed li tuj kiam Eneon, tra verda kamparo venantan,
- 685 Vidis, subite li manojn duopajn tutkore prezentis :
 Larmoj ekfluis sur vangoj, dum vortoj el buŝo eliris :
 « Fine vi venis ; kaj rajte pieco al inda naskinto
 Malfacilecon de vojo venkadis : mi povas vizaĝon
 Vidi, ho filo, kaj voĉon aŭskulti, kaj al vi respondi.
- 690 Tiun esperon en koro nutrante, mi sentis ke tempo
 Alproksimiĝis ; kaj mia atendo ne estis trompita.
 Mi vin ricevas, tra kiom da landoj, tra kiom da ondoj,
 Nun veturintan. Ve ! kiajn malbonojn vi, filo, suferis !
 Kiel mi timis ke regno Libuja fariĝu mortiga ! »
- 695 Tamen li diris : « Ho patro, nur via malĝoja vizaĝo,
 Ofte al mi aperante, Avernon min trafi devigis. »
 Staras ŝiparo en maro Tirena. Ni penu manplekti,
 Patro, kaj mian kسادon ameman ne tiel forkuru. »
 Tiel li diris ; kaj larma fluado sur vangoj ruliĝis.
- 700 Kolon amatan ĉirkaŭi per brakoj trifoje mi penis,
 Vane ! El manoj fantomo premita trifoje foriris,
 Kiel malpeza venteto, simila al sonĝo flugila.
 Tamen Eneo, en valo mistera, ekvidas arbaron
 Tute senhoman, kun branĉoj bruantaj pro venta blovado ;
- 705 Dum tra belega sidejo moviĝas Letea rivero :
 Tie popoloj kaj gentoj sennombraj fantome flugadis.
 Tiel, sur verda herbejo, en tago somera, abeloj

Florojn sieĝas diversajn ; kaj ĉirkaŭ blankegaj lilioj
 Aro rapidas, dum tutan kamparon sonigas flugadoj.
 Tion vidinte, ne kaŭzon konante, subite Eneo 710
 Tremas kaj tial demandas : « Ĉe tiu fluanta rivero,
 Kia do estas ĉi tiu anaro, sur bordo vaganta? »
 Tiam Anĥizo la patro : « Animoj al kiuj Fataloj
 Korpojn aliajn rezervas, kun ondo kvieta Letea
 Trinkas samtempe malzorgon trankvilan kaj longan forge- 715
 Longa de tempo, mi volas pri ili paroli, kaj poste, [son.
 Antaŭ okuloj pasigi sinsekvon de via ŝidaro :
 Ĉar, Italujon trovinte, vi estos multe pli ĝojega.
 — Patro, ĉu iam Animoj eteraj, el tie al tero
 Suprenirante, en korpoj pezegaj denove konsentas 720
 Loĝi? Kaj kial al lumo mizera malsaĝa deziro?
 — Vin nescianta, ho filo, mi certe ne lasos », respondis
 Patro Anĥizo ; kaj tuj li mirigajn klarigas sekretojn :
 « Dia spirito unue vivigas ĉielon kaj teron,
 Vastan ondaron, kaj globon brilantan de luno, kaj helan 725
 Astron Titanan : en vejnojn de mondo senĉese verŝata,
 Mason movigas Animo kaj tute kun korpo sin miksas.
 Homan ĝi naskis kaj bestan rasaron kaj birdan popolon,
 Fine grandulojn de maro, kaŝatajn en ondo marmora.
 Estas deveno ĉiela kaj fajra forteco en ĉiuj 730
 Semoj, kaj restas en ili, dum korpoj malpuraj, artikloj
 Teraj, kaj membroj mortontaj ne ilin per pezo prokrastas,
 Timon, deziron, doloron kaj ĝojon naskinte : en nigra
 Malliberejo ligitaj, Animoj ne vidas plu sunon.
 Tamen ve! kiam, post lasta elspiro, viveco forflugis, 735
 Ili el tuta malbono, el aĵoj malpuraj de korpo,
 Liberigitaj ne estas ; ĉar difektegaĵoj, en koroj,
 Kiuj longtempe vivadis, potencajn kreskigis radikojn.
 Ili do punojn suferas kaj per turmentegoj maljunajn
 Kulpojn elpagas : unuaj, blovataj per ventoj malpezaj, 740
 Pendas aere : aliaj, en kavo profunda, el krimoj
 Difektigitaj sin lavas, aŭ ilin per flamoj purigas.
 Ĉiu post morto suferas fantome : sed poste, en vastan
 Oni nin sendas Elizon ; en ĝoja kamparo ni loĝas, [ga,
 Sed ve! malmultaj : kaj fine, post kiam, post tempo tre lon 745

- Kulpa makulo puriĝis, kaj iĝis pli hela, pli pura,
 Tiu spirito etera kaj tiu ĉiela fajrero,
 Tiam, tuj kiam la rodo de jaroj miloble turniĝis,
 Dio al ondo Letea sennombran kondukas anaron,
 750 Por ke Animoj forgesu estinton, denove deziru
 Supran arkaĵon ekvidi, kaj ree revenu en korpon. »
 Tiel parolis Anĥizo : samtempe Sibilon kaj filon
 Mezen de aro fantome bruanta li poste kondukas,
 Kaj supreniras monteton kontraŭan, de kie li povos
 755 Ĉiun, laŭ vico pasantan, rekoni, vidinte vizagon :
 « Sciu nun kiun estontan gloregon Dardana nacio
 Estas havonta, kaj kion al nepoj rezervas Itala
 Lando : pri tiuj Animoj famegaj, kaj eternigontaj
 Nomon, mi al vi parolos, kaj gloran koniĝos estonton.
 760 « Vidu junulon, sur lancon mallongan sin kiu apogas.
 Lokon proksiman al lumo li havas per sorto : Italan
 Sangon mikson, li, via kaj lasta naskito, unua
 Altan ĉielon ekvidos, nomota : Silvio Albano.
 Via edzino Lavinjo lin naskos de edzo maljuna,
 765 Reĝon kaj patron de reĝoj edukos en densaj arbaroj,
 Kaj per li nia nacio potencos en Albo la Longa.
 « Estas proksime Prokaso, la gloro de gento Trojana,
 Kaj Numitoro, Kapiso, kaj tiu ĉi, kiu de nomo
 Via sin nomas, Silvio Eneo, piece kaj glave
 770 Same glorega, se iam li Albon potenci bonvolas.
 Kiaj junuloj ! Kaj kiom da fortoj jam ili prezentas !
 Tiuj ĉi, kiujn vi vidas kun kapoj kverkaĵe kronataj, [bion,
 Murojn fortikajn konstruos sur montoj, Nomenton, Ga-
 Urbon Fidenan, kaj Kolatinurbajn turegojn, Pometon,
 775 Kaj fortikaĵon Inuan, kaj Bolon, kaj Koron, kaj fine
 Tutan nomaron de lokoj hodiaŭ neniel konitaj.
 « Baldaŭ al avo kuniĝos Romulo, naskito de Marso,
 Kiun patrino Ilio de sango de Asaracidoj
 Naskos. Vi vidas duoblan lumfaskon sur frunto starantan ;
 780 Ĉar sur lin Patro de dia majesto jam presis sigelon.
 Filo, per patra protekto de tiu heroo, famega
 Romo potencon grandigos en landoj kaj gloron ĝis astroj.
 Ĝi, fruktoporta de vira idaro, sep montojn ĉirkaŭos

Inter nur unu murego : ĝi al Berecinta patrino
 Estos simila ; tra urboj Frigujaj ŝi ĝoje veturas, 785
 Ture kronata, sur ĉaro, fiera pri dia idaro
 Ĉielloĝanta, cent nepoj starantaj sur alta Olimpo.

« Nun vi ĉi tien direktu okulojn kaj tiun rigardu
 Genton : jen viaj Romanoj. Ĉi tie Cezaro kaj ĉiuj
 ldoj lulaj, sub akso ĉiela venontaj al lumo. 790

Estas jen tiu ĉi kiun tre ofte Fataloj anoncis,
 Dia naskito, Cezaro Aŭgusto : li oran jarcenton
 Ree al lando Latuja redonos, al kampoj en kiuj
 lam potencis Saturno : li ĝis Garamantoj kaj Indoj
 Regnon etendos, ĝis landoj kuŝantaj trans astroj ĉielaj, 795
 Kie, trans vojoj de suno kaj jaro, sur ŝultroj de Atlo
 Ĉielportanta, ruliĝas mondakso kaj astroj brilegaj.

Regnoj Kaspiaj jam lian atendas alvenon, kaj pri ĝi
 Timas, respondon aŭdinte divenan ; kaj lando Meota
 Estas tremanta ; kaj Nilo sepbuŝa terure timegas. 800

Tiom da landoj trairis nek granda Alcido, — kaj tamen
 Kupropiedan cervinon li boris, arbaron pacigis
 De Eridano, kaj Lernon tremigis per forta pafarko, —
 Nek vinberdio, jungita kaleŝon per vinberbranĉetaj
 Bridoj, dum tigroj ĝin tiras el alta supraĵo de Niso. 805

Kaj ni, por gloron grandigi tra aĝoj, ni nun ŝanceliĝus ;
 Kaj ni nun timus en lando Aŭzona fiksadi sidejon !

— « Kiu do, pli malproksime, olive kronata, kunportas
 Sanktajn lavvazojn ? — Hararon kaj blankan de dua Roma-
 Reĝo mi barbon rekonas : unua al urbo li leĝojn [na 810
 Donos : veninte el landoj malriĉaj kaj Kuro malgranda,
 Grandan li regnon konstruos. Sed Tulo postiras ; patrujan
 Interromponte ripozon, li virojn batale movigos
 Mallaboremajn, kaj arojn je gloro dekutimigitajn.

Post li alvenas nun Anko fiera : pri amo popola 815
 Tiu ĉi ĝojas ; ĉar lin nur altigis nacia favoro.

Reĝojn Tarkvinojn ĉu vi do ekvidi deziras, kaj grandan
 Koron de Bruto venĝema, kaj faskojn de reĝoj lasitajn ?
 Povon konsulan, timindajn hakilojn, unua ricevos
 Bruto : sed filoj intrigos pri novaj militoj ; kaj patro 820
 Ilin punege mortigos, ve ! pro libereco belega.

Malfeliĉulo! Ĉar kia ajn estos la juĝo de nepoj,
Venkos ĉu amo patruja, ĉu granda deziro al gloro.

« Vidu nun pli malproksimen : Decioj kaj Druzoj, Tor-
825 Hakilarmita timinde, Kamilo portanta standardojn. [kvato
Tiuĵ ĉi, kiujn vi vidas brilantaj sub samaj armiloj,
Restos amikoj, dum ilin premados mallumo de nokto.

Kiaj bataloj fariĝos se ili atingas al lumo

Viva! Se ili renkontas sin, kiom da frapoj mortigaj,

830 Kiam, el Alpaj supraĵoj kaj alta Moneco, bopatro
Malsupreniros, kaj trovos bofilon kun gentoj Aŭroraj;
Viaj animoj, ho knaboj, ne tiajn kutimu batalojn.
Kontraŭ patrujan vivecon ne viajn direktu armilojn!
Vi do unue kompatu, ĉar iam vin naskis Olimpo :

835 Sagojn el manoj forĵetu, hó miaj sangidoj!

Tiu triumfos je alta Korinto; kaj lin Kapitolen
Ĉaro veturos venkintan post sanga buĉado Aĥaja.

Tiu ĉi Argon faligos kaj Agamemnonan Mikenon :
Sur Eacidan idaron de armopotenca Aĥilo

840 Avojn li venĝos Trojanajn kaj malrespektitan Minervan
Templon. Ĉu mi ne parolos pri vi, ho Katono, ho Koso?
Ĉu mi forgesos gloregon de Grakoj kaj de Scipionoj,
Fulmoj batalaj, Libuja teruro, kaj de Fabricio,
Kiun riĉigas malmulto, kaj de sulksemanta Serano?

845 Kien Fabioj min lacan fortiras? Jen estas Maksimo :
Li, prokrastante, de nia patrujo malhelpis ruinon.

« Povos pli bone aliaj el kupro vivigi statuon,
Certe mi kredas, kaj skulpti marmoron laŭ homa vizaĝo,
Eble procese pli lerte paroli, cirkele ĉielan

850 Movon kalkuli, kaj astran science klarigi kuradon;
Regi vi devas popolojn, Romano; ne tion forgesu :
Pacon altrudi kutiman, kompati venkitojn, mallevi
Gentojn fierajn, jen estas nur artoj de vi kultureblaj. »

Tiel parolis Anĥizo, dum miris Sibilo kaj filo :

855 « Vidu nun kiel fiere aliras Marcelo, akiron
Ĉefan portanta : venkinte, li virojn superas aliajn.
Ĉar li, en granda batalo, Romanajn ĉefante rajdistojn,
Savos publikan aferon; kaj Galojn venkinte kaj Penojn,
Trian armilon kaptitan pendigos en templon Kvirinan. »

Tamen Eneo, ĉe flanko de granda Marcelo, junulon 860
 Belan ekvidas, pro korpaj formaĵoj, pro brilaj armiloj,
 Sed kun malĝoja vizaĝo, kun teren okuloj fiksataj :
 « Kia do estas, ho patro, kunulo de fama heroo,
 Kiun vi montris? ĉu filo? ĉu iu el grandaj genepoj?
 Kiel lin aro ĉirkaŭas, kaj kiel sin ambaŭ similas! 865
 Nigra sed nokto jam skuas sur kapon flugilojn mallumajn. »
 Tiam Anĥizo la patro, kun larmoj en voĉo, respondis :
 « Filo, plej grandan de via idaro ne serĉu doloron.
 Tiun junulon al tero nur montros Fataloj, sed poste
 Ili lin tuje haltigos. Ĉar Romo tro ŝajnus potenca, 870
 Dioj, se tiun mirindan donacon ĝi povos konservi.
 Kiom da ĝemoj sonados en kampo proksima de granda
 Urbo Mavorsa; kaj kiom da festoj funebraj vi vidos,
 Tibro; ĉar ondo tuŝetos piedon de nova tombejo.
 Ido de sango Ilia neniam pli alten de avoj 875
 Portos Latinan esperon; kaj tero Romula neniam
 Estos pli juste fiera pri iu el mamosuĉontoj.
 Sankta pieĉo! antikva konfido, neniam venkebla
 Brako milite! Neniu senpune kuraĝis ĉi tiun
 Kontraŭbatali, ĉu kiam piede li al malamikoj 880
 Iris, ĉu kiam ŝaŭmantan ĉevalon li sprone piketis.
 Knabo plorinda, Fatalon kruelan se rompi vi povos,
 Tiam vi estos Marcelo. Plenmane liliojn eljetu;
 Florojn mi ŝutos purpurajn : de nepo, per tiuj donacoj,
 Mi nun deziras animon satigi; kaj tiel mi pagos 885
 Vanan honoron. » Li diris : kaj ili vagadis tra tuta
 Lando, kaj ĉion rigardis en vastaj kamparoj aeraj.
 Filon post kiam Anĥizo kondukis tra aĵoj mirindaj,
 Kaj lin bruligis per amo al gloro estonta, li tiam
 Al li konigas militojn pri kiuj li iam klopodos, 890
 Kaj lin instruas pri gentoj Laŭrentaj, pri urbo Latina,
 Pri maniero por saĝe eviti aŭ fari laboron.
 Dormo posedas du pordojn : unua, laŭ famo, farita
 Korne, al veraj fantomoj facilan permesas eliron;
 Dua, farita el elefantosto brilega kaj blanka, 895
 Sendas ĉielen nur vanajn fantomojn kaj sonĝojn malverajn.
 Tiam, post kiam Anĥizo silentis, Sibilon kaj filon

- Li akompanis, kaj ilin eligis per dua pordego.
 Ŝipojn reiras Eneo kaj siajn retrovas kunulojn.
 900 Apud marbordo naĝante, Kajetan li trafas havenon.
 Ankron ŝipnazoj faligas; kaj staras ĉe bordo ŝipvostoj.

KANTO SEPA

- Ho nutristino Enea, Kajeto, vi, kiel aliaj,
 Famon eternan al niaj marbordoj per morto liveris :
 Glora ĉar estas la loko en kiu vi kuŝas, kaj nomo
 Via nun rememorigas tombejon en lando Hespera.
 5 Dume la pia Eneo, solenajn farinte tombpreĝojn,
 Kaj stariginte funebran monteton, tuj kiam kvietaj
 Ondoj fariĝis, velŝipojn irigis kaj lasis havenon.
 Noktaj blovetas ventetoj, kaj luna blankaĵo lumigas
 Marveturadon, dum brilas ondaro per helo tremanta.
 10 Estas sekvitaj proksime marbordoj de Circa insulo,
 Kie filino riĉega de Suno per kanto senĉesa
 Nealireblajn sonigas arbarojn, kaj nokte odoran
 Cedron bruligas, en domoj belegaj, por ilin lumigi,
 Dum ŝi sonorante tra maŝoj maldikaj kurigas teksilon.
 15 Tie aŭdiĝas ĝemadoj koleraĵoj de grandaj leonoj,
 Kiuj skuadas ligilojn kaj forte tra nokto blekegas :
 Aproj starigas haregojn, kaj ursoj en kavoj profundaj
 Furiozegas, dum lupoj grandformaj kriegas freneze.
 Ili, ve! homoj ja estas : sed ilin diino kruela
 20 Ŝanĝis per herboj potencaj en korpojn de bestoj sovaĝaj.
 Sed, por ke piaj Trojanoj ne tiajn suferu danĝerojn
 Eblajn, se ili havenon kaj bordon alirus timindan,
 Velojn Neptuno plenigis je vento favora, ŝiparon
 Naĝi devigis, kaj ekster ondaro ĝin puŝis varmega.

Maro sub ŝunaj radioj jam ruĝe heliĝis; sur roza 25
 Ĉaro, en alta ĉielo, jam flava brilegis Aŭroro,
 Kiam tuj haltas ventado kaj ĉiu aera bloveto :
 Penas sed vane remistoj ondaron lacigi senmovan.
 Grandan arbaron el ondo starantan subite Eneo
 Vidas, tra kiu la Tibra rivero flankita de arboj, 30
 Multajn turnakvojn igante rapidajn, sur flavaj sablaĵoj,
 Fluis en maron. Ĉirkaŭe kaj supre, sur bordo loĝantaj,
 Birdoj diversaj moviĝis, en riverkuŝujo plenigis
 Klaran aeron je kantoj kaj flugis tra sankta arbaro.
 Ŝanĝi direkton, ŝipnazojn al tero prezenti, Eneo 35
 Tiam ordonas; kaj ĝoja li ombran aliras riveron.
 Nun mi konigos, Erato, nunajon de reĝoj kaj gentoj,
 En la antikva Latujo, tuj kiam anaro fremdula
 Unuafoje al bordoj Aŭzonaj irigis ŝiparon :
 Kaj de unua milito mi poste komencos rakonton. 40
 Muzo, inspiru poeton. Terurajn mi diros batalojn,
 Sangajn armilojn, koleron de reĝoj igantaj buĉadon,
 Helpon Tirenan, kaj landon Hesperan de viroj armitaj
 Tute kovritan. Aferoj pli grandaj naskiĝas en penso :
 Verkon pli grandan mi skribos. — Kamparon kaj urbojn kvi- 45
 Reĝo Latino maljuna en paco jam longa potencis. [etajn
 Oni rakontas ke Faŭno kaj nimfo Laŭrenta Narico
 Naskis lin, Faŭno la filo de Piko; kaj li vin honoris
 Kiel kreinton, Saturno, kaj patron unuan de raso.
 Filon ne havis, pro dia Fatalo, nek viran idaron 50
 Tiu ĉi reĝo, ĉar filo unua pereis junaĝe;
 Kaj nur filino bienon vastegan mastrumis kaj domon,
 Ino jam maturigita de jaroj kaj edziniĝebla.
 Multaj ŝin petis fianĉoj en granda Latujo kaj tuta
 Lando Aŭzona, kaj, antaŭ aliaj precipe, belega 55
 Turno, potenca per famaj prapatroj : lin reĝa edzino,
 Kiel bofilon, posedi kaj nomi fervore deziris :
 Sed kontraŭstaris per multaj mirakloj ordono de dioj.
 Laŭro troviĝis en mezo de domo, en lokoj privataj;
 Kaj foliaron multjara respekto piege honoris. 60
 Kiam li muron konstruis unuan, ĝin estis trovinta
 Patro Latino; li ĝin laŭ la famo, al Febo dediĉis :

Kaj kolonio Laŭrenta de tiu ĉi nomon ricevis.

Multaj abeloj, — rakonto mirinda! — tra klara aero

65 Veturigitaj, kun bruaj zumadoj sur supron de arbo
Iam elfalis; kaj tuj, per piedoj sin interplektinte,
Aro abela subite pendiĝis al branĉo folia.

Tiam diveno : « Mi vidas, li diris, fremdulon kuraĝan :

Ĉefas li roton venantan de samaj kamparoj; kaj ili
70 Saman kamparon aliras, kaj supran potencos altaĵon. »

Plie dum virga Lavinjo, ĉe flanko de patro starante,
Sanktan altaron fumigas per piaj parfumoj rezinaj,
Fajro, — terure! — eksaltas kaj longan manĝegas hararon,
Ĉiujn ornamojn bruligas belegajn kaj flamas krakete :

75 Brulas reĝina kapvesto kaj krono portanta juvelojn.

Juna knabino forkuras, kovrita de flamoj flavruĝaj;
Kaj, fumigante, bruladon ŝi semas tra tuta palaco.

Estis vidaĵo terura kaj vere mirinda averto,
Kiu anoncis ke iam ŝi fama kaj glora fariĝos,

80 Sed ke samtempe minacas popolon kruela milito.

Tamen la reĝo, pri diaj elmontroj tre priokupata,

Al orakolo de Faŭno, la fataldiranta naskinto,

Iras, kaj altan demandas arbaron Albunan : ĉi tie
Fonto bruegas kaj ombron plenigas je sterkaodoro.

85 Gentoj Italaj kaj tuta kamparo Enotra ĉi tie

Petas klarigojn pri duboj : ĉar kiam la pastro oferis
Donojn, kaj felojn de ŝafoj buĉitaj etendis sur teron,
Por sin ĉi tien kuŝigi kaj sonĝi sub nokto silenta,
Milmaniere flugantajn li tiam ekvidas fantomojn,

90 Voĉojn aŭdadas diversajn, kaj ĝuas parolojn de dioj;

Fine li ombrojn demandas Akerajn el fundo Averna.

Tie do, kiam Latino la patro, petante respondon,
Cent lanportantajn, laŭ sankta kutimo, ekbuĉis ŝafinojn,
Li sin etendis sur felojn iliajn, sur dorso kuŝante.

95 Tiam li voĉon ekaŭdis venantan el alta arbaro :

« Nun do, por via filino ne edzon deziru latinan,
Mia naskito; kaj pretan edziĝon ne kredu ŝatinda.

Fremda alvenas bofilo : de raso latina li sangon

Portos ĝis astroj kaj nomon : genepoj naskotaj de ili

100 Mondon potencos kaj metos sub siajn piedojn, de maro

Kie la suno sin levias ĝis maro en kiun ĝi falas. »

Tiun respondon, per kiu en nokto silenta konsilis
Faŭno la patro, ne volis por si mem konservi Latino :

Sed jam la Faŭno fluganta alportis al urboj Aŭzonaj

Tiun sciigon, ĵus kiam la Laomedido Trojana

105

Sian ŝiparon alligis al bordo herbhava de Tibro.

Tiam Eneo kaj ĉefoj precipaj kaj bela Iulo

Korpojn lacetajn etendas sub branĉojn de alta arbaro,

Mangon preparas kaj metas sur herbon, sub siaj mangaĵoj,

Kukojn tritikajn; — al tio Jupitero mem ilin instigis, — 110

Kaj telerforman platkukon surkovras per fruktoj kamparaj.

Kiam unuaj mangaĵoj finiĝis, nutraĵo mankanta

Ilin devigis direkti mordegon al plata Cereso,

Poste ataki per mano kaj per multmemaj makzeloj

Randon de krusto Fatala por pecojn glutadi dikegajn. 115

« Nia malsato eĉ tablojn englutas! » ekkriis Iulo,

Nur petolante. Sed tiu parolo senvola ekmontris

Finon de ĉiuj laboroj; kaj patro ĝin ĝoje akceptis,

Tre mirigita de senco kaŝita : kaj ĝin li meditis.

Poste : « Saluton, ho lando donita de miaj Fataloj : 120

Kaj vi, li diris, fidelaj Trojanoj, salutu Penatojn.

Estas ĉi tie patrujo kaj domo. Anĥizo la patro,

— Mi nun memoras, — de tiuj Fataloj konigis sekreton :

« Kiam, ho filo, al fremdaj marbordoj vin veturigitan

« Tablojn malsato mangegi devigos, post mango finita, 125

« Tiam memoru ke tie vi laca ekpovos esperi

« Domojn, kaj lokon prepari, kaj novajn konstrui tegmen-

Estas jen tiu malsato : jen lasta laboro kaj provo, [tojn. »

Kiu elfinos ekzilon.

Tial, kuraĝu, ĝojantaj : kaj kiam sin levos la suno, 130

Morgaŭ, ni lokojn, kaj homojn kaj murojn de tiuj popoloj

Zorge demandos, kaj lasos havenon por ĉien esplori.

Nun al Jupitero oferu kalikojn, per preĝoj alvoku

Patron Anĥizon, kaj vinon denove remetetu sur tablojn. »

Tiel li diris : kaj poste li zonas tempiojn per branĉo 135

Verda : li tiam alvokas Genion de loko, kaj Teron,

Dion unuan, kaj Nimfojn, kaj tiun riveron ankoraŭ

Nun nekonatan, kaj Nokton, kaj signojn de Nokta naskiĝo,

- Idan Jupitron, kaj poste Patriron Frigujan, kaj fine,
 140 En la Olimpo kaj en la Erebo, gepatrojn amatajn.
 Tiam trifoje, el alta ĉielo klarega, ektondris
 Ĉiopotenca la Patro, dum mano agitas kaj montras
 Nubon eteran, brilegan per oro kaj lumaj radioj.
 Famo samtempe trakuras tra aro Trojana kaj diras :
 145 « Jen promesita momento en kiu ni urbon konstruos. »
 Ili do vete refaras manĝaĵojn por fĉesti nubsignon,
 Vinajn starigas kalikojn, kaj ilin ĝojantaj ekkronas.
 Hele lumigis al tero radioj de suno sekvanta,
 Kiam marbordon, kaj urbon, kaj limon de gentoj tieaj
 150 Ili esploras : jen ondoj senmovaj de fonto Numika,
 Tie ĉi Tibra rivero ; kaj tie kuraĝaj Latinoj
 Loĝas. Sed filo Anhiza elektas en tuta anaro
 Cent delegitojn : li volas ke ili aliru al urbo
 De respektinda regnestro, kronataj de branĉoj Palasaj,
 155 Donojn prezentu al reĝo, kaj lian petegu protekton.
 Ili sen ia prokrasto klopodas kaj marŝas rapide.
 Tamen li muron estontan desegnas per sulko malgranda,
 Lokon aranĝas, domaron unuan sur bordo starigas,
 Fine ĉi tiun ekzonas tendaron per muro fortika.
 160 Tamen jam vojon transiris junuloj ; kaj ili, vidinte
 Turojn Latinajn, al alta tegmento jam alproksimiĝas.
 Antaŭ murego infanoj kaj unufloraĝaj junuloj
 Rajdis ekzerce, kaj polvon sublevis sub ĉaroj rapidaj :
 Penis aliaj por streĉi pafarkojn, ĵetegis per brakoj
 165 Lancojn flekseblajn, kaj inter si kure kaj pugne batalis,
 Kiam sendito, rapide rajdante, al reĝo maljuna
 Diras mallaŭte ke viroj grandkreskaj kun fremda vestaro
 Alproksimiĝas. Li volas ke oni akceptu ĝentile
 Tiujn fremdulojn, kaj reĝe sidiĝas sur tronon prapatran.
 170 Sankta, vastega, havanta cent grandajn kolonojn, palaco
 Estis, loĝejo, en urba altaĵo, de Piko Laŭrenta,
 Tre respektita pro densa arbaro kaj kredoj antikvaj.
 Tie ĉi reĝoj kutimis ricevi la sceptron, kaj faskojn
 Levi unuajn : ĝi estis loĝejo por konsilantaroj,
 175 Templo por sanktaj manĝadoj ; kaj, kiam ŝafviro buĉita
 Estis, ĉefpatroj al tabloj longegaj sidiĝi kutimis.

Plie de famaj prapatroj statuoj el cedro antikva
 Staris en grandaj vestibloj : Italo kaj patro Sabino
 Vinberplantinta, tenante en mano kurbitan falĉilon,
 Poste maljuna Saturno, figuro dufronta de Ĵano, 180
 Ĉiu laŭ vico, kaj, de la deveno, regantoj aliaj,
 Kiuj batalis kaj estis vunditaj pro sankta patrujo.
 Estas ligitaj sur pordaj tabuloj armiloj multegaj;
 Pendas kaptitaj kaleŝoj kaj kurbaj hakiloj militaj,
 Kaj protektiloj de kapo, kaj grandaj rigliloj de pordoj, 185
 Sagoj, kaj ŝildoj, kaj spronoj perforte tiritaj el ŝipoj.
 Piko mem ĉevaldresanto, tenante bastonon Kviringan,
 Ŝildon portante maldekstre, vestite de togo malgranda,
 Tie ĉi sidis : lin Circo amanta sed freneziĝinta
 Tuŝis de ora vergeto, kaj, helpe de kantoj magiaj, 190
 Ŝanĝis en birdon kun belaj flugiloj milfoje koloraj.
 Tiel, sidante sur seĝo de patroj, en dia palaco,
 Al si Latino venigis Trojanojn, al trona ĉambrego,
 Kaj enirantojn unua li tiel parolis amike :

« Ho Dardanidoj, parolu. — Ni vian nacion kaj urbon 195
 konas; kaj Famo pri maraj kuradoj nin same sciigis. —
 Kion vi petas? kaj kiu tialo, aŭ eble bezono,
 Ŝipojn kondukis al bordoj Aŭzonaj, tra tiom da ondoj?
 Ĉu vi eraris en vojo, aŭ ĉu vin ventego frapegis?
 — Multaj ĉar estas maristoj batitaj de maro kolera. — 200
 Nun, alirinte al bordo rivera, vi trovis havenon.
 Nian gastigon akceptu, kaj konu pli bone Latinojn :
 Gento Saturna sen ĉenoj, sen leĝoj, praktikas justecon,
 Kaj propramove de dioj antikvaj konservas kutimojn.
 Mi nun memoras, — sed ĝin mallumigis multego da jaroj, — 205
 De maljunuloj Aŭruncaj rakonton : de niaj kamparoj
 Filo, Dardano penetris ĝis urboj Frigujaj de Ido,
 Kaj eĉ ĝis Samo Tracuja. — Ĝi nun Samotraco nomiĝas. —
 Li, elirinte el urbo Tirena Korito, sur trono,
 Meze de ĉielastraro, en oraj palacoj, nun sidas, 210
 Kaj plinombrigas de la diajaro la multajn altarojn. »

Tiel li diris : kaj Ilioneo ĝentile respondas :
 « Ido nobela de Faŭno, ho reĝo, nenia ventego
 Nin al marbordo Itala alnaĝi devigis; nenia

- 215 Astra observo per montroj malveraj falsigis direkton :
Tute intence kaj vole ni vian aliras ĉefurbon.
Ni, forpelitaj el regno plej granda sur kiun radiojn
Lumajn verŝadis sundio, venanta el limo Olimpa,
Ni de Jupitero devenas : do Dardanidaro junaĝa
220 Ĝojas pri avo : kaj reĝo, naskita de raso Jupitera,
Troja Eneo, al viaj landlimoj nin li mem alsendis.
Tiun ventegon teruran, vomitan sur Idan kamparon
De la kruela Mikeno, kaj finon de tiu milito,
Kiu puŝegis Eŭropajn armilojn ĝis bordoj Aziaj,
225 Ĉiu tro konas, eĉ kiam li loĝus post Oceanmaro
Malproksimega, eĉ kiam li inter kvar zonoj vivadus,
Kie la sunaj radioj marlimon bruligas per fajroj.
Veturigitaj post Troja ruino tra maro vastega,
Ni nur por dioj patrujaj malgrandan ekpetas landeton,
230 Bordon senriskan, aeron kaj akvon, de ĉiu proprecon.
Tamen al regno ni gloron alportos; kaj via grandigis
Famo; ĉar ĉiam ni estos dankemaj pro via gastamo.
Se vi akceptas Trojanojn, neniam vi pentos : pri tio
Mi atestigas Fatalojn Eneajn kaj viron potencan,
235 Kiu en ĵuroj kaj en bataladoj neniam eraris.
Multaj popoloj kaj multaj nacioj deziris sin ligi
Kun ni; do ne nin malŝatu se antaŭ vi ni nin prezentas,
Mane portante rubandojn kaj preĝajn dirante parolojn.
Sed nin dekretoj de dioj kaj volo komandaj devigis
240 Vian serĉadi patrujon : ĉar tie Dardano naskiĝis,
Tie nin ree alvokas ordonoj de diu Apolo,
Apud la Tibro Tirena kaj ondoj de fonto Numika.
Al vi malgrandan donacon el siaj riĉaĵoj antaŭaj
Reĝo nun sendas, restaĵon rabitan el Troja brulado.
245 Patro Anĥizo per tiu orglaso trinkaĵojn oferis.
Tiun ĉi sceptron manportis kaj kronon surmetis Priamo,
Kiam popolojn, laŭ sankta kutimo, li juĝis vokitajn.
Fine vestaĵoj, Trojana laboro... »
Tamen dum Ilioneo parolis, Latino vizaĝon
250 Havis penseman : li mute, atentajn rulante okulojn,
Restis senmova sur trono : ĉar koron de reĝo kortuŝas
Nek la vestaĵoj purpure pentritaj, nek sceptro Priama,

Sed nur pripensoj pri la edzinigo de lia filino :
 Kaj li de Faŭno antikva en koro agitas respondon.
 Estas jen tiu bofilo, venanta el lando ekstera, 255
 Kiun Fataloj anoncis, kaj kiu kun sama potenco
 Regos kun li mem; de kiu idaro kuraĝa kaj virta
 Fama fariĝos, kaj mondan regnaron potence komandos.
 Fine li diras ĝojege : « Nu! Dioj favoru projektojn
 kaj orakolojn! Vi kion deziras ricevos, Trojanoj. 260
 Mi ne malŝatas donacojn. Sub reĝo Latino ne mankos
 Ĉu produktaĵoj de grasa kamparo, ĉu Trojaj riĉaĵoj.
 Tamen se reĝo Eneo fortege min koni deziras,
 Se li tuj volas sin kun mi ekligi kaj gasto fariĝi,
 Li do alvenu, kaj vidi amikan ne timu vizaĝon. 265
 Manon Enean ekpremi sufiĉos por pacon fortigi.
 Vi, viaflanke, al reĝo nun mian reportu respondon.
 Havas filinon mi : sed orakoloj de patro kaj multaj
 Diaj avertoj ne volas ke viro de nia nacio
 Kun ŝi edziĝu, kaj tion anoncas : « El landoj eksteraj 270
 Venos bofilo : haltonta en lando Latuja, ĝis astroj
 Nomon kaj sangon li portos. » Kredeble Eneon alvokas
 Dioj : kaj, se estontecon mi vidas, mi tion deziras. »
 Tiel li diris, kaj inter ĉevaloj plej bonajn elektas.
 Tri cent rapidajn ĉevalojn li nutris en staloj vastegaj. 275
 Li tuj ordonas ke oni donacu al ĉiu Trojano
 Unu ĉevalon purpure vestitan kun selo brodita :
 Kolon ĉirkaŭas ornamoj orataj kaj pendas ĝis brusto :
 Ili, jungitaj el oro, en buŝoj mordetas orilon.
 Al forestanta Eneo kaleŝon kun ambaŭ ĉevaloj 280
 Eternaskitaj, kaj flamojn ŝetantaj el nazo, li donas.
 Circo lertega, por ilin naskigi, submetis inside
 Inojn ĉevalajn sub viraj ĉevaloj de patra sundio.
 Tiam Trojanoj, ŝargitaj de donoj kaj diroj Latinaj,
 Belajn rajdante ĉevalojn, eliras kaj pacon alportas. 285
 Tamen kruela edzino Jupitra, el Argo Inaka
 Ĵus revenante, fluidan sur ĉaro trairis aeron,
 Kiam, de alta etero, ŝi, super Pakino Sicila,
 Vidis Dardanano Eneon, kaj lian ŝiparon ĝojantan.
 Ili jam domojn konstruas, al tero sin fidas, forlasas 290

- Ŝipojn. Ŝin, tion vidintan, ĉagreno starigas senmova.
 Kapon skuinte, ŝi tiujn el brusto eligas parolojn :
 « Malamegita nacio! Friguĵaj Fataloj senĉese
 Kontraŭstarantaj! En kampoj Sigeaj ĉu ili pereis?
 295 Plie, ĉu estis kaptitaj? Ĉu tiujn venkitojn bruligis
 Trojo flamanta? Ne. Tra batalantoj, en mezo de flamoj,
 Ili eĉ vojon trahakis! Mi kredas ke mia potenco
 Kuŝas lacega, ke sata malamo ripozas kaj dormas.
 Kion mi diros? Mi ilin, pelitajn el urbo falinta,
 300 Sekvi kuraĝis tra ondoj kaj persekutadi tra mondo.
 Kontraŭ Trojanoj mi uzis ĉielajn kaj marajn fortaĵojn.
 Ve! min utilis nek Sirtoj, nek Scilo, nek vasta Karibdo!
 Ili ĉe Tibra kuŝujo revita nun ĝoje ripozas,
 Nun protektitaj el maro kaj el mi. Kruelan nacion
 305 Marso mortigis Lapitan; koleron satigis Dianan
 Patro de dioj, kaj Kalcedonurbon punegis antikvan.
 Kian krimegon elpagis Lapitoj kaj Kalcedonurbo?
 Tamen min, grandan edzinon Jupitran, min, kiu kuraĝis
 Ĉion provadi, min, kiu min turnis al ĉio, nun venkas,
 310 Min malfeliĉan, Eneo! Se mia potenco ne estas
 Eble sufiĉa, de dio alia mi petos helpadon;
 Se mi Superaĵn ne fleksis diaĵojn, mi vokos Inferaĵn.
 Certe Eneon el regno Latina mi peli ne povos;
 Kaj edziniĝon Lavinjan senmovaj plenumos Fataloj;
 315 Estu! Sed tamen mi povas prokrasti, haltigi aferojn
 Gravajn, mi povas de tiuj du reĝoj mortigi popolojn.
 Ligu bofilon kun lia bopatro buĉado de gentoj!
 Sango Trojana vin dotos, Lavinjo, kaj sango Rutula;
 Kaj edziniĝon Belono prezidos : ne nur Cisidino
 320 Estos naskinta de sia kuniĝo fatalan brulaĵon.
 Tiel do filo Venusa similos alian Parison :
 Kaj li fariĝos flamtorĉo danĝera por nova Pergamo! »
 Tiel dirinte, diino timinda sur teron aliras :
 Poste ŝi vokas kruelan Alekton el nigra sidejo,
 325 Kie loĝadas Furioj diinaj : malĝojajn militojn
 Nur ŝi amegas, kolerojn, insidojn, kaj krimojn aliajn.
 Tiun ĉi monstron Tartaran malamas fratinoj, malamas
 Patro Plutono mem, tiel diversajĵn ŝi vestas formaĵojn,

Tiel sur kapo malbela teruraj pliiĝas serpentoj.
 Ĝin do per tiuj paroloj instigas Junono, kaj diras : 330
 « Ho virgulino, naskita de Nokto, mi de vi petegas
 Servon gravegan : min helpu, por ke mi konservu honoron
 Mian kaj famon, por ke Eneanoj ne povu Latinon
 Per edziniĝo ĉirkaŭi, kaj limojn okupi Italajn.
 Inter amikaj gefratoj vi povas naskigi militon, 335
 Povas en domojn disverŝi malamojn, kaj skui sur ilin
 Torĉojn kaj vipojn funebrajn : vi por malutili posedas
 Mil manierojn kaj artojn. En cerbo elpensu rimedojn ;
 Pacon disrompu revitan, kaj kaŭzojn dissemu militajn :
 Volu armilojn, kaj petu, kaj prenu samtempe junuloj ! » 340

Tuj, sorbigita de nigraj venenoj Gorgonaj, Alekto
 Landon Latujan kaj altan palacon de reĝo Laŭrenta
 Celas unue, kaj trafas Amaton en domo privata.
 Ŝin, pri alveno de aro Trojana, pri Turna edzigo,
 Grandaj koleroj kaj timoj virinaj fortege agitis. 345

Unu el haraj serpentoj lazuraj diino ekĵetas
 Sur ŝin, en bruston, kaj funden de koro inside ĝin ŝovas,
 Por ke ŝi domon konfuzu per sia kolero freneza.
 Inter vestaĵoj kaj brusto glateta glitiĝas la monstro,
 Sur ŝi volviĝas sentuŝe, kaj, spiron blovante viperan, 350
 Trompas malsaĝan reĝinon : jen granda serpento fariĝas
 Ora ornamo de kolo, tenilo de longaj rubandoj ;
 Jen ĝi hararon alligas, kaj membrojn tuŝetas volupte.
 Tamen eniro de flua veneno malseka unue
 Sentojn nur ŝiajn agitas, kaj fajron nur ĵetas en ostojn. 355
 Tiel do longe ke flamo ne tutan okupis animon,
 Kiel patrinoj kutimas, ŝi diras plej dolĉajn parolojn ;
 Multe ĝemante pri sia filino, pri edzo Friguja :

« Ĉu do Lavinjon ni devos konduki al Trojekzilitoj,
 Patro? ĉu vian filinon, kaj vin mem, kaj fine patrinon 360
 Vi ne kompatos? Je akvilonvento unua, vin lasos
 Tiu perfida ŝtelisto; kaj li, forportinte edzinon,
 Celos maralton. Ve! tiel penetris en Lakedemonon
 Bela Pariso, por Ledan Helenon konduki Trojurbon.
 Kio fariĝis sanktega bonfido, al viaj parencoj 365
 Amo antikva, promeso tre ofte donita al Turno?

- Tamen se petas Latinoj bofilon de gento ekstera,
 Se vi lin volas, se premas ordonoj de Faŭno la patro,
 Ĉu regionoj sur kiuj ne regas Latina potenco
- 370 Fremdaj ne estas? Mi kredas ke tiel rezonas diaĵoj.
 Kaj, se de Turno unuan ni serĉas devenon, ni trovas,
 Kiel prapatrojn, Inakon, Akrizon kaj grekan Mikenon. »
- Tiel ŝi diras por tenti Latinon, sed vane; ĉar reĝon
 Kontraŭstarantan ŝi vidas. Subite en korpon profunde
- 375 Kaj furioze serpento ŝovita ŝin tutan penetras.
 Tiam ŝi, vere plendinda, de krizoj mordita deliraj,
 Urbon grandegan freneze trakuras sen ia hontemo.
 Ŝi turnludilon similas, batitan de vipaj frapadoj,
 Kiun, en korto malplena turnigas per movoj rapidaj
- 380 Knaboj atentaj al ludo : ludilo, puŝita de ŝnuro,
 Rondojn farante, rondiras; junula anaro malklera
 Super ĝi ĝoje sin klinas, kaj bukson admiras turnantan,
 Dum rapidigas movadon batadoj : ŝi tiel rapide
 Kuras el urbo en urbon, kaj mezen de gentoj kruelaj.
- 385 Plie, pli kolerigita, ŝi krimon pli grandan kuraĝas;
 Ĉar ŝajnigante frenezon de Bako, ŝi inter arbaroj
 Baldaŭ forkuras, kaj kaŝas filinon en montojn arbhavajn,
 Kie Trojanan ŝi edzon evitos, kaj torĉojn prokrastos.
 « Bako, evohe! ŝi krias saltante, vi de virgulino
- 390 Estas nur inda : nur por vi ŝi tirsojn ekprenis dolĉegajn,
 Por vi ŝi ĥorojn preparis, kaj sanktan ornamis hararon! »
 Famo ekflugas : kaj korojn patrinajn freneze brulantajn
 Sama fervoro ekscitas por novajn serĉadi tegmentojn.
 Ili forlasas loĝejojn, al vento hararon kaj kolon
- 395 Nudan prezentas, plenigas aeron je krioj sovaĝaj,
 Kaj vinberbranĉajn bastonojn agitas, vestite per feloj.
 Inter aliaj, Amato malsaĝa pinbranĉon flamantan
 Portas, kaj kantas edziĝon de Turno kun sia filino.
 Sangajn rulante okulojn, subite ŝi krias sovaĝe :
- 400 « Aŭdu, patrinoj latinaj, en kiu ajn loko vi estas,
 Por malfeliĉa Amato se restas en koroj sentemaj
 Iom da amo, se rajtojn patrinajn vi ĉiam petegas,
 Harajn rubandojn malligu, kaj kun mi komencu Bakfes-
 Tiel, en densaj arbaroj, en lokoj loĝitaj de bestoj, [tojn. »]

Ĉie, reĝinon turmentas Alekto per Bakaj pikiloj. 405

Kiam ŝi vidis ke ŝi pligrandigis unuajn kolerojn,
Domon konfuzis Latinan, kaj liajn malhelpis projektojn,

Tiam diino malĝoja funebrajn etendas flugilojn,
Kaj de kuraĝa Rutulo ektrafas muregojn. Jetita
Tien per Noto ventega, Danao, Akriza filino, 410

Tiun ĉi urbon konstruis : nomita de avoj « Ardeo »
Iam, ĝi tiun ĉi nomon konservas ankoraŭ famegan :

Sed ne plu estas grandeco. Ĉi tie, en alta domego,
Turno, en mezo de nokto nigreta, ĝuadis ripozon.

Frunton malbelan kaj membrojn terurajn forlasas Alekto, 415

Poste sin aliformigas en ŝajnon de ino maljuna,

Ĉar per sulketoj malpuran ŝi strekis vizaĝon : hararon

Blankan alligas rubando kaj fiksas branĉeton olivan :

Estas Kalibo, maljuna pastrino de templo Junona.

Antaŭ junulo ŝi tiel aperas kaj tiel parolas : 420

« Turno, ĉu ĝoje de viaj laboroj vi perdos premion?

Ĉu vi toleros ke sceptron Dardanaj ekkaptu migrantoj.

Reĝo rifuzas edzinon kaj doton de sango pagitan ;

kaj li ekŝteran kaj fremdan al lando elektas bofilon.

Iru, mokita, kaj risku danĝerojn por maldankemulo ; 425

Venku Tirenajn armilojn, kaj pacon firmigu latinan.

Jes, dum en nokto kvieta vi dormas, Saturna filino

Ĉiopotenca ordonis ke tiel mi al vi parolu.

Nun do, kuraĝu, kaj armu junulojn ; kaj ilin rapide

Ekster pordegoj konduku : nun ĉefojn mortigu Frigujajn, 430

Kiuj okupis riveron, kaj ŝipojn bruligu pentritajn.

Tion ordonas volado de dioj. Nun, reĝo Latino,

Se li rifuzas plenumi edzigon kaj teni promeson,

Sentu kuraĝon de Turno, kaj liajn ekprovu armilojn. »

Tiam junulo, mokante pastrinon, ĉi tiun parolon 435

Diris : « Mi scias ke Tibran riveron okupas ŝiparo ;

Tiu sciigo kredeble alvenis al miaj oreloj.

Min do timigi ne provu : ĉar dia reĝino Junono

Ne min forgesis.

Ĉar maljuneco vin venkis, kaj malkapabligis por koni 440

Veron, patrino, vin vana okupas zorgado : kaj, inter

Reĝaj disputoj, ĝi trompas pastrinon per timo malvera.

- Templon purigu kaj diajn figurojn, por ilin konservi :
 Viroj nur estas kapablaj por zorgi militon kaj pacon. »
- 445 Tiuj paroloj de nigra Alekto naskigas koleron.
 Tiam subita tremado junulajn ekkaptas artiklojn ;
 Restas okuloj fiksataj : ĉar siblas Erinaj serpentoj,
 Ĉar malbelege sin montras vizaĝo. Ŝi tiam okulojn
 Flamajn rulante, lin, ŝanceliĝantan kaj diri volantan
- 450 Multojn, repuŝas, duoblan serpenton tiregas el haroj,
 Vipojn sonigas, kaj diras siblante per buŝo rabia :
 « Estas jen maljunulino ne ĝinda por koni veraĵojn,
 Inter disputoj de reĝoj trompita de timo malvera.
 Nun, min rigardu : mi venas el domo de nigraj Furioj ;
- 455 Mi militadon alportas kaj morton. »
 Diras ŝi : kaj, sur junulon brulaĵon ĵetinte flamantan,
 Koron ŝi boras per torĉo fumanta de helo malluma.
 Dormon disrompas grandega teruro : el ostoj, el membroj,
 Ŝvito glacia eliras, kaj fluas sur korpo tremanta.
- 460 Li furioza ekserĉas armilojn en domo, en lito ;
 Ĉar li soifas nur feron, frenezan kaj kriman militon,
 Venĝon precipe. Ĉar kiam, sub flankoj de kupraĵo bolvazo,
 Flamo nutrita de branĉoj grandiĝas, kun kanto sonora
 Akvon boligas varmego : interne saltegas ondaro,
- 465 Ŝaŭmas fluaĵo, kaj ĝi fumigante aliras al supro ;
 Baldaŭ ĝi ne sin detenas, kaj flugas vapore aeren.
 Ĉefoj do estis petitaj sin turni al reĝo Latino,
 Ĉar amikecon li rompis, kaj preni rapide armilojn,
 Por Italujon protekti kaj peli fremdulojn el limoj.
- 470 Povas li sola batali Trojanojn kaj kune Latinojn.
 Kiam li tiel parolis kaj diojn alvokis per preĝoj,
 Vete Rutuloj sin ĉiujn admonas al sanga batalo.
 Tiu ĉi laŭdas belecon de Turno, kaj tiu junecon,
 Unuj prapatrojn de reĝo, aliaj kuraĝon konitan.
- 475 Kiam do Turno en korojn Rutulajn inspiris fervoron,
 Flugas Alekto per Stiksaj flugiloj ĝis Troja tendaro.
 Ŝi, elpensante malbonojn, beletan ekvidas Iulon :
 Bestojn sovaĝajn, sur bordo, li ĉasis per ruzo kaj kuro.
 Tiam diino Kocita, blovante sur hundojn rabion
- 480 Tujan, tra nazoj iliaj konitan irigas odoron.

Cervon tuj ili fervoraj ekflaras. Jen kaŭzo unua,
 Kiu kamparajn instigis animojn al sanga milito. [gajn.

Havis la cervo tre balan formaĵon kaj kornojn grande-
 Tiro la patro kaj Tiraj infanoj ĝin nutris, post kiam
 Ili ĝin kaptis el mamu patrina : li reĝan brutaron 485
 Regis, kaj ĉefis gardistojn de vasta bieno Latina.
 lam ĝin dresis Silvio fratino kaj ĝin obeigis,
 Kornojn ornamis per floraj girlandoj de ŝi alligitaj,
 Beston kombadis, kaj ŝi mem ĝin lavis en fonto purega.
 Ĝi, kutiminte karesojn kaj majstran konante manĝtablon, 490
 Vagis en meza arbaro, kaj, lokojn irante malfremdajn,
 Kvankam la nokto nigriĝis, revenis al hejma tegmento.
 Ĝin, malproksime vagantan, de knabo ĉasanta lulo
 Hundoj ekflaris koleraĵ, ĵus kiam ĝi, ondon riveran
 Pro malvarmeto serĉante, kuŝiĝis sur bordan herbejon. 495
 Tiam Askano, brulante de amo fervora al gloro,
 Streĉas pafarkon kurbetan ; kaj cervon li zorge ekcelas.
 Dio direktis sageton flugantan : ĉar kano mortiga,
 Fôrte siblante, uteron kaj ventron de besto traboris.
 Cervo vundita en domon konitan sin tuje rifuĝas, 500
 Stalojn ĝemante aliras ; kaj, al peteganto simila,
 Sangokovrita, de plendoj ĝi tutan plenigas loĝejon,
 Tamen Silvio unua, per pugnoj frapante vizaĝon,
 Petas helpadon, kaj anojn kamparajn alvokas fortikajn.
 Ili — ĉar nigra Alekto sin kaŝas en densa arbaro, — 505
 Tuje alvenas, ĉi tiu portante flamantan karbaĵon,
 Tiu bastonon tuberan : de ĉiu objekto trovita
 Faras armilon kolero. Anaron alvokas tuj Tiro,
 Kiu perforte en kverkon kvarone rompitan enpuŝis
 Kojnojn, kaj kiu portante hakilon alkuras kolera. 510
 Tamen diino, serĉante momenton por malutilegi,
 Krutan tegmenton de stalo aliras : sur supro starante,
 Ŝi nun signalon aŭdigas kamparan : per voĉo Tartara
 Kornon kurbetan ŝi eksonorigas : de bruoj terura
 Tremis montaroj, kaj densaj arbaroj profunde ĝemadis. 515
 Aŭdis ĝin la malproksima lageto Arico ; ĝin aŭdis
 Akvoj sulfuraj de Naro blanketa kaj fontoj Velinaj ;
 Kaj tremegantaj patrinoj sur brustojn ekpremamis naskitojn.

- Tiam rapide al loko, en kiu signalon trompetan
 520 Donis diino, kaj, ĉie preninte armilojn, alkuras
 La kampanaroj kuraĝaj; dum Trojaj junuloj, kuradon
 Rapidigante, eliras el tendoj por helpi Askanon.
 Haltas anaroj minace. Ne estas batalo kampara,
 Kiu nur uzas pezegajn bastonojn kaj stangojn malmolajn;
- 525 Estas armiloj hakiloj duoblaj : kaj tre malproksime
 Staras nigreta rikolto de glavoj frapitaj de suno :
 Brilas kupraĵoj kaj suben de nuboj resendas rebrilon.
 Tiel do kiam unuaj blovetoj blankigas ondaron,
 Iom post iom ekŝvelas la maro, pli alten altigas
- 530 Ondojn, kaj fine el profundegaĵoj ĝis nuboj aliras.
 Antaŭ junula anaro marŝante kaj ilin ĉefante,
 Almo, unua naskito de Tiro, de sago frapita,
 Falas : ĉar fero en gorgon penetris, en vojon tra kiu
 Voĉo eliras; kaj vivon li verŝas kun multa sangfluo.
- 535 Ĉirkaŭ li falas multego da viroj, maljuna Galezo,
 Kiu sin interproponis por paco, plej justa el ĉiuj
 Homoj, plej riĉa el anoj kamparaj de lando Aŭzona;
 Ĉar kvin brutaroj da ŝafoj kaj tiom da bovoj en staloj
 Estis garditaj, kaj per cent plugiloj li plugis bienon.
- 540 Kaj dum en kampoj batalo fariĝas kun Marso egala,
 Pri plenumita promeso diino kontenta, — ĉar sangan
 Ŝi mem komencis militon, unuajn igante mortigojn, —
 Landon forlasas Hesperan : tra ventoj fluginte ĉielaj,
 Mulhumilino venkinta fiere aliras Junonon :
- 545 « Por vi, batalo kruela mortigan ekigis militon.
 Diru nun ili : « Nin kisu, ni ligo kontraktu amikan, »,
 Kiam sur virojn Trojanajn Aŭzonan mi sangon disverŝis.
 Eĉ pli ankoraŭ mi faros, se tion plenumi vi volas :
 Mi al milito limurbojn instigos per falsaj sciigoj,
- 550 Kaj de freneza deziro al Marso mi korojn bruligos.
 Helpoj de ĉie alvenos : armilojn mi semos tra kampoj. »
 Tamen Junono : « Sufiĉe da agoj teruraj kaj falsaj.
 Staras nun kaŭzoj militaj : armeoj komencis batalon :
 Sango unua sorbigis armilojn okaze trovitajn.
- 555 Tiajn edziĝon kaj ceremonion nun festu do kune
 Filo famega de bela Venuso kaj reĝo Latino.

Tamen ne volas la Patro, reganto de alta Olimpo,
 Ke vi libere nun tiel vagadu, en ventoj eteraj :
 Tial foriru. Se io okazos ne antaŭvidita,
 Mi pri ĝi zorgos. » Kaj tiel parolis idino Saturna. 560
 Tiam Alekto flugilojn etendas serpente bruantajn ;
 Kaj ŝi, lasinte ĉielon, sidejon aliras Kocitan.

Loko troviĝas, en lando Itala, sub alta montaro,
 Glora kaj fama ĉe multaj popoloj kaj landoj diversaj :
 Estas la valo Amsankta : de densa branĉaro ĝin premas 565
 Nigra arbaro duflanke : en mezo, torento bruanta
 Krutajn sonigas ŝtonegojn per ondaj turniĝoj rapidaj.
 Tie terura kaverno, fenestro de Dito kruela,
 Kuŝas kaj profundegaĵo vastega, el kiu Akero
 Superfluanta vaporojn blovas pestigajn. Erino 570
 Tien sin ĵetas ; kaj monstro ĉielon forlasas kaj teron.

Tamen reĝino, idino Saturna, ekpenas militon
 Pli perfektigi. Rapidas en urbon, el kampo batala,
 Aro paŝtista, kaj korpojn malvivajn alportas de Almo
 Juna kaj de maljuna Galezo kruele vundita. 575

Diojn preĝante, ĉi tiuj samtempe alvokas Latinon.
 Turno aperas : dum oni malbenas bruladon kaj buĉon,
 Li pligrandigas teruron : « Trojanoj ekkaptos potencon ;
 Ili edziĝos Lavinjon ; mi estas pelota el lando. »
 Tiuj ĉi, kies patrinoj frenezaj trairas arbarojn, 580
 Ĥorojn de Bako dancante — ĉar estas potenca Amato, —
 Venas de ĉie, sin are kolektas, kaj Marson lacigas.
 Ĥiuj do, malgraŭ avertoj ĉielaj kaj diaj voladoj,
 Malrespektante ordonojn, malpian postulas militon,
 Fine de reĝo Latino ŝieĝas amase palacon. 585

Kiel ŝtonego en mezo de ondoj, li staras senmova.
 Tiel ŝtonego de maro per sia masego sin tenas,
 Kiam bruege alkuras ventego, per ondoj bojantaj
 Ĝin ĉirkaŭante, dum, ĉirkaŭ ĝi vane tremegas ŝaumantaj
 Ŝtonoj, kaj rifoj, kaj maraj kreskaĵoj perforte ŝiritaj. 590
 Tamen, vidinte ke ia potenco ne povas malsaĝan
 Venki projekton, ke mano Junona direktas aferojn,
 Atestiginte altarojn de dioj, Latino la patro
 Diris : « Ve ! min nun rompegas Fataloj, forportas ventego !

595 Tiun krimegon malpian vi pagos de via sangverŝo,
 Malfeliĉuloj! Vi, Turno, suferos pro malpiegaĵo
 Punon kruelan, kaj diojn alvokos per preĝoj malfruaj.
 Pri mi, ripozon mi ĝuos; ĉar baldaŭ mi trafos havenon:
 Mankos nur morto kvieta. » Li, ne pli dirinte, enfermis
 600 Sin en palacon; kaj li direktilon de regno ellasis.

Estis kutimo en lando Hespera Latujo; kaj poste
 Ĝin kolonioj de Albo konservis; nun, monda ĉefurbo,
 Romo ĝin havas ankoraŭ, tuj kiam komencas militon
 Marso, plorindan portonte batalon al Getoj, Hirkanoj,
 605 Aŭ al Araboj, ĉu li sin direktas al Indoj kaj celas
 Liton Aŭroran, ĉu niajn standardojn li petas de Partoj.
 Estas du pordoj Militaj, — ĉar ili nun tiel nomiĝas, —
 Kiujn sanktigis pieco, kaj timo al Marso kruela.
 Ilin fermadas cent kupraj rigliloj kaj feraj fortegaj
 610 Traboj; kaj Ĵano gardisto neniam el sojlo eliras.
 Kiam do definitive militon decidis la Patroj,
 Tiam konsulo, Kvirinan vestinte togeton, zonite
 Kiel Gabioj, de pordo bruege turnigas pordhokojn.
 Li al batalo alvokas junulojn, kaj ili aplaŭdas:
 615 Dume trompetoj per raŭkaj sonoroj kunsonas anoncon.
 Tiel do estis petita Latino por ke li konigu
 Al Eneanoj militon, kaj pordojn malfermu timindajn.
 Tiun deziron plenumi rifuzis la patro, kaj reĝan
 Li forlasinte oficon sin kaŝis en ĉambron malluman.
 620 Tiam reĝino de dioj, ĉielon malsuprenirante,
 Pordojn de mano mem sia malfermis; kaj Saturnidino,
 Hokojn turninte, el feraj bariloj forpelis Militon.

Lando Aŭzona antaŭe kvieta subite flamiĝas.
 Unuj al kampoj piede aliras; aliaj tra polvo
 625 Rajdas ĉevalojn vivegajn: kaj ĉiuj petegas armilojn.
 Tiu ĉi ŝildon heligas kaj lancon glatigas, oleo
 Ilin frotante; kaj tiu sur ŝtono akriĝas hakilon.
 Ĉiuj plezure standardojn malfaldas kaj aŭdas trompeton.
 Plie, sur feraj ambosoj, kvin grandaj ĉefurboj senĉese
 630 Sagojn forĝadas, Atino potenca, belega Tiburo,
 Krustumerurbo, Ardeo, kaj turoportanta Antemno.
 Jen protektilon por kapo kavigas ĉi tiu; jen tiu

Ŝildon konstruas per branĉoj salikaj; alia arĝentajn
 Metas plataĵojn sur glatan kirason kaj kupran gamaŝon.
 Ĉiuj plugilon, falĉilon, ve! ne plu honoras, malŝatas [noj. 635
 Kampajn laborojn, kaj glavojn de patroj retremas en for-
 Tamen sonoras trompetoj : jam ĉefoj konigis ordonojn.
 Tiu ĉi kaskon rapide ekprenas; kaj tiu fervorajn
 Jungas ĉevalojn, kirason el oraj trimaŝoj faritan
 Vestas kaj ŝildon, kaj glavon fidelan sur flankon alligas. 640

Nun Helikonon malfermu, Diinoj, kaj kanton komencu.
 Kiaj regnestroj kunfaris militon? kaj kiaj armeoj
 Kampojn kun ili plenigis? Heroojn jam naskis Itala
 Laŭdo, patrino de viroj; jam ili kuraĝe batalis.
 Kantu : vi tion memoras, Diinoj, kaj povas rakonti : 645
 Ĉar ĝis ni famo malforta apenaŭ blovete penetris.

Venis unua de bordoj Tirenaj Mezenco kruela,
 Malestimanta diaĵojn; kaj multajn li armis soldatojn.
 Apud li Laŭzo la filo troviĝas, pli bela ol ĉiuj.
 Tameĝ mi Turnon esceptas, naskitan en urbo Laŭrenta. 650
 Laŭzo, la ĉevaldresanto, ĉasisto de bestoj sovaĝaj,
 Ĉefas mil mirojn : sed ili lin sekvis el Agilinurbo
 Vane : ĉi tiu kuraĝa junulo meritis pli dolĉan
 Ĉefon, kaj patron pli human ol reĝon malmolan Mezencon.

Jen Aventino belega, la ido de bela Herkulo, 655
 Kiu postiras, sur ĉaro kronita de branĉoj triumfaj,
 Kaj de ĉevaloj venkintaj tirita : sur ŝildo vidiĝas
 Hidro simbola de patro, zonita de multaj serpentoj.
 Sur Aventino, arbara monteto, kun dio kuniĝis
 Reo pastrino, mortema virino : lin poste sekrete 660
 Naskis patrino, post kiam Gerion mortigis venkinta
 Dio, post kiam, Laŭrentan trafinte kamparon, purigis
 Terintheroo Iberajn bovviroj en ondoj Tirenaj.
 Ferajn bastonojn kaj lancojn mallongajn portante, kunuloj
 Liaj batalas per ronda pikilo kaj pinto Sabela. 665
 Piedirante, zonite de felo de granda leono,
 Kiu de densaj haregoj, de blanka dentaro terura,
 Kapon de viro superas, li reĝan eniras palacon,
 Tute timinda, mantelon Herkulan vestinte sur ŝultroj.
 Poste aperas du fratoj venintaj el urbo Tibura. 670

Nomo de gento devenas de nomo de frato Tiburto.

Estas Katilo kaj brava Koraso, junuloj Argujaj,

Kiuj, tra sagoj flugantaj, rapidas al vico unua.

Tiel nubidaj Centaŭroj malsupren de alta montaro

675 Iras, dum lasas Homolon kaj neĝan Otrison ilia

Kuro rapida; perforte sin densa malfermas arĥaro

Antaŭ irantoj, dum krakas branĉetoj kun granda frakaso.

Same ĉi tie vidiĝas fondanto de urbo Prenesta,

Reĝo Cekulo, trovita en fajro kaj filo Vulkana.

680 — Tion kredadis jarcentoj. — Lin inter brutaroj edukis

Kampaj paŝtistoj. Multega lin aro kampara kuniras;

Viroj de alta Prenesto kaj viroj de kampoj Gabinaj,

Junonpreĝantoj; kaj de malvarmeta Anio; de ŝtona

Lando Hernika malseka, loĝantaj en dia Anagno,

685 Ĉe Amazena rivero. Sed ĉiuj ne havas armilojn :

Ŝildoj kaj ĉaroj ne bruas : dum kuglojn el plumbo nigreta

Unuj ĵetegas, aliaj nur portas en mano du lancojn.

Ili kovrilon el felo brunruĝa de lupo sur kapon,

Kiel ĉapelon, surmetas, dum nude piedon maldekstran

690 Ili prezentas kaj kovras la dekstran per ledo senarta.

Tamen jen estas Mesapo, la ĉevaldresanto kuraĝa,

Filo Neptuna : lin povas haltigi nek fajro nek fero.

Gentojn kvietajn de tempo jam longa, kaj sekve militon

Malkutimintajn, li vokis subite, kaj glavon reprenis.

695 Sekvas lin bandoj de Fescenianoj, de Ekoj-Faliskoj,

Kiuj kulturas Soraktan montaron kaj kampon Flavinan,

Lagon kaj monton Ciminan kaj sanktajn arbarojn Kapenajn.

Ili aliras laŭ vicoj egalaj kaj reĝon laŭdadas.

Tiel do cignoj neĝblankaj, flugante tra nuboj malsekaj,

700 Kiam ĉi tiuj forlasas paŝtejon, el koloj longegaj

Sonojn eligas agrablajn : rivero kaj lago Azia

Ilin ripetas, frapitaj.

Ŝajnas ke tiuj anaroj ne estas militaj korpusoj

Kuproarmitaj, sed nubo aera el birdoj raŭkvoĉaj,

705 Kiuj forlasis maralton, kaj bordon aliras rapide.

Estas nun Klaŭzo, de sango antikva Sabina : li ĉefas

Grandan armeon : sed sola li grandan valoras anaron :

Kaj li, tra lando Latuja, de raso Klaŭdia vastigis

- Genton, post kiam en Romo Sabinoj egaligis Romanojn.
 Amiternanan korpuson kuniras Kviritoj antikvaj; 710
 Viroj de lando Eretra, de olivportanta Mutusko,
 Kaj Nomentanoj, kaj anoj Rozeaj, ĉe bordo Velia;
 Viroj loĝantaj ŝtonegojn Tetricajn kaj monton Severon,
 Kaj Kasperion, kaj urbon Forulan, kaj ondon Himelan;
 Viroj trinkantaj Fabaron kaj Tibron; kaj viroj senditaj 715
 De Nusiurbo; kaj Hortoj rajdantaj; kaj gentoj Latinaj;
 Fine, loĝantoj Alian riveron, je nomo malgaja.
 Estas ne malpli sennombraj ondegoj de maro Libuja,
 Kiam Orio ventega dum vintro sin kaŝas sub akvojn;
 Spikoj de densaj rikoltoj brulitaj de suno varmega, 720
 Meze de Hermaj plugaĵoj, de flavaj kamparoj Libujaj.
 Ŝildoj resonas, kaj tero tremegas sub frapoj piedaj.
 Jen malamiko al nomo Trojana kaj Agamemnido.
 Ĉefo Halezo, al ĉaro junginte ĉevalojn, al Turno
 Sendis mil gentojn sovaĝajn: unuaj kulturis Masikan 725
 Vinberujmonton; aliaj elvenas el altaj Aŭruncaj
 Montoj, kaj kune iliaj najbaroj senditaj de patroj
 Sidicinanaĵoj; kaj viroj loĝantaj Kaleson; kaj tiuj
 Kiuj elvenas el bordo sablhava Vulturna; kaj same
 Oskoj kaj Satikulanoj kruelaj. Mallongan kaj rondan 730
 Ili manumas pikilon, ligitan per mola rimeno;
 Kaj de proksime batalas per glavo kaj ŝildo maldekstra.
 Certe, en mia kantado mi ne vin forgesos, Ebelo.
 Oni rakontas ke naskis vin Telo kaj nimfo Sabeto,
 Kiam li regis Kaprean insulon kaj Teleboanojn, 735
 Jam maljunulo. Trovinte ke regnoj de patro ne estis
 Por vi sufiĉaj, vi premis potence Sarastajn popolojn
 Tre malproksimajn, loĝantajn sur bordo de Sarna rivero,
 Poste Rufranojn, kaj virojn Batulajn, kaj anojn Celenajn,
 Fine urbanojn de alta Abelo la pomoportanta. 740
 Laŭ maniero Teŭtona ĉi tiuj ekĵetas lancegojn,
 Kapon kovrante de ĉapo farita el ŝelo de korko.
 Ŝildoj el kupro brilegas, kaj brilas la glavoj el kupro.
 Kaj vin, Ufenso, feliĉa pro famo de gloraj armeoj,
 Ankaŭ alsendis al sanga batalo la monta Narsurbo. 745
 Ekajn anarojn vi ĉefas sovaĝajn: ĉi tiuj kutimas

- Ĉasi tra densaj arbaroj, en malfruktoporta kamparo.
 Ili kulturis armataj, sed ĉiam deziras en koroj
 Novan forpreni akiron por vivi de ŝtelo kaj rabo.
- 750 Same alvenis de Marubiurbo la pastro de dioj,
 Umbro kuraĝa, sendita de reĝo Arkipo : li kaskon
 Kovris per branĉoj feliĉaj de olivportanta kreskaĵo.
 Rason viperan kaj hidrojn malbonodorege spirantajn
 Li senmovigi en dormon kutimis per mano kaj kantoj,
 755 Kaj kvietigi kolerojn, kaj mordojn per arto kuraci.
 Tamen de lanco Dardana faritan ne povis vundegon
 Li resanigi; nek dormodonantaj kantadoj, nek herboj,
 Kiujn li tranĉis sur Marsaj montaroj, ĝin povis fermigi.
 Ploris vin Anguitia arbaro, kaj ondo Fucina
- 760 Vitrosimila, kaj lagoj fluidaj.
 Kaj Hipolita naskito, Virbio belega, militon
 Same aliris; ĉar lin Aricio alsendis patrino,
 Lin edukitan en Egerinimfaj arbaroj, kaj apud
 Bordo malseka, ĉe grasaj altaroj de bona Diano.
- 765 Ĉar Hipolito, al morto sendita de duopatrinaj
 Ruzoj, post kiam li patran punegon plenumis per sango,
 — Lin timigitaj rompegis ĉevaloj, — sub astrojn eterajn
 Ree alvenis, kaj spiris denove ĉielan aeron :
 Vivon redonis sanherboj Peonaj kaj amo Diana.
- 770 Ĉiopotenca sed Patro kolera, ĉar homo mortema
 Resupreniris al lumo kaj vivo el lokoj Inferaj,
 Volis, per frapo de fulmo, en Stiksan ĵetegi riveron
 La elpensinton de arto kuraca, la filon de Febo.
 Tamen Trivio bonkora en lokojn ekkaŝis sekretajn
- 775 ldon Tezean, profunden de Egerinimfa arbaro.
 Tie ĉi, li, nekonata kaj sola, en lando Itala
 Vivon daŭrigas : kaj nomo ŝanĝita fariĝis : Virbio,
 Oni pro tio el templo Trivia kaj sanktaj arbaroj
 Kornopiedajn forpelas ĉevalojn : ĉar ili sur bordo,
- 780 Terurigitaj de monstro, junulon kaj ĉaron renversis.
 Filo ne malpli kuraĝa tra kampoj direktas ĉevalojn
 Kure fervorajn : kaj ĉaro rapidas al sanga milito.
 Inter unuaj ĉefantoj klopodas, tenante armilojn,
 Turno grandkreska : li ĉiujn aliajn je kapo superas.

kasko tre alta tri faskojn haregajn kaj grandan Ĥimeron 785
Portas; kaj Etnajn ĉi tiu elĵetas el buŝo fajrerojn.

Ju pli batalo grandiĝas kaj teron de sango surverŝas,
Des pli ĝi forte tremegas kaj flamojn ekvomas terurajn.
Oron de ŝildo glatega ornamas, per kornoj levitaj,
Io, jam tute kovrita de haroj, jam tute bovino, 790

— Montra pentraĵo! — kaj Argo, gardanto de tiu knabino,
Fine Inako la patro el urno verŝante riveron.

Sekvas lin nubo el piedirantoj; en kampoj densiĝas
Ŝildoarmitaj soldatoj: jen estas junuloj Argujaj, 795

Anoj Aŭruncaj, Rutuloj, kaj flanko maljunaj Sikanaj,
Bandoj Sakranaj, kaj ŝildoj pentritaj de viroj Labikaj,

Kaj kulturantoj de Tibraj kamparoj, de sankta Numika
Bordo, kaj anoj plugantaj Rutulajn montetojn kaj Circan

Monton: ĉe tiu ĉi lando potencas Anksura Jupitero;
Kaj Feronio ĝojadas en verda kaj sankta arbaro. 800

Kuŝas ĉi tie nigreta marĉejo Saturaj; kaj vojon

Serĉas tra valoj malvarma Ufensoj, por maron aliri.

Tiujn postirās Kamilo, virino de Volska nacio.

Ĉefas korpuson radjantan kaj bandon pro kupro brilantan
Batalantino: ŝpinaĵon kaj korbon Minervan ne ŝiaj 805

Manoj kutimis; militon suferi malmolan pli amas

La virgulino, kaj venton egali per kuro pieda.

Ĉar ŝi, kurante sur herboj, ne supran kurbigus rikolton,

Kaj, en kurado senhalta, ŝi spikojn ne vundus malfortajn:

Eĉ ŝi, sur mezo de maro kaj inter ondegoj muĝantaj, 810

Vojon daŭrigus; kaj plandojn rapidajn ŝi ne malsekigus.

Por ŝin ekvidi, el domoj kamparaj eliras junuloj:

Alirantinon admiras silente patrinoj, kaj, buŝojn

Malfermegante pro miro, purpuran rigardas mantelon

Reĝan, metitan sur ŝultroj glatetaj, oratan hoketon, 815

Kiu alligas hararon, sagujon Lician portitan

Flanke, kaj mirton kamparan fiksitan sur fera pikilo.

KANTO OKA

- Kiam sur muron de urbo Laŭrenta militan standardon
 Turno ekplantis, kaj kiam bruantaj sonoriz trompetoj,
 Tiam vivegajn li jungas ĉevalojn kaj glavon agitas.
 Koroj ekbatas subite : samtempe kun granda tumulto
- 5 Tuta Latujo sin levas amase, kaj la junularo
 Tuj freneziĝas; dum ĉefoj precipaj, Mesapo, Ufenco,
 Malrespektanto al dioj Mezenco, de ĉiuj petegas
 Helpon, kaj vastan je kulturigistoj senigas kamparon.
 Ili, por peti kunhelpon, eksendas Venulon al urbo
- 10 De Diomedeo grandfama, por diri : « Trojanoj Latujon
 Venis; Eneo, Penatojn sur ŝipoj portante venkitajn,
 Tien aliris; li diras ke al li rezervis Fataloj
 Regnon; kun tiu ĉi viro nun multaj kuniĝas popoloj;
 Kaj malproksimen li nomon vastigas tra lando Latuja.
- 15 Kion enhavas projektoj? kaj, se lin Fataloj favoras,
 Kion li revas per nova milito? » Sed ĝin Diomedeo
 Multe pli klare suspektas ol reĝoj Latino kaj Turno.
 Tiel tra lando Latuja. Sed, tion vidinte, heroo
 Troja sin sentis naĝanta en granda turniĝo ĉagrena :
- 20 Penso rapide ĉu tien ĉi flugas kaj poste ĉu tien :
 Li sanĉeliĝas al malaj projektoj, sin turnas al ĉiuj.
 Tiel, en vazo el kupro, sur akvon rebrilas tremanta
 Lumo de suno aŭ nokte de luno brilanta; ĝi flugas
 Tre malproksimen al ĉiuj objektoj; kaj fine aeren
- 25 Ĝi supreniras, por frapi skulptaĵojn de alta plafono.
 Nokto fariĝis; kaj bestojn lacegajn tra tuta kamparo,
 Birdojn kaj genton brutaran kuŝigis dormego potenca,
 Kiam, sub arko ĉiela, kaj apud rivero malvarma,
 Patro Eneo kuŝiĝis, pro tiu malgaja milito
- 30 Priokupata, kaj donis al membroj malfruan ripozon.

- Tiam la dio de loko, la Tibro je dolĉaj ombraĵoj,
 Inter branĉetoj de poploj vizago ekmontris maljunan.
 Verda vestaĵo el lino maldika lin kovris, dum harojn
 Krono el kanoj ĉirkaŭis, kaj frunton vualis per ombro.
- Tiam li tiel parolis : kaj diroj forpelis ĉagrenon : 35
- « Ido de dia deveno, vi kiu Trojurbon reprenis
 El malamikoj, kaj ree eternan konservas Pergamon,
 Lando Laŭrenta kaj kampoj Latinaj vin kore atendas.
 Tie do restu, ĉar tie fiksiĝos Penatoj kaj domo :
 Kaj minacantan ne timu militon; ĉar ĉiun koleron, 40
 Ĉiun malamom delasis diaĵoj.
- Kredu min : vanan averton ne naskas dormego : ĉar baldaŭ
 Grandan vi trovos porkinon sub kverkoj de bordo kuŝantan,
 Blankan, kun tridek porkidoj blanketaĵ kaj nove naskitaj,
 Kiuj sur sablo al mamoj patrinaj por suĉi rapidos. 45
 Tie ĉi urbo stariĝos, kaj viaj finiĝos laboroj.
- Tie, pri tio, kaj post tridekfoja reveno de jaroj,
 Vondos Askano Alburbon la Longan, je nomo famega.
 Mine rakontas mensogojn. Nun aŭdu : per vortoj malmultaj,
 Kiajn rimedojn vi uzos por venki mi al vi konigos. 50
 Viroj Arkidaj, naskitaj de raso Palasa, fidelaj
 Anoj de reĝo Evandro, lin sekvis kaj lian standardon.
 Poste li lokon elektis, kaj urbon konstruis sur monto,
 Kiun, pri nomo de avo Palaso, li nomis : Palanto.
- Kontraŭ nacio Latina ĉi tiu senĉese batalas. 55
 Novajn armitojn al viaj kunuloj alligu per ĵuro.
 Inter rivera bordaro ŝiparon mi vian kondukos
 Rekte, kaj helpos remistojn por fluon venkadi kontraŭan.
 Iru do, filo diina : kaj kiam kuŝiĝos astraro,
 Preĝu Junonon, laŭ sankta kutimo; per riĉaj oferoj, 60
 Vi senarmigu koleron danĝeran. Nur vi min honoros,
 Kiam vi estos venkinta. Mi estas ĉi tiu rivero,
 Kiu, plenborde fluante, tra grasaj verŝiĝas kamparoj,
 Tibro lazura. Pli amas min dioj ol ĉiujn aliajn :
 Estos ĉar mia loĝejo kapego de urboj plej famaj. » 65
- Diris Rivero, kaj poste sin kaŝis en ondon profundan,
 Groton petante; dum nokto kaj dormo forlasis Eneon.
 Li sin eklevas, de suno etera rigardas radiojn,

- Al Oriento, ekĉerpas, laŭ sankta kutimo, riveran
 70 Ondon, per mana kavaĵo, kaj tiel preĝante parolas :
 « Nimfoj Laŭrentaj, ho Nimfoj, de kiuj naskiĝis Riveroj,
 Kaj vi, ho Tibro, ĉe bordo de via rivero sanktega,
 Patro, akceptu Eneon ; for de li forpelu danĝerojn.
 Kiaj ajn estas lageto de kiu defluas rivero,
 75 Tero de kiu ĝi bela devenas, ĉar vi min kompatis,
 Ĉiam per donoj kaj preĝoj mi vian honoros diecon,
 Kornoportanta Rivero, reganto de ondoj Hesperaj.
 Estu favora : per agoj pli certaj certigu promeson. »
 Tiel dirinte, li tuj en ŝiparo du ŝipojn elektas,
 80 Metas remilojn en ilin, kaj armas samtempe kunulojn.
 Tamen jen estas miraklo subita kaj vere mirinda!
 Blankan porkinon kaj ĝian idaron blanketan samtempe,
 Inter arbaro, li vidas, kuŝantan sur bordo verdanta.
 Al vi, Junono, al vi mem ĉi tiun prezentas oferon
 85 Pia Eneo, kaj buĉas porkaron sur via altaro ;
 Kaj kvietigis fluadon, dum tuta daŭrigo de nokto,
 Tibro atentā, kaj sian ondaron haltigis silentan :
 Ĝi nun similas al marĉo trankvila, al lago ebena,
 Por ke remistoj penantaj akvaron facile sulkadu.
 90 Ili do vojaĝon rapide komencas kun ĝojaj kriadoj.
 Glitas sur akvo abio gudrita : kaj ondoj kaj same
 Nekutimintaj arbaroj admiras, sur ŝipoj pentritaj,
 Ŝildojn brilantajn de viroj naĝantaj en ombro rivera.
 Ĉiuj kunuloj, dum nokto kaj tago, senlace remadas,
 95 Longajn kurbiĝojn laŭiras riverajn, kovrite de arboj
 Multaj, kaj verdajn tranĉetas arbombrojn sur ondo trank-
 Suno flamanta troviĝis en meza ĉielo, tuj kiam [vila.
 Ili ekvidas dometojn maldensajn, altaĵon kaj muron,
 Kiujn posedis la reĝo malriĉa Evandro, kaj kiujn
 100 Nun plialtigis ĝis astroj eteraj la Roma potenco.
 Ili deturnas ŝipnazojn, kaj urbon tuj alproksimiĝas.
 Reĝo Arkida okaze per piaj oferoj honoris,
 Antaŭ urbeto, en sankta arbaro, diaĵojn kaj idon
 Amfitrionan ; dum filo Palaso, kaj ĉiuj junuloj,
 105 Fine senato malriĉa kuniĝis por bruli parfumojn
 Antaŭ altaroj : kaj sango varmeta sur ili fumiĝis.

Tiam vidinte remŝipojn, tra ombra arbaro naĝantajn,
 Dum sin kurbigas silente maristoj sur longajn remilojn,
 Ili pro timo subite ektramas; kaj ĉiu forkuras,
 Tablojn lasinte. Sed brava Palaso ne volas ke estu 110
 Interrompitaĵoj : li sagon ekprenas kaj flugas.
 De malproksime, sur monto : « Junuloj, pro kio vojiron
 Vi nekonitan ekprovas? kaj kien vi iras? li diris.
 Kiaj nacio kaj domo? ĉu pacon vi portas, ĉu glavon? »
 Tiam parolis Eneo la patro, sur alta ferdeko; 115
 Dum olivujan li branĉon prezentis, simbolon de paco :
 « Estas ni Trojoj, kaj sagojn rezervas por fremdaj Latinoj,
 Kiuj minacas migrantojn per sanga milito maljusta.
 Reĝon ni petas Evandron. Do, iru kaj diru : « Precipaj
 Ĉefoj Dardanaj ĉi tien alvenis por peti helpadon. » 120
 Nomon famegan aŭdinte, Palaso stariĝis senmova :
 « Malsupreniru vi, kiu ajn estas, li diris; kun patro
 Interparolu; kaj gaste ĉe niajn sidiĝu Penatojn. »
 Poste li manon prezentas kaj manon kunpremas Enean :
 Ili eniras en sanktan arbaron, kaj lasas riveron. 125
 Tiam Eneo kun reĝo parolas per vortoj amikaj :
 « Reĝo, plej bona el Grekoj, vin mia Fatalo devigas
 Peti, kaj branĉojn prezenti kovritajn de sanktaj rubandoj.
 Nu, mi ne timis, ĉar estas vi reĝo Arkida kaj Greka,
 Ĉar kun Atridoj vin iam kunligis parencaj ligiloj : 130
 Sed min instigis bonfido, ordono sanktega de dioj,
 Samaj prapatroj, kaj via famego tra mondo konita,
 Min kun vi ligi, kaj vole Fatalan obei dekretan.
 Patron Dardanon, unuan kreinton de urbo Ilia,
 Naskis Elektro, idino de Atlo; se Grekojn ni kredas. 135
 Li ĉe Trojanojn alvenis. Do Atlo grandega Elektron
 Naskis, li kiu sur ŝultroj eteran portadas arkaĵon.
 Via prapatro sed estas Merkuro : Maio plaĉinda
 Lin gravediĝis kaj naskis sur monto malvarma Cileno.
 Tamen Maio, laŭ la tradicio, de Atlo naskiĝis, 140
 Atlo mem, tiu ĉi kiu ĉielan subtenas astraron.
 Tiel do niaj du rasoj devenas de unu nur sango.
 Mi do, pro tio, deziris, por sondi intencojn, nek sendi
 Ambasadorojn, nek ruzojn ekprovi : mi min mem kaj mian

- 145 Kapon alportis, kaj venis preĝante al viaj landlimoj.
 Sama nacio Rutula de sama milito kruela
 Nin persekutas : ĝi kredas ke se ĝi min povos forpeli,
 Tiam ĝi landon Hesperan premegos per jugo potenca
 Tutan, de maro supera ĝis maro infere kuŝanta.
- 150 Ĵuron akceptu kaj donu. Mi havas, por fari militon,
 Fortajn animojn kaj brustojn kuraĝajn de bravaj junuloj. »
 Tiel parolis Eneo. Sed de parolanto okulojn,
 Frunton kaj tutan personon de longe Evandro rigardis :
 Fine li diras mallonge : « Plej forta el ĉiuj Trojanoj,
- 155 Kiel korege mi nun vin akceptas ; ĉar kiel de patro,
 Granda Anĥizo, vizaĝon kaj voĉon mi ĉe vi retrovas !
 Laomedidon Priamon mi bone memoras : li iam,
 En Salaminon veninte, por regnon viziti fratinan
 De Heziono, ĝis limoj malvarmaj aliris Arkidaj.
- 160 Tiam sur vangoj ekkreskis unua florado juneca.
 Mire mi ĉefojn admiris Trojanajn, admiris precipe
 Laomedidon : sed tamen pli alte ol ĉiuj Anĥizo
 Staris : kaj brulis animo de granda deziro junula
 Interparoli kun viro, kaj manon kunplekti kun mano.
- 165 Mi lin aliris, kaj ĝoje ĝis muroj kondukis Feneaj.
 Forveturonta, li sagojn Liciajn kaj riĉan sagujon
 Al mi donacis, kaj veston broditan per oraj fadenoj,
 Kaj enbuŝaĵojn el oro : nun ilin Palaso posedas.
 Mi ja kunligon de vi deziritan per mano jam ligis.
- 170 Morgaŭ do, kiam unuaj radioj ekbrilos al tero,
 Mi vin forsendos, pro helpo ĝojantan, kaj arme subtenos.
 Tamen, ĉar tien vi venis amike, kun ni ĉiujaran
 Tiun piaĵon festadu fervore, ĉar ĝin tro prokrasti
 Estus malpie : do tablon amikan sidiĝi kutimu. »
- 175 Tiel li diris : manĝaĵojn kaj plenajn kalikojn remeti
 Li tuj ordonas sur tablojn ; dum virojn li lokis sur herbajn
 Seĝojn, li poste sidigas Eneon sur liton, per felo
 De haregriĉa leono kovritan, el ligno faritan.
 Tiam precipaj junuloj kaj pastro de sankta altaro
- 180 Vete alportas viandon rostitan de bovoj, plenigas
 Korbojn je donoj Ceresaj, kaj Bakan ekverŝas likvoron.
 Manĝas Eneo kaj ĉiuj junuloj Trojanaj la tutan

Dorson de bovo, kaj aĵojn intestajn ofere donitajn.

Ili malsaton forpelis kaj trinkan satigis bezonon.

Tiam parolis Evandro : « Nu; al ni ĉi tiun piaĵon, 185

Tiun festenon kutiman, altaron de tia diaĵo,

Nek superstiĉo, nek vana forgeso de dioj antikvaj,

Trudis; kruelajn ni iam evitis danĝerojn, Trojana

Gasto, kaj ni, pro dankeco, pagotajn plenumas honorojn.

Vidu unue ĉi tiun ŝtonegon el rifoj pendantan, 190

Masojn ĵetitajn ĉi tien kaj tien, sur monto dezerta

Domon starantan, kaj vastan ruinon el ŝtonoj falintaj.

Tie, en kavo vastega, troviĝis profunda kaverno,

De duonviro loĝita, de Kako la monstro terura,

Ne alirebla al sunaj radioj : de nova buĉado 195

Ĉiam la tero fumiĝis; sur pordo mortiga fiksitaj,

Kapoj de homoj pendadis, palegaj kaj ruĝaj pro sango.

Estis Vulkano naskinta la monstron : kaj vomis el buŝo

Fajrojn timindajn de patro ĉi tiu kruela giganto.

Fine alvenis la tago en kiu Fataloj permesis 200

Ke nin protektu kaj helpu diaĵo. Ĉar venis Alcido,

Granda venĝisto, fiera pri morto kaj riĉaj akiroj

De la trikorpa Gerio. Ĉi tiu venkinto kondukis

Grandajn bovirojn : kaj bovoj loĝadis riveron kaj valon.

Penso freneza tuj Kakon okupas : li, kiu kutimis 205

Ĉiujn imagi krimegojn kaj eblajn ekprovi ŝteladojn,

Rabas sukcese el staloj kvar bovojn je kapo belegajn,

Poste kvar junajn bovinojn superajn per formo gracia :

Kaj, por ke rektaj postsignoj de paŝoj ne montru direkton,

lin per voŝto li tiras al groto; — do montrás paŝsignoj 210

Malan direkton, — kaj ilin enfermas en kavon malluman.

Iu serĉante per montro nenia suspektus kavernon.

Dume, el staloj brutaron satitan eligis la filo

Amfritriona : sed, dum li de bovoj preparas foriron,

Brutoj subite blekegas; kaj tutan plenigas arbaron 215

Muĝoj iliaj, dum eĥo montetojn sonigas proksimajn.

Unu el bovoj kaŝitaj en vasta kaverno respondis,

Brue blekante, kaj trompis esperon de Kako gardanta.

Tiam freneza kolero naskiĝas en koro Alcida :

Tuj li en mano ekprenas armilojn kaj kverkan bastonon 220

- Lignotuberan, kaj celas monteton per fluga kurado.
 Unuafuje ni vidas de Kako paliĝi vizaĝon,
 Kaj malklariĝi okulojn : kurante pli forte ol Eŭro,
 Groton li trafas ; ĉar timo flugilojn alligis al plandoj.
- 225 Li sin enfermas kaj tuj ekfaligas pezegan ŝtonegon,
 Kiun detenis ĉenegoj el fero, de patro forĝitaj :
 Antaŭ pordegoj ĝi pendas, kaj ilin de maso protektas.
 Sed furioza jen Tirintheroo : rapide li kuras,
 Tien kaj tien direktas okulojn, kaj serĉas eniron,
- 230 Dentojn grincante. Trifoje, flamanta de granda kolerio,
 Li Aventinan esploras monteton ; trifoje li pordon
 Provas ŝanceli ŝtonegan ; trifoje li laca sidiĝas.
 Staris, sur dorso kaverna, ŝtonego, de ĉie aparta,
 Kruta kaj pinta, el kiu rigardoj tra lando vastiĝis,
- 235 Tre oportuna al birdoj rabemaj por meto de nestoj.
 Sed li, ĉar pinto de rifo kliniĝis maldekstren al Tibro,
 Dekstren ĝin puŝas, ĝin skuas kontraŭe, ĝin poste el teraj
 Elradikigas fundejoj, movegas, kaj fine renversas.
 Falas ŝtonego ; kaj falo bruege sonigis aeron :
- 240 Bordoĵ tremegis, kaj terurigita reiris rivero.
 Tiam aere kavaĵo kaj granda palaco de Kako
 Estas vidataj ; kaj funde aperas mallumaj kavernoj.
 Same se tero, sin malfermante perforte, Inferajn
 Lokojn vidigus profundajn, kaj regnon de Ombroj palegaj,
- 245 Malamegitan de dioj, subite grandega aperus
 Profundegaĵo, kaj Manoj tremegus vidante sunlumon.
 Sed, surprizita de tiu heliĝo tre neatendita,
 Kako en kava ŝtonego sin kaŝis, kaj strange kriegis,
 Dum lin el supre per saĝoj premegis Alcido ; ĉar, ĉion
- 250 Kiel armilon kaptinte, li ŝtonojn kaj branĉojn ĵetegis.
 Sed li, ĉar li per forkuro ne povas eviti danĝeron,
 Fumon el gorĝo ekvomas densegan, — rakonto mirinda! —
 Kiu subite de nigra malhelo plenigas domegon,
 Antaŭ okuloj Herkulaj lin kaŝas, kaj funde de groto
- 255 Nokton densigas fumegan, mallumon miksitajn de fajroj.
 Teni ne povis Alcido koleron ; per salto rapida
 Li sin ekĵetis en fajron, ĵus kien densiĝas turniĝoj
 Fumaj plej forte, kaj kavon plenigas je nubo plej dika.

Kakon vomantan en nigra mallumo senfruktan bruladon
Forte li ligas per brakoj potencaj, okulojn eligas 260

El okulejoj, kaj sangon haltigas en gorgo sekega.

Poste li pordojn disrompas por domon lumigi malluman.

Bovoj rabbitaj, akiroj mensoge neitaj, plenlume

Tiam aperas ; dum li malvivulon senforman eksteren

Per la piedoj ektrenas. Ne povas satigi vidantojn 265

Terurigantaj okuloj, vizaĝo, kaj brusto harplena,

Kaj estingitaj fajraĵoj en gorgo de duonbestulo.

Naskis festaĵojn ĉi tiu venkego, kaj ĝoje genepoj

Tagon observis : kaj Poticianoj ekkreis piaĵojn.

Pinarianoj, zorgante pri religiaĵoj Herkulaj, 270

Tiun altaron en sankta arbaro starigis : kaj ĉiam

Oni ĝin nomos Maksima, ĉar ĉiam ĝi estos plej granda.

Tial vin levu, junuloj : pro danko ne tiu servego,

Fruntojn ekkronu verdaĵe, kaj mane ekprenu kalikojn ;

Dion alvoku komunan, kaj vinajn verŝadu piaĵojn. » 275

Diris li : kaj dukolorajn foliojn Herkulajn zoninte

Ĉirkaŭ tempioj, li harojn ombrigas de verdaj branĉetoj :

Poste per mano li sanktan plenigas kalikon. Rapide

Ĉiu sur tablon ekverŝas trinkaĵon, kaj preĝas diaĵojn.

Dume deklivon Olimpan Vespero jam alproksimiĝis : 280

Jam Poticio ĉefanta kaj pastroj majeste aliris,

Ĉiu vestite de feloj kutimaj, kaj torĉojn portante.

Ili preparas festenon, sur tablon gajigan bongustajn

Metas manĝaĵojn, kaj kovras altaron per plenaj teleroj.

Tiam Salioj, kun fruntoj kronitaj de poplaj branĉetoj, 285

Alproksimiĝas altaron flamantan kaj kantas sankthimnojn.

Tie ĉi ĥoro junula kaj tie grizbarba, kantante,

Laŭdojn kaj agojn rakontas Herkulajn : jen kiel per mano

Li du serpentojn mortigis, senditajn de duonpatrino ;

Kiel, en gloraj militoj, li urbojn detruis famegajn, 290

Ĉu Ekalion, ĉu Trojon ; kaj kiel, sub reĝo Eŭristo,

Li mil laborojn suferis danĝerajn, ĉar lin persekutis

Granda Junono maljusta : « Vi, nevenkeblulo, mortigis

Mane Hileon kaj Falon, dumembrajn nubidojn, kaj Kretan

Monstron, kaj grandan leonon loĝantan sub rifo Nemea : 295

Stiksan vi lagon tremigis kaj Orkan pordiston, kuŝantan

- Funde de sanga kaverno, sur ostoj duone manĝitaj.
 Vin terurigis neniu vizaĝo, eĉ granda Tifeo
 Fortajn portanta armilojn : kaj via ekgesto rapidis,
 300 Kiam vin hidro Lernea ĉirkaŭis per kapoj multegaj.
 Vera naskito Jupitra, saluton, ornamo Olimpa :
 Nun nin kaj viajn aliru sanktaĵojn kun koro favora. »
 Ili per kantoj festante Herkulon ne tamen forgesis
 Kakan kaverton kaj monstron spirantan el buŝo fajraĵojn.
 305 Tuta arbaro kunsonas de bruo, kaj tremas montetojn.
 Sed ĉeestantoj, tuj kiam piaĵaj finiĝis oferoj,
 Urbon reiras. Ĉar lin maljuneco pezigis, la reĝo
 Sin sur Eneon kaj filon kunule marŝante apogis,
 Kaj per diversaj rakontoj de vojo ĉarmadis longecon.
 310 Miras Eneo kaj ĉien scivolajn direktas okulojn,
 Ĉirkaŭ li : poste li lokojn admiras, pri viroj antikvaj
 Historiaĵojn ekpetas, kaj ilin aŭskultas atente.
 Tiam Evandro la reĝo, fondanto de Roma altaĵo :
 « Faŭnoj kaj Nimfoj enlandaj loĝadis en tiuj arbaroj,
 315 Raso homforma, naskita de trunkoj kaj kverkoj malmolaj.
 Ili ne havis regulojn kaj leĝojn ; kaj ili ne sciis
 Jungi bovviroj, kolekti riĉaĵojn kaj ŝpari provizojn :
 Sed de hazarda ĉasado kaj fruktoj devenis nutraĵo.
 Tamen el alta Olimpo unua alvenis Saturno,
 320 Kiu Jupitrajn forkuris armilojn kaj regnon rabitan.
 Tiam li genton, tra montoj arbhavaj sovaĝe vagantan,
 Tien kolektis ; kaj, leĝojn doninte, li nomis « Latujo »
 Tiun kamparon ; ĉar certan ĉi tie li trovis rifuĝon.
 Oraj jarcentoj famegaj sub tiu ĉi reĝo fluadis,
 325 Tiel en paco kvietaj popolojn li regis feliĉajn.
 Baldaŭ jarcento fariĝis pli suba kaj pli senkolora ;
 Kaj ve ! naskiĝis frenezoj militaj kaj profitdeziroj.
 Tiam Aŭzonaj alvenis popoloj kaj gentoj Sikanaj.
 Dume de tero Saturna la nomo oftege ŝanĝiĝis.
 330 Fine alvenis la reĝoj kaj Tibro, kruela giganto :
 Estas nomita de tiu ĉi nomo rivero Itala,
 Tibro ; kaj sekve antikvan alnomon ĝi perdis « Albulo ».
 Min do, el mia patrujo pelitan ĝis limoj de maro,
 Ĉiopotencaj diaĵoj kaj neevitebla Fatalo

Puŝis al tiuj ĉi bordoj : de Nimfo patrina Karmento 335
Tien min vokis timindaj avertoj kaj volo Apola. »

Tiel li diras kaj iras, montrante altaron kaj pordon,
Kiun Romanoj alnomas ankoraŭ : la Karmentalpordo,
Por memori antikvan sciencon de Nimfo Karmento,
Kiu, pastrino divena, unua anoncis estontan 340
Famon de idoj Eneaj kaj gloron de urbo Palanta.

Tie li montras arbaron grandegan nomotan « Azilo »
De la kuraĝa Romulo, kaj sube, sub rifo malvarma,
Luperkalgroton, nomitan de Pano la lupmortiganto.
De Argileto li montras samtempe arbaron, kaj, lokon 345
Atestigante, de Argo la gasto li morton rakontas,
Poste kondukas al rifo Tarpeja kaj Kapitolmonto,
Iam kovrita de densaj arbaroj, nun orbrileganta.

Jam religio terura timigis loĝantojn de tiu
Loko timinda; jam ilin tremigis arbaro kaj rifoj. 350

« Tiun arbaron, li diris, kaj tiun monteton verdantan
Loĝas diaĵo; sed kiu? ne scias mi. Kredis Arkidoj
Lin mem Jupiteron ekvidi : diego per mano agitis
Ŝildon timindan, kaj nubojn ĉirkaŭen kolektis nigregajn.
Plie vi vidas du urbojn kaj murojn sur tero kuŝantajn : 355
Ruinigita ĝi estas restaĵo de viroj antikvaj.

Ĝano la patro ĉi tiun konstruis, kaj tiun Saturno :
Do Ĵanikulo kaj Saturniurbo ĵus ili nomiĝis. »

Tiel interparolante, al hejmo Evandra malriĉa 360
Ili alvenis, kaj vidis brutarojn ĉi tie blekantajn,
Meze de Foro Romano, de riĉa kvartalo Karena.
Ili eniris en domon : « Vi vidas, li diris, la sojlon.
Kiun Alcido transpaŝis : lin tiu akceptis palaco.
Gasto, kuraĝu malŝati riĉaĵojn; vin inda de dio
Montru : kaj vi malriĉecon rigardu sen malestimego. » 365

Tiel li diris : li poste en ĉambron de domo malgranda
Grandan kondukas Eneon, kaj por li preparas kuŝejon
El foliaro ŝutita kaj felo de urso Libuja.

Nokto rapidas kaj teron envolvas per nigraj flugiloj.
Tamen Venuso, — ĉar koron patrinan ne vane timigas, 370
Ĉu Laŭrentanaj minacoj, ĉu sanga milito estonta, —
Edzon Vulkanon aliras, kuŝiĝas en oran kuŝejon

- Edzan, kaj, tiel dirante, ŝi amon inspiras diinan :
 « Dum kondamnitan Pergamon milito kaj reĝoj Argujaj
 375 Ruinigadis, kaj turojn per fajro detruis falontajn,
 Por mizeruloj mi helpon nenian, nenian armilon,
 De vi, de via scienco kaj arto mi petis; ĉar mi vin,
 Edzo karega, per vana penado ne volis lacigi.
 Tamen al filoj Priamaj grandegan mi devis dankemon;
 380 Kaj de Eneo mi ofte laboron kompatis malmolan.
 Sed nun lin volo Jupitra haltigas en regnoj Rutulaj.
 Mi do alvenas preĝante, kaj petas armilojn de via
 Sankta dieco : patrino vin preĝas por filo. Pro larmoj,
 Nereidinon kaj Titonedzinon vi iam kompatis.
- 385 Vidu : ĉi tiuj popoloj sin ligas, dum tiuj ekfermas
 Pordojn, kaj feron akriĝas por mian mortigi idaron. »
 Tiel ŝi diras : per dolĉa premado de brakoj blankegaj,
 Ŝanceliĝantan ŝi edzon bruligas volupte. Tuj dio
 Flamon kutiman eksentas, dum varmo konita penetras
 390 Funden de koro, kaj senfortigitajn sin ŝovas en ostojn.
 Tiel do, kiam tra nuboj denseĝaj trakuras fajrero
 Tondra, ĝi ilin disŝiras subite de lumă helego.
 Sentis edzino ke, dank'al beleco, insido sukcesis,
 Kaj ŝi ridetis; dum patro, venkita de amo eterna,
- 395 Diris : « Vi tro malproksime, diino, klarigojn ekserĉas
 Decidigontajn. Ĉu vi ne plu fidas? Se jam vi saman
 Sentis deziron, plezure mi estus arminta Trojanojn.
 Ne malpermesis Fataloj kaj ĉiopotenca la Patro
 Ke dum dek jaroj ankoraŭ Priamo kaj Trojo vivadu.
 400 Nun se vi volas batali, se estas deziro en koro,
 Ĉiujn armilojn de arto fareblajn mi al vi promesas.
 Fluidigitajn mi miksos kun fero arĝenton kaj oron;
 Helpos bloviloj kaj forĝoj. Ne preĝu pli longe, kaj ĉesu
 Dubi pri via potenco. » Kaj, kiam li tiel parolis,
- 405 Li, deziritajn doninte karesojn, sur bruston edzinan
 Laca kuŝiĝis : kaj dormo kvieta fluadis tra membroj.
 Jam, post unua ripozo, en mezo de vojo troviĝis
 Nokto, pelante dormadon. Jam estas levita virino,
 Kiu por vivi nur havas ŝpinaĵon kaj lanokudrantan
 410 Hon Minervan : ŝi fajron reiĝas sub cindro kuŝantan,

Nokton aldonas al taga penado, kaj de servistinoj
 Ekrapidigas laboron sub lampo; ĉar liton de edzo
 Ĉaste ŝi volas konservi, kaj etajn eduki naskitojn.
 Tiel do Fajrpotenculo ne malpli kuraĝa sin levas,
 Liton voluptan eliras, kaj forĝajn ekcelas laborojn. 415

Apud la bordo Sicila kaj Eolbieno Liparo,
 Kuŝas insulo, en mezo de rifoj fumantaj kaj krutaj.
 Sube kaverno kaj grandaj kavajoj por fornoj Ciklopaj
 Etnon similas bruantan. Ambosoj fortege frapitaj
 Sonas de ĝemo senĉesa; sur ili batado de ŝtaloj [ton. 420
 Larĝajn tremigas kavernojn, dum fornoj blovegas flamven-
 Estas domego Vulkana : kaj lando nomiĝas « Vulkano ».
 Tien do Fajrpotenculo aliris el alta ĉielo.

Feron penege preparis en vasta kaverno Ciklopoj
 Bronto, Steropo, Pirakmo, je membroj potencaj kaj nudaj. 425

Fulma sagego vidiĝis en manoj, simila al tiuj,
 Kiujn sur teron ekĵetas la Patro el nuboj eteraj,
 Parte finita kaj glata, sed parte ankoraŭ krudeta.
 Ili kombinis tri hajlajn radiojn, kaj tri de pluvego,
 Kaj tri de fajro vivega, kaj tri de rapida ventego, 430

Poste miksadis internen de ilo terurajn ekfulmojn,
 Bruon, timadon kaj fine kolerojn de flamo senlaca.
 Pli malproksime, aliaj de Marsa kaleŝo konstruis
 Radojn flugilajn, per kiu li virojn kaj urbojn ekscitas.

Ŝildon timindan, armilon de granda Palaso kolera, 435

Vete poluris ĉi tiuj, kaj skvamojn serpentajn el oro,
 Kaj kunligitajn kolubrojn, kaj fine Gorgonon : kaŝonta
 Bruston diinan, ĝi rulis okulojn en kapo tranĉita.

« Ĉion formetu, li diris; tuj nunajn ĉesigu laborojn,
 Etnaj Ciklopoj; kaj mian atente aŭskultu parolon. 440

Estas farotaj armiloj por viro kuraĝa. Nun uzu [tecon;
 Brakojn fortegajn kaj manojn rapidajn kaj majstran ler-
 Nun rapidigu agadon. » Li ne pli parolas : kaj ĉiuj,

Antaŭ ol ili komencos laboron, tuj inter si lotas
 Taksojn. Fluadas rivere jen kupraj jen oraj metaloj; 445

Kaj fluidiĝas en fornoj vastegaj la ŝtalo mortiga.
 Ili ŝildegon konstruas, kapablan por ĉiujn repuŝi
 Sagojn Latinajn, kaj per sep plataĵoj ĝin formas plektitaj.

- Unuj aeron økkaptas per ventaj bloviloj muĝantaj,
 450 Poste reĵetas : aliaj en akvon enmetas siblantan
 Kupron. Ĝemadas ambosoj lokitaj en larĝa kavajo.
 Ili fortege, per movo senĉesa de brakoj potencaj,
 Takte laboras, kaj mason returnas per fortaj teniloj.
 En Eolujaj kavernoj dum patro de Lemno rapidas,
 455 Lumo viviga, kaj kantoj matenaj de birdoj loĝantaj
 Sub la tegmento, Evandron alvokas el domo humila.
 La maljunulo sin levas, kitelon surmetas sur dorson,
 Kaj al piedoj alligas rimenojn de ŝuo Tirena.
 Poste, al flanko, sur ŝultron, li, glavon zoninte Tigean,
 460 Randon pendantan de felo pantera relevas maldekstren.
 Plie du hundoj, fidelaj kunuloj, el sojlo palaca
 Antaŭeniras, kaj mastron amatan bojante kuniras.
 Celis heroo privatan loĝejon de gasto Eneo;
 Ĉar li memoris pri sia promeso, pri helpo donota.
 465 Tamen ne malpli fruema Eneo ekcelis Evandron.
 Filo Palaso kuniris ĉi tiun, kaj tiun Akato.
 Sin renkontinte, tuj ili sin prenas per manoj, sidiĝas
 Meze de domo, kaj ĝuas parolojn plezure sincerajn.
 Tiel do reĝo unue :
 470 « Ĉefo Trojana famega, neniam mi, dum vi vivados,
 Povos konfesi ke estas venkitaj Trojurbo kaj regno.
 Niaj fortaĵoj militaj, por grandan helpadi projekton,
 Estas malfortaj : ĉi tie nin Tuska enfermas rivero ;
 Tie Rutula najbaro nin premas de densaj armiloj.
 475 Tamen mi volas de granda popolo, de riĉa tendaro,
 Kun vi kunigi potencon : okazo ne antaŭvidata
 Savon ekmontras : vin certe protektas potenca Fatalo.
 Staras ĉar ne malproksime, sur alta ŝtonego antikva,
 Urbo Agila : ĝi iam de Lidoj, milita nacio,
 480 Estis fondita, tuj kiam ĝi venis sur montojn Etruskajn.
 Tiun popolon, feliĉan dum jaroj multegaj, kruela
 Reĝo Mezenco premegis per povo de sangaj armiloj.
 Ĉu mi terurajn rakontos buĉadojn, kaj agojn de reĝo
 Abomeninda? Sur lin, sur idaron ĵus ili refalu!
 485 Tiu tirano vivulojn alligis al korpoj malvivaj,
 Manojn kunigis kun manoj, kaj buŝojn kun buŝoj, (grandega

Turmentegado!) Ĉar ili, de sango kaj puso kovritaj,
Malrapidege venantan per larmoj petegis pereon.

Sed laciĝintaj urbanoj pro tiaj agadoj kruelaj,
Iam reganton frenezan kaj domon ĉirkaŭas armate, 490

Liajn mortigas gardistojn, kaj fajron enjetas en domon.

Li, el buĉado savita, ĝis kampoj aliras Rutulaj,
Petas de Turno helpadon : kaj gaston ĉi tiu protektas.

Sed Etrurio, tre juste kolera, sin tute eklevis,
Juĝon petante al Marsaj armiloj por puno de reĝo. 495

Milojn da tiuj soldatoj vi ĉefos, Eneo : mi volas.

Ĉar, kolektita sur bordo, ŝiparo malpacientiĝas;
Kaj por foriro ĝi petas signalon : sed ilin haltigas 500

Pastro grandaĝa; li kantas : « Ho Meonjunuloj kuraĝaj,

Floro kaj virto de viroj antikvaj, vi, kiujn doloro

Justa kaj prava kolero instigas al puno Mezenca,

Tian venkadi popolon ne povos ĉefanto Itala :

Ĉefon eksteran elektu. » En tiu ĉi kampo, armeo

Haltis Etruska; ĉar dia averto ĝin forte timigis.

Tarko alsendis al mi delegitojn por ke mi akceptu 505

Kronon kaj sceptron de regno : ĉar tiu ĉefanto dezirus

Ke mi aliru tendaron, kaj regnon direktu Tirenan.

Sed ve! nun la maljuneco glacia kaj pezo de jaroj

Regnon al mi malpermesas kaj provon de agoj militaj.

Filon mi kore proponus; sed naskis patrino Sabina 510

Lin; kaj mi timus malhelpi patrujon. Vi, kiu junecon

Havas kaj dian naskiĝon, vi, kiun Fataloj alvokas,

Iru kaj ĉefu samtempe Trojanojn kaj anojn Italajn.

Sed al vi mian esperon kaj mian konsolon mi donos, 515

Filon Palason : sub via komando li lernos militon,

Gravajn laborojn de Marso; ĉar, viajn vidinte agadojn,

Vin li kutimos, de siaj junjaroj, admiri sincere.

Ducent rajdantojn Arkidajn al li mi donacos, junulojn

Tute ŝatindajn; kaj tiom proprece kondukos Palaso. »

Tiel apenaŭ li diris, — dum supren direktis okulojn 520

Ido Anĥiza Eneo kaj lia fidela Akato,

Multajn en koroj ĉagrenaj malĝojajn rulante pensadojn, —

Kiam, el klara ĉielo, signalon Citera alsendis.

Ĉar el etero alvenis subite bruanta fajrero

- 255 Neatendita : kaj ŝajnis ke ĉio samtempe tremegas;
 Dum tra ĉielo fortege muĝadis trompeto Tirena.
 Ĉiuj sin levas : denove kaj ree fortiĝas bruego.
 Inter aeraj nubetoj, en loko sennuba, armilojn
 Ili ekvidas brilantajn kaj sin reĉiproke frapantajn.
- 530 Ĉiuj ekreĉmas en koroj; sed tiam Trojana heroo
 Ĝoje rekonas promeson de sia patrino diina;
 Kaj li memoras : « Ho mastro, li diris, ne serĉu al kiu
 Estas sendita ĉi tiu miraklo; min petas Olimpo.
 Tiu disigno anoncas ke tenas promeson patrino :
- 535 Ĉar se milito fariĝas, Vulkanajn armilojn, tra ventoj
 Al mi ŝi devos alporti.
 Kiaj buĉadoj minacas mizerajn urbanojn Laŭrentajn!
 Kiel vin, Turno, mi punos! kaj kian, sub ondoj kaŝantaj,
 Aron da viraj kiraso, da ŝildoj, da korpoj vi rulos
- 540 Tibro, ho patro. Li petu militon kaj rompu ĵuradon! »
 Kiam li tiel parolis, li seĝon forlasas altegan;
 Kaj li unue, de sankta altaro Herkula vekinte
 Fajrojn dormantajn, Penatojn kaj Larojn de mastro malriĉa
 Gaje aliras : kaj, dum elektitajn Evandro bovirojn
- 545 Buĉas, laŭ sankta kutimo, lin junaj imitas Trojanoj.
 Poste Eneō reiras ŝiparon kaj trafas kunulojn.
 Tiam li zorge elektas la plej kuraĝulojn el ili,
 Kiuj lin sekvas al sanga milito : aliaj de akvo
 Estas portotaj, kaj malsupreniros senrame riveron,
- 550 Por al Askano rakonti pri patro kaj nunaj fariĝoj.
 Havas Trojanoj ĉevalojn por landon ektrafi Tirenan :
 Rajdas Eneō belegan rajdilon; ĝin tute surkovras
 Felo de flava leono brilanta per oraj ungegoj.
 Famo subite, flugante tra urbo malgranda, konigas
- 555 Ke tuj al limoj de ĉefo Tirena rajdantoj aliros.
 Timo patrinajn pliigas preĝadojn; ĉar ĝi pligrandiĝas,
 Kiam alvenas danĝeroj, kaj Marsa aperas figuro.
 Tiam Evandro la patro manprenas de filo irona.
 Manon, kaj, larmojn verŝante multegajn, li tiel parolas :
- 560 « Filo, ve! se al mi jarojn pasintajn Jupitero redonus;
 Kaj se mi povus ankoraŭ unuan mortigi korpuson
 Antaŭ murego Prenesta, kaj ŝildajn bruligi amasojn,

Reĝon Herilon per tiu ĉi mano ĵetinte Tartaren ;
 — Ĉar tri animojn li de Feronio patrino ricevis ;
 (Teruriganta rakonto!) kaj lin tri armiloj vestadis. 565
 Oni lin devis trifoje mortigi. Sed tamen ĉi tiu
 Mano trioblan animon formetis kaj veston trioblan. —
 Se mi ne estus maljuna, nenio min povus senigi,
 Filo, je viaj kisadoj : neniam najbaro Mezenco
 Tiun ĉi kapon insultus, buĉadojn faradus sennombrajn, 570
 Kaj senhomigus ĉefurbon de tiom da bonaj urbanoj.
 Ho Superuloj, Jupitero, vi granda reganto de dioj,
 Reĝon Arkidan kompatu, mi petas, kaj patrajn aŭskultu
 Preĝojn : se vivo de filo Palaso ne estas tranĉota,
 Se vi kaj viaj dekretoj permesas, Fataloj potencaj, 575
 Ke mi lin povos revidi por kun li daŭrigi vivadon,
 Vivon mi petas, kaj ĉiujn bonvolas toleri suferojn :
 Sed, ho Fataloj, se vi min minacas de frapo subita,
 Nun, mi vin petas, nun rompu fadenon de vivo malgaja,
 Timojn dum dubo ŝancelas, dum estas necerta estonto, 580
 Dum mi vin, filo karega, malfrua kaj sola volupto,
 Tenas ankoraŭ en brakoj, dum grava kurjero ne vundis
 Patrajn orelojn. » Kaj tiel parolis, dum lasta foriro,
 Patro maljuna : lin portis svenantan servistoj en domon.
 Oni malfermas pordegojn : kaj jam rajdantaro eliris. 585
 Inter unuaj ĉefrajdas Eneo kaj brava Akato,
 Poste aliaj Trojanoj precipaj : en mezo de aro,
 Vesto vidiĝas kaj riĉaj armiloj de juna Palaso.
 Tiel do, kiam el Oceanmaro eliras Lucifro,
 Kiun Venuso pli amas ol astrojn aliajn, tuj kiam 590
 Li en ĉielo vidigis vizaĝon, solviĝas mallumo.
 Staras sur muroj patrinoj tremantaj, kaj sekvas okule
 Polvan nubeton kaj aron militan pro kupro brilantan.
 Tra arbetoj irante por vojajn eviti kurbiĝojn,
 Ili kuradas. Tuj bruas ekkrio; anaro densiĝas : 595
 Ufoj eksonas; kaj tremas kamparo de takta frapado.
 Apud rivero Cerita troviĝas malvarma arbaro,
 Kiun sanktigis kredaĵoj de patroj : ĉi tiun ĉirkaŭas
 Ĉie montetoj, kronitaj de densaj kaj nigraj abioj.
 Iam antikvaj Pelasgoj, de lando Latina unuaj 600

- Kulturigistoj, laŭ famo, arbaron kaj tagon dediĉis
 Al protektanto de kampoj kaj brutoj, al dio Silvano.
 Ne malproksime tendaro de Tarko kaj aro Tirena
 Lokon okupis fortikan : de alta monteto vidiĝis
- 605 Tuta armeo, kaj ĝi malproksimen tra kampoj vastiĝis.
 Tie Eneo la patro kaj liaj kuraĝaj kunuloj
 Haltas; kaj lacaj ĉevaloj kaj viroj plezure ripozas.
 Tamen Venuso, la blanka diino, el nuboj eteraj,
 Donojn portante, alvenis. Tuj kiam ŝi filon ekvidas,
- 610 Apud rivero malvarma, en valo aparte sidantan,
 Antaŭ li tuj ŝi aperas, kaj tiel parolas afable :
 « Jen promesitaj donacoj, faritaj de arto de edzo.
 Baldaŭ, ho filo, vi povos minaci de sanga batalo
 Arojn Laŭrentajn tro malhumilegajn, kaj Turnon kuraĝan.»
- 615 Diris ŝi; poste, kisadon de filo petinte, Citera
 Kontraŭ radikojn de kverko brilantajn apogas armilojn.
 Ĝoja pro donoj diinaj, fiera pri tia honoro,
 Li ŝin satigi ne povas, armilojn rigardas atente,
 Kaj, admirante sincere, li turnas, per manoj kaj brakoj,
- 620 Kaskon teruran vomantan flametojn el fasko harega,
 Glavon mortigan, kirason el kupro rigida faritan,
 Sangokoloran, grandegan, similan al nubo lazura,
 Kiam ĝi foren rebrilas, frapita de sunaj radioj,
 Fine gamaŝojn malpezajn el oro dufoje forĝita,
- 625 Lancon, kaj neesprimeblajn ĉizaĵojn de ŝildo belega.
 Tie fariĝojn Italajn kaj grandajn de Romo triumfojn,
 Antaŭkonante Fatalojn kaj agojn de tempo estonta,
 Fajrpotenculo desegnis : ĉar tuta idaro Askana
 Tie troviĝis, kaj ĉiuj militoj laŭ vico pentritaj.
- 630 Kuŝas lupino graveda en groto verdanta de Marso;
 Apud ĝi ludas duopaj infanoj, kaj mamojn pendantajn
 Ili por suĉi penadas, ne terurigitaj; kaj dume,
 Ĝi, malantaŭen turninte buŝegon kaj kapon sovaĝan,
 Ilin lekadas amege, kaj korpojn per lango glatigas.
- 635 Oni nun vidas en Romo Sabinojn maljuste kaptitajn,
 Antaŭ popolo, en cirko, post fino de jaraj ludegoj.
 Inter Romulo kaj reĝo maljuna Tatío, ĉefanta
 Kurajn Sabanojn, subite flamiĝas terura milito.

Poste ĉi tiuj du reĝoj, — ĉar ili ĉesigis batalojn, —
Antaŭ altaro Jupitra, en manoj tenante kalikojn, 640
Staras armataj, kaj buĉas porkinon por ligon certigi.

Pli malproksime, ĉevaloj dufoje kvaropaj Metion
Dispecigegas : — sed kial, Albano, vi falsis ĵuradon? —
Tulo tra densa arbaro ŝiritajn trenadas restaĵojn
De ĉensoganta krimulo; kaj sango ruĝigas arbetojn: 645
Flanke, Porseno ordonas ke Romo Tarkvinon akceptu,
De si pelitan : kaj urbon preme gas kruela sieĝo :

Sed Eneidoj al glavo rapidas por sin liberigi.
Reĝo indignas kaj poste minacas; — kaj tio sur ŝildo
Estas videbla, — ĉar ponton disrompi kuraĝas Kokleso; 650
Ĉar, disŝirinte ligilojn, Klelio transnaĝas riveron.

Supre de ŝildo, Manlio, gardante Tarpejan altaĵon,
Antaŭ preĝejo staradas kaj Kapitolmonton okupas.
Tegas palacon Romulan tegmento el nova pajlaĵo.

Tie flugetas, tra oraj pordejoj, arĝenta ansero; 655
Kiu alvenon de Galaj soldatoj per kantoj anoncas.

Tra arbetaĵoj rampinte, Galanoj okupas altaĵon;
Ilin protektas mallumo kaj helpo de nokto nigrega.
Estas ilia hararo el oro, el oro vestaĵoj;

Brilas jaketoj strihavaj; kaj laktokoloron de koloj 660
Oro ĉirkaŭas; en manoj iliaj brilegas du Alpaĵ

Lancoj pezegaj; kaj ŝildo longforma protektas la korpon.
Tie saltantaj Salioj, kaj nudaj Luperkoj, kaj lanaj
Ĉapoj Flaminaj, kaj ŝildoj sanktegaj el alta ĉielo

Iam falintaj : tra urbo, ĉastegaj patrinoj, sur ĉaroj 665
Alpendigitaj, kondukas sanktaĵojn. Li, pli malproksime,
Montras Tartaran sidejon, kaj pordon profundan al Dito,

Poste punegojn pro krimoj : kaj vi, Katilino, pendante
Sub minacanta ŝtonego, vi tremas, vidante Furiojn.
Loĝas piuloj aparte : kaj donas leĝaron katono. 670

Meze de ŝildo vidiĝas figuro de maro ventega,
Ora, dum ondoj lazuraj kroniĝas de ŝaŭmo arĝenta;
Ronde delfenoj arĝente brilantaj, ĉirkaŭe naĝantaj,

Sulkas ŝaŭmantan ondaron, kaj maron batadas per vostoĵ.
Meze de maro, du kupraj ŝiparoj, — Aktia batalo, — 675
Estas vidataj; kaj saĝnas ke maro Leŭkata bolegas.

- Marso direktas movadon; kaj maron briligas orŝildoj.
 Tie instigas kaj ĉefas Italojn Cezaro Aŭgusto,
 Kaj lin kuniras popolo, Penatoj, Diegoj kaj Patroj.
- 680 Staras sur alta ferdeko li; frunto brilanta du flamojn
 Ŝetas, kaj astro de patroj montriĝas sur kapo liera :
 Dum aliparte, puŝita de ventoj kaj dioj favoraj,
 Ĉefas armeon Agripo kuraĝa : de krono marista
 Spronoj brilegas sur kapo zonata de fama ordeno.
- 685 Tie, de bandoj barbaraj diversajn ĉefante armilojn,
 Jen Antonio : sur bordo ruĝmara venkinte Aŭrorajn
 Gentojn, li trenas soldatojn Egiptajn kaj Baktrajn, venin-
 De Oriento; lin sekvas, hontinde! Egipta edzino. [tajn
 Ĉiuj samtempe rapidas; kaj tuta ondaro batita
- 690 Ŝaŭmas, tranĉita de akraj remiloj kaj spronoj tridentaj.
 Ŝipoj aliras maralton : kaj ŝajnas ke naĝas Cikladoj
 Elŝiregitaj, ke montoj altegaj tuŝegas montegojn,
 Tiel montriĝas pezegaj ŝipvostoj turhavaj de ŝipoj.
 Estas ŝetitaj, jen stupo flamanta, jen flugo de sagoj
- 695 Feraj; kaj regnon Neptunan ruĝigas terura buĉado.
 Meze, reĝino ekscitas soldatojn per sistro patruja,
 Kaj minacantajn ne vidas post dorso duopajn serpentojn;
 Dum ĉiuformaj dimonstraj kaj Anubisdio bojanta
 Kontraŭmilitas Neptunon, Venuson kaj saĝan Minervon.
- 700 Meze de sanga batalo, — ĉizita sur fero, — freneze
 Marso klopodas : el alta cetero lin helpas Furioj;
 Ĉie ĝojega Malpaco ŝiritan agitas vestaron;
 Kaj ŝin sekvadas Belono kun vipo sorbita de sango.
 Tion vidinte, ekstreĉas pafarkon Apolo Aktia.
- 705 Terurigitaj pro sama timego, Egiptoj kaj Indoj,
 Poste Araboj kaj fine Sabeoj forkuras subite.
 Oni rimarkas ke velojn al ventoj prezentis reĝino
 Tute timanta, kaj ŝnurojn ligantajn pli kaj pli ellasis.
 Palan pro morto proksima, en sanga buĉado, ŝin montras
- 710 Fajrpotenculo, portitan de ondoj kaj vento Japiksa.
 Staras kontraŭe vastega korpego de Nilo malĝoja :
 Li, malferminte vestaĵon, al brusto lazura venkitojn
 Vokas, por ilin ekkaŝi profunden de grotoj riveraj.
 Tamen Cezaro kondukas kaleŝon trioble triumfan

Ĉirkaŭ Rommuro, al dioj Italaj eternan prezentas 715
 Donon, kaj tricent preĝejoj al ili en urbo dediĉas.
 Stratojn plenigas aplaŭdoj kaj ĝojo kaj ludoj popolaj.
 Ĥoroj patrinaj vidiĝas interne de ĉiu preĝejo.
 Antaŭ altaroj, bovviroj buĉitaj kovradas la teron.
 Li mem, sidante sur sojlo marmora de Feba templo, 720
 Donojn akceptas de fremdaj popoloj, kaj ilin sur belajn
 Fiksas pordegojn : aliras longvice nacioj venkitaj,
 Inter si diferencantaj per lingvoj, armiloj kaj vestoj.
 Tie Nomaĝajn popolojn, kaj gentojn Afrikajn senzonajn,
 Karojn, Lelegojn, kaj sagoĵetantajn Gelonojn, Vulkano 725
 Ĉizis : vidiĝas Eŭfrata rivero humile fluanta,
 Reno bikorna, Morinoj la plej malproksimaj el homoj,
 Daloj neniel dresitaj, Arakso kolera pro ponto.
 Tiujn ĉizajojn de ŝildo Vulkana, patrina donaco,
 Miras Eneo : li, kvankam malklera pri senco kaŝita, 730
 Ĝojas, kaj ŝargas sur ŝultrojn Fatalon kaj famon de nepoj.

KANTO NAŬA

Dume, dum tiuj agadoj fariĝas en lokoj diversaj,
 Saturnidino el alta ĉielo al Turno kuraĝa
 Sendas Irison. En valo sanktega de avo Pilumno,
 Turno sidadis okaze, sub ombro de verda arbaro.
 Al li do Taŭmasidino ekdiras per buŝo rozeta : 5
 « Tion ĉi kion neniu diaĵo promesi kuraĝus,
 Turno, nun al vi prezentas Fatalo, en tiu ĉi tago.
 Urbon, ŝiparon, kunulojn Eneo forlasis, por trafi,
 Sur Palatina monteto, la regnon de reĝo Evandro.
 Plie li poste penetris ĝis plej malproksimaj Koritaj 10
 Urboj, por armi korpusojn Lidanajn, kamparan amason.

Ne ŝanceliĝu; rapide ĉevalojn ekpetu kaj ĉaron;
Kaj senprokraste, ekkaptu tendaron sen ĉefo lasitan. »

- Diris ŝi; kaj ŝi flugilojn etendas por trafi ĉielon,
 15 Luman arkegon post sia irado lasinte sub nuboj.
 Ŝin rekoninte, junulo du manojn direktas al astroj,
 Kaj, forkurantan okule sekvinde, li tiel parolas :
 « Kiu, Iriso, ĉiela ornamo, el nuboj al tero
 Vin por min helpi alsendis? De kie devenas lumego
 20 Tiel subita? En malfermiĝanta ĉielo mi vidas
 Astrojn vagantajjn. Mi, kia ajn estas ĝi, vole obeas
 Tian miraklon, kaj prenas armilojn. » Li, tiel dirinte,
 Alproksimiĝas riveron; kaj, ondon ĉerpinte klaregan,
 Diojn li preĝas, kaj je kordeziroj plenigas aeron.
 25 Rajdis jam militistaro tra vasta kamparo malplena,
 Riĉa per belaj ĉevaloj, per vestoj broditaj kaj oraj.
 Ĉefas Mesapo korpuson unuan, kaj lastan junuloj,
 Filoj de Tiro : en mezo aliras, tenante armilojn,
 Turno la reĝo; li ĉiujn aliajn je kapo superas.
 30 Tiel do, de sep riveroj kvietaj pli ampleksigita,
 Gango fluadas silente; kaj tiel el kampoj eliras
 Nilo, je ondoj ĝermigaj, por sian reiri kuŝujon.
 Sed malproksime ekvidas Trojanoj de polvo densega
 Nubon nigretan, dum kovras kamparon subita mallumo
 35 Staris Kaiko sur turo antaŭa : li krias unue :
 « Kia do estas, urbanoj, ĉi tiu turniĝo malluma?
 Glavojn alportu rapide, kaj sagojn preparu remparajn :
 Jen malamiko; atentu. » Rapidas al pordoj Trojanoj,
 Forte kriante, kaj ili lignaĵajn aranĝas fermilojn.
 40 Estis Eneo tre lerta ĉefanto; ĉar li forironta
 Diris : « Se ia okazo fariĝos, ĝi kia ajn estu,
 Vi ne ekprovu batalon, en kampon ne malsupreniru;
 Sed, nur malantaŭ bariloj, tendaron defendu kaj domojn. »
 Vane al sanga batalo kuraĝo kaj same kolero
 45 Hlin instigas; ĉi tiuj obeas, malfermas pordegojn,
 Kaj malamikon atendas armate, en turaj ĉambretoj.
 Turno sed, antaŭirante iradon de tro malrapida
 Aro, kaj akompanate de dudek ŝatindaj rajdantoj,
 Urbon subite aliras : lin blankmakulata ĉevalo

Portas Tracuja, lin kasko ruĝfaska kaj ora protektas. 50
 « Kiu unua kunvenos min al malamikoj? li diris.
 Jen! » Tuj li lanĉon balancas kaj forte ĵetegas aeren,
 Kiel averto milita, kuraĝe tra kampo kurante.
 Ĉiuj kriegas kunuloj, lin ili kun gestoj timindaj
 Sekvas : ĉar ilin mirigas la malkuraĝemo Trojana. 55
 Kiel do, viroj ne irus en kampon, ne glavon prezentus,
 Sed nur tendaron protektus : kaj Turno kolere direktas
 Ĉirkaŭ murego ĉevalon, kaj serĉas ĉu estas eniro.
 Kiel do lupo rabema, ĉe pordo de plena ŝafejo,
 Venton kaj pluvon toleras, tremante de varma deziro, 60
 Meze de nokto, dum junaj ŝafidoj sub ventroj patrinaj
 kuŝas, senriske blekante; sed besto kruela kolere
 Flaras akiron neeban; de longe malsato ne sata
 Ĝin turmentegas, kaj gorgo sekega je sango soifas.
 Tiel en koro de Turno, vidanta tendaron kaj muron, 65
 Flamas kolero; ĝis ostoj malmolaj eniĝas doloro.
 Kiun eniron ek trovi? per kiu rimedo forpeli
 El rifugejo Trojanojn, kaj ilin irigi en kampojn?
 Flanke de tiu tendaro sin kaŝis ŝiparo Trojana.
 Ĝin protektitan de muro tendara kaj ondoj riveraj 70
 Li tuj okupas, de bravaj kunuloj ekpetas bruligojn;
 Li mem triumfe de pino flamanta alportas branĉaĵojn :
 Viroj klopodas, ĉar ilin instigas ĉeesto de Turno;
 Ĉiuj junuloj sin armas per nigraj brulaĵoj flamantaj;
 Ili senigas fajrujojn : malklaran eklumon disverŝas 75
 Torĉoj fumigaj, kaj nubon ruĝhelan direktas al astroj.
 Kiu diaĵo, ho Muzo, de tiu kruela brulado
 Savis Trojanojn, kaj tiom da fajroj forigis el ŝipoj?
 Diru : ĉar kredon antikvan tra jaroj la Famo konservis.
 Kiam Eneo, ĉe Ido Friguja konstruis ŝiparon, 80
 Kaj ĝin preparis por ondojn transiri de maro senfina,
 Oni rakontas ke tiam Cibelo, Patrino de dioj,
 Diris al granda Jupitro : « Ho filo, plenumu deziron,
 Kiun karega patrino ekpetas de estro Olimpa.
 Pinan arbaron mi havas, amatan de jaroj multegaj; 85
 Supre de monto ĝi kreskas, kaj en ĝi fariĝas piaĵoj :
 Nigraj abioj kaj kverkoj densegaj ĝin ĉiam ombrigas.

- Al Dardanida junulo, por ke li konstruti ŝiparon,
 Arbojn mi ĝoje donacis : nun timo min kaptas kruele.
- 90 Ĝin kvietigu ; kaj tion konsentu, pro petoj patrinaj :
 Ilin do rompu nek ia kurado, nek ia ventego ;
 Estu favora por ili naskiĝo sur niaj montaroj. »
- Filo, ĉi tiu mem kiu de mondo turnigas astraron ;
 « Kien Fatalojn, Patrino, per tiaj petegoj vi volas
- 95 Puŝi ? Do ŝipoj faritaj de mano mortema senmortan
 Havus indecon ! Suferus Eneo danĝerajn okazojn,
 Sed sen danĝero ! Ĉu tian potencon eĉ dioj posedas ?
 Ne ! Sed tuj kiam, post kuro finita, Aŭzonan havenon
 Ili ektrafos, ĉi tiuj do, kiujn indulgis ventego,
- 100 Kiuj ĝis bordoj Laŭrentaj ĉefanton transportis Dardanano,
 Formon ekperdos morteman : diinoj de maro vastega
 Ĉiuj fariĝos, kaj ondon ŝaŭmantan per brusto sulkados,
 Kiel Galato kaj Doto, idino de dia Nereo. »
- Tiel li diris, kaj tion certigis per ĵuro sur Stikson,
 105 Fratan riveron, sur nigran torenton, sur peĉajn turniĝojn.
 Poste li kapon klinetis : kaj tuta tremegis Olimpo.
- Sed promesita momento do estis veninta, kaj Parkoj
 Tempon plenumis ŝuldotan, ĵus kiam atenco de Turno
 Dian Patrino avertis ke torĉoj minacas ŝiparon.
- 110 Antaŭ okuloj ekbrilas subite ĝis nun nekonita
 Lumo, kaj nubo grandega, el limoj Aŭroraj, portanta
 Ĥorojn de Ido, ĉielon transiras ; dum voĉo tērura
 Bruas aere, kaj arojn Rutulan kaj Trojan tremigas :
 « Viroj Trojanaj, ne penu pro helpo de miaj velŝipoj ;
- 115 Manojn ne armu ; ĉar Turno bruligus sukcese marondon,
 Pli ol ĉi tiujn sanktegajn abiojn. Vi, iru libere ;
 Iru, diinoj de maro : Patrino ordonas. » Subite,
 Ĉiu ŝipvosto disrompas ligilojn al bordo ligantajn,
 Akvon perspronoj malfermas, kaj, kiel delfenoj, sub ondojn
- 120 Sin subakvigas : kaj virgaj knabinoj, — mirinda miraklo ! —
 Nombre egalaj al kupraj ŝipnazoj ĉe bordo starintaj, [ton.
 Montras vizaĝojn samnombrajn, kaj ĉarme alnaĝas maral-
 Miras fortege Rutuloj : Mesapo mem, tute tremanta,
 Terurigitajn haltigas ĉevalojn ; kaj Tibro, ĝemante
- 125 Raŭke, al fonto reigas fluadon de sia rivera.

Tamen ne ĉesas konfido ĉe Turno kuraĝa ;

Plie li tuj kvietigas animojn, kaj tiel riproĉas :

« Tiu miraklo koncernas Trojanojn : Jupitero mem ilin
Volis senigi je helpo kutima : nun sagojn, nun fajrojn,

Ne plu bezonas Rutuloj : ĉar maro fermiĝis, por ili 130

Mondo cetera ne estas ; kaj ili ne povas forkuri ;

Dum ni posedas la teron, dum miloj da gentoj Italaj

Prenos armilojn. Ne nin terurigas Fataloj, per kiuj

Nun fanfaronas Friganoj, kaj vanaj respondoj de dioj.

Ĉar fruktodonan kamparon Aŭzonan ektraflis Trojanoj, 135

Estas kontentaj Venuso kaj diaj dekretoj. Mi same

Havas Fatalojn : per fero krimegan mortigi nacion,

Kiu ve ! ŝtelis edzinon : ĉar ne nur Atridojn vundegis

Tia doloro, ĉar ne nur Mikeno sin armis rajtege.

Tamen sufiĉus unua pereoj ? Jes, se post unua 140

Krimo, plej zorge sin ili forigus el ĉiu virino.

Tiuj muretoj kaj tiuj fosaĵoj, malforta protekto

Kontraŭ mortigo, en korojn de tiuj fremduloj inspiras

Tamen konfidon. Ĉu ili ne vidis ke muroj de Trojo,

Kvankam faritaj de mano Neptuna, falegis en flamojn. 145

Kiu do, inter vi, tiun barilon per fero detruos,

Bravaj kunuloj, kaj kun mi tremantan okupos tendaron ?

Kontraŭ Trojanoj Vulkanajn armilojn kaj milon da ŝipoj

Mi ne bezonas, eĉ kiam Etruskoj sin ligus kun ili.

Nokton malluman kaj rabon insidan de la Palasaĵo, 150

Fine mortigon de viroj gardantaj fortikan altaĵon,

Ili ne timu : en ventron de ligna ĉevalo mi ne min

Kaŝos ; sed tage, plenumo, mi muron certege bruligos.

Kontraŭ si ili ne trovos Danaojn kaj bandojn Pelasgajn,

Tiujn ĉi kiujn haltigis Hektoro dum deko da jaroj. 155

Tamen, ĉar preskaŭ nun estas finita la tago, restaĵon

Uzu por ĝoje ripozi kaj fortojn ripari per manĝo,

Viroj, kaj estu vi pretaj por provi konfide batalon. »

Dume li vokas Mesapon por ke li gardistojn atentajn

Metu ĉe pordoj, kaj ĉirkaŭ murego prizorgu pri fajroj. 160

Oni elektas du sepon da bravaj Rutuloj por muron

Zorge observi ; kaj ĉiun el ili cent sekvas aliaj.

Tiujn junulojn briligas ruĝfaskoj kaj oraj armiloj.

Ili kuradas, reprenas la gardon, sur herbo kuŝantaj
 165 Ĝojas, kaj vinon trinkadas verŝitan el kupraj kalikoj.
 Flamas fajrujoj tra kampo; kaj ludo por istoj gardantaj
 Nokton pasigas sendorman.

Sur defendaĵoj rigardas Trojanoj; kaj ili armitaj
 Turojn okupas : de timo premitaj, ĉi tiuj kontrolas
 170 Pordojn, kaj turojn altegajn kun muroj kunigas per pontoj.
 Oni alportas sagaron. Mnesteo kaj brava Seresto
 Ĉefas; ĉar patro Eneo, se ia danĝero okazus,
 Volis ke ili direktu junulojn kaj agon militan.
 Tuta legio lotita okupas ĉe pordoj danĝerajn
 175 Lokojn, kaj pri defendotaj remparoj laŭvice prizorgas.

Niso troviĝis gardanto de pordoj, kuraĝa junulo,
 Filo Hirtaka, tre lerta pri lancoj kaj sagoj malpezaj;
 Kiel kunulo li sekvis Eneon, de Ido ĉashava.
 Eurialo, plej bela el anoj Eneaj; el ĉiuj
 180 Kiuj Trojanan ekvestis armilon, ĉi tiun kuniris,
 Knabo havanta junaĝajn haretojn sur vangoj senbarbaj :
 Ilin egale kuraĝajn kunligis egala korsento.
 Ili do kune troviĝis gardistoj de unu el pordoj.
 Niso parolis : « Ĉu dioj en koron instigas fervoron?
 185 Eurialo, ĉu forta deziro fariĝas diforto?

Ĉar en milito famegan agadon plenumi de longe
 Mia animo deziras, ĝin ne kontentigas ripozo.
 Iom rigardu do kiel Rutuloj montriĝas memfidaj :
 Lumoj briletas maldense : per vino kaj dormo senmovaj,
 190 Ili kuŝegas, kaj ĝis malproksimo silentas kamparo.
 Jen nun pri kio mi pensas kaj kion mi kore meditas.
 Ĉiuj deziras revenon Enean, popolo kaj Patroj :
 Ili do sendos kurjerojn por al li konigi nunaĵojn.
 Mian se oni plenumas deziron pri vi, — ĉar sufiĉos

195 Por mi la gloro de ago, — mi kredas ke tiu monteto
 Vojon enhavas, min kiu kondukos al muroj Palantaj. »

Miras fortege, de amo grandega al gloro flamante,
 Eurialo, kaj diras samtempe kuraĝan amikon :
 « Ĉu vi rifuzas min kun vi kunule, por tiaj agadoj,
 200 Niso, akcepti; mi lasus vin sola en tiaj danĝeroj!
 Certe ne tiel min patro edukis Ofelto, militojn

Tre kutimanta : mi kreskis en mezo de Trojaj laboroj,
 Inter bataloj Argujaj : kaj pri vi ĉu tiel mi agis,
 Kiam de granda Eneo gloregan mi sekvis Fatalon.

✓ Koro ĉi tie batanta malŝatas percon, kaj kredas 205

Pagi ne kare per vivo honoron al kiu vi kuras. »
 Niso respondis : « Mi rajte ne dubas pri via kuraĝo ;
 Kaj mi esperas ke granda Jupitero, aŭ kiu ajn dio
 Min instiganta, permesos ke mi vin venkinte revidos.

Sed, min se ia hazardo se ia diaĵo mortigus, 210

— Ĉar entrepreno milita multegajn enhavas danĝerojn, —
 Volus mi ke vi postvivu : por morti vi estas tro juna.

Iu min prenu sur kampo batala, min mone aĉetu,
 Kaj min en teron enmetu, aŭ, se malpermesos Fatalo,
 Al forestanto prezentu honorojn kaj tombon oferu. 215

Vian mi timus per tiaj doloroj ĉagreni patrinon :

Inter ĉar multaj virinoj ŝi sola vin sekvi kuraĝis ;
 Kaj ŝin ne povis deteni muregoj de granda Acesto. »

✓ Tame ĉi tiu : « Pretekstojn vi al mi prezentas vanegaju ;
 Kaj decidecon neniam vi povos el koro tiregi. 220

Ni tuj rapidu. » Li diris ; samtempe li vekas gardistojn.

Ili sin levas kaj gardon reprenas : lasinte postenon,
 Eurialo kaj Niso eliras por reĝon ekpeti.

Ĉiu bestaro, de dormo premita, tra tuta kamparo
 Zorgojn forlasis ; kaj koroj malmolajn forgesis laborojn. 225

Ĉefoj Trojanaj, precipaj junuloj, pri gravaj aferoj

En konsilejo diskutis : al kiu decido sin turni ?

Ĉu al Eneo nun estus sendota kurjero, kaj kiu ?

Sin apogante sur longajn sagegojn, kaj ŝildojn tenante,
 Staris ĉi tiuj en mezo de placo tendara. Insiste 230

Eurialo kaj Niso ekpetas por ke sen prokrasto

Oni bonvolu tre gravan aŭskulti aferon. Iulo

Tuj fervorulojn akceptas, kaj petas de Niso klarigojn.

Tiam la filo Hirtaka : « Aŭskultu per sentoj favoraj
 Kion ni faros : pro nia junaĝo ne moku projekton, 235

Anoj Eneaj. Rutuloj, per dormo kaj vino senmovaj,

Ĉiuj silentas : por fari embuskon ni lokon ektrovis,

En intervoja teraĵo, ĉe pordo proksima de maro.

Ĉar estingiĝas fajrujoj, ĉar fumo nigrega al astroj

- 240 Ĵus supreniras, permesu do ke ni profitu okazon.
 Ni tuj eliros por serĉi Eneon ĝis muroj Palantaj;
 Kaj revenantajn kun multaj akiroj vi baldaŭ nin vidos,
 Grandan buĉadon farintajn. La vojon ni konas tre bone :
 Urbajn dometojn, ĉasante senĉese tra valoj mallumaj,
- 245 Ni jam ekvidis; kaj bordojn riverajn ni tute esploris. »
 Tiam maljuna Aleto, igita de jaroj tre saĝa :
 « Dioj patrujaj, vi ĉiam de Trojo protektas idaron,
 Kaj vi ne volas ke genton Dardanano detruu Fataloj,
 Ĉar vi en korojn de tiaj junuloj kuraĝaj inspiris
- 250 Tiajn dezirojn. » Kaj, tiel dirinte, li ŝultrojn kaj manojn
 Premis de ambaŭ, kaj kovris per larmoj vizaĝojn kaj frun-
 « Kio, ho viroj, per inda premio, pro tiaj agadoj, [tojn.
 Vin rekompensas sufiĉe? Plej grandan kompenson diaĵoj
 Kaj konscienco ekdonos unue; restaĵon ŝuldotan
- 255 Pagos la pia Eneo, kaj same honesta kaj juna
 Filo Askano; ĉar li ne forgesos ĉi tian sindonon.
 — Plie, mi kiu nur savon ekvidas en patra reveno,
 Diris Askano, ho Niso, per grandaj Penatoj kaj Laroj
 De Asaraco, per piaj sanktejoj de Vesto antikva,
- 260 Mi atestigas, subtenon kaj solan esperon mi metas
 En vin, en vian sukceson. Nu! dank'al vi patro revenu;
 Lian redonu ĉeeston : nur tiam mi ĝoja fariĝos.
 Mi du pokalojn donacos arĝentajn kaj bone ĉizitajn,
 Kiujn akiris naskinto en kaptito de urbo Arisba,
- 265 Du tripiedojn, du grandajn talentojn el oro, kaj fine
 Unu kalikon antikvan, donacon de Dido Sidona.
 Iam se landon Italian kaj sceptron mi povos venkinte
 Kapti, se iam per sorto lotiĝos akiro rabita,
 — Certe armilon el oro de Turno kaj belan ĉevalon,
- 270 Kiun li rajdas, vi vidis, — nu! ŝildon kaj faskon ruĝetan
 Mi el lotaĵoj eligos, kaj al vi mi donos, ho Niso.
 Plie de mia naskinto vi dudek sklavinojn ricevos
 Belajn, kaj sklavojn, kaj ĉiujn armilojn el ili kaptitajn,
 Fine la tutajn bienojn havitajn de reĝo Latino.
- 275 Pri vi, ĉar via junaĝo al mia pli alproksimiĝas,
 Ho estiminda junulo, vin kore mi tute akceptas,
 Kaj nun alprenas vin kiel kunulon de miaj laboroj :

- Famon neniam en gloraj agadoj mi sen vi ekserĉos;
 Ĉiam milite kaj pace, por agoj, por saĝaj konsiloj,
 Al vi mi donos konfidon. » Al tiuj paroloj respondis 280
 Eurialo : « Neniam en ia momento de vivo
 Mi mensogigos promeson, se tamen min sorto favora
 Helpi bonvolas. Sed, super premioj de vi promesitaj,
 Unu mi petas : mi havas patrinon de gento Priama ;
 Ŝin malfeliĉan, kun mi vojaĝantan, nek lando Ilia 285
 Povis deteni, nek muroj Sicilaj de reĝo Acesto.
 Ŝin, nesciantan al kiuj danĝeroj mi kuras, mi lasas
 Ne salutitan ; ĉar, mi atestigas kaj Nokton kaj vian
 Manon, mi larmojn de mia patrino ne povus toleri.
 Sed, mi vin petas, konsolu mizeran kaj helpu lasitan, 290
 Mi do certigon kunportu donitan, kaj mi pli kuraĝe
 Ĉiujn ekprovos okazajn. » Sed, tion aŭdinte, Dardanaj
 Idoj ekverŝas larmegojn, precipe la bela lulo ;
 Ĉar li pripensas kortuŝe al amo fervora de patro.
 Tiam li tiel parolas : 295
 « Al vi, al iu kapabla de tiaj projektoj, mi kore
 Ĉion promesas : patrino fariĝos do mia ; nur mankos
 Nomo de Kreŭso : ĉar nasko de tia naskinto ne estas
 Danko titolo malgranda, eĉ kia ajn estos la fino
 De l'entrepreno. Do, kiel kutimis la patro, sur tiun 300
 Kapon mi ĵuro : premiojn donotajn al vi, se vi venkos,
 Mi tuj redonos al via patrino kaj viaj parencoj. »
 Tiel li diras, plorante, samtempe el ŝultro elprenas
 Glavon mirindan el oro : Likao Gnosia ĝin arte
 Faris, kaj ilon enfermis en ingon el elefantosto. 305
 Felon harriĉan de flava leono Mnesteo al Niso
 Donas ; kaj kaskon kun li interŝanĝas fidela Aletio.
 Ili armitaj eliras, dum ĉiuj, ĉe pordo starante,
 Manojn agitas, ĉefantoj, junuloj kaj eĉ maljunuloj,
 Bonajn sendante dezirojn. Samtempe la bela lulo, 310
 Kvankam junaĝa jam koron kaj zorgojn de viro havante,
 Donis multnombrajn avertojn al patro portotajn ; sed ven-
 Ĉion forpelis, kaj vanajn al-nuboj redonis parolojn. [toj
 Ili eliras, transiras fosaĵon, tra nokto malluma,
 Kaj pereigan ekcelas tendaron, estontan por multoj 315

- Loko mortiga. Sur herbo, pro dormo kaj vino senmovajn,
 Ili dormantojn ekvidas : sur bordo, starigas timonojn
 Ĉaroj; kaj inter rimenoj, armiloj, kalikoj kaj radoj
 Kuŝas soldatoj; do tiel parolas la filo Hirtaka :
- 320 « Eurialo, ni provu kuraĝon; jen estas okazo,
 Estas jen vojo. Vi, por ke neniuj korpuso nin povu
 De malantaŭe surprizi, prizorgu, rigardu atente :
 Dume mi rabos tendaron, kaj vojon mi faros larĝegan. »
 Tiel dirinte, li poste per glavo silente atakas
- 325 La malhumilan Ramneson : kuŝante sur multaj tapiŝoj,
 Tiu ĉi dormas okaze, kaj forte plenpulme ronkadas;
 Reĝo samtempe kaj kara diveno de Turno la reĝo,
 El li ne povis scienco divena forigi pereon.
 Li tri servistojn mortigas tra sagoj okaze kuŝantajn,
- 330 Kaj ĉevalostron de Remo : kaj, veturigiston trovinte
 Apud ĉevaloj, per fero li kolon ektranĉas pendantan.
 Poste li kapon de estro faligas kaj trunkon forlasas
 Sin movigantan en sango, dum nigraj sangfluoj ruĝigas
 Liton kaj teron. Li poste Lamiron mortigas kaj Lamon,
- 335 Fine junaĝan kaj belan Saranon : li, dum la plej granda
 Parto de nokto, ludadis; kaj nun li, de Bako venkita,
 Membrojn etendis senmovajn : ve! estus feliĉe ke ludo
 Daŭru dum nokto la tuta ĝis luma reveno de suno.
 Tiel leono rabema tra plena ŝafejo saltegas :
- 340 Ĉar ĝin instigas malsato, ĝi mutajn pro timo ŝafidojn
 Ŝiras, manĝegas, kaj dume blekegas per sanga buŝego.
 Eurialo ne malpli buĉadas : kuraĝe flamanta,
 Multajn soldatojn, sennoman anaron, li frapas kurante,
 Poste mortigas Herbeson, Abaron, kaj Fadon, kaj Reton,
- 345 Senkonsciantajn : ja Reto ne dormis kaj ĉion ekvidis;
 Sed li, fortege timanta, sin kaŝis malantaŭ kaliko.
 Tutan ferlavon puŝinte en bruston kontraŭan de viro,
 Kiu sin levis, li vivon kaj feron samtempe eligas.
 Sangon li vomas animon kaj vinon kun sango miksitajn,
- 350 Poste li mortas : kaj buĉojn daŭrigas fervora Trojano.
 Li sin direktis al anoj Mesapaj, kaj kien li vidis
 Estingiĝantajn fajrujojn, kaj kien ĉevaloj, ligitaj
 Kiel kutime, tra herbo sin paŝtis. Sed Niso, pensante

Ke li tro ŝatas buĉadon kaj rabon, lin diras mallonge :
 « Haltu kaj ĉesu : ĉar alproksimiĝas danĝera sunlumo. 355
 Tra malamikoj ni vojon malfermis; nun venĝo satiĝas. »
 Multajn objektojn belegajn el plena arĝento, armilojn,
 Ili forlasas, kaj same kalikojn, kaj riĉajn tapetojn.
 Eurialo Ramnesan ekkaptas glavŝelkon kaj zonan,
 Kiun ornamis globetoj el oro : ĝin iam Cediko 360
 Donis al riĉa Remulo Tibura, ĉar lin forestantan
 Al si alligi li volis; ĝin tiu mortante al nepo
 Lasis; post morto, ĝin, kiel akiron militan, Rutuloj
 Kaptis. Junulo sur ŝultrojn fortikajn ĝin vestas. ve! vane;
 Poste malpezan kaj faskornamitan li kaskon Mesapan 365
 Metas sur kapon. Tendaron lasinte, tuj ili forkuras.
 Dume, rajdantoj senditaj el urbo Latina, dum staris
 Tuta legio cetera bonorde en kampoj proksimaj,
 Iris, kaj portis respondon de ĉefo al Turno la reĝo.
 Tiujn ĉi tricent armitojn ŝildhavajn komandis Volscenso. 370
 Ili jam alproksimiĝis tendaron kaj muron ektuŝis,
 Kiam maldekstre, sur kruta vojeto, Trojanojn kurantajn
 Ili ekvidas, dum kasko, lumanta tra ombro de nokto,
 Eurialon perfidas, ĉar frapis ĝin lunaj radioj.
 Oni ne vane ĝin vidis. En aro Volscenso ekkrias : 375
 « Haltu do! Kien vi iras? kaj kial vi estas armitaj?
 Kial vi kuras sur tiu vojeto? » Sed ili silentis,
 Kaj rapidigis forkuron, fidante arbaron kaj nokton.
 Tien kaj tien, al vojoj konitaj, sin tuje direktas
 Aro rajdanta; kaj ĉiun eliron gardistoj observas. 380
 Estis arbaro kovrita de kverkoj kaj nigraj arbetoj;
 Ĝis malproksimo ĝin dornarbetaĵoj plenigis densegaj,
 Kaj, tra mallumaj arbejoj, vojetoj montriĝis maloftaj.
 Eurialon mallumo sub branĉoj kaj peza akiro
 Malrapidigas; kaj timo lin trompas pri vojo sekvota. 385
 Niso foriras, malsaĝa! Jam li, malamikon lasinte,
 Lokon atingis, nomitan Albano de Albo antikva,
 Kie la reĝo Latino stalaron posedis altegan.
 Tie li haltas, kaj vane foreston rimarkas amikan :
 « Eurialo plendinda, vin kie mi povis forlasi? 390
 Kien mi serĉos? » Li vojojn de tiu arbaro trompema

- Ree trakuras, kaj li malantaŭe lasitajn postsignojn
 Zorge demandas, vagante tra densaj arbejoj silentaj.
 Bruon li aŭdas, ĉevalojn, rajdantojn lin persekutantajn.
- 395 Tiam, apenaŭ kriadoj atingis orelojn, subite
 Eurialon li vidas. Nescio de lokoj kaj nokto
 Trompis junulon. Lin kaptis kaj premas, tra granda tumulto,
 Aro kolera, dum vanĉe multegon li penas batali.
 Kion li faros? Per kiu atako, per kiuj armiloj,
- 400 Savi li povos amikon? Ĉu li sin ĵetegos en mezon
 De malamikoj, kaj petos mortigon de vundo ĥonora?
 Brakon rapide li streĉas al kapo kaj lancon balancas :
 Sed ekvidinte vizaĝon de Luno, ŝin tiel li preĝas :
 « Estu favora, diino, kaj mian helpadu laboron,
- 405 Gloro de astroj, vi kiu Latonajn prizorgas arbarojn.
 Iam se patro Hirtako sur viajn altarojn, por Niso,
 Donojn oferis; se mi plinombrigis per miaj ĉasaĵoj
 Ilin, najlinte donacojn sur pordojn, sur sanktan arkaĵon,
 Tiun korpuson forpelu, kaj sagojn direktu tra ventoj. »
- 410 Tiel dirinte, kaj ĉiujn streĉinte muskolojn, li feron
 Ĵetas : la sago fluganta trairas tra ombro de nokto,
 Dorson kontraŭe renkontas Sulmonan kaj tie rompiĝas;
 Pecoj de ligno penetras en bruston kaj koron traboras.
- 415 Tere ĉi tiu ruliĝas malvarma, vomante el brusto
 Varman fluaĵon, dum flankojn skuadas senĉesaj singultoj.
 Ĉien rigardas Rutuloj. Ĝojega pri tiu sukceso,
 Apud orelo li sagon alian balancas rapide :
 Dum malamikoj klopodas, tra ambaŭ tempioj de Tago
 Sago penetras siblante kaj haltas en mezo de cerbo.
- 420 Serĉas kolere Volsenso de kie elvenas fersagoj,
 Ĉar li ne scias sur kiun li devos faligi kulpigon :
 « Nu! vi min pagos per sango verŝita mortligon de tiuj
 Ambaŭ armitoj, li diris! » Samtempe, per glavo seninga,
 Li tuj aliras al Eurialo. Sed terurigita
- 425 Niso ekkrias freneze, sin kaŝi en ombro pli longe
 Ne plu volante, ne tian povante suferi doloron :
 « Mi! mi! jen kiu ĝin faris! Kaj kontraŭ mi feron direktu.
 Mi kulpigota nur estas, Rutuloj : neniam kuraĝis
 Tiu, nek povis; ĉielon kaj astrojn mi nun atestigas :

- Li malfeliĉan tro amis amikon; jen estas kulpego. » 430
- Tiel li diris, plorante. Sed glavo fortege puŝita
Ripojn traboras maldikajn, kaj bruston blanketan disrom-
Eurialo ekfalas en morton : el membroj graciaj [pas.
Sango elfluas; kaj kolo senforta klinetas sur ŝultrojn.
- Tiel do floro purpura, tranĉita de fera plugilo, 435
Senkoloriĝas kaj mortas; kaj tiel papavo faligas
Kapon sur kolon lacetan, tuj kiam ĝin ŝarĝis pluvego.
Niso samtempe saltegas en mezon de aro; li celas
Solan Volscenson, de sola Volscenso li morton deziras.
Ĉefon ĉirkaŭas Rutuloj, kaj Nison ĉi tie kaj tie 440
Penas repuŝi : sed Niso multigas atakojn, turnigas
Glavon fulmigan, en buŝon krintan de ĉefo Rutula
Ĝin trapuŝegas, kaj li malamikon mortante mortigas.
Tiam, borita de frapoj, sur korpon de sia amiko
Li sin faligas, kaj fine ekdormas en morto kvieta. 445
- Ambaŭ feliĉaj! Se miaj versaĵoj sufiĉe daŭrados,
Vian jarcentoj konservos memoron en homaj animoj
Ĉiam, dum staros sur rifo senmova de Kapitolmonto
Domo Enea, dum Patro Romana posedos potencon.
- Tiam Rutuloj venkantaj, ŝarĝitaj de multaj akiroj, 450
Sed, ve! plorantaj malvivan Volscenson, reiras tendaron.
Tie ne malpli bruiĝis plendadoj, tuj kiam Ramneson
Oni ektrovis sensangan, kaj tiom da ĉefoj aliaj,
Numon, Saranon, buĉitaj. Sin ĉiuj kolektas por vidi
Korpojn de viroj duone mortantaj, de nova buĉado 455
Lokojn varmetajn, kaj sangon ankoraŭ rivere fluantan.
Ili rekonas akiron Mesapan kaj kaskon brilantan,
Fine globetojn el oro rabbitajn per tia penado.
- Dume, por novan eklumon disverŝi sur teron, lasinte
Ruĝan kuŝejon Titonan, unua stariĝis Aŭroro; 460
Kaj jam videblaj montriĝis objektoj sub sunaj radioj.
Turno, vestinte armilon, al armoj alvokas soldatajn,
Kaj pro milito li kuproarmitajn kolektas korpusojn.
Ĉiuj lin sekvas : diversaj rakontoj instigas kolerojn.
Plie sur lancoj rigidaj, — plorinda vidaĵo! — fiksataj 465
Estas kaj akompanataj de grandaj kriegoj, du kapoj,
Tiuj de Niso kaj Eurialo.

- Sed Eneanoj senlacaj en parto maldekstra de muroj
 Tutan armeon kolektis; ĉar dekstran protektas rivero.
- 470 Ili fosaĵon defendas profundan, kaj straras sur altaj
 Turoj malĝoje : ĉar ilin kortuŝas la vido de kapoj
 Ve! tro konitaj, kovritaj de nigraj sangaĵoj fluantaj.
 Dume, tra urbo timanta, kurjere alflugas rapide
 Famo flugila, kaj trafas orelojn de bona patrino
- 475 Euriala. Subite el ostoj de mizerulino
 Varmó eliras : ŝpinaĵon kaj linon ŝi tuj ekfaligas.
 Tiam saltegas malfeliĉulino, virine kriante,
 Kaj tiregante hararon : ŝi murojn kaj kampojn unue
 Trafas per kuro freneza; ŝi virojn, ŝi sagojn danĝerajn
- 480 Tute forgesis : kaj plendoj senĉesaj plenigas ĉielon.
 « Tia vin, Eurialo, mi vidas! Ĉu, de maljuneco
 Mia malfrua protekto, vi povis min sola forlasi,
 Filo kruela? kaj, kiam vi kuris al tiaj danĝeroj,
 Lastan kison ne povis vin doni mizera patrino.
- 485 Sanga akiro por hundoj kaj birdoj Latinaj, ve! nun vi
 Kuŝas sur fremda kamparo! Ne via patrino tombreĝojn
 Povis konduki, nek fermi okulojn, nek lavi vundegojn,
 Korpon kovrinte per vesto, sur kiu, dum noktoj kaj tagoj,
 Mi laboradis senĉese, por mian konsoli grandaĝon.
- 490 Kien mi serĉos? Kaj kiu nun lando posedas de filo [taĵo,
 Membrojn rompitaĵoj kaj korpon senforman? Jen estas res-
 Kiun vi lasas! Pro ĝi vin tra maroj kaj landoj mi sekvis!
 Min tuj traboru, se vi min kompatas, Rutuloj, kaj sur min
 Ĉiujn jetegu sagegojn : unuan min fero mortigu!
- 495 Sed vi prefere, ho Patro grandega de dioj, kompatu;
 Malamegitan virinon per fulmo enĵetu Tartaren;
 Ĉar mi alie ne povas seniĝi je vivo kruela! »
 Korojn tuŝegas ĉi tiuj plendadoj : ĝemado malgaja
 Kuras tra aro, kaj rompas kuraĝojn al sanga milito.
- 500 Ŝi pligrandigas dolorojn. Pro tio Ideon, Aktoron
 Ilioneo kaj multe ploranta lulo komandas.
 Ili ŝin prenas en brakoj kaj portas en ŝian loĝejon.
 Sed malproksime trompeto resonas je kupra sonoro;
 Ĝin kunbruegas kriegoj, dum muĝas ĉielo frapita.
- 505 Volskoj alkuras rapide, egalan farinte testudon,

Kaj sin preparas por kavon plenigi kaj rompi remparon.
 Iuj ekserĉas eniron, kaj per ŝtupetaroj surrampas
 Muron, ĵus kie armeo aperas maldensa, kaj kie
 kronas ĝin malpli da viroj. Sur ilin Trojanoj ĵetadas
 Sagojn multspecajn, kaj ilin repuŝas per stangoj malmolaj, 510
 Tre kutimintaj, per longa milito, al muraj defendoj.

Ili pezegajn surrulis ŝtonegojn, kaj penis senlace
 Kupran tegmenton disrompi per maso falinta : sed Volskoj
 Povis sub dika testudo plej fortajn toleri frapegojn.
 Sed jam ne ili sufiĉas; ĉar, kien plej forta minacas 515

Aro, Trojanoj ruligas kaj ĵetas pezegan masegon,
 Kiu premezas Rutulojn, kaj tre malproksime armilan
 Rompas tegmenton : kuraĝaj Rutuloj ne volas pli longe
 Sub protektilo batali, sed penas per sagoj forpeli
 El fortikaĵo Trojanojn. 520

Sed aliflanke Mezenco la malbelegulo agitas
 Pinon Etruskan, kaj fajrojn fumantajn fervore ĵetegas.
 Dume Mesapo, la ĉevaldresanto kaj ido Neptuna,
 Barojn tiregas, kaj petas ŝtuparojn por rampi sur murojn.

Vin, Kaliopo, vin, Muzoj, mi preĝas : inspiru poeton. 525
 Diru per kiaj buĉadoj per kiaj funebroj ferglavon
 Turno famigis, kaj kiom da viroj li sendis al Orko :
 Antaŭ mi grandajn malvolvu pentraĵojn de tiu milito.
 Diru : vi tion memoras, Diinoj, kaj povas rakonti.

Turo troviĝis, altege staranta kun pontoj tre altaj, 530
 Bone lokita : ĝin ĉiuj Italoj per multaj rimedoj
 Penis okupi, kaj fortojn kunigis por ĝin renversegi.
 Sed ĝin kontraŭe per ŝtonoj defendis Trojanoj; kaj sagojn
 Ili ĵetadis sennombrajn el kavaj fenestroj de turo.

Turno unua de torĉo flamanta enĵetas bruligon; 535
 Kaj tuj ekflamo aliĝas al flanko : de vento nutrita,
 Ĝi alkroĉiĝas al pordoj, kaj baldaŭ manĝegas tabulojn.
 Tamen interne Trojanoj ektimas kaj vane danĝeron
 Penas forkuri. Dum ili densiĝas kaj posten rifuĝas,
 Kie ne iĝas brulado, subite sub ŝarĝo ekfalas 540

Turo, kaj bruo terura resonas ĝis alta ĉielo.
 Kun derompaĵoj de vasta ruino al tero aliras
 Ili, duone mortantaj, vunditaj de propraj sagegoj,

- Brustojn rompinte sur trabojn malmolajn : kaj estas sa-
 545 Nur Helenoro kaj Liko. Unuan ankoraŭ junagan [vitaj
 Naskis sekrete de reĝo Liduja sklavino Licimno,
 Kaj ŝi lin, malpermesitajn portantan armilojn, al Trojo
 Sendis, ne gloran pro glavo tro nuda, pro ŝildo tro glata.
 Kiam li vidas, en mezo de miloj da viroj de Turno,
 550 Tie armeon Latinan, kaj tie alian, starantajn
 Kontraŭ li, kiel bestego, zonata de rondo ĉasista,
 Kontraŭ pikilojn rapidas, sin antaŭ mortigon volonte
 Ĵetas, kaj sur ponardegojn saltegas per lasta kurego,
 Tiel junulo en mezon de glavoj alflugas, mortonta,
 555 Kaj sin direktas ĵus kien plej densajn li vidas sagegojn.
 Sed, pli rapida piede, tra sagoj kaj tra malamikoj
 Liko forkuras : li, muron trafinte, penadas por mane
 Altan tegmenton atingi kaj manojn ekkapti kunulajn;
 Vane! Ĉar Turno lin sekvis kun sagoj, laŭ kuro egala,
 560 Kaj lin insultas venkante : « Ĉu, malprudentulo, el mia
 Mano vi eblan esperis forkuron? » Samtempe pendantan
 Li lin ekkaptas, kaj lin altiregas kun parto de muro.
 Tiel leporon aŭ cignon je korpo blanketa forportas
 Birdo Jupitra celante ĉielon, per ungoj kurbetaj;
 565 Tiel ŝafidon, de ĝia patrino petitan per blekoj,
 Lupo en staloj ekrabas kruele. De ĉie sonadas
 Krioj : dum unuj aliras, kaj kavojn per tero plenigas,
 Torĉojn flamantajn aliaj ekĵetas ĝis altaj tegmentoj.
 Ilioneo per granda ŝtonego, pecego de monto,
 570 Frapas Luceton, ĵus kiam sur pardon li fajron alligis.
 Eminationon mortigas Ligerio, Korinon Asilo,
 Tiu per forta sagego, ĉi tiu per sago perfida.
 Buĉas Ortigon Ceneo : sed Turno Ceneon venkantan
 Same mortigas, kaj Iton, Klunion, Promulon, Sagaron,
 575 Kaj Diokripion, kaj Idon, starantan sur supro de turo.
 Frapas Privernon Kapiso : unue lin vundis malpeza
 Lanco Temila; li ŝildon ekĵetis, malsaĝa, kaj manon
 Portis al vundo; sed sago, fluganta per plumoj, al flanko
 Manon fiksadismaldekstran, kaj, bruston borinte, profunde
 580 Rompis per vundo mortiga organojn kaŝitajn de spiro.
 Bela vizaĝe, vestita de jako kudrile brodita,

Kolorigita de ruĝo lbera, sub riĉaj armiloj,
 Staris la filo Arcensa. Naskinto Arcenso alsendis
 Lin, edukitan en Marsa arbaro, sur bordoj Simetaj,
 Apud altaroj grasegaj de la kompatema Paliko. 585
 Lancon lasinte, Mezenco ekprenas kaj streĉas rimenojn
 De ŝtonĵetilo, ĝin ĉirkaŭ la kapo trifoje turnigas,
 Kaj, per varmega plombaĵo rompinte tempiojn de viro
 Kontraŭstaranta, sur sablon flugantan lin ĵetas malviva.
 Tiam unue, ĵetinte sageton rapidan, Askano; 590
 Kiu ĝis nun nur bestegojn sovaĝajn trabori kutinis,
 Provis millton, kaj mane kuraĝan mortigis Numanon.
 Li, alnomita Remulo, de Turno plej junan fratinon
 Nove edziĝis : kaj oni rakontas ke tiu junulo,
 Antaŭ armeo starante, parolojn kriegis insultajn. 595
 Li, malhumila pro nova parenco la reĝo Rutula,
 Antaŭeniris kaj diris senlace per voĉo bruanta :
 « Ĉu vi ne estas hontemaj, Friganoj dufoje kaptitaj;
 Ĉar vi malantaŭ bariloj vin kaŝas por morton eviti?
 Kaj vi pretendas ke niaj edzinoj fariĝos la viaj!
 Kia frenezo aŭ dio vin puŝis en landon Italian? 600
 Tie ne estas Atridoj nek falsodiranta Uliso.
 Gento de forta deveno, naskitojn en fluon riveran
 Ni subakvigas, kaj korpojn fortigas per frosto kaj ondoj.
 Filoj, senlacaj ĉasistoj, senĉese trakuras arbarojn. 605
 Dresi ĉevalojn, kaj streĉi pafarkon per sago, jen ludoj.
 Paciencaj junuloj, al kiuj malmulto sufiĉas,
 Teron plugile laboras aŭ urbojn milite potencas.
 Dum la tutvivo ni sagon manprenas, kaj dorsojn de bovoj
 Per lancpikilo kontraŭa lacigas. Ĉe ni maljuneco 610
 Malpligrandigas neniel de penso kaj korpo fortecon.
 Blanka hararo sin vestas per kasko; kaj ĉiam ni amas
 Novan forpreni akiron por vivi de ŝtelo kaj rabo.
 Viajn beligas vestaĵojn safrano kaj brila purpuro.
 Mallaborem vi amas, kaj vi nur dancadojn deziras. 615
 Viaj kiteloj posedas manikojn, kaj ĉapoj rubandojn.
 Frigujanoj, — ĉar ne Frigujanoj vi estas, — do iru
 Sur Dindimonton, kaj kanton aŭskultu de fluto bitrua.
 Vokas vin de Berecinta Patrino tamburoj kaj Idaj

- 620 Flutoj : al viroj rezervu armilojn kaj lasu militon. »
 Sed fanfaronajn parolojn kaj dirojn insultajn ne povis
 Plie toleri Askano : sur kordon haregan li sagon
 Metas, kaj, kontraŭstaranton celante, li streĉas du brakojn.
 Tamen antaŭe Jupitron li petas per vortoj preĝantaj :
- 625 « Ĉiopotenca Jupitero, ekprovon favoru kuraĝan ;
 Kaj mi al via preĝejo solenan alportos donacon.
 Antaŭ altarojn mi metos bovviron je frunto orata,
 Blankan kaj junan, egalan per kresko al kresko patrina.
 Ĝi jam frapadas per kornoj, kaj sablon per hufoj disigas. »
- 630 Patro, aŭdinte demandon, de alta ĉielo sennuba
 Tondris maldekstre : subite eksonas pafarko mortiga ;
 Kaj, malantaŭen tirita, forflugas kun siblo terura
 Sago, dum, kapon trafinte Remulan, tra kavaj tempioj
 Fero penetras : « Nun moku kuraĝon per vortoj insultaj !
- 635 Tiun respondon alsendas Friganoj dufoje venkitaj. »
 Tion nur diris Askano : Trojanoj fervore aplaŭdas :
 Ĝojo tremigas animojn, kaj ilin ĝis astroj sublevas.
 Dume Apolo harriĉa okaze, de bordo, eteraj,
 Vidis, sur nubo sidante, armeojn Aŭzonajn kaj urbon.
- 640 Tiel de alte li junan Iulon parolas venkintan :
 « Virte grandigu, infano ; ĉar tiel vi iros al astroj,
 Diojn naskonto, naskito de dioj : kaj rajte Fataloj
 Volas ke Asaragento estontajn elfinu militojn :
 Ĉar vin enhavi ne povas Trojurbo. » Samtempe el alte
- 645 Malsupreniras la dio, kaj, ventajn tranĉinte blovetojn,
 Trafas Askanon, vestinte vizaĝon kaj ŝajnon de Buto
 La maljunulo. Li iam de ido Dardana Anĥizo
 Estis la ĉevalzorgisto fidela kaj porda gardanto.
 Kiel kunulon, Eneo lin denis al filo. Do tute simila
- 650 Venis Apolo, havante de la maljunulo koloron,
 Voĉon, kaj blankan hararon, kaj brue sonantajn armilojn :
 Poste al brava Iulo li tiujn ekdiras parolojn :
 « Ido Enea, sufiĉas per sago senpune Numanon
 Ke vi mortigis, ke al vi permesis unuan triumfon
- 655 Granda Apolo ; ĉar li pro lerteco ne estas jaluza.
 Sed nun, infano, ne faru militon. » Kaj, tiel dirinte,
 Lasis Apolo mortemajn rigardojn en mezo de diro,

Kaj, malproksime de homaj okuloj, fandiĝis aeren. .
 Dion kaj sagojn timindajn de dio rekonas precipaj
 Idoj Dardanaj, kaj aŭdas pafarkon pro kuro sonantan. 660
 Tiam, por Feban obei ordonon, de juna Askano
 Ili haltigas kuraĝon : denove al sanga batalo
 Ĉiu reiras kaj vivon ekriskas tra ĉiuj danĝeroj.
 Bruo eksonas tra tutaj remparoj antaŭaj de muroj ;
 Estas streĉitaj pafarkoj malmolaj, ĵetitaj sagegoj ; 665
 Tuta kamparo je sagoj kovriĝas, dum interpuŝiĝas
 Ŝildoj kaj kaskoj bruege : perforta fariĝas batalo.
 Tiel per pluvoj frapegas kamparon pluvemaj Kapridoj,
 El Okcidento venantaj ; kaj tiel sur maron ĵetegas
 Hajlon densegan nubaroj, tuj kiam Jupitero kolera 670
 Ventojn ekscitas en vintro, kaj nubojn disrompas eterajn.
 Alkanoridoj Pandaro kaj brava Bitio, Idanoj,
 Kiujn Jupitero edukis en sanktaj arbaroj Ieraj,
 Tiom alkreskaj ja kiom abioj de montoj patrujaj,
 Pardon malfermas, de ili gardatan laŭ ĉefa ordono, 675
 Kaj malamikojn, fidante armilojn, al muroj invitas.
 Antaŭ la turoj, maldekstre kaj dekstre, staradas ĉi tiuj,
 Fere armite kaj kapojn flerajn per fasko kronante.
 Tiel, sur bordo de klara rivero, ĉu ĉarma Adigo,
 Ĉu Po, du kverkoj altiĝas eteren kaj ilin ombrigas. 680
 Ili branĉaron direktas ĝis astroj ĉielaj, kapegojn
 Densajn agitas, kaj verdan hararon balancas aeran.
 Tamen Rutuloj, vidante eniron, tuj al ĝi rapidas.
 Tiam subite Kvercenso, kaj Tmaro je koro kuraĝa,
 Kaj Akvikolo belega, kaj Hemo Marsido, puŝitaj 685
 Forte per tuta armeo, ĉu, dorson turninte, forkuras,
 Ĉu, sur la sojlo de pordo, kruelan ricevas mortigon.
 Sed pligrandiĝas pli kaj pli koleroj en koroj frenezaj.
 Jam kolektiĝas Trojanoj por pordan protekti malfermon :
 Ili kuraĝas foriri, kaj ekster remparoj batali. 690
 Dume, dum Turno la ĉefo ĉi tie kaj tie batalas,
 Kaj militistojn mortigas, kurjero tuj al li sciigas
 Ke malamiko, freneza pro buĉo, malfermis la pordon.
 Granda lin kaptas kolero : buĉadon lasinte faratan,
 Li tuj rapidas al pordo Dardana, al fratoj grandkreskaj, 695

- Kaj Antifaton unue, -- ĉar tiu unua sin montris, —
 Filon bastardan de Teba patrino kaj granda Sarpedo,
 Li ekmortigas per sago. La ilo el ligno Itala
 Flugas tra mola aero, kaj, bruston perforte frapante,
 700 Boras stomakon; el kavo de vundo profunda eliras
 Sango ŝaŭmanta, kaj fero varmiĝas fiksita en pulmo.
 Tiam per glavo li tuj Erimanton, Meropon, Ofidnon
 Frapas, kaj okulflamantan Bition en koro frenezan,
 Sed ne per sago; ĉar sago ne povus mortigi giganton.
 705 Tiam sagego alflugas siblante, perforte ĵetita,
 Kiel flamfulmo: ne frapon du ledoj de bovo, kaj eĉ du
 Skvamaj tavoloj el oro de ĝis nun fidinda kiraso,
 Povis subteni. Li falas, kaj membroj senmove kuŝiĝas:
 Tero ĝemadas, kaj ŝildo grandega sonoras bruege.
 710 Tiel kelkfoje, sur bordo de Eŭbeana Baio,
 Kiam, antaŭen en maron, por digon konstrui fortikan,
 Oni faligas ŝtonegan masegon: amaso kliniĝas,
 Glitas kaj brue en profundegaĵon rapide falegas,
 Dum malklariĝas ondaro, dum ŝlimo nigreta flosiĝas:
 715 Altan Procidon tremigas bruego kaj liton malmolan
 De Inarimo, sur kiun Jupitero kuŝiĝis Tifeon.
 Marso sed armopotenca animojn kaj fortojn Latinajn
 Rekuragiĝas, kaj akran pikilon enigas en brustojn,
 Dum al Trojanoj li sendas Forkuron kaj Timon timindan.
 720 Venas de ĉie Rutuloj, ĉar grandan fervoron batalan
 Dio milita en korojn inspiris.
 Kiam ekvidas Pandaro ke korpo de frato kuŝadas,
 Ke nun la ŝanco forkuris, ke estas hazarda la fino,
 Tiam per granda penado li pordon sur hokoj turniĝas,
 725 Ŝultrojn larĝegajn sur ĝin apoginte: li ekster remparo
 Multajn kunulojn forlasas, per sanga batalo prematajn,
 Dum li aliajn akceptas kurantajn, kaj kun li enfermas.
 Sed li malsaĝa ne vidis ke reĝo Rutula troviĝis
 Meze de aro, kaj kun ĝi samtempe penetris en urbon:
 730 Tigro kruela eniris en mezon de dolĉaj ŝafidoj.
 Nova fajrero subite okulojn de Turno briligas;
 Sonas bruege armiloj; tremetas sur kapo sangruĝaj
 Faskoj; kaj ŝildo alĵetas flamerajn de fulmo lumantajn.

Malamegitan vizaĝon kaj membrojn fortikajn rekonas
 La Eneanoj subite tremantaj. Sed granda Pandaro 735
 Saltas antaŭen, kaj, forte kolera pri-morto de frato,
 Diras : « Ne estas ĉi tie palaco Amata, donota
 Dote; kaj vi ne troviĝas en muroj de patra Ardeo.
 El malamika tendaro neniam vi povos eliri. »
 Sed ridetante kaj kore trankvila, jen Turno respondas : 740
 « Se vi posedas en koro kuraĝon, komencu batalon :
 Kaj vi Priamon konigos ke novan vi trovis Ahilon. »
 Tiel li diras. Sed tutan fortaron kolektas Pandaro,
 Kaj li ĵetegas sagegon tuberan, ankoraŭ ŝelhavan :
 Sed ĝi nur vundis aeron; idino Saturna Junono 745
 Ilon flugantan deturnis; kaj sago fiksiĝis sur pordon.
 « Tiun armilon ĉi, kiun per mano mi forte balancas,
 Vi ne evitos; ĉar miaj frapegoj neniun indulgas. »
 Tiel li diras; kaj glavo, el alte venante, refalas
 Inter tempioj, en mezon de frunto fortege penetras, 750
 Kaj per vundego larĝega ĝi vangojn dividas senbarbajn.
 Bruo eksonas, kaj tero tremegas sub pezo de viro; [tajn
 Membrojn malfortajn, armilojn de sango kaj cerbo kovri-
 Teren forlasas mortanto; dum kapo, en mezo tranĉita,
 Partojn egalajn, maldekstre kaj dekstre, pendigas sur ŝul- 755
 Tiam, premitaj de forta teruro, forkuras Trojanoj : [trojn.
 Kaj se, en tiu momento, venkanto pripensus barilojn
 Rompi per mano, kaj pordon malfermi al siaj kunuloj,
 Estus finintaj samtempe Trojgento kaj nuna milito.
 Sed furiozo, deziro malsaĝa al buĉo, lin puŝas 760
 Al malamikoj.

Li do unue Faleron kaj Gigon atakas, genuojn
 Tranĉas, kaj sagojn el ili kaptitajn ĵetegas en dorson
 De forkurantoj : ĉar fortojn kaj koron fortigas Junono.
 Frapoj mortigas Halison, Fegeon je ŝildo malgranda, 765
 Poste Alkandron, Halion, Noemon, Pritanon; ĉar ili
 Lian ne konis ĉeeston, kaj Marson sur muroj batalis.
 Al li aliris Linceo, vokanta kunulojn : sed dekstre,
 Sin apoginte per dorso sur urban remparon, li glavon
 Streĉas, kaj poste, per unu nur frapo, li kapon kaj kaskon 770
 Tre malproksimen flugigas Lincean : li poste mortigas

- Bestegdresanton Amikon, — neniu pli ol li rimedojn
 Konis por sagojn kaj ĉiujn armilojn venene sorbigi, —
 Kaj Eolidon, Klition, kaj Kreton, amikon de Muzoj.
- 775 Kreto, kunulo de Muzoj, plezure per kordoj de citro
 Versojn deklamis poemajn; ariojn amante muzikajn,
 Ĉiam li kantis ĉevalojn, armilojn kaj sangan batalon.
- Fine, aŭdinte buĉadon de siaj kunuloj, alkuras
 Cefoj Trojanaj, Mnesteo kaj brava Seresto; kaj ili
- 780 Disforkurantajn ekvidas Trojanojn kaj Turnon en urbo.
 Tiam Mnesteo : « Nu! kien vi iras kaj kuras, li diris?
 Pli malproksime ĉu vi do aliajn posedas remparojn?
 Unu nur viro, urbanoj, — kaj viaj korpusoj de ĉiuj
 Lokoj ĉirkaŭas lin, — tiajn buĉadojn senpune tra urbo
- 785 Semis, kaj tiom da junaj kunuloj alsendis al Orko!
 Ĉu malfeliĉa patrujo, ĉu dioj antikvaj, ĉu fine
 Granda Eneo en korojn ne verŝas kompaton kaj honton? »
 Kuraĝigite de tiaj paroloj, kaj ne plu timante,
 Ili densiĝas; kaj iom post iom, lasinte batalon,
- 790 Turno ektrafas riveron kaj ondon zonantan tendaron.
 Lin persekutas pro tio pli forte Trojanoj, kun grandaj
 Krioj, kaj virojn kolektas. Do, kiam kruelan leonon
 Sagoj minacas ĉasistaj, se ĝi timigita deiras,
 Tamen rigardo sovaĝa tremigas : kuraĝe kolera,
- 795 Dorson ĝi turni ne volas; sed, kvankam ĝi tion deziras,
 Estas neeble ke ĝi tra sagegoj kaj viroj forkuru.
 Same do, ŝanceliĝante kaj tre malrapide marŝante,
 Turno deiras tendaron : ĉar koron flamigas kolero,
 Eĉ li dufoje tra aro Trojana terure rapidas,
- 800 Kaj pro forkuro konfuza dufoje ĝi muron ektrafas.
 Baldaŭ sed tuta armeo kuniĝas el tuta tendaro;
 Kaj ne kuraĝas idino Saturna je tiaj multegoj
 Turnon protekti. El alta ĉielo Jupitro Irison
 Sendis, por porti al sia fratino minacajn ordonojn,
- 805 Por ke el alta remparo Trojana tuj Turno eliru.
 Tiam nek mano de brava junulo nek ŝildo nun povas
 Kontraŭbatali : multegon da sagoj de ĉie pluvantaj
 Li ne repuŝas plu : ĉirkaŭ tempioj de bruo senĉensa
 Kasko resonas, ĉar firman kuprilon ŝtonfrapoj difektas

Estas tranĉita plumfasko : por batojn eviti la ŝildo 810
 Ne plu sufiĉas; lin premas per sagoj Trojanoj kaj fine
 Fulmosimila Mnesteo. Sur korpo fluadas nigreta
 Ŝvito, kaj, — ĉar li ne povas plu spiri, — el nazo eliras
 Sterko malpura, dum membrojn lacegajn skuadas spirego.
 Fine, per salto altega, kun ĉiuj armiloj, sin ĵetas 815
 Li en riveron. Ĉi tiu en profundegaĵo flaveta
 Junan heroon akceptas kaj kaŝas sub ondoj kvietaj,
 Kaj lin redonas al liaj kunuloj, je buĉo lavitan.

KANTO DEKA

Dume de ĉiopotenca Olimpo sin domo malfermas.
 Patro de dioj kaj Reĝo de homoj en astra sidejo
 Konsilantaron kunvokas : de tiu altaĵo li vidas [najn.
 Mondon kuŝantan, Dardanano tendaron kaj gentojn Lati-
 lli sidiĝas en ĉambro duporda : kaj Patro parolas : 5
 « Ĉielloĝantoj potencaj, nu, kial do viaj konsentoj
 Tiel ŝanĝiĝis? kaj kial malame vi interbatalas?
 Mi malpermesis ke lando Itala militu Trojanojn :
 Vi malobeis ordonon; sed kial? kaj kia timado
 Ilin instigis ekkapti armilojn kaj glavon agiti? 10
 Tempo alvenos Fatala, — ĝin ne rapidigu, — en kiu
 Sur fortikaĵojn Romanajn kruele Kartago verŝados,
 Tra malfermitaj Alpegoj, teruron kaj malfeliĉegon.
 Tiam vi povos satigi malamojn, kaj provi militon.
 Nun vin haltigu, kaj inter vi ĵuron starigu volontan. » 15
 Tiel mallonge parolis Jupitero : sed ora Venuso
 Malpli mallonge respondas :
 « Patro, de dioj kaj homoj eterna reganto, ĉu estas
 Povo alia sur kiun mi povas apogi preĝadon? »

- 20 Vi de Rutuloj ekvidas insultojn : fiere ĉevalojn
 Turno kondukas en batalantarojn ; ĉar Marsa helpado
 Lin favoregas. Jam muroj ne povas protekti Trojanojn :
 Eĉ malantaŭ pordegoj kaj inter remparoj, batalo
 Ilin premezas, kaj kavaj fosaĵoj je sango plenigas.
- 25 Sed forestanta ne scias Eneo. Ĉi tiun sieĝon
 Ĉu vi neniam ĉesigos? De nove naskita Trojurbo
 La malamiko minacas muregojn : alian armeon
 De Etolanoj Tidido direktas, el urbo Arpisa,
 Kontraŭ Trojanojn. Mi kredas ke ree mortema armilo
- 30 Vian filinon kruele minacas de nova vundego.
 Ĉu sen permeso, ĉu malgraŭ Jupitra volado, Trojanoj
 Landon Italan aliris? nu, kulpon punegu ; kaj ili
 Helpon ĝuadu nenian : sed ili se de Superuloj
 Kaj Inferuloj obeis avertojn, ĉu viaj komandoj
- 35 Neaj kaj vanaj fariĝos? ĉu novaj okazos Fataloj?
 Ĉu mi rakontos ŝiparon brulitan sur bordo Eriksa,
 Reĝon ventegan igantan kolerojn de ventoj senĉenaj
 En Eolujo, Irison el nuboj kurjere senditan?
 Nun mem Infero moviĝas ; — ĝis nun ĝi ne estis uzita. —
- 40 Eksupreniras Alekto subite al lokoj superaĵ,
 Kaj ŝi en mezon de urboj Italaj malpacon enigis.
 Pri imperio mi diros nenion ; ĉar ĝin mi esperis,
 Kiam nur estis feliĉo : ve ! venku de vi protektatoj !
 Se al Trojanoj neniun permesas patrujon edzino
- 45 Via kruela, per Trojaj ruinoj fumantaj, ho Patro,
 Mi vin petegas, senkulpan Askanon min lasu eligi
 El pereigaj armiloj, kaj nepon min lasu konservi.
 Tra nekonitaj ondaroj Eneo do estu ĵetita ;
 Vojon, de sorto donitan, li sekvu ; mi tion akceptas.
- 50 Sed lin mi povu protekti, kaj el li forigi militon.
 Mi Amatonton, Citeron posedas, kaj Pafon altegan,
 Kaj Idalujan palacon : li tie, lasinte armilojn,
 Vivon pasigu sengloran. Ordonu potenca volado
 Ke Aŭzonujon Kartago premezos ; per ia barilo
- 55 Ni ne malhelpos Tiranojn. Pro kia profito, Trojanoj
 Armojn danĝerajn evitis, Argujan forkuris bruladon,
 Tiom da maraj, da landaj minacoj, senhalte trairis,

Por en Latujo de nova Pergamo ekprovi konstruon?
 Estus pli bone por ili restado ĉe cindroj patrujaj,
 Kampoj en kiuj ekstetis Trojurbo. Simoon kaj Ksanton 60
 Al mizeruloj redonu, ho Patro, mi petas : kaj ili
 Povu reigi hazardojn! »

Sed tiam reĝina Junono,
 Multe kolera : « Nu! kial do vi min devigas silenton
 Rompi, kaj longan doloron kaŝitan konigi per vortoj?
 Kiu do, homo aŭ dio, devigis Eneon militon 65

Provi, kaj sin malamike prezenti al reĝo Latino.
 Landon Italan lin trafi ordonis Fatalaj avertoj,
 Aŭ frenezaĵoj Kasandraj prefere : sed ĉu mi konsilis
 Ke li forlasu tendaron, esperon konfidu al ventoj,
 Ekkomisiu al knabo militon kaj zorgon de muroj, 70
 Ligon ekpetu Tirenano, kaj gentojn agitu kvietajn?
 Estas ĉu dio, ĉu mia potenco, nun kiu lin premas?
 Kaj ĉu pro tio Irison el nuboj alsendis Junono?

Vi nun indignas, vidante Italojn ĉirkaŭi per flamoj
 Novan Trojurbon : sed Turno defendas la landon de patroj, 75
 De Venilio diina patrino, de avo Pilumno.

Estas Trojanoj pli krimaj; ĉar ili atakas Latinojn,
 Premas kamparon malpropan, rabitan ŝteladas akiron,
 Kaj fianĉinon tiregas el brustoj fianĉa kaj patra.
 Pacon li petas kun branĉoj, sed ligas armilojn sur ŝipojn. 80
 Tiri Eneon vi povis el manoj de Grekoj, anstataŭ
 Viro nebulon prezenti flugantan, kaj vanan vaporon;
 Same vi povis en tiom da Nimfoj ŝanĝadi velŝipojn;
 Ĉu al ni estus do malpermesite helpadi Rutulojn?
 Sed forestanta nescias Eneo : li ĉiam nesciu. 85

Vi Idalujon kaj Pafon posedas kaj altan Citeron;
 Kial milite vi urbon kaj korojn instigas kolerajn!
 Vere, ĉu estas mi kiu Frigujan restaĵon malfortan
 Rompas, aŭ tiu kiu mizerajn liveris Trojanojn
 Al Ahajidoj? Sed kiu do kontraŭ Eŭropaj armiloj 90
 Metis Aziajn, kaj pacon disrompis per rabo insida?
 Ĉu mi adultan Trojanon konsilis por Spartano insulti?
 Ĉu, lin vundinte per sagoj Kupidaj, mi naskis militon?
 Tiam pro viaj vi povis ektemi : tro estas malfrue

- 95 Nun por maljustan aŭdigi plendadon, kaj peton malprae-
 Tiel parolis Junono; kaj ĉiuj, pro sentoj diversaj, [van.]
 Ĉielloĝantoj murmuris. En densaj arbaroj, unuaj
 Blovoj malliberigitaj similajn aŭdigas murmurojn,
 Kiuj pri gravaj ventegoj estontaj informas maristojn.
- 100 Tiam la sola reganto de mondo, la Patro potenca,
 Ekparoladis: silentis subite diaro atenta;
 Tera sidejo tremetis, malbruis vastega etero,
 Haltis Zefiroj, kaj maro kvietan haltigis ondaron:
 « Tiujn parolojn en viajn animojn akceptu kaj fiksu.
- 105 Ĉar ni ne povas per juro Trojanojn kaj anojn Aŭzonajn
 Ligi, kaj ĉar vi ne volas ke inter vi haltu malpaco,
 Ĉiu do sian esperon nun sekvu kaj sian Fatalon.
 Sendiference mi agos kun Trojoj kaj anoj Rutulaj,
 Kaj ne distingos, ĉu juste Italoj sieĝas tendaron,
- 110 Aŭ ĉu maljuste trompemaj avertoj instigis Trojanojn:
 Same mi agos Rutulojn. Kaj ĉiu de sia laboro
 Sekvon toleros Fatalan: al ĉiuj samiĝos Jupitero.
 Vojon sekvados Fataloj. » Ĉi tion li ĵuris sur Stikson,
 Fratan riveron, sur nigran torenton, sur peĉajn turniĝojn:
- 115 Poste li kapon klinetis; kaj tuta tremegis Olimpo.
 Tiam, kunvenon fininte, ortronon forlasas Jupitero;
 Kaj lin la Ĉielloĝantoj ĝis pordo respekte kondukas.
 Dume Rutuloj de ĉiuj pordegoj sieĝas eniron,
 Virojn buĉadas kruele kaj murojn ĉirkaŭas per flamoj;
- 120 Ĉar enfermita en muroj troviĝas Enea legio.
 Estas forkura espero nenia. Sur turoj altegaj
 Staras la malfeliĉuloj maldensaj, kaj vane remparojn
 Kronas: Imbrasid' Azio, Hicetaonido Timeto,
 Du Asaracoj, Kastoro kaj Timbro maljuna unuan
- 125 Lokon okupas, dum ilin kuniras Temeno kaj Klaro,
 Fratoj Sarpedoj ambaŭ venintaj de monta Licujo.
 Ĉiujn streĉante muskolojn, por pezan alporti ŝtonegon,
 Grandan pecegon de monto, jen Akmo, de urbo Ĥirnesa,
 Forta, ne malpli ol patro Klitio, ol frato Mnesteo.
- 130 Tiuj sin penas defendi per sagoj, ĉi tiuj per ŝtonoj:
 Ili preparas flamĵetojn, kaj sagojn almetas al kordoj.
 Meze de aro, objekto plej kara de zorgoj Venusaj,

- Staras Dardana infano : li kapon malkovras belegan.
 Tiel lumegas juvelo, zonata de rondo orata,
 Kiu ornamas ĉu kolon ĉu kapon; aŭ elefantosto, 135
 Kiun, lokitan en busko aŭ terebintujo Orika,
 Arto briligas. Hararo rivere fluadas sur kolo
 Laktokolora, kaj ringo el oro ĝin ligas maldika.
 Tiuj nacioj grandkoraj vin same ekvidis, Ismaro,
 Sagojn ĵetantan, kaj ilin armantan per nigra veneno, 140
 Ido de gento Liduja, en kiu kamparon riĉegan
 Viroj kulturas, kaj kiun fruktigas orhava Paktolo.
 Same ĉeestas Mnesteo : el muroj remparaj li iam
 Turnon repuŝis; lin tiu ĉi gloro ĝis nuboj altigas :
 Fine Kapiso; de nomo mem urbon li nomis Kapuan. 145
 Tamen dum ili, por tiun kruelan subteni militon,
 Penojn kunigis, en nokto Eneo tranĉadis ondaron.
 Kiam, lasinte Evandron, tendaron li trafis Etruskan,
 Reĝon li petas, kaj lin memorigas pri nomo kaj gento :
 Kion li volas li poste konigas, kaj kion li povas 150
 Fari, kaj gentojn armitajn por helpi Mezencon, kaj fine
 Turnajn kolerojn : dum malkonstantecon de homaj aferoj
 Li rimarkigas, li preĝe parolas. Sen ia prokrasto,
 Tarko kunigas armeojn, kaj ligon akceptas. Fataloj
 Efektivigiĝis, ĉar ĉefas fremdulo Lidanojn : do ili 155
 Ŝipojn eniras, laŭ diaj ordonoj. Aliras unua
 Ŝipo Enea, sur sprono Frigujajn portante leonojn;
 Ilin superas Idmonto, karega al Trojaj migrantoj.
 Sidas ĉi tie la granda Eneo : profunde li pensas
 Pri sortovicoj militaj : ĉe flanko maldekstra Palaso 160
 Staras, kaj li lin demandas pri astroj, pri vojoj sekvotaj
 Nokte, pri teraj kaj maraj danĝeroj de li triumfitaj.
 Nun Helikonon malfermu, diinoj, kaj kanton komencu.
 Diru do kiaj herooj eliris el bordoj Etruskaj,
 Armis ŝiparon kaj maron sulkadis por sekvi Eneon. 165
 Fendas ondaron unua Masiko sur Tigro bronzita :
 Li mil junulojn komandas lasintajn Kluzian remparon,
 Kaj fortikaĵon de Koso : sagujo malpeza sur ŝultroj,
 Sagoj rapidaj, mortiga pafarko, jen estas armiloj.
 Flanke, Abaso kruela : je riĉaj armiloj brilegas 170

- Lia korpuso, kaj ora Apolo ornamas ŝipveston :
 Ses cent junulojn milite lertegajn al li komisiis
 Populonia patrurbo, kaj tri cent aliajn alsendis
 Ilva insulo, famega pro ŝtelaj minejoj senfinaj.
- 175 Trie alvenas Asilo, diveno de dioj kaj homoj,
 Kiu tradukas intestojn de brutoj kaj astrojn ĉielajn,
 Lingvon de birdoj, kaj profetadantajn fajrerojn de fulmo :
 De mil soldatoj, kun lancoj teruraj, li ĉefas amason.
 Ilin donacis Pisurbo, naskita sur bordo Alfea,
- 180 Urbo de lando Etruska. Lin sekvas belega Asturo ;
 Lin fierigas ĉevalo kaj multekoloraj armiloj :
 Tri cent armitoj, kontentaj, — ĉar ili kuniras Eneon, —
 Ceran forlasis muregon, riveron kaj kampon Miniajn,
 Pirgon malnovan, kaj domojn de la malsaniga Gravisko.
- 185 Kaj vin, Ciniro, vin, reĝon kuraĝan de bravaj Liguroj
 Mi ne forgesos, kaj aron malmultan de ĉefo Kupavo,
 Kiu sur kasko surmetas fasketon el plumoj de cigno,
 Viva emblemo de patro ; ĉar amo lin malfeliĉigis.
 Ĉar Faetonon amatan dum Cikno senfine ploradis,
- 190 Apud branĉaro ĝemanta, sub ombro de poplaj fratinoj,
 Dum li kantadis, kaj amon malĝojan konsolis per kantoj,
 Dolĉa plumaro subite maljunan ekkovris amanton :
 Tiam li teron forlasis, kaj astrojn kantante trafadis.
 Filo nun, kiun kuniras sur ŝipo kunuloj samaĝaj,
- 195 Grandan Centaŭron movigas per pezaj remiloj : sur ondoj
 Tiu ĉi staras fiere, simila al granda ŝtonego,
 Kaj ĝi, per ŝelo profunda, longegan desegnas sulkaĵon.
 Same el bordoj patrujaj aliras korpuso de Okno.
 Naskis lin Manto, divena pastrino, kaj Tuska Rivero :
- 200 Viajn muregojn, Mantuo, li nomis de nomo patrino.
 Granda per avoj, loĝita de gentoj diversaj, Mantuo
 Havas tri rasojn, kaj ĉiun dividas kvar gentoj malsamaj :
 Kapo de tiuj popoloj, ĝin sango fortigas Etruska.
 Kontraŭ Mezencon ĝi armis tricenton da viroj kuraĝaj.
- 205 Ŝipon direktis sur ondoj Mincio, ŝipnaze pentrita,
 Filo de lago Benako, kronita de kanoj flavverdaj.
 Peze aliras Aŭlesto : remistoj batadas akvaron
 Per cent remiloj ; kaj ondoj frapitaj je saŭmo kovriĝas :

Lin veturigas grandega Tritono; kaj maron lazuran
Konko timigas : ĝis zono barbhavan vizagon kaj frunton 210
Viran ĝi montras, sed korpo finiĝas en ventron balenan :
Ŝaumas kaj bruas kolera ondaro sub brusto sovaĝa.

Tiuj elektaj armitoj sur tridek remŝipoj aliris,
Trojon helponte, kaj sulkis salondon per kupraj ŝipnazoj.
Suno jam lasis ĉielon, kaj Febo diina, sur nokta 215

Ĉaro, jam mezan trairis arkajon de alta Olimpo,
Kiam Eneo, — ĉar li pro zorgadoj neniam ripozas, —
De direktilo ekprenas tenilon, kaj velojn; arangas.

Tiam en mezo de maro aperas ĵus ĥoro de liaj
Ekskunulinoj, de Nimfoj mem, kiujn Patrino Cibelo 220
Faris diinoj de maro, eksŝipoj ŝanĝitaj en Nimfojn.

Ili alnaĝas sammove kaj ondon sulkadas samvice,
Nombre egalaj al kupraj ŝipnazoj ĉe bordo starintaj.
Ili rekonas Eneon kaj reĝon salutas per kantoj.
Cimodoceo, plej lerta el ĉiuj por arte paroli, 225

Sekvas sulkajon, per dekstra ŝipvoston ekprenas kaj, dorson
Suprenigante, ŝi, per la maldekstra, forigas ondetojn.

Tiam ŝi lin nesciantan sciigas : « Diido Eneo,
Ĉu vi atentas? Atentu; kaj velajn ellasu ŝnuregojn. 230

Pinoj ni estas, sur Ida montaro sanktega naskitaj,
Nimfoj de maro hodiaŭ, kaj via ŝiparo. Sed kiam
Nin ekminacis per fero kaj flamoj perfida Rutulo,
Niajn ligilojn bedaŭre ni rompis; kaj ni vin tra ondoj
Serĉas. Kompatis Patrino, kaj, niajn ŝanĝinte formaĵojn,
El ni ŝi faris diinojn, en maro sensfine vivontajn. 235

Nun enfermita troviĝas Askano en muroj tendaraj,
Meze de sagoj kaj glavoj mortigaj de aro Latina.
Jam rajdantaro Arkida kaj fortaj Etruskoj okupas

Lokojn montritajn : sed Turno klopodas kaj sendas korpu-
Por ke ne ili kuniĝu, kaj povu protekti tendaron. [son, 240
Do, ne prokrastu : kaj kiam Aŭroro sin levas, al armoj

Vokur unue kunulojn, kaj ŝildon ekprenu, donitan
Al vi de Fajrpotenculo, zonitan de ora ringego.
Kaj, se vi pensas ke ni ne mensogas, kredeble morgaŭa
Suno de multaj Rutuloj grandegan ekvidos buĉadon. » 245

Tiel ŝi diras, kaj malsupreniras, puŝinte per mano

- Lerta ŝipvoston : sur ondoj subite ĝi glitas rapide,
 Kiel sagego rapida, kaj sago fluganta tra ventoj.
 Iras samtempe aliaj. Pro tiu strangega fariĝo,
 250 Miras la filo Anhiza; sed koron fortigas miraklo.
 Tiam li supran rigardas arkaĵon, kaj preĝas mallonge :
 « Ida Patrino de dioj, diino de monto Dindima,
 Kiu jungitajn amegas leonojn kaj urbojn turhavajn,
 Vi al milito min ĉefas : promeson plenumu donitan,
 255 Helpu Friganojn, kaj ilin konduku per mano favora. »
 Tiujn nur vortojn li diras : sed dume jam suno sin levis,
 Lumon verŝante sur teron kaj nokton pelante tra ombroj.
 Tiam ordonas Eneo : « Signalojn atentu, kunuloj;
 Vin por batalo preparu; kaj zorge kolektu armilojn. »
 260 Jam li, sur alta ferdeko starante, de siaj Trojanoj
 Vidas tendaron, kaj ŝildon brilantan per mano maldekstra
 Tuj plialtigas : el muroj al astroj puŝegas kriadon
 Idoj Dardanaj; ĉar nova espero fortigas animojn.
 Manoj pluvigas saghajlon. Ja, tiel sub nuboj nigregaj,
 265 Gruoj Strimonaj signalon konigas, tra vento traflugas,
 Multe bruante, kaj Noton forkuras kun ĝojaj kriadoj.
 Tion aŭdinte, la reĝo Rutula kaj ĉefoj Aŭzonaj
 Miras, ĝis kiam ŝipnazojn al bordo alproksimiĝantajn
 Ili ekvidas, dum mara alfluo aliras kun ŝipoj.
 270 Kasko Enea brilegas sur kapo; el fasko fiera
 Flamoj eliras; kaj vomas fajrerojn orrando de ŝildo.
 Tiel, en nokto kvieta, funebre ruĝiĝas kaj sangan
 Ĵetas rebrilon kometoj; kaj tiel Sirio bruliga
 Soifon kaj poste malsanojn alportas al malfeliĉuloj,
 275 Kaj malgajigas ĉielon sennuban per lumo malĝoja.
 Tamen ne perdas esperon malhelpi aliron al bordo
 Turno kuraĝa, kaj elŝipiĝantojn el tero forpeli.
 Plie li penas jen korojn relevi, jen ilin riproĉi :
 « Vi malamikon deziris; vi havas ĝin; sekve ĝin rompu :
 280 Marso ĝin al vi liveras. Al sia edzino kaj hejmo
 Ĉiu pripensu, kunuloj; kaj patrajn memoru agadojn
 Plej memorindajn. Sammove al maro ni ĉiuj alkuru,
 Kiam timantaj Trojanoj unuan ekprovos aliron.
 Ĉar kuraĝulojn Fortuno protektas. »

Tiel dirinte, li virojn elektas al maro marŝontajn,
Kaj militistojn por murojn observi kaj zorgi sieĝon. 285

Dume Eneo, por virojn eligi el altaj ŝipvostoj,
Pontojn metigas. Sed multaj observas elfluon de maro,
Kiam ĝi estas kvietaj, kaj tuje sur bordon saltegas :
Uzas remilojn aliaj. Sed Tarko rimarkas bordlokon, 290
Kie ne ŝvelas ondegaj, ne bruas salakvo rompita,
Kie marondo profunda ŝoviĝas sen malfacileco.

Li tuj ŝpinazojn alturnas, kaj petas insiste maristojn :
« Bravaj kunuloj, fortege sur ondon apogu remilojn ;
Ŝipojn sublevu kaj puŝu ; per sprono ekfendu landlimon 295
De malamikoj ; kaj ĉiu remŝipo mem faru sulkaĵon.
Ŝipon en tiu ĉi loko mi rompi konsentas, se mi nur
Povas aliri marbordon. » Kaj tiel apenaŭ parolis
Tarko, fortege maristoj sin klinas sur pezajn remilojn,
Kaj rapidigas ŝiparon ŝaŭmantan ĝis kampoj Latinaj : 300
Fine spronpintoj ektuŝas marsablon ; kaj ĉiu remŝipo
Sendifektite kuŝiĝas, escepte la via, ho Tarko.

Ĝi, haltigita per dorso de sabla monteto kaŝita, [as,
Pendas, dum ondoj muĝantaj ĝin frapas longtempe, ĝin sku-
Fine ĝin rompas, kaj ĉiujn maristojn faligas en maron. 305
Pecoj remilaj kaj benkoj remistaj, — flosanta miksaĵo ! —
Ĝenas naĝantojn, dum ilin maralten elĵetas elfluo.

Turno ne haltas : li tutan armeon fervoran rapide
Kontraŭ Trojanojn direktas, kaj lokas sur bordon de maro.
Sonas trompetoj. Unua Eneo kamparajn atakas 310
Bandojn, kaj, — signo feliĉa por malkuraĝigi Latinojn, —
Buĉas Teronon : pli granda ol viroj aliaj, ĉi tiu
Celis Eneon ; sed filo Anĥiza, per frapo de glavo,
Flankon malfermas, tra kupra kiraso, tra vesto orbrila.
Poste li Likon mortigas ; el ventro patrino malviva 315
Fero lin tiris : ĉar feron evitis infano, lin oni
Donis al Febo. Fortikan Ciseon kaj Gion grandegan,
Kiuj per pezaj bastonoj faligis korpusojn, li poste
Ĵetas en morton : ne ilin protektis armiloj Herkulaj,
Brakoj fortegaj, kaj patro Melampo : de granda Alcido 320
Iam li estis kunulo, dum dio tra mondo plenumis
Gravajn laborojn. Jen Faro diranta ventajaĵojn : Eneo

- Lancon enpuŝas en buŝon kriantan de fanfaronanto.
 Same vin, Cido mizera, dum ame vi sekvas Klition,
 325 Novan amaton, montrantan sur vangoj unuajn haretojn,
 Mano Dardana traborus; kaj amon al junaj viretoj,
 Vian zorgadon, lasinte, vi tute plendinda nun kuŝus;
 Sed, por vin savi, Eneon atakas anaro da fratoj :
 Filoj de Forko sep estas, kaj ĵetas samtempe sep sagojn.
 330 Sed, repuŝitaj per kasko kaj ŝildo, kaj malakrigitaj,
 Unuj ekfalas, nur korpon tuŝetas aliaj; ĉar ilin
 Zorge deturnis Venuso. Fidelan li diras Akaton :
 « Donu do sagojn, — ĉar ili ne vane atingos Rutulojn;
 Tion mi kredas, — per kiuj mi vundis en kampoj Iliaj
 335 Korpojn Danaajn. » Li tiam grandegan ekprenas sagegon,
 Kaj li ĝin ĵetas : ĉi tiu flugante de ŝildo Meona
 Kupron traboras, kaj rompas samtempe torakon kaj pul-
 Dum Alkanoro rapidas al frato, kaj viron falantan [mon.
 Mane subtenas, jen nova sagego ekflugas, kaj, lian
 340 Brakon borinte, sangplena ĝi sian daŭrigas iradon :
 Mano el ŝultro de viro mortanta pendadas per nervoj.
 Sed Numitoro, sagegon el korpo de frato tirinte,
 Celas Eneon : ĉi tiu ĵetito neniel atingas
 Reĝon Trojanan, sed boras femuron de granda Akato.
 345 Tiam, fidante al korpo junaĝa, la reĝo Sabana,
 Klaŭzo, alkuras, kaj de malproksime Diopan mentonon
 Frapas per sago mortiga : armilo tra gorgo penetras,
 Vivon rabinte kaj voĉan organon; per frunto li teron
 Frapas, dum sango malpura eliras el buŝo ŝirita.
 350 Same pereas tri Tracoj de gento antikva Borea,
 Tri Idasidoj, senditaj de urbo patruja Ismaro,
 Ĉiuj diverse frapitaj. Haleso kaj bandoj Aŭruncaj
 Tiam alkuras : lin sekvas Mesapo, la filo Neptuna,
 Kun rajdantaro kuraĝa. Kaj penas sin interrepuŝi
 355 Malaj partioj ĉi tien kaj tien : sur sojlo Aŭzona
 Ili batalas mem. Tiel, en vastaj kamparoj aeraj,
 Ventoj rapidaj militas per samaj fervoroj kaj fortoj :
 Inter si volas ekcedi nek ventoj, nek maro, nek nuboj :
 Ĉiuj obstinas, kaj estas longtempe necerta batalo.
 360 Tiel armeoj Trojanaj kaj anoj Latinaj freneze

Kontraŭbatalis, piedo tuŝanta piedon, vir' viron.

Dume, en parto alia, en kiu torento alportis
Ŝtonojn rulantajn kaj arbojn falintajn el bordoj, Arkidoj;
Ne kutimante batali piede, hontinde forkuris.

Ilin devigis naturo de loko forlasi ĉevalojn. 365

Kiam ekvidis Palaso ke ilin forpelis Latinoj,
Ilin por rekuraĝigi, riproĉojn kaj preĝojn li uzas,
Sola rimedo uzebla en tiuj malĝojaj okazoj :

« Kien vi kuras, kunuloj? Per vi, kaj per viaj heroaj
Aĵoj, per nomo de ĉefo Evandro, per liaj triumfoj, 370

Kaj per espero fariĝi simila al patro famega,
Vi al piedoj ne fidu : per fero, tra viroj, jen estas
Vojo falĉota, kaj kien plej densaj nin premas armiloj.
Tien vin vokas fiera patrujo kaj ĉefo Palaso.

Ne nin minacas diaĵoj; sed nur mortemuloj batalas 375
Virojn mortemajn, per manoj kaj koroj similaj al niaj.

Jam nin haltigas la maro per vasta barilo de ondoj;
Tero nin mankas : ĉu maron ni trafos, ĉu Trojan tenda-
Tiel li diras, kaj tra malamikoj rapidas densegaj. [ron? »

Kontraŭstarantan, puŝitan de sorto maljusta, unue 380

Lagon li frapas : dum tiu ĉi ŝtonon tiregis pezegan,
Sago ĵetita lin boras en mezon de dorso, en lokon

Kie la spino disiĝas el ripoj : li, sin klinetante,
Penis el ostoj tiregi sagegon ; sed Hisbo rapidas, 385
Lin esperante surprizi, kolera pri morto kruela

De samlandano : sed, antaŭ ol Hisbo sukcesos, Palaso
Lin preteriras, kaj glavon trapuŝas tra pulmo kolera

Poste Stenelon li frapas, de raso antikva de Reto,
Kaj Ankemolon : li duonpatrinan krimigis kuŝejon.

Same vi falis, en kampoj Rutulaj, Larido kaj Timbro, 390
Vi dunaskitoj de Daŭko, kaj tiel similaj, ke ne vin

Malsimiligis gepatroj, — tialo de dolĉaj eraroj. —
Malsimilecon kruelan nun inter vi metis Palaso.

Dum Evandrida ferglavo de Timbro ektranĉas la kapon,
Dume la mano Larida, tranĉita el brako, serĉadas 395

Mastron, kaj fingroj mortantaj moviĝas por premi armilon.

Tamen Arkidojn, — ĉar ilin flamigis paroloj kaj agoj
Glora de ĉefo, — ĉagreno kaj honto instigas kaj armas:

- Tiam Palaso traboras Reteon sur ĉaro kurantan.
- 400 Tiu momento rapida nur morton de Ilo prokrastis :
 Ilon ĉar de malproksime celadis la peza sagego,
 Kiun Reteo kuranta ricevis, dum Teŭkron kuraĝan
 Li forkuradis, kaj fraton Tirenon : li duonmortanta
 Falas el ĉaro, kaj kampon Rutulan kalkane frapadas.
- 405 Tiel do, kiam, vidinte ke vento somera plenumas
 Sian deziron, pajlerojn kuŝantajn bruligas paŝtito :
 Eksrikoltaro subite flamiĝas, kaj poste tra kampo
 Aro brulanta de spikoj Vulkane pli kaj pli vastiĝas;
 Flamojn venkantajn li ĝoje rigardas, sur ŝtono sidante.
- 410 Same kuraĝo de kunaj Arkidoj atakas Rutulojn.
 Tio ĝojigas Palason. Sed militkuraĝa Haleso
 Al batalantoj rapidas, ŝirmita de ŝildo kaŝanta.
 Li Demodokon, Ladonon, Fereton mortigas; per glavo
 Manon li de Strimonio ektranĉas; ĉar li supreniris
- 415 Por lin al gorgo ataki : per ŝtono li frapas Toantan
 Frunton, kaj ostojn disigas miksitajn kun sanga cerbaĵo.
 Patro Halesa diveno lin kaŝis en densaj arbaroj :
 Kiam la morto fermadis okulojn de patro maljuna,
 Filon ekkaptis la Parkoj kaj tuj lin dediĉis al sagoj
- 420 De Evandrido. Sed, lin atakonta, ekpreĝas Palaso :
 « Tibro, ho patro, direktu fersagon de mi ŝetegotan :
 Vojon favoran ĝi havu kaj bruston traboru Halesan :
 Kaj mi armilon de viro sur kverkon de bordo pendigos. »
 Dio lin aŭdis : ĉar, dum Imaonon Haleso protektas,
- 425 Bruston de malfeliĉulo traboras la sago Arkida.
 Laŭzo, plej granda subteno milita, ne volas ke viroj
 Estu tremantaj pro buĉo. Li Abon unue mortigas
 Kontraŭstarantan; ĉar tiu ĉi venkon kuraĝe haltigis.
 Estas buĉitaj idaro Arkida, idaro Etruska,
- 430 Kaj vi, Trojanoj, vi kiujn indulgis ferglavo de Grekoj.
 Ambaŭ armeo batalas kun ĉefoj kaj fortoj egalaj.
 Lastaj soldatoj kunpremas unuajn; ne movi permesas
 Sagojn kaj manojn amaso. Jen tie Palaso klopodas
 Kaj persekutas, jen Laŭzo ĉi tie. Ve! ambaŭ samaĝaj,
- 435 Ambaŭ belformaj, ne volis Fatalaj dekretoj ke ili
 Karan patrujon revidu : sed reĝo de granda Olimpo

Volis neniam permesi ke kontraŭ si ili batalu.

Baldaŭ pli famajn venkantojn al ili rezervos Fataloj.

Dume fratino diina al Turno konigas ke Laŭzo

Estas helpota : per ĉaro fluganta li tranĉas anaron. 440

Kiam li vidas kunulojn : « Nun lasu batalon. Mi volas

Sola Palason mortigi ; nur al mi Palaso ŝuldota

Estas : mi forte dezirus ke patro mem tie ĉeestu ».

Tiel li diras : obeas Rutuloj kaj kampon forlasas.

Kiam li vidas ke ili eliris, Palaso, miranta

445

Pro aroganta ordono, mirege rigardas de Turno

Korpon grandegan : longtempe li viron observas silente ;

Fine al malhumilega tirano li tiel respondas :

« Baldaŭ ĉu riĉaj akiroj kaptitaj, ĉu morto glorega,

Fama min igos ; ĉar ambaŭ okazo por patro egalas, 450

Ĉesu minacoj. » Dirinte, li mezon de kampo aliras.

Sango en koroj Arkidaj pro timo frostiĝis kaj haltis.

Turno el ĉaro eliras : piede, proksime, li volas

Venki Palason. Leono el monta supraĵo saltegas,

Kiam ĝi vidas bovviron en kampo starantan, kaj pretan 455

Por la batalo : jen estas vidiĝo de Turno marŝanta.

Kiam li kredas ke spaco sufiĉas por ĵeto de sago,

Lin tuj atakas Palaso, por ke malsamecon de fortoj

Povu korekti Fataloj, kaj vastan rigardas eteron :

« Nun mi, per patra gastigo, per tablo ĉe kiu vi sidis 460

Kvankam fremdulo, vin preĝas, Alcido : favoru penadon.

Turno mortanta min vidu kaptantan sangplenajn armilojn ;

Turnaj rigardoj mortantaj venkantan ekvidu vizaĝon. »

Aŭdis Alcido junulon : profunde li premis de koro

Grandan ĝemadon, kaj vanajn okuloj fluigis larmegojn. 465

Tiam la Patro konsolis naskiton per vortoj amikaj :

« Estas por ĉiuj morthoro : mallongan kaj neripareblan

Ĉiu posedas vivtempon : sed famon grandigi per agoj,

Jen la laboro de virto. Ĉe altaj de Trojo muregoj,

Kiom pereis da filoj de dioj? Ĉu mian naskiton 470

Mi mem ne perdis Sarpedon? Jam Turnon alvokas Fataloj

Liaj, jam limon de vivo donita li alproksimiĝas. »

Tiel li diris, kaj kampojn Rutulajn denove rigardis.

Tamen Palaso per tuta forteco alĵetas sagegon,

- 475 Poste li glavon lumantan el ingo rapide eltiras.
 Sago fluganta aliras al supro de ŝildo kovranta
 Ŝultrojn, kuradon daŭrigas tra rando borita de l'ilo,
 Kaj nur tuŝetas haltante la korpon de Turno grandega.
 Turno longtempe balancas kverksagon armitan de fero
- 480 Akra, kaj kontraŭ Palason ĝin forte ĵetegas, dirante :
 « Vidu ĉu mia sagego ne estas ja pli penetranta. »
 Tiel li diras : kaj pinto traboras, per frapo vibranta,
 Mezon de ŝildo, kaj, malgraŭ tavoloj el fero kaj kupro,
 Malgraŭ felaĵoj bovviraj kovrantaj supraĵon de ŝildo,
- 485 Maŝojn kirasajn kaj bruston fortikan penetras profunde.
 Vane li penas el vundo varmetan tiregi sagegon, .
 Sango kaj vivo samtempe eliras per sama voĵiro.
 Tiam li falas sur vundon : kaj sur li sonoras armiloj,
 Dum malamikan li teron mordetas per buŝo sangplena.
- 490 Antaŭ li Turno starante ekkrias :
 « Miajn parolojn, Arkidoj, memoru reporti al via
 Reĝo Evandro : meritis li tiel revidi Palason.
 Tombajn honorojn kaj de enterigo konsolon al li mi
 Lasos bonvole : sed kare li pagas gastigon Enean. »
- 495 Tiel li diras : sur korpon metante maldekstran piedon,
 Pezan kaj riĉan pendilon de glavo li kaptas rapide.
 Krimon artisto desegnis : dum unu nur nokto edziĝa,
 Kvindek junuloj buĉitaj, kaj plenaj je sango kuŝejoj.
 Klono la filo Eŭrita ĝin ĉizis interne de oro.
- 500 Turno armilon ekkaptas kaj ĝojas pri tiu akiro.
 Homa animo ne konas Fatalon kaj sorton estontan,
 Mezan mezuron forgesas; kaj ĝin pereigas sukcesoj.
 Venos momento en kiu li kare deziras aĉeti
 Vivon Palasan, en kiu li tiun akiron kaj tagon
- 505 Kore malamos. Kun multaj ĝemadoj kaj larmoj, kunuloj
 Korpon de brava Palaso forportas, sur ŝildo kuŝantan.
 Kiam lin patro revidos, ve! kia doloro, sed gloro!
 Sama mateno vin sendis militen kaj vivon ektranĉis :
 Sed vi almenaŭ Rutulojn vi lasas amase buĉitajn.
- 510 Sed, pli fidinda ol Famo, kurjero avertas Eneon :
 « Stato fariĝis tre grava; Trojanojn minacas danĝeroj
 Grandaj : ĉar ili forkuras, tuj ili bezonas helpadon. »

Glavon li svingas, rapidas, buĉadas armitojn, tra aroj
 Vojon larĝegan malfermas, ardanta, kaj, Turno, vin serĉas,
 Por vin mortigi. Ĉar antaŭ okuloj, Palason, Evandron, 515
 Tablon ĉe kiun li gaste sidigis, kaj manojn premitajn,
 Ĉiam li vidas. Li kvar Salmonidajn ekkaptas junulojn
 Vivajn, kaj tiom da filoj Ufensaj : ĉar antaŭ altaroj
 Ilin li volas buĉadi, por Ombron satigi Palasan,
 Kaj malsekigi flamegojn ŝtiparajn per sango kaptita. 520
 De malproksime sagegon timindan li ĵetas al Mago :
 Li genufleksas, kaj lin superiras ĵetito bruiga.
 Tiam, Eneajn kisante genuojn, preĝante li diras :
 « Mi vin, per Manoj patrujaj, per via lulo kreskanta,
 Preĝas : al filo, al patro konservu jen patron jen filon. 525
 Grandan mi havas palacon : sub tero, kaŝitaj moneroj
 Kuŝas, kaj aĵoj arĝentaj, kaj krudaj kaj priloboritaj
 Oraj amasoj. De mia pereco ne certe dependas
 Venko Trojana; kaj unu nur viro ne havas gravecon. »
 Tiel li diras : per tiuj paroloj Eneo respondas : 530
 « Tiujn amasojn arĝentajn kaj orajn por viaj parencoj,
 Mago, konservu : ĉar ĉiun komercon militan haltigis
 Turno unua, tuj kiam li junan mortigis Palason.
 Tiel ordonas lulo kaj Manoj de patro Anĥizo. »
 Tiel dirinte, per mano maldekstra li kaskon ekprenas, 535
 Kapon renversas, kaj glavon profunde trapuŝas en gorgon.
 Sed Hemonido, Trivia kaj Feba ĉefpastro, proksime
 Staris, liginte sur frunto sanktaĵojn per blanka rubando,
 Tute lumante per riĉa vestaro kaj brilaj armiloj.
 Lin atakitan, tra kampo kurantan, Eneo renversas, 540
 Buĉas kaj kovras de ombro de korpo ; armilojn Seresto
 Prenas sur ŝultrojn, kaj tiun trofeon dediĉas al Marso.
 Ambaŭ naskitaj de raso Vulkana, refaras korpusojn
 Ĉefoj Cekulo kaj Umbro, venintaj el monta Marsujo :
 Ilin mortigas Dardana heroo. Per glavo li tranĉas 545
 Manon maldekstran Anksuran kaj tutan rondaĵon de ŝildo.
 Li arogante parolis; kredante ke certa efiko
 Sekvus parolojn, esperon li portis ĝis alta ĉielo,
 Kaj maljunecon al si li promesis feliĉan kaj longan.
 Kontraŭ Eneon saltegas, sub brilaj armiloj, Tarkvito : 550

- Nimfo Driopo lin naskis de Faŭno la arbardiaĵo :
 Li fanfarone heroon esperis haltigi. Per sago
 Forte ĵetita, li kune kun ŝildo najlegas kirason :
 Kapon de viro, vanege preĝanta, kaj diri volanta
 555 Multojn, li tranĉas; kaj, trunkon varmetan ĵetinte sur teron,
 Tiujn parolojn malamajn el koro kolera eligas :
 « Ho timindulo, ĉi tie kuŝadu : amanta patrino
 Tereĝ ne metos vin, kaj vin ne portos en patran tombejon.
 Birdoj rabemaj vin manĝos : aŭ eble en profundegaĵo
 560 Ondoj vin skuos, kaj sangon de vundoj suĉados fiŝaro. »
 Poste Anteon kaj Lukon, en vico unua starantajn,
 Li persekutas, kaj Numon kuraĝan kaj blondan Kamerton,
 Filon de ĉefo grandkora Volscenso, plej bienriĉulon
 De Aŭzonujo : silentan li urbon regadis Amiklan.
 565 Kiel Egeo, laŭ Famo, cent brakojn, cent manojn agitis,
 Fajron el kvindek buŝegoj kaj tiom da bustoj vomadis,
 Kiam li, kontraŭ Jupitero tondranta igonte batalon,
 Tiom da ŝildoj bruege svingadis kaj tiom da glavoj;
 Tiel Eneo tra tuta kamparo kolere rapidas,
 570 Kiam de sango sorbiĝis la glavo. Nun antaŭ venantajn
 Brustojn de kvar ĉarĉevaloj Nifeaj tuj li sin direktas.
 Sed, ekvidinte koleran vizaĝon kaj kuron frenezan
 De atakanto, tuj ili timegas, rapide reiras,
 Posten forkuras, kaj, ĉefon ĵetinte, aliras al bordo.
 575 Tamen Lukago kaj frato Ligerio veturas sur ĉaro,
 Kiun fortiras du blankaj ĉevaloj : dum frato ĉevalojn
 Fulme direktas, seningan ferglavon agitas Lukago.
 Tian fervoron batalan ne povis toleri Eneo :
 Kontraŭstarante, li ilin minacas per granda sagego.
 580 Al li Ligerio :
 « Nek Diomedajn ĉevalojn, nek ĉaron Aĥilan vi vidas,
 Nek militkampon Frigujan : ĉi tie samtempe militon
 Eble kaj vivon vi finos. » Paroloj Ligeraj aeren
 Kaj malproksimen flugadas : pro ĉiu respondo, heroo
 585 Troja, sagegon preninte, ĝin al malamiko ekĵetas.
 Dum sin klininte antaŭen, Lukago, per vipo ĉevalojn
 Penas instigi, kaj dum li piedon maldekstran autaŭnen
 Metas, por sin al batalo prepari, de ŝildo brilanta

Randon inferan penetras sagego, kaj boras ingvenon :
 Tuje li, falinte el ĉaro, ruliĝas mortanta sur kampo. 590
 Tiam lin pia Eneo per mokaj insultas paroloj :
 « Malforkurantaj ĉevaloj ne vian perfidis kaleŝon ;
 Kaj timigilo neniŭ ilian instigis forkuron :
 Vi mem, saltinte el rodoj, forlasis jungilon. » Dirinte,
 Li du ĉevalojn ekkaptas. El sama kaleŝo falinte, 595
 Frato du manojn prezentis senarmajn, la malfeliĉulo :
 « Per vi, per famaj prapatroj, naskintaj de tia heroo,
 Viro Trojana, min lasu vivadi, kompatu preĝanton. »
 Sed al ploranto, Eneo : « Alie, je unu momento,
 Vi paroladis. Nun mortu ; ĉar frato ne fraton forlasas. » 600
 Tiam per glavo li bruston malfermas kaj vivan kaŝejon.
 Tiel tra kampoj funebrajn kaj sangajn multigis mortigojn
 Ĉefo Dardana, kaj, kiel torento aŭ nigra ventego,
 Verŝis koleron. Do fine eliras kaj lasas tendaron
 Knabo Askano, kaj kun li junuloj ne plu sieĝataj. 605

Dume Junonon unue Jupitero mem interparolas :
 « Kara fratino, kaj mia samtempe karega edzino,
 Estis vi prava. Venuso, — vi certe neniel eraris, —
 Helpas Trojanajn penadojn : ĉar brakoj iliaj ne estas
 Fortaj, nek koro kuraĝa, kapabla por venki danĝerojn. » 610
 Sed submetita Junono : « Do kial, ho edzo belega,
 Koron malĝojan vi moke turmentas per vortoj petolaj.
 Se al mi, kiel ĝi estis, kaj kiel ĝi devus nun esti,
 Via amego restadis, vi certe ne al mi rifuzus,
 Ĉiopovulo, ke dank'al mi Turno forlasu militon, 615
 Por ke al Daŭno la patro mi povu lin sanan redoni.
 Tamen li mortos ; kaj venĝon sangverŝo satigos Trojanan !
 Tamen de dia naskiĝo li sian eltiras devenon :
 Estas ĉar kvara prapatro Pilumno ; kaj li malavare
 Ofte, per multaj donacoj, de temploj plenigis altarojn. » 620
 Al ŝi respondis mallonge la reĝo de alta Olimpo :
 « Por kondamnita junulo al morto proksima, templimon
 Se vi nur petas ; se tiun kondiĉon vi bone komprenas,
 Turnon formetu, kaj Parkajn minacojn haltigu momente :
 Tion mi povas konsenti. Sed se vi pli altajn dezirojn 625
 Kaŝas sub viaj preĝadoj ; se ŝanĝi vi pensas militon

Aŭ ĝin alien direkti, vi vanan nutradas esperon. »

Tiam Junono ploranta : « Se vivon de Turno, ve! kiun
Vi malfacile per buŝo promesas, tutkore vi donus!

630 Sed ne : lin morto kruela senkulpan atendas, se timoj
Estas ne vanaj : mi volus que falsaj teruroj min trompu!
Kial, ĉar tion vi povas, vi do ne dolĉigas dekretojn? »

Ĉiam ŝi tiel parolis, el alta ĉielo Junono

Malsupreniris, pelinte ventegon, flugante tra nuboj;

635 Kaj ŝi tendaron ektrafis Laŭrentan kaj aron Ilian.
Tiam diino vaporan kaj vanan fabrikas fantomon,
— Stranga miraklo! — kaj donas al Ombro vizagon Enean,
Poste ĝin armas per sagoj Dardanaj; ŝi ŝildon imitas
Kaj haregfaskon de frunto, al ĝi senideajn parolojn

640 Donas, nur voĉajn sonadojn, kaj fine marŝadon de viro.
Tiel, laŭ kredo, flugetas fantomoj de homoj malvivaj;
Tiel, en dormo, de sentoj trompitaj sin ludas sonĝaro.
Tiam ĉe fronto arma saltetas fiere figuro

Falsa : ĝi Turnon senlace atakas per sagoj kaj voĉo.

645 Turno ĝin sekvas, kaj de malproksime vibrantan sed vanan
Ĵetas sagegon : fantomo forkuras kaj dorson prezentas.
Turno nun kredas ke vere Eneo forlasas batalon,
Kaj li, de malhumileco ebria, insultas vanombron :
« Kien vi kuras, Eneo? Ne certan forlasu edziĝon.

650 Mi al vi donos tuj tiun ĉi teron serĉitan tra ondoj. »
Tiel kriante, li sekvas ŝajnaĵon, svingante brilantan
Glavon, kaj ne rimarkante ke ĝojon forportas venteto.
Staris okaze ĉi tie velŝipo; sur alta ŝtonego
Ligis ĝin ĉenoj, kaj pretaj troviĝis ŝtuparoj kaj pontoj.

655 Sur ĝi veturis el bordoj Klusiaj la reg' Osinio.
Tien figuro tremanta de falsa Eneo forkuras,
Kavon malluman celante : sed Turno fervore ĝin sekvas,
Super bariloj saltegas, kaj altan ektrafas ferdekon.
Ŝipon apenaŭ li tuŝis, idino Saturna ligilon

660 Tranĉas; kaj ŝipon elfluo rapide tra ondoj forportas.
Tiam fantomo malpeza ne serĉas plu ian kaŝejon;
Sed ĝi, flugante ĉielen, al nuboj sin miksas nigretaj.

Dum, forestanton tra sanga batalo serĉante, Eneo
Korpojn mizerajn de multaj soldatoj sendadas al morto,

Turnon forportas elfluo en mezon de ondoj muĝantaj. 665
 Tion li kio okazis nescias kaj savon malŝatas.
 Tiam li manojn prezentas al astroj kaj diras preĝante :
 « Ĉiopotenca ho Patro, ĉu vi opiniis ke grandan
 Punon mi juste meritis, por tiel min grave malŝati?
 Kien mi iras? De kie mi venas? Nun kiel forkuri? 670
 Kiel reveni, kaj ree Laŭrentan revidi tendaron?
 Kion ekdiros viraro, armilojn kaj min mem sekvinte,
 Kiun ve! persekutitan de morto kruela mi lasis?
 Ilin mi nun forkurantajn ekvidas; nun mi de mortantoj
 Aŭdas ĝemadojn. Ja, kion mi faros? Ĉu tero sub paŝoj 675
 Ne malfermiĝos? Prefere, ho Ventoj, pri Turno kompatu,
 Mi vin fundkore petegas; sur rifojn, sur akrajn ŝtonegojn,
 Ŝipon forportu, ĝin poste sur Sirtojn disrompu mortigajn,
 Kien min trafos nek miaj Rutuloj, nek famo hontinda! »
 Tiel li diras, dum li ŝanceliĝas ĉi tien kaj tien : 680
 Ĉar ĉu, pro honto, li koron freneze per glavo traboros?
 Mezen de ripoj, ĉu feron kruelan li puŝos en bruston?
 Funden de ondoj ĉu li sin ekĵetos, kaj bordon kurbetan
 Celos naĝante, por ree Trojanajn batali armilojn?
 Ambaŭ rimedon trifoje li provas, trifoje Junono, 685
 Lin haltigante, komplete koleron eligas el koro.
 Tiam li trafas maralton, helpite de fluo favora,
 Kaj al ĉefurbo antikva aliras de Daŭno la patro.
 Sed, laŭ Jupitra ordono, ardanta Mezenco eniras
 En bataladon, kaj baldaŭ venkantajn atakas Trojanojn. 690
 Bandoj Tirenaj alkuras, kaj ĉiŭj, ĉi tiun nur viron
 Persekutante, lin premas per sagoj kaj forta malamo.
 Kiel ŝtonego antaŭeniranta en vastan ondaron,
 Kaj minacita de ventoj koleraj, de maraj frapegoj,
 Kiu ĉielon kaj maron insultas, senmove staranta, 695
 Tiel Mezenco. Li Dolikaonan naskiton kuŝigas
 Teren, kaj Palmon, dum li ekforkuris, kaj poste Latagon.
 Frunton de kontraŭstaranta Latago li frapas per ŝtono,
 Peza pecego de monto : de Palmo la malkuraĝulo
 Dekstran li tranĉas genuon, kaj donas al Laŭzo armilon, 700
 Kiel kovrilon por ŝultroj, kaj kreston brilantan por kapo.
 Kaj li mortigas Evason Frigujan, Mimason, kunulon

- De samtempula Pariso : samnokte de edzo Amiko
 Naskis Teano lin, kiam, kredante ke torĉon ŝi naskas,
 705 Naskis Parison filino de Ciso : sed urbon putrujan
 Kuŝas Pariso, dum fremdan Laŭrenton okupas Mimaso.
 Kiel do apro, pelita el montoj per mordo de hundoj,
 Kiun dum jaroj multegaj protektis Vesulo pinhava,
 Kiun longtempe marĉejoj Laŭrentaj en kanaj arbaroj
 710 Nutris, tuj kiam per retoj mortigaj ĝi estas kaptita,
 Tuje ĝi haltas, starigas haregojn kaj blekas kolere :
 Ĝin ekataki kaj kontraŭbatali neniu kuraĝas ;
 De malproksime nur sagoj kaj krioj ĝin premas ĉasistaj ;
 Besto sentima sin turnas al ĉiuj kaj ĉiujn batalas,
 715 Dentojn grincante, kaj sagojn el dorso freneze skuante ;
 Tiel Mezenco. Lin kvankam atakas tre justa malamo ;
 Tamen pro timo neniu kuraĝas lin vundi per glavo ;
 Sed malproksime per sagoj kaj krioj lin ili lacigas.
 Venis Akrono el limoj antikvaj de urbo Korita,
 720 Viro Grekuja ; li lasis edziĝon ne tute finitan .
 Vidas Mezenco ke li en armeon semadis konfuzon,
 Veston purpuran, edzinan donacon, portante kaj faskon.
 Kiam leono ĉasanta profundan trairas arbaron,
 — Ĉar ĝin instigis malsato, — okaze se ĝi forkurantan
 725 Vidas kaprinon aŭ cervon je kornoj altkreskaj, buŝegon
 Ĝoje ĝi grandan malfermas, starigas haregojn, sur beston
 Saltas rapide, al ventro sin ligas, dum sango nigrega
 Buŝon ruĝigas avidan :
 Tiel Mezenco kuraĝa tra densaj saltegas armitoj.
 730 Falas Akrono la malfeliĉulo : kalkane li teron
 Batas mortanta, kaj sagon ruĝigas en vundo rompitan.
 Dume forkuris Orodo : kaj lin ne bonvolis Mezenco
 Frapi per sago, facile ĵetita en dorson kurantan ;
 Sed li lin antaŭeniras, antaŭe atakas, kaj vire
 735 Viron batalas : ne venkas insido sed forto armila .
 Tiam, metinte piedon kaj lancon sur korpon kuŝantan :
 « Kuŝas Orodo, de ĉefoj militaj ĵus la plej timinda. »
 Venkon aplaudas kunuloj, kaj ĝojan ekkantas Peanon.
 Tamen mortanto : « Ha! kiu ajn estas vi, ne min insultu ;
 10 Ĉar vi de venko ne ĝojos tre longe : vin samaj Fataloj

Eble atendas; kaj baldaŭ vi kuŝos en samaj kamparoj. »

Tiam ridante, sed tamen kolera, Mezenco respondas :

« Mortu : kaj poste la Patro de dioj kaj Reĝo de homoj

Zorgos pri tio. » Li diras kaj sagon eltiras el korpo.

Pezas sur liaj palpebroj kruela ripozo kaj dormo 745

Fera; kaj fine fermiĝas okuloj por nokto eterna.

Dum Alkatoon mortigas Cediko, Hidaspo pereas,

De Sakratoro frapita; kaj Rapo sur Orson fortegan,

Sur Partenion sin ĵetas; Mesapo Klonion ekbuĉas

Kaj Ericeton : unuan renversis ĉevaloj ardantaj; 750

Dua batalas piede. Agiso Licuja alkuris :

Lin, heredanton de ava kuraĝo, mortigas Valero.

Buĉas Tronion Salio, Salion Nealco, scianta

De malproksime pereon alsendi per sago rapida.

Jam reciprokajn dolorojn, jam ĝemojn egalajn pluvigis 755

Marso : venkantoj, venkitoj, egale rapidas, egale

Buĉas : ĉe tiuj nenia forkuro, ĉe tiuj ĉi same.

Vanen koleron de ambaŭ kompatas, en domo Jupitra,

Dioj, kaj tiajn laborojn por homojn premegi mortemajn.

Tie Venuso batalas, ĉi tie idino Saturna : 760

Kaj Tisifono palega koleras tra miloj da viroj.

Tamen Mezenco, grandegan svingante sagegon, trakuras

Kampon, kolere ebria. Simila al granda Orio,

Kiam li vastan marĉejon Nerean trairas piede,

Akvan tranĉante vojiron, dum ŝultroj eliras el ondo; 765

Kiam li ulmon reportas jarcentan el monta supraĵo,

Teron tuŝante piede, dum kapo kaŝiĝas tra nuboj;

Tiel aperas Mezenco, vestita de larĝaj armiloj.

Kontraŭ li, — ĉar li lin serĉis tra vicoj densegaj de viroj, —

Staras Eneo; kaj same Mezenco ne terurigita 770

Kontraŭstaranton grandkoran rigardas, kaj staras per ma-

Poste li spacon kalkulas necesan por flugo de sago. [so :

« Tiu ĉi mano, ja sola diaĵo, kaj sago ĵetota,

Estu favoraj. Mi al vi dediĉas akiron, ho Laŭzo,

Kiun sur korpo de tiu rabisto mi kaptos : vi estos, 775

Filo, Enea trofeo. » Li diras, kaj sagon vibrantan

De malproksime ĵetegas : sed ŝildo repuŝas sagegon,

Kiu, en ventro kaj flanko, kuraĝan atingas Antoron.

- Tiu Herkula kunulo eliris el Argo, Evandron .
- 780 Helpis fervore, kaj fine ekloĝis en urbo Itala.
 Malfeliĉulo vundita de frapo senvola, mortanta
 Falas, rigardas ĉielon, kaj Argon memoras karegan.
 Tiam sagegon ekĵetas Eneo : kupraĵon trioblan
 Fero traboras, tavolon el lino, trioblan bovviran
- 785 Ledon, ĵus kie troviĝas tenilo, kaj haltas en flanko,
 Forton kaj movon perdinte. Eneo, tuj kiam li vidis
 Sangon de reĝo Tirena fluantan, ferglavon el ingo
 Ĝoje eltiras, kaj al malamiko timanta rapidas.
 Tamen, vidinte danĝeron, pro amo al patro karega,
- 790 Laŭzo ekĝemas; kaj larmoj sur vangoj fluadas rivere.
 Kia plorinda mortigo, kaj kia sindono laŭdinda!
 Se al ĉi tiu poemo bonvolas konfidi jarcentoj,
 Brava junulo, neniam en versoj mi ilin forgesos.
 Sed reeniris Mezenco kaj kampon forlasis batalan,
- 795 Kiel venkito, trenante sagegon sur ŝildo fiksitan.
 Tiam rapidas junulo kaj inter armiloj sin ĵetas :
 Li minacantan Eneon haltigas por patron protekti,
 Frapon ricevas por li difinitan, kaj tiel ebligas
 Savan prokraston : kunuloj alkuras kun grandaj kriegojj.
- 800 Dum protektita troviĝas Mezenco per ŝildo de filo,
 Ili, multegajn ĵetinte sagegojn, repuŝas atakon
 De malamiko. Eneo kolera sin kaŝas sub ŝildo.
 Kiam el nuboj eteraj falegas torentoj el hajlo,
 Ĉiuj plugistoj kaj ĉiuj paŝtistoj eliras el kampoj;
- 805 Kaj vojaĝanto, sub ia tegmento serĉante rifuĝon
 Eblan, ĉu bordon riveran, ĉu kavon de alta ŝtonego,
 Pluvon evitas, ĝis kiam reveno de suno permesos
 Taskon daŭrigi : do tiel, de ĉie frapita de, sagoj,
 Nubon militan toleras Eneo, atendas ke haltos
- 810 Fera ventego, kaj Laŭzon riproĉas, kaj Laŭzon minacas :
 « Kial al morto forkuri? Ĉu forto egalas kuraĝon?
 Trompas vin, Laŭzo, pieco malsaĝa. » Sed ardon **junulo**
 Volas nur aŭdi; kolero terura naskiĝas en koro
 De Dardanido. Ve! lastan fadenon de Laŭzo jam ŝpinis
- 815 Parkoj : ĉar glavon timindan en mezon de brusto **junula**
 Tutan Eneo trapuŝis; kaj ĝi malaperas en korpon.

Glavo traboras ŝildeton, malfortan armilon, kaj veston,
 Kiun patrino ornamis per oraj fadenoj teksitaj :
 Sango fluegas sur bruston; kaj korpon forlasas sensangan
 Vivo malĝoja, por Manojn inferajn aliri tra ventoj. 820
 Tamen, tuj kiam vizaĝon de viro mortanta ekvidis
 Filo Anhiza, vizaĝon kovritan de ega paleco,
 Malfeliĉulon li grande kompatis, kaj manon prezentis;
 Ĉar lin kortuŝas memoro de fila amego al patro :
 « Kio do, ho kompatinda junulo, vin laŭdos sufiĉe? 825
 Kion do, indan de tia noblaĵo, nun faros Eneo?
 Viajn armilojn amatajn konservu; kaj mi vin redonos,
 Por ke, se tion vi ŝatas, en tombo gepatra vi kuŝu.
 Sed okazaĵo vin povas konsoli pri morto kruela :
 Ĉar vi pereas de mano de granda Eneo. » Li tiam 830
 Ŝanceliĝantajn kunulojn alvokas, kaj korpon sublevas,
 Kiu hararon laŭ modo kombitan en sango trempigis.
 Dume, sur bordo de Tibra rivero, Mezenco la patro
 Vundojn per akvo lavadis, kaj korpon apogis malfortan
 Kontraŭ la trunkon de arbo. Apude, sur branĉon li kupran 835
 Kaskon pendigis, dum kuŝas sur herbo ceteraj armiloj.
 Staras ĉirkaŭe junuloj precipaj; dum li spiregante
 Kolon fleksetas, kaj barbon densegan fluigas sur bruston.
 Multojn pri Laŭzo li petas, kaj sendas kurjerojn, — ĉar ili
 Lin revenigos, — por porti ordonojn de patro malĝoja. 840
 Tamen de Laŭzo, sur ŝildo kuŝanta, kunuloj plorantaj
 Korpon alportas, glореge venkitan de glora venkanto.
 Sed malfeliĉon de longe konigis al patro ĝemadoj.
 Blankan hararon per polvo li tuj malpurigas, kaj manojn
 Levas al astroj, kaj korpon de filo freneze kisadas : 845
 « Ĉu por mi estis do tiel agrable vivadi, ho filo,
 Ke mi permesis al mia naskito ricevi frapadojn
 Al mi donotajn? Min, patron, savadis vundegoj de filo!
 Via per morto mi vivas! Ve, nun de ekzilo mi sentas
 Malfeliĉaĵojn : de vundo duobla mi nun suferegas. 850
 Mi malpurigis per krimoj la nomon de mia naskito,
 Kiam malamo de gentoj el trono prapatra min pelis.
 Eble mi devus per punoj elpagi patrujan koleron :
 Juste pro multaj krimegoj kulpulon punegus Fataloj.

- 855 Tamen mi vivas, mi lumon kaj homojn ankoraŭ vidadas:
Nu! mi forlasos! » Li diras, kaj poste sur kruro malsana
Penassin levi: kaj, kvankam la vundo malhelpas marŝadon,
Li, ne venkita, venigas ĉevalon: ĝi estis gloraĵo
Lia kaj lia konsolo; li, dank'al ĝi ĉiujn batalojn
- 860 Gajnis venkinte: do, beston vidinte malĝojan, li diras:
« Rebo, longtempe ni vivis, se, por mortemuloj, ekzistas
Longaj aferoj. Sed venki ni devas hodiaŭ, armilon
Sangan kaj kapon Enean kunporti, kaj venĝi de Laŭzo
Lastajn dolorojn: se male Fatalo perfidas esperon,
865 Kune ni mortos; ĉar, plej kuraĝulo, mi kredas que iam
Vi ne toleros fremdestron, kaj ĉefojn obeos Trojanajn. »
Diras li: ŝarĝon kutiman ĉevalo akceptas sur dorso.
Poste li manojn plenigas per akraj sagegoj, kaj rajdas.
Kasko el kupro kaj fasko harega sur kapo brilegas.
- 870 Tiel li tra batalantoj rapidas. Profunde de koro,
Honto kaj lasta espero trompita miksiĝas kun sento
De kuraĝego, de venĝa deziro por filo malviva.
Do li Eneon alvokas trifoje per granda kriado:
Sed lin rekonas Eneo, kaj ĝoje li tiel ekpreĝas:
875 « Patro de dioj, kaj granda Apolo, permesu ke tuje
Li mem komencu batalon. »
Tiel li diras, kaj al li aliras kun lanco minaca.
Tamen Mezenco: « Ĉu min timigebla vi kredas? Mortigi
Filon, jen estis la sola rimedo por min pereigi.
- 880 Morton ne certe timante, mi dion indulgas nenion.
Ĉesu minacoj; mi venis por morti, sed tiun donacon
Sendas unue. » Li diris; kaj sagon li al malamiko
Ĵetas, kaj poste alian, kaj trian, kaj fine pluvigas
Aron da sagoj: sed ilin repuŝas la ŝildo orata.
- 885 Rajdas trifoje Mezenco maldekstren de piedstaranto,
Sagojn ĵetante multegajn: trifoje heroo Trojana
Turnas armilon, kovritan de sagoj arbare pikitaj.
Sed, ĉar formeto de tiom da sagoj prokrastas la venkon,
Fine tedita, li volas pli juste reigi batalon.
- 890 Multojn en koro volvante, li antaŭeniras, kaj inter
Kavaj tempioj ĉevalon militan ekfrapas per sago.
Besto stariĝas sur postaj piedoj, de ufoj antaŭaj

Batas aeron, renversas rajdanton, kaj, sur lin falinte,
Lin embarasas en iloj batalaj, kaj premas per maso.

Frapas ĉielon per krioj Trojanoj kaj anoj Latinaj. 895
Tuje alkuras Eneo, ferglavon el ingo tirinte.

Tiam li diras : « Nu! kie do estas potenca Mezenco?

Kaj nevenkita kuraĝo? » Sed ĉefo Tirena okulojn
Levas al astroj, spiregas, kaj reviviĝinte konscie :

« Viro kruela, min kial insulte je morto minaci? 900

Krimo ne estas min buĉi : pro tio mi faris militon :

Ne pri mi Laŭzo mortanta hontindan kontraktis promeson.

Unu favoron mi petas, se estas petebla favoro.

Korpon tereroj surkovru. Mi scias de miaj samanoj
Kiel ardegas malamo : mi petas; malhelpu insulton. 905

Fine permesu ke tombon de filo mi povu kunloĝi. »

Tiel dirinte, en gorgon li glavon akceptas Fatalan :

Kaj sur armilo animo kun sango rivere fluadis.

KANTO DEKUNUA

Dume Aŭroro sin levas kaj Oceanmaron forlasas.

Kvankam Eneo fundkore deziras malvivajn kunulojn

Tuj entombigi, kaj kvankam okupas lin tiu zorgado,

Tamen, tuj kiam aperas Eoo, li dankas diaĵojn.

Kverkon altkreskan li tiam senigas je ĝia branĉaro, 5

Ĝin sur monteton starigas, ĝin vestas per brilaj armiloj,

Kaj al vi tiun trofeon, akiron de ĉefo Mezenco,

Armpotenculo, dediĉas. Li faskon aranĝas sangplenan,

Sagojn rompitaĵajn de viro, kirason boritan per dekdu

Frapoj gravegaj : maldekstre li ŝildon el kupro alligas; 10

Fine en mezon li elefantostan pendigas glavingon.

Tiam kunulojn, — dum granda kaj densa anaro da ĉefoj

- Lin ĉirkaŭadis, — li ĝoje alvokas venkintajn, kaj diras:
 «Viroj, plej granda laboro finiĝis; forpelu timadon
 15 Pri la restaĵo : vi vidas akiron de reĝo potenca,
 Tiun trofeon; jen kio nun restas de forta Mezenco.
 Estas do vojo libera ĝis reĝo kaj muroj Laŭrentaj.
 Zorge preparu armilojn; baldaŭan esperu batalon,
 Por ke, tuj kiam diaĵoj permesos eliron el tendoj
 20 Kaj starigadon de gloraj stantardoj, ĵus vin ne malhelpu
 Ia prokrasta ordono aŭ ia timado malprava.
 Dume ni metu en teron kadavrojn de niaj kunuloj,
 Sola rimedo por ilin ĝojigi ĉe bordoj Akeraj;
 Iru, li diris, kaj pie honoru per lastaj donacoj
 25 Tiujn animojn kuraĝajn, per sango de kiuj patrujo
 Nova sin al ni malfermis. Ni al Evandrurbo malgaja
 Sendu unue Palason : ve! al li ne mankis kuraĝo,
 Sed antaŭtempe lin kaptis kaj frapis mortiga Fatalo. »
 Tiel li diras, plorante, kaj poste reiras al loko,
 30 Kie troviĝis la korpo malviva de juna Palaso,
 Kiun observis maljuno Aceto : li estis antaŭe
 Ĉevalzorgisto de reĝo Evandro, kaj filon amatan
 Poste kuniris amike, sub malpli favoraj Fataloj.
 Ĉirkaŭ li aro servista premiĝas, kaj viroj Iliaj,
 35 Kaj Trojaninoj malgajaj kun haroj laŭ rito falantaj.
 Tiam, tuj kiam Eneo aliras sub altan pordejon,
 Ili bruantan al astroj ekpuŝas ĝemadon, kaj frapas
 Brustojn, dum reĝa loĝejo resonas je plendoj senfinaj.
 Sed li, tuj kiam li kapon Palasan ekvidis kuŝantan,
 40 Kaj neĝkoloran vizaĝon, kaj vundon en brusto faritan
 De la sagego Aŭzona, li tiel ekkrias, ĝemante :
 « Kial do, knabo plorinda, min kiam Fatalo favoras,
 Ĝi min samtempe malamas; ĉar ĝi ne permesas ke mian
 Regnon vi vidos, kaj patran loĝejon venkinte reiros.
 45 Tian promeson al patro Evandro mi, lin delasinte,
 Pri vi ne donis, dum min elirantan li kisis tutkore,
 Dum, min sendante al regno potenca, timante li diris :
 « Virojn kuraĝajn vi baldaŭ batalos, kaj gentojn malmole-
 Eble en tiu momento, de vana espero kaptite, [lajn. »
 50 Diajn altarojn je donoj li kovras, kaj petas favorojn.

Nun ni malĝojaj, kun vana honoro, kuniros junulon,
 Kiu malviva al Ĉielloĝantoj ne ŝuldas plu preĝojn.
 Malfeliĉulo, vi vidos de filo kruelan tombeton.

Estas jen glora reveno, jen estas triumfo revita,
 Jen rezultato de miaj promesoj! Vi tamen, Evandro, 55
 Filon ne vidos boritan de vundoj malgloraj : kaj vi ne
 Morton deziros pro filo hontinde savita. Ve! kian
 Helpon vi perdis, Iulo, kaj same vi, lando Aŭzona! »

Tiel ĝeminte, li tuje ordonas ke korpon plorindan
 Oni forportu : kaj li en armeo mil virojn elektas, 60
 Kiuj kuniros ĝin, kaj al ĝi lastajn prezentos honorojn,
 Fine plorados kun patro; por tia doloro konsolo
 Ve! malpotenca, sed tamen ŝuldata al patro plendinda.
 Dume, por fari flekseblan kaj dolĉan portilon, aliaj [ĵoj,
 Kune kunplektas trunketojn arbetajn kun kverkaj branĉa- 65
 Kaj sur ĝin metas kuŝejon kovritan de verda tegmento.

Ili sur supron de lito folia junulon etendas,
 Kiu similas al floro tranĉita de mano virgina,
 Ĉu al violo humila, ĉu al hiaciĉto senforta :
 Ili ne perdis ankoraŭ ĉu formon ĉu brilan koloron; 70
 Sed ne plu nutras nek fortojn refaras la tero patrina.

Tiam du vestojn purpure pentritajn kaj ore brilantajn
 Poste venigas Eneo : feliĉa pri tiu laboro,
 Iam de mano mem ilin kudradis fervore Sidona
 Dido, kaj ŝtofon ornanis per ora fadeno maldika. 75

Unu el ili junulon ekvestas, je lasta honoro;
 Kaj bruligotan hararon vualas alia vestaĵo.
 Plie li multajn kolektas objektojn, militan akiron,
 Kiun kunportos sennombra anaro : li poste aldonas
 Sagojn, kaj belajn ĉevalojn rabitajn en kampoj Laŭrentaj, 80
 Fine kaptitojn, kun manoj ligitaj, buĉotajn por Ombron
 Pie honori, kaj flamojn plenigi je sango verŝita.

Kaj li ordonas ke ĉefoj mem portos sur trunkoj trofeojn
 El malamikaj armiloj, kun nomoj de eksposedantoj.
 Oni kondukas mizeran Aceton, per aĝo premitan : 85
 Bruston per pugnoj li frapas, kaj ŝiras vizagaĝon per ungoj;
 Poste li svenas, kaj korpon tra polvo faligas sur teron.
 Ruĝaj de sango postiras Rutulaj kaleŝoj kaptitaj.

- Sekvas Etono, ĉevalo milita, sen ia ornamo :
- 90 Ploras la malfeliĉulo, kaj larmoj fluadas sur vangoj.
 Portas sagegon kaj kaskon aliaj; ĉar Turno ceterajn
 Kaptis armilojn. Malĝoja aliras anaro; Trojanoj
 Sekvas kaj ĉefoj Tirenaj, dum lancojn mallevas Arkidoj.
 Kiam longvicoj de la sekvantaro tre malkroksimiĝis,
- 95 Haltis Eneo kaj diris, profundan puŝinte ĝemadon :
 « Ĉar nin al novaj larmegoj, en tiu kruela milito,
 Vokas Fataloj, ŝaluton eternan, eterne adiaŭ,
 Glora Palaso. » Aliajn parolojn li ne plu dirinte,
 Altajn remparojn de urbo reiris, kaj trafis tendaron.
- 100 Jam delegitoj elvenis el urbo de reĝo Latino,
 De olivuja branĉaro kovritaj, petante permeson.
 Oni bonvolu ke korpojn, sur kampo pro glavo kuŝantajn,
 Ili reprenu, por ilin en tombon sub tero enfermi :
 « Kontraŭ venkitoj malvivaj ne estas plu ebla batalo;
- 105 Nun do kompatu nin, iam vokitajn : bopatroj kaj mastroj. »
 Bona Eneo volonte konsentas pri tiu deziro
 Tre akceptinda, kaj ilin respondas per tiuj paroloj :
 « Kia Fatalo malbona al tiu milito, Latinoj,
 Vin do instigis? kaj kial vi viajn repuŝas amikojn?
- 110 Pacon vi petas por viroj malvivaj, de Marso frapitaj;
 Sed mi pli amus ĝin doni al anoj vivantaj : mi venis
 Tien ĉi, nur ĉar Fataloj promesis loĝejon kaj urbon;
 Mi ne al gento alportis militon. Ligilon gastaman
 Reĝo ekrompis, kaj fidis prefere armilojn de Turno.
- 115 Estus pli juste ke Turno nur risku batalan hazardon.
 Se li deziras ĉesigi militon kaj peli Trojanojn,
 Kontraŭ mi li do batalu, Fatalajn provente dekretojn.
 Vivos ĉi tiu al kiu permesos kuraĝo kaj dioj
 Vivon. Nun, iru; kaj anojn mizerajn kuŝigu sur fajrojn. »
- 120 Tiel parolis Eneo. Unue mirante silentis
 La delegitoj, okulojn kaj buŝojn tenante senmovaj.
 Tiam maljuna Dranceso, li kiu senĉese kulpigis
 Turnon junaĝan malame, komencas, kaj tiel parolas :
 « Glora per famo, pli glora ankoraŭ per viaj armeoj,
- 125 Viro Trojana, per kiaj paroloj mi juste vin laŭdos?
 Kion admiri, ĉu vian justecon, ĉu militagadojn?

Certe dankemaj ni tion reportos al urbo patruja,
 kaj vin al reĝo ni ligos per ĵuro, se tion Fataloj
 Volas permesi : kaj ligojn aliajn, nu! Turno ekpetu.
 Plie ni estos feliĉaj pro faro de Trojaj novmuroj; 130
 kaj ni sur ŝultroj alportos ŝtonaron por ilin konstrui. »
 Tiel li diris; kaj ĉiuj kunuloj murmuris aprobe,
 Dum por dekduo da tagoj li tuj interpacon konkludas.
 Tiam, amike miksitaj kun Trojoj, Latinoj tra densaj
 Vagas arbaroj. Sub frapoj hakilaj ekĝemas frakseno; 135
 Pinoj, tuŝantaj de pinto ĉielon, bruege falegas;
 Kverkojn senĉese disrompas ferkojnoj, kaj cedron odoran;
 kaj veturiloj ĝemadas sub pezo de ulmoj ŝarĝantaj.
 Sed jam la Famo fluganta, malĝoja kurjero de larmoj,
 Kiu hieraŭ pri venko Latina aplaŭdis Palason, 140
 Murojn kaj domojn de reĝo Evandro je plendoj plenigas.
 Pordojn rapide aliras Arkidoj : laŭ modo antikva,
 Ili flamingojn kunportas funebrajn; sur vojo, lumantaj
 Marŝas longvicoj; kaj tre malproksime heliĝas kamparo.
 Baldaŭ anaro Friguja, kontraŭe iranta, renkontas 145
 Anojn plorantajn : kaj, kiam patrinoj ekvidas ke aro
 Pordojn transiris, tuj ili je krioj plenigas urbeton.
 Povas semtempe neniu potenco haltigi Evandron :
 Mezen de vicoj li iras, portilon haltigas, Palason
 Kisas freneze, sur lin sin ĵetinte kun larmoj kaj ĝemoj. 150
 Fine doloro malfermas sed pene vojiron al voĉo :
 « Tiajn promesojn, Palaso, ĉu iam al patro vi donis?
 Kial vi pli singardeme ne Marson kruelan batalis?
 Forte instigas, mi tion tro konas, deziro al gloro
 Viron kuraĝan; kaj koron flamigas unua batalo. 155
 Provo plorinda por juna heroo! Malmola lernado
 De tro proksima milito! Ve! miajn dezirojn kaj preĝojn
 Dioj ne aŭdis! Kaj al vi, plej kara edzino, feliĉe
 Morto evitis kruelajn suferojn de tia doloro.
 Mi preteriris limtempon de vivo, por ke min Fataloj 160
 Filon postvivi devigu. Se Trojajn mi sekvus armilojn,
 Min mem Rutuloj mortigus, kaj mian tiregus animon;
 Kaj nun min tiu tombefesto, sed ne vin, Palaso, koncernus.
 Tamen mi ne vin kulpigas, Trojanoj, nek ĵuron, nek manojn

- 165 Niajn gastame premitajn : ve!, al maljuneco kredeble
 Estis devita ĉi tiu nunajo. Sed, — ĉar antaŭtempa
 Filon minacis mortigo, — mi ĝojas; ĉar milojn da Volskoj
 Buĉis Palaso; kaj li al Trojanoj malfermis Latujon.
 Sed aliparte, Palaso, pli inde mi glori ne povus
- 170 Vian memoron ol pia Eneo, ol ĉefoj Frigujaj,
 Ol altranguloj Tirenaj kaj tuta armeo Etruska.
 Ili trofeojn alportas de ĉefoj de vi mem buĉitaj.
 Same vi estus nur trunko grandega, armile vestita,
 Se egaligus batalon forteco kaj aĝo egalaj,
- 175 Turno. Sed kial, Trojanoj, vin el batalado detenas
 Malfeliĉulo? Do iru, kaj diri memoru al reĝo :
 « Nur malamindan mi vivon daŭrigas post morto de filo,
 Ĉar al vi tute mi fidas : vi ŝuldas al filo, al patro,
 Vivon de Turno : pri tiu nur punkto, Fatalo kaj vi min
- 180 Povos ĝojigi : ve! vivfeliĉaĵojn mi ne plu deziras
 Rajte; sed tion al filo mi volus reporti ĉe Manojn. »
 Dume Aŭroro sur homojn mizere mortemajn vivigan
 Lumon reverŝis; kaj ili denove refaris laboron.
 Kaj jam Eneo la patro, jam Tarko, sur kurba marbordo,
- 185 Pie starigis ŝtiparojn : kaj ambaŭ, laŭ modo de patroj,
 Korpojn de siaj samanoj alportis; dum ekbruligitaj
 Fajroj ĉielon nigrigis altegan per fumo malluma.
 Viroj, vestitaj per brilaj armiloj, trifoje rondiras
 Ĉirkaŭ ŝtiparoj; trifoje rajdistoj malĝoje galopas
- 190 Ĉirkaŭ funebraj tombfajroj, el buŝo puŝante ĝemadojn,
 Malsekigante armilojn kaj teron per larminoj sennombraj;
 Dum supreniras sonoraj trompetaj kaj viraj kriegoj.
 Unuj akiron, kaptitan sur viroj Latinaj buĉitaj,
 Ĵetas en fajron, kirasojn kaj glavojn artiste ĉizitajn,
- 195 Kaj enbuŝaĵojn, kaj rodojn varmegajn; aliaj konitajn
 Donojn alportas, kaj ŝildojn, kaj sagojn neŝance uzitajn.
 Estas ĉirkaŭe buĉitaj al Morto multegaj bovviroj :
 Porkoj longharaj, brutaro kaptita tra tuta kamparo,
 Estas ĵetitaj en flamojn. Sur bordo, kunulojn brulantajn
- 200 Ĉiu rigardas fervore, kaj zorge ŝtiparojn aranĝas
 Duonbrulitajn : kaj ili eliri ne povas, ĝis kiam
 Nokto malseka ĉielon turnigis kaj brilan astraron.

Dume, en lokoj diversaj, mizeraj Latinoj starigis [ron
 Multajn ŝtiparojn. Dum parton sennombran de korpoj en te-
 Unuj enmetas senpere, en kampojn proksimajn ceteran 205
 Parton forportas aliaj, aŭ ilin al urbo direktas,
 Poste bruligas senorde, sen ia honoro, restaĵon
 De malvivuloj buĉitaj : kaj ĉie, sur lando ebena,
 Lumas ŝtiparoj brulantaj kaj vastan heligas kamparon.
 Ombron malvarman de nokto jam tria forpelis Aŭroro. 210
 Tiam, por cindrojn kolekti kaj ostojn forporti, malgaja
 Aro rapidas, kaj kovras restaĵojn per tero varmeta.

Sed sub tegmentoj, en riĉaj domegoj de urbo Latina,
 Regas plej grando tumulto, aŭdiĝas plej bruaj ĝemadoj.
 Tie patrinoj plorantaj, edzinoj, fratinoj vunditaj 215
 De la pereco de frato, kaj orfinigitaj filinoj,
 Ĉiuj malbenas militon kruelan kaj Turnan edziĝon :
 « Tiu mem iru, de glavo armita, kaj finu disputon,
 Kiu deziras honorojn kaj sceptron de regno Itala! »
 Tiun koleron gravigas Drancesa malamo : « Nur Turnon 220
 Celas Eneo; nur Turnon batali Eneo deziras. »
 Sed opinion kontraŭan por Turno, per diroj diversaj,
 Multoj konigas : ĉar nomo de granda reĝino protektas
 Reĝon, dum sian sur multajn trofeojn li famon apogas.

Inter ĉi tiuj movadoj, en mezo de tia tumulto, 225
 Delegitaro, sendita al la Diomeda grandurbo,
 Tute malĝojan alportas respondon; ĉar ĝi ne sukcesis.
 Vanaj fariĝis penadoj : nek oro, nek riĉaj donacoj,
 Nek eĉ preĝadoj plej egaj valoris : alien Latinoj
 Serĉu helpadon, aŭ pacon ekpetu de reĝo Trojana. 230
 Falas Latino mem reĝo, premita de granda ĉagreno ;
 Ĉar evidente Eneon kondukas Fatala potenco :
 Tion tro montras kolero de dioj kaj novaj tombaroj.
 Li do kunvokas, en granda ĉambrego palaca, solenan
 Konsilantaron de viroj altrangaj, ministroj de regno. 235
 Ili alkuras al reĝa tegmento : kaj vojon plenigas
 Aro ilia. En mezon sidiĝas, unua pro aĝo,
 Sceptro kaj povo, kun frunto malĝoja, la reĝo Latino.
 Poste li al revenantaj senditoj el urbo Etola
 Tiam ordonas, ke ili rediros respondojn donitajn 240

Tre akurate. Do kiam silento haltigis langmovojn,
Tiel, por reĝan ordonon obei, parolas Venulo :

- « Ni Diomedan tendaron kaj urbon Argujan, urbanoj,
Vidis : post longa vojaĝo kaj venko de multaj malhelpoj,
245 Manojn ni premis de tiu ĉi kiu faligis Trojurbon.
Li Arĝiripan novurbon, je nomo de gento patruja,
Fondis, venkinte, en kampoj Japigaj, ĉe monto Gargana.
Kiam al ni enigitaĵi li laŭtan permesis parolon,
Donojn doninte, ni nomon konigas patrujan, kaj diras
250 Kial ni faras militon, kaj kial ni Arpon aliris.
Nin aŭskultinte, li al ni respondas per buŝo afabla :
« Ho tro feliĉaj nacioj, sur kiujn potencis Saturno,
Gentoj Aŭzonaj, vin kia Fatalo, malkvietiginte
Vian ripozon, instigas hazardan ekprovi militon?
255 Ĉiuj ni, kiuj per fero Ilian detruis potencon,
— Mi ne parolas pri viroj falintaj ĉe Trojaj remparoj,
Entombigitaj sub ondoj Simoj, — ni krimojn elpagis
Per neaŭditaj punegoj, konitaj de mondo cetera.
Ve! nin kompatus Priamo mem! Estas Minerva ventego
260 Tiel terura, Kafaro venganta kaj rifoj Eŭbeaj.
Estas, post tiu milito, puŝitaj al bordoj diversaj,
Ĉu Menelao Atrido, ĝis altaj kolonoj Proteaj,
Ĉu insidisto Uliso, ĝis Etnaj kavernoj Ciklopaj.
Ĉu mi parolos pri Neoptolemo, pri Idomeneo,
265 Regnon lasinta, pri Lokroj loĝantaj sur bordo Libuja?
Reĝo Mikena, potenca ĉefanto de reĝoj Argujaj,
Mortis sur sojlo palaca, sub frapoj de krima edzino :
Tiel venkinton de granda Azio mortigis adulto.
Al mi ĉu dioj permesis revidon de kampoj patrujaj,
270 De Kalidono karega kaj de amegita edzino?
Min persekutas ankoraŭ mirakloj terure minacaj.
Miaj kunuloj perditaj tra ventoj eteraj forflugis :
Ili, similaj al birdoj, vagadas — ve! kia punego! —
Ĉirkaŭ rivero, kaj rifojn plenigas je voĉoj larmhavaj.
275 Tiujn fariĝojn mi devis ektimi, de tiu ĉi tago,
Kiam malsaĝe, en korpon diinan puŝinte ferglavon,
Manon Venusan mi malrespektigis per vundo malpia.
Ne min instigu, mi petas, al provo de tiaj militoj.

De ruinigo Pergama, neniel mi volis batali
 Kontraŭ Trojanojn : malnovajn insultojn mi tute forgesis. 280
 Tiujn donacojn, el-bordoj patrujaj de vi alportitajn,
 Donu al reĝo Eneo. Mi kontraŭ lin iam batalis;
 Lian kuraĝon mi konas; nun kredu spertulon : neniu
 Kiel li ŝildon manumas, sagegon turnigas kaj ĵetas.
 Certe se' estus naskitaj du viroj similaj en Ida 285
 Lando, al urboj Inakaj idaro de fama Dardano
 Estus veninta, kaj plorus Grekujo pro sorto kontraŭa.
 Kio ajn estis farita ĉe muroj de Trojo timinda,
 Grekoj ĝin devas al glavo Hektora, al mano Enea :
 Ili nur povis daŭrigi defendon dum deko da jaroj. 290
 Ambaŭ egale famegaj per koroj kaj gloraj agadoj,
 Estis Eneo pli pia. Pro ligo do manojn kunpremu
 Senfierce; kaj zorgu ke glavoj ne interbatalu. » —
 Kaj nun vi konas, ho reĝo plej granda, respondon faritan
 De Diomedo, kaj lian konsilon pri grava milito. » 295

Sed li apenaŭ parolis, diversa tremado trakuras
 Aŭzonidaron timantan. Ĉar kiam rapide fluantan
 Rifoj haltigas riveron, per baro ĝenita koleras
 Akvo, dum bordoj proksimaj sonoras pro ondoj bruantaj.
 Fine, tuj kiam fariĝis trankvilaj animoj kaj buŝoj, 300
 Diojn preĝinte, la reĝo parolis, el trono altega :
 « Antaŭ milito ni devis diskuti pri tio, Latinoj :
 Tion mi volis; ĝi estis pli bone : ne estas momento
 Peti konsilojn, dum malamikaro sieĝas remparojn.
 Kontraŭ naskitojn de dioj senfinan ni faras batalon. 305
 Ni ne triumfos; ĉar ilin lacigas nenia milito :
 Ili eĉ, kvankam venkitaj, ne povas forlasi armilojn.
 Se vi esperis kunhelpon Etolan, vi nun ĝin forlasi
 Povas. Do fido al vi mem nur restas, sed kiel malforta!
 Kian mortigan frapadon ricevis antikva prospero, 310
 Tio, ve! antaŭ okuloj kaj manoj tro kuŝas videble.
 Sed mi neniun kulpigas; ĉar ĉio kuraĝe provebla
 Estis farita; kaj regno batalis per ĉiuj rimedoj.
 Nun do aŭskultu : ĉar nova ideo naskiĝis en penso
 Ŝanceliĝanta, ĝin al vi mi volas mallonge konigi. 315
 Landon antikvan mi havas, proksiman de Tuska rivero;

- Ĝis Okcidento ĝi kuŝas, ĝis lastaj landlimoj Sikanaj;
 Teron Aŭruncoj kulturis kaj same Rutuloj: ĉi tiuj
 Plugas malmolajn montetojn, kaj paŝtas sur suprojsenfruk-
- 320 Tiu ĉi lando kaj ĉeno pinhava de altaj montetoj [taj.
 Pagu bonvolon Trojanan : per ŝuro al ili ni faru
 Justajn proponojn kaj leĝojn, kaj ilin kunligu kun regno.
 Ili sidiĝu ĉi tien, laŭ volo, kaj murojn konstruu.
 Tamen se ili preferas aliri ĉe genton alian;
- 325 Landon Latinan se ili deziras forlasi, ni dudek
 Ŝipojn, per kverko Itala, bonvole por ili konstruu,
 Pli eĉ, se ili bezonas : sur bordo ĵus kuŝas la tuta
 Materialo; kaj al ni ĉu nombron, ĉu formon de ŝipoj
 Ili mem montros; ni donos kupraĵon, laboron, ŝipaĵojn.
- 330 Plie, por porti leteron kaj tiun firmigi ŝuradon,
 Cent delegitoj Latinaj, naskitaj de raso nobela,
 Iros, mi tion deziras, prezentos branĉetojn de paco,
 Donos donacojn, amasojn da oro kaj elefantosto,
 Fine seĝegon kaj togon mallongan, reĝecajn insignojn.
- 335 Do konsiliĝu plej saĝe, kaj regnon subtenu falantan. »
 Tiam sin levas Dranceso kolera, ĉar gloro de Turbio
 Koron ŝaluzan incitas per pikoj sekrete malamaj:
 Riĉa li estas, kaj lange tre lerta; sed agoj militaj
 Lin malflamigas : en konsilantaroj li saĝe parolas,
- 340 Scias direkti ribelon, fiera pri raso nobela
 Kaj heredeco patrina; sed naskis lin patro necerta.
 Turnon li tuje kulpigas; kaj diroj grandigas kolerojn :
 « Reĝo plej bona, vi klare parolis : neniel bezonas
 Tiaj proponoj diskuton : se ĉiu tre bone komprenas
- 345 Agon utilan por gento, neniu ĝin diri kuraĝas.
 Li ne malhelpu parolon, li malhumilecon mallevu,
 Tiu ĉi kiu per agoj malbonaj, perfidaj konsiloj,
 (Jes, mi parolos; jes! kvankam min glavo danĝere minacas!)
 Tiom da ĉefoj mortigis, kaj urbon je ĝemoj kaj ploroj
- 350 Tutan plenigis, kaj kiu, forkuron provinte, tendaron
 Trojan atakas, kaj pensas per glavo timigi ĉielon.
 Nun al ĉi tiuj donacoj, de vi mem proprece donotaj
 Al Dardanido, plej bona el reĝoj, aldonu tutkore
 Unu; neniu per forto ĉi tion vin fari malhelpu.

Patro, al fama bofilo, tre inda por tia edzigo, 355

Donu filinon, kaj pacon starigu per juro eterna.

Tamen se granda timego animojn kaj brustojn okupas,

Lin mem ni preĝu, de li mem ni tian petegu favoron :

Cedu li ; li al patrujo kaj reĝo redonu promeson.

Kial urbanojn mizerajn vi jetas en tiajn danĝerojn, 360

Turno, vi kaŭzo kaj kapo de malfeliĉaĵoj Latujaj?

Savon neniun alportos milito : ni pacon petegas ;

Donu do garantiaĵon sufiĉan por pacon ricevi.

Kvankam vi kredas min malamikema, (mi tion ne neas),

Tamen mi venas al vi, petegante : kompatu samanojn ; 365

Malhumilecon formetu ; venkito, forkuru. Sufiĉe

Da enterigoj ni vidas, da ruinigitaj kamparoj !

Sed se vin gloro instigas ; se, dank'al kuraĝo, vi certan

Venkon esperas ; se dotan reĝecon vi tiel deziras ;

Nu ! konkuranton ataku, kaj bruston prezentu kuraĝe. 370

Ĉu, por ke Turno sin povu edzigi kun reĝa edzino,

Ni, malnobela anaro, sen tomboj, seĝ larmoj, restados

Nude kuŝantaj en kampoj ? Se iom vi estas kuraĝa,

Se vi de patroj heredis maltimon, rigardu kontraŭen

Tiun ĉi kiu vin vokas ! » 375

Tiaj kulpigoj frenezan de Turno ekscitas koleron :

Poste ĝemante el brusto li tiujn eligas parolojn :

« Certe, Dranceso, vi larĝan kapablon posedas parolan,

Kiam milito ekpetas agantojn, en Patraj kunvenoj

Ĉiam unua : sed nun ne utilas sonoraj paroloj, 380

Kiuj forflugas el buŝo ŝirmita, dum ne malamiko

Murojn sieĝas, dum sango ne fluas en plenajn fosaĵojn.

Elokventecon tondrigu kutiman : kulpigu timadon

Mian, Dranceso, vi, kiu de tiom da Trojoj buĉitaj

Kovris kamparojn, kaj ilin plenigis je venkaj trofeoj. 385

Pruvi vi povas facile ĉu via kuraĝo kapabla

Estas de famaj agadoj ; ni ne malproksime serĉados

La malamikon ; de ĉie ĝi niajn sieĝas muregojn.

Ĉu vi kontraŭen aliras ? Vin kio haltigas ? Ĉu ĉiam

Marsa fervoro troviĝas en lango de insultemulo, 390

En forkurantaj piedoj ?

Mi, forpelita ! Ĉu, malestimulo, vi rajte certigas

- Ke mi forkuris, dum Tibro pleniĝas je sango Trojana;
 Dum vi ekvidis ke domo Evandra kaj lia idaro
 395 Ne plu ekzistas, ke mi de Arkidoj formetis armilojn.
 Tiel ja ne opiniis Bitio, grandega Pandaro,
 Miloj da viroj samtage senditaj Tartaren nur de mi,
 Mi, enfermita en muroj, interne de Trojaj remparoj.
 Savon nenium alportos batalo! Nur via Eneo
 400 Devas ĝin timi, nur via partio. Vi dume timadon
 Semas senĉese tra gentoj, potencon laŭdegas de Trojaj
 Viroj dufoje venkitaj, kuraĝon malŝatas Latinan.
 Nun Mirmidonajn ĉefantojn tremigus Frigujaj armiloj,
 Nun Larisanan Ahilon kaj filon de Tido : forkurus
 405 Adriatikon rivero Aŭfida kaj posten reirus.
 Anoj, vi vidas ke artifikulo nun mian koleron
 Timi sajnigas, por sian pli bone grandigi kulpigon.
 Rekuraĝigu vin : tian animon neniam per mano
 Mi eltiregos : ĝi loĝu en vi! ĝin en brusto konservu!
 410 Mi al vi, patro, al viaj decidoj gravegaj revenas.
 Se vi nenian esperon enmetas en niajn armilojn;
 Se forlasitaj ni tute fariĝis; se unu malvenko
 Tute mortige nin frapis; se estas revenĝo neebila;
 Pacon ni petu humile kaj manojn prezentu senarmajn.
 415 Tamen ĉu iom da virto antikva ne vivas ankoraŭ?
 Antaŭ aliaj li estis feliĉa kaj koron altigis,
 Tiu ĉi kiu, por tiajn agadojn ne vidi hontindajn,
 Glore pereis sur kampo batala kaj polvon mordetis.
 Sed se ni havas ankoraŭ rimedojn, junulojn ardantajn;
 420 Se nin samtempe kunhelpas kaj urboj kaj gentoj Italaj;
 Gloron Trojanaan se ili elpagis per multa sangfluo;
 Samajn mizerojn se ili suferis kaj saman ventegon;
 Kial nin malkuraĝigi hontinde, de paŝo unua?
 Kial tremeti ĝis ostoj eĉ antaŭ trompeta signalo?
 425 Ofte la tempo fluganta laboras diverse, kaj ŝanĝojn
 Kaŭzas feliĉajn; oftege fatalo sin ludas de homo,
 Kaj reciproke lin ree remetas en staton pli firman.
 Se, por nin helpi, kunvenos nek Arpo nek anoj Etolaj,
 Nin Tolumnio feliĉa, Mesapo, kunhelpos, kaj ĉiuj
 430 Gentoj senditaj de tiom da ĉefoj; kaj ne ŝanceliĝos

Gloro, por sekvi plej bonajn Latinojn kaj anojn Laŭren-
Estas ankoraŭ Kamilo, de Volska nacio glorega; [tajn.

Ŝi rajdantinan korpuson direktas per kupro brilantan.

Sed se min solan Trojanoj batale invitas; se al vi

Plaĉas propono; se bonon komunan mi sola malhelpas; 435

Venko ne tiel malame forkuris el manoj de Turno,

Ke li rifuzus ajn kion ekprovi pro tia espero.

Mi lin kuraĝe batalos, eĉ kiam li estus Ahilo

Mem, kaj eĉ kiam li vestus armilojn, de mano Vulkana

Same faritajn. Al vi, al bopatro Latino, mi, Turno, 440

Vivon promesas, ne malpli supera kuraĝe ol miaj

Avoj. Min solan Eneo deziras? Li venu; mi petas :

Por ke, se dioj koleris, Dranceso ne pro mi pereu;

Por ke je tia honoro kaj gloro li ne min senigu! »

Dume dum inter si ili disputis pro ŝanceliĝantaj

445

Regnaj aferoj, Eneo armeon kondukis el tendoj.

Tiam kurjero, en reĝan palacon, tra granda tumulto,

Tuje rapidas, kaj urbon plenigas je forta teruro.

Pretaj por tuja batalo, Trojanoj kaj anoj Tirenaj

Malsupreniras el Tibra rivero, tra tuta kamparo. 450

Koroj subite ekbatas; spiregas de aro tremanta

Brustoj; kaj ĝian koleron incitas potencaj pikiloj.

Ĉiuj ekprenas armilojn; kaj ardas junuloj kuraĝaj;

Patroj murmuras kaj ploras, malgajaj; kaj granda kriego,

Inter diversaj disputoj, trairas tra blovoj eteraj. 455

Tiel bruegas, en alta arbaro, anaro da birdoj,

Kiuj ĉi tien kunvenis; kaj tiel fiŝhavajn Padusajn

Ondojn kaj marĉojn bruantajn plenigas cignaro.

« Nu! nun, urbanoj, alvoku do konsilantaron, ekkrias

Turno, kaptante okazon, kaj pacon laŭdadu, sidantaj : 460

Regnon Trojanoj per glavo okupas. » Li ne plu parolas,

Sed tuj eliras rapide, kaj altan forlasas palacon.

« Kuru, Voluso, ordonu ke Volskoj ekprenu armilojn :

Same konduku Rutulojn : Mesapo kaj frato Koraso

Ĉefu rajdantojn, kaj ilin vastigu tra tuta kamparo : 465

Parto observos eniron de urbo kaj turojn okupos :

Kien pli ili utilos mi ĉefos kaj sendos aliajn. »

Ciuj subite el urbo cetera alkuras al muroj.

- Konsilantaron tremante forlasas Latino la patro,
 470 Kaj komencitan diskuton rezervas al tempo pli bona.
 Multe li sin ekkulpigas : ĉar vole li, kiel bofilon,
 Ne Dardanidan akceptis Eneon, ne metis sur tronon.
 Antaŭ pordegoj, Latinoj kavigas fosaĵojn, alportas
 Ŝtonojn kaj stangojn. Trompeto signalon de sanga batalo
 475 Donas. Patrinoj, infanoj, diverse starantaj, remparojn
 Kronas amase; kaj ĉiujn alvokas premanta laboro.
 Baldaŭ reĝino, sekvata de granda anaro patrina,
 Al fortikaĵo altega veturas kaj templo Palasa,
 Donojn portante : ŝin flankas kunule virgina Lavinjo,
 480 Kaŭzo de tiaj doloroj, kaj belajn okulojn mallevas
 Teren. Aliraŝ patrinoj kaj templon arome parfumas,
 Poste, sur sojlo diina, malĝojajn ekdiras parolojn :
 « Armopotenca, juĝanta militojn, virgina Minervo,
 Mano rompegu sagegon de Friga rabisto, kaj lin mem
 485 Polven ekjetu, kaj antaŭ altegajn kuŝigu pordegojn. »
 Turno ardanta sin armas rapide por provi batalon.
 Jam li kirason Rutulan, de kupra maŝaĵo kovritan,
 Vestis, kaj krurojn enfermis internen de oraj gamaŝoj.
 Nudan li kapon altigas; kaj, glavon liginte sur flankon,
 490 El fortikaĵo li malsupreniras, brilanta per oro :
 Koro ekbatas, ĉar li malamikon jam venkis espere.
 Tiel, rompinte ligilojn, el stalo forkuras ĉevalo ;
 Liberigita, ĝi baldaŭ senfinan okupas kamparon,
 Poste galopas por trafi, jen ĉevalinaron vagantan,
 495 Jen de rivero konita fluadon kaj tien sin ĵeti :
 Ĝi petolante saltegas, blekegas, kaj, plialtigante
 Kapon fieran, sur kolon kaj ŝultrojn skuadas hararon.
 Antaŭ li, rajdantinaron de Volskoj ĉefante, Kamilo
 Tuj sin prezentas : ĉe pordoj, el bela ĉevalo reĝino
 500 Malsupreniras; kaj tuta anaro, lasinte rajditojn,
 Ĝian ĉefinon imitas. Ŝi haltas, kaj tiel parolas :
 « Turno, se ĉiu al sia maltimo ĵus povas konfiĝi,
 Mi do kuraĝos, kaj aron Enean kredeble haltigos :
 Sola, sen helpo, mi povas Tirenajn batali rajdantojn.
 505 Lasu min provi unuajn danĝerojn de tiu milito :
 Kaj vi, piede de muroj, restadu por zorgi remparojn. »

Turno de ino timindan rigardas vizaĝon kaj diras :

« Ho virgulino, glorego Itala, neniam mi povos

Diri kaj pruvi sufiĉan dankecon : sed nun, — ĉar vi volas

Ĉiujn ekprovi danĝerojn, — ni kune dividu laboron. 510

Baldaŭ, se estas fidindaj ĉu famo ĉu miaj kurjeroj,

Sendos antaŭen malpezajn rajdantojn Eneo maltima :

Ili kamparon okupos. Li dume, tra vojoj dezertaj,

Monton transiros krutegan, por poste ĝis urbo aliri.

Por li embuskon mi zorge preparis en faŭkoj arbaraj, 515

Kaj per soldatoj armitaj mi vojon duflanke plenigis.

Vi do suferu frapegon de kunaj rajdantoj Tirenaj.

kun vi vi havos kuraĝan Mesapon, korpusojn Latinajn,

Kaj militistojn Tiburajn : vi kiel mi ĉefe komandos. »

Diris li : kaj li Mesapon, kunulojn kaj ĉefojn per vortoj 520

Samaj incitas ; dum li al batalo rapide aliras.

Valo troviĝis faldhava kaj kurba, tre inda por ruzoj

Kaj artifikoj/militaj : duflanke ĝin kovris arbaroj,

Kaj du montetoj enfermis : ĉi tien kondukis vojeto,

Funde de faŭko krutega, je malfacilega aliro. 525

Super kavaĵo, tra rifoj, sur pinto plej alta de monto,

Kuŝis plataĵo neniel videbla, kaŝejo senriska, .

Ĉu por maldekstren kaj dekstren el supro surprize ataki,

Ĉu por, restante sur monto, pezegajn ruligi ŝtonegojn.

Tien junulo aliras per vojoj konitaj nur de si, 530

Lokon okupas, kaj lokas soldatojn en mezan arbaron.

Dume, en altaj sidejoj de dioj, Opion rapidan,

Unu el inoj kunulaj kaj virgaj de sankta anaro,

Tute malĝoja, alvokas filino Latona, kaj diras :

« Ho virgulino, militon kruelan aliras Kamilo : 535

Vane ŝi vestis armilojn similajn al niaj. Ŝi estas

Al mi pli kara ol ĉiuj aliaj : de longe ŝin amas

Koro Diana, kaj de amikeco gustumas dolĉecon.

Ĉar tiranecon malamis urbanoj, Metabon el regno

Ili forpelis : el urbo Priverna li do ekforkuris, 540

Kaj infaninon forportis el mezo de sanga ribelo,

Por ke ŝi lian ekzilon kunvivu : kaj vorton « Kasmilo »

lom ŝanĝinte, de nomo patrina li nomis Kamilon.

Li, ŝin portante sur brusto, ekcelis rapide de montoj

- 545 Kaj de arbaroj rifuĝon : de ĉie danĝeraj sagegoj
 Pluis, kaj Volskoj per glavo mortiga lin kaj ŝin minacis.
 Sed Amazeno forkuron haltigas; ĉar inter plenbordoj
 Fluis ŝaŭmanta rivero; ĝin pluvo senĉesa el nuboj
 Tute plenigis. Lin, pretan por naĝo, haltigas amego
- 550 Al infanino : li timas pro ŝarĝo karega. Mil pensoj
 Lian ŝancelas animon : subite li tion decidias.
 Forta armito, li portis okaze en mano sagegon
 Pezan kaj lignotuberan, el kverko fajrmalmoligita.
 Li naskitinion envolvas en ŝelon de korko sovaĝa,
- 555 Kaj ŝin tre lerte alligas en mezo de granda sagego :
 Ĝin balancinte per forta movado de brako, li preĝas :
 « Sankta filino Latona, diino de densaj arbaroj,
 Infanineton mi al vi dediĉas : ĉar, sagon tenante,
 Ŝi malamikon tra ventoj preĝante forkuras. Akceptu,
- 560 Mi vin petegas, diino, knabinon aere senditan. »
 Tiel li diris; kaj, brakon levinte, li sagon ĵetegas
 Forte; aero sonoras : kaj fluon de ondoj rapidaj
 La malfeliĉa Kamilo transiras kun sago bruanta.
 Poste Metabo, proksime premita de forta korpuso,
- 565 Sin en riveron ekĵetas, kaj fine el tero herbhava
 Tiras sagegon kaj virgan infanon, Trivian proprecon.
 Ia tegmento kaj ia remparo de urbo neniam
 Viron akceptis, tro kore sovaĝan por peti gastamon.
 Kiel paŝtistoj li vivis sur supro de montoj dezertaj.
- 570 Tie filinon, tra densaj arbetoj kaj bestaj nestegoj,
 Zorge li nutris, per lakto sovaĝa de ino-ĉevala,
 Mamojn premante sur lipojn moletajn de l'infanineto.
 Poste, tuj kiam postsignon de paŝoj unuaj knabino
 Markis sur teron, tuj manon li armis per akra saĝeto,
- 575 Kaj alpendigis pafarkon kaj sagojn al ŝultroj malfortaj,
 Dum ŝi, anstataŭ hararaj juveloj kaj roboj trenantaj,
 Felon de tigro vestadis, el verto sur dorso pendantan.
 Tiam per mano maldika ŝi sagojn ekĵetis malpezajn;
 De ŝtonĵetilo ŝi ĉirkaŭ tempioj turnigis rimenojn;
- 580 Kaj ŝi mortigis ĉu gruon Strimonan, ĉu cignon blanketan.
 Multaj patrinoj, en urboj Etruskaj, ŝin, kiel edzinon,
 Petis por filoj : sed ŝi, dediĉita al sola Diano,

Funde de koro, konservas al sagoj kaj al virgineco,
 Amon eternan. Mi certe pli amus ke ŝin ne ekkaptu
 Tia fervoro milita, ke ŝi ne ataku Trojanojn : 585
 Ĉar ŝi fariĝis por mi plej karega el inoj kunulaj.
 Sed, ĉar kruela Fatalo minacas ŝin, malsupreniru,
 Nimfo, el alta poluso, kaj landon ektrafu Latinan,
 Kie fariĝas malĝoja batalo sub signo mortiga.
 Prenu sagujon, kaj el ĝi venĝeman eltiru sageton. 590
 Sanktan Kamilon se iu per vundo difektos, Trojana
 Aŭ eĉ Latina, mi same lin punos per sango verŝita :
 Poste, en nuboj, de mizerulino mi korpon forprenos
 Kaj nekaptitajn armilojn, kaj portos en tombon patrujan. »
 Tiel ŝi diris : el alta ĉielo flugante, tra ventoj 595
 Bruas Opio; kaj nigra turpiĝo ŝin tute ĉirkaŭas.
 Dume armeo Trojana kaj ĉefoj Etruskaj remparojn
 Alproksimiĝas, kaj ĉiuj rajdantaj soldatoj, farante
 Skadrojn virnombro egalajn. Saltegas tra tuta kamparo
 Aro ĉevala, kaj sur haltigantajn tiradas gvidilojn, 600
 Piedfrapante ĉi tien kaj tien. Rikolto da lancoj
 Kovras plugaĵojn; kaj kampoj heliĝas per brilo armila.
 Estas vidataj kontraŭe Mesapo, rapidaj Latinoj,
 Frato Koraso, Kamilo virgina kaj ŝia korpuso.
 Ili, ĉe flanko kontraŭa, per brako streĉita prezentas 605
 Pinton de lancoj minacaj, aŭ sagojn balancas ĵetotajn.
 Kiam ĉevaloj kaj viroj ekiras, grandiĝas bruego.
 Ambaŭ armeo aliras ĝis ĵetinterspaco por sago,
 Haltas kaj staras. Subite kriaro eksonas; ĉevalojn
 Ĉiu ekscitas freneze; de ĉie samtempe pluviĝas 610
 Densaj sagegoj, pli multaj ol neĝo kaŝanta ĉielon.
 Tiam Tireno kaj brava Akonto kontraŭen rapidas,
 Lancon antaŭen direktas kolere, kaj, sin renkontinte,
 Falas unuaj kun granda bruego; ĉar brustoj ĉevalaj
 Sin reciproke frapegis kaj rompis. Tuj elseligita 615
 Fulmrapidece, Akonto ruliĝas, kaj, kiel ŝtonego
 De ĵetilego ĵetita, li vivon elspiras tra ventoj.
 Vicoj subite rompiĝas; kaj forkurigitaj Latinoj,
 Ŝildojn ĵetinte sur ŝultrojn, ĉevalojn al urbo direktas,
 Persekutitaj de ĉefo Asilo kaj bandoj Trojanaj. 620

Ili jam alproksimiĝis pordegojn : denove Latinoj
 Puŝas kriegojn, kaj kapojn deturnas de lertaj ĉevaloj.
 Ree forkuras Trojanoj kaj bridojn ellasas sur kolojn.
 Tiel la maro eterne aliras kaj vice eliras :

625 Jen ĝi rapidas al tero, kaj super ŝtonegoj sublevas
 Akvon ŝaŭmantan, dum bordo pleniĝas je kurbaj ondegoj;
 Kaj jen ĝi posten rapide reiras, reprenas ŝtonetojn,
 Kiujn ĝi iam alportis, forkuras kaj bordon forlasas.
 Tuskoj dufoje venkitajn Rutulojn repuŝis al muroj;
 630 Vice Etruskoj dufoje forkuras kun ŝildoj sur dorso.
 Tamen tuj kiam por tria batalo kuniĝis armeoj,
 Ili sin miksas konfuze; kaj viro al viro rapidas.

Tiam nur mortaj aŭdiĝas ĝemadoj; en sango fluanta
 Banas armiloj kaj korpoj; kun estroj buĉitaj ruliĝas
 635 Duonmortantaj ĉevaloj : batalo ferura komencas.

Sed Orsiloko, — ĉar li ne kuraĝas ataki Remulon, —
 Celas ĉevalon; kaj apud orelon fiksiĝas la sago.
 Besto saltegas sub frapo; ĉar vundo ĝin furiozigas,
 Tiam ĝi bruston prezentas kaj frapas aeron piede.

640 Elseligita Remulo falegas. Katilo Jolanon
 Kaj Herminion, kuraĝe, armile koj korpe timindan,
 Teren renversas; sur kapo, sur ŝultroj sen vesto, li portis
 Blondan hararon; al batoj li tiom prezentis da lokoj,
 Ke lin ne vundoj timigis. Sagego tremante tra ŝultroj
 645 Larĝaj penetras; kaj viron klinigas kruela doloro.
 Ĉie fluadas sangfluo; per glavo multigas mortigojn
 La batalantoj, aŭ petas honoron de bela perejo.

Amazonino Kamilo, saltante tra sanga buĉado,
 Portas sagujon, kaj mamon malkovras por bone batali.
 650 Jen ŝi, per mano lertega, ŝetadas densege sagetojn;
 Jen ŝi, per brako senlaca, duoblan svingegas hakilon :
 Ora pafarko kaj sagoj Dianaj resonas sur ŝultroj.
 Kiam eĉ ŝi ekforkuras kaj dorson prezentas, rapide
 Ŝi sin deturnas, kaj sendas sageton al persekutantoj.
 655 Ĉirkaŭ ŝi, jen kunulinoj amataj, virgina Larino,
 Tulo, kaj, kupran hakilon svingante, Tarpejo; tri estas
 Italianoj : kaj ilin elektis diina Kamilo,
 Por sin konsili en paco kaj helpi en sanga milito.

Tiel do Amazoninoj Tracujaj, sur bordoj Termodaj
Kuras, kaj, por batalado pentritajn uzante armilojn, 660
Ĉaron ĉirkaŭas jen de Hipolito, jen de Marsidino

Pentesileo : kaj tie korpuso virina agitas

Ŝildojn lunformajn, kriante, saltante, tra granda tumulto.

Kiun do, ho virgulino kruela, unue kaj laste

Teren vi jetis? kaj kiom da korpoj vi sendis en morton? 665

Estis unua Eŭneo Klitido : ŝi bruston sen vesto

De kontraŭulo traboras per longa pikstango abia.

Sangon rivere vomante, li falas, sangruĝan manĝetas

Teron, kaj fine mortanta ruliĝas sur vundon profundan.

Poste ŝi buĉas Pagazon kaj Liron : dum unu el ili 670

Bridojn kolektas, premita de maso ĉevala; dum dua,

Tuj alkurinte, prezentas helpadon de mano senarma,

Ambaŭ pereas, samtempe frapitaj. Al ili aldonas

Ŝi Hipoditon, Amastron; dum lanco timinda minacas

Demofooton, Kromison, kaj Teron, kaj eĉ Harpalikon. 675

Kiom da sagoj eliras siblante el mano virgina,

Tiom da viroj Frigujaj pereas. Ĉasisto Ornito

Rajdis ĉevalon Japigan, vestita per strangaj armiloj :

Ŝultrojn li kovris per felo de juna bovviro sovaĝa;

Lupan buŝegon li metis sur kapon; de besto kruela 680

Pendis potencaj makzeloj, armitaj de blanka dentaro.

Stangon kamparan li svingis per mano, kaj inter korpusoj

Vagis fiere, kaj ĉiujn aliajn je kapo superis.

Ŝi, lin trafinte, — facila laboro en aro senorda, —

Lin tuj traboras, kaj plie lin diras per voĉo kolera : 685

« Ĉu, Tirenulo, vi pensis ke bestojn vi ĉasis arbarajn?

Tago alvenis en kiu armilo virina deĵetis

Malhumilecon. Vi tamen ĉe Manojn de patroj alportos

Grandan honoron : ĉar vin pereigis sagego Kamila. »

Ŝi Orsilokon kaj Buton, plej altakreskulojn el Trojoj, 690

Poste mortigas : sed Buton ŝi posten traboras en loko,

Kie kiraso kaj kasko disiĝas kaj ĵus malprotektas

Kolon senarman, dum ŝildo alpendas al brako maldekstra.

Ŝi Orsilokon unue forkuras kaj turnas for de li,

Poste en rondo pli eta lin trafas, kaj sekvas sekvanton. 695

Tiam ŝi tute sin levas, per batoj de peza hakilo

Frapas armilon kaj ostojn de viro preĝanta kaj vane
 Ŝin peteganta; dum sango el cerbo surkovras vizagon.

Antaŭ ŝi, terurigita pro ŝia vidiĝo subita,

700 Staras la filo de Aŭno, l'Apeninloĝanto, plej ruza
 El Liguranoj, dum al li Fataloj permesis mensogon.

Ĉar li, tuj kiam li vidas ke ia forkuro ne estas
 Ebla, ke li de reĝino ne povas deturni minacojn,
 Provas insidon, kaj helpon alvokas de ruza parolo.

705 Li do ekdiras : « Ĉu estas tre glore por ino kuraĝa
 Fidi ĉevalon rapidan? nu, malsupreniru; sur tero,
 Kontraŭ min venu batali, kaj penu min venki piede.
 Tiam vi konos de kiu plej vanta fariĝis espero. »

Diris li : sed furioza, premita de akra doloro,

710 Ŝi komisias ĉevalon, kaj venas egale armita
 Al li, piede, kun glavo seninga, kun glata ŝildeto.
 Tiam junulo, ĝojega pri ruza elpenso, forkuras,
 Ne prokrastinte; kaj, bridon turninte, li flugas rapide,
 Flankon ĉevalan senĉese pikante per kalkanumfero.

715 « Ha! Ligurano perfida, ŝvelinta de vana vanteco,
 Vane vi provis malsaĝan rimedon de ruzoj patrujaj :
 Ne vin insido redonos vivantan al Aŭno trompema. »

Tiel ŝi diras; kaj ŝi, pli ol fajro rapida, saltegas,
 Kure ĉevalon transiras, kaj beston per brido kaptitan

720 Tuj haltigante, per sango Aŭnida ŝi venĝas insulton.
 Nu, akcipitro ne malpli facile, el alta ŝtonego,
 Fulme rapidas sur blankan kolombon, flugantan en nubo :
 Birdon kaptitan rabisto disŝiras per akraj ungegoj,
 Dum el ĉielo elfalas sangpluvo kaj plumoj tranĉitaj.

725 Tamen la Patro de dioj kaj homoj ne tiun vidaĵon
 Indiferente rigardis, sidanta sur alta Olimpo.

Li mem al sanga batalo instigas la ĉefon Tirenan,
 Tarkon, kaj lian koleron incitas per akraj pikiloj.
 Inter buĉadoj kaj bandoj ardantaj ĉevalon direktas

730 Tiu ĉi : li batalantojn instigas, per nomo alvokas
 Ĉiun, kaj persekutitojn reigas al nova batalo.

« Kia timado, Tirenoj senhontaj? ho malkuraĝuloj!
 Kial en viajn animojn penetras nun mallaboremo?
 Vin forkurigas virino, kaj viajn forpelas korpusojn!

Ĉu senutilaj en manoj fariĝis sagegoj kaj glavoj? 735
 Pli kuraĝemaj vi estas por noktaj bataloj Venusaj,
 Kiam la fluto kurbeta de Bako anoncas ke tabloj
 Estas kovritaj de bonaj manĝaĵoj kaj plenaj pokaloj.
 Tion nur kore vi ŝatas, dum pastro konigas favorajn
 Signojn, dum ĝrasa ofero vin vokas al sanktaj arbaroj. » 740

Tuj li, dirinte, ĉevalon en mezon kondukas, mortonta.

Kontraŭstarantan Venulon li tiam aliras kolere,
 Forte tiregas el selo ĉevala, lin prenas en brakoj,
 Kaj lin, sur brusto premitan, per stranga forteco forportas.
 Tuj al ĉielo aliras kriadoj; kaj ĉiuj Latinoj 745

Al li direktas okulojn, dum fulme tra kampo traflugas
 Tarko, armilon kaj viron portante : de lanco Venula
 Pinton li rompas, kaj malprotektitan li lokon ekserĉas,
 Por lin mortige vundegi : sed kontraŭbatalas Venulo,
 Forte penante por manon de Tarko repuŝi el gorgo. 750

Tiel, flugante en nuboj, serpenton forportas kaptitan
 Aglo brunruĝa, ĝin tenas perforte, ĝin ŝiras per ungoj :
 Ringojn samtempe malvolvas kaj volvas serpento vundita,
 Skvamojn starigas, kaj fine, siblante per buŝo kolera,
 Kontraŭbatalas kuraĝe, sed vane : ĉar ĝin dispecigas 755
 Aglo per kurba bekego; dum batas flugiloj aeron.

Tiel forportas akiron kaptitan el vicoj Tiburaj
 Tarko fiera. Ekzemplon de ĉefo imitas Etruskoj,
 Ĝojaj pro tiu sukceso. Arunso, signita por morto,
 Ĉirkaŭ rapida Kamilo flugetas : armita de sago, 760
 Multe pli ruza, favoran por frapi li serĉas momenton.

Ĉu virgulino en mezan batalon sin ĵetas freneze,
 Tuj ŝin postiras Arunso, kaj sekvas silente kuradon :
 Ĉu ŝi venkinte revenas kaj sangan forlasas militon,
 Bridon de lerta ĉevalo subite junulo deturnas. 765

Alproksimiĝi li penas ĉu tien, ĉu tien; kaj post ŝi
 Li ĉiuflanke vagadas, kaj pretan mantenas sagegon.

Dume Kloreo, adepto kaj iam ĉefpastro Cibela,
 En malproksimo brilegis per belaj armiloj Friguĵaj.
 Li direktadis ŝaŭmantan ĉevalon kovritan de felo, 770
 Kie plataĵoj el oro kaj kupro desegnis plumfaskon.
 Sin ornamente per vesto pentrita de fremda purpuro,

- Li el pafarko Licuja Goritnajn ŝetadis sagetojn.
 Ora sagujo sonadis sur ŝultroj; kaj kasko orata
 775 Kapon divenan survestis; hoketo el oro alligis
 Faldojn bruete movantajn de lina kitelo brunruĝa.
 Estis kudrile broditaj mantelo kaj fremdaj gamaŝoj.
 Sed virgulino, volante ĉu pie pendigi en templon
 Trojajn armilojn, ĉu sin mem ornami en ĉasoj, per oro
 780 Tiel kaptita, en tuta batalo nur sekvis Kloreon,
 Blinde; kaj tro nesingarde ŝi kuris tra batalantaroj,
 Belan akiron je amo virina nur persekutante.
 Kiam alvenis momento favora, Arunso kaŝita
 Sagon ekprenas; kaj al Superuloj li tiel parolas :
 785 « Dio plej granda, gardanto de sankta Sorakto, Apolo,
 Kiun unue ni preĝas, por kiu amasoj da pinoj
 Vastajn nutradas ŝtiparojn, por kiu sur fajrajn karberojn,
 Plenaj je sankta fervoro, ni marŝas per nudaj piedoj,
 Patro, permesu ke honton Trojanan mi povu forigi,
 790 Ĉiopotenca. Neniun trofeon, neniun akiron,
 De virgulino venkita mi petas; aliaj agadoj
 Igos min fama : dum tiu ĉi pesto, mortige vundita,
 Falos, mi urbon patrujan volonte ŝenglore reiros. »
 Febo lin aŭdis, kaj parton de lia deziro akceptis :
 795 Parto alia samtempe forflugis en vastan aeron.
 Dio permesis ke morto subita faligu Kamilon ;
 Sed li ne volis ke murojn de alta patrujo revidu
 Viro preĝanta : do peto perdiĝis en Noton kaj venton.
 Kiam do sago ŝetita per mano bruegis tra blovoj,
 800 Ĉiuj animoj kortuŝe atendis : kaj turnis rigardojn
 Volskoj al juna reĝino. Ŝi aŭdas aeran bruadon,
 Vidas sagegon venantan tra vento etera, nur kiam
 Haltis ŝetito sub mammo sen vesto, kaj en ĝin penetris,
 Sangon virginan sorbante profunde per longa trinkado.
 805 Tuj kunulinoj alkuras; kaj ili falantan reĝinon
 Zorge subtenas. Pli terurigita ol ĉiuj, Arunso
 Tuje forkuras, timanta samtempe kaj ĝoja : al lanco
 Li ne plu fidas; kaj de virgulino li timas sagegon.
 Kiel do, antaŭ ol sagoj venĝontaj ĝin persekutados,
 810 Lupo mem, kiu mortligis paŝtiton aŭ belan bovviron,

Zorge sin kaŝas en montoj sovaĝaj, en krutaj ŝtonegoj :
 Ĉar ĝi konscias pri ago maltima, ĝi voston sub ventron
 Faldas tremantan; kaj terurigita ĝi celas arbaron.

Tiel Arunso timanta sin kasas el ĉiuj okuloj;

Poste li, ĝoja pri tio, sin miksas kun aro armita. 815

Dume per mano mortanta ŝi sagon tiregas : sed pinto
 Fera, en ripoj, tra ostoj, profunde eniĝas en vundo.

Fine ŝi falas sensanga, dum fermas okulojn malvarma
 Morto, dum, iam rozetan, koloro forlasas vizaĝon.

Tiam mortanta ŝi Akon venigas, plej karan el ĉiuj 820

Kunulinetoj : de ŝia estrino Kamilo ŝi zorgojn

Partoprenadis. Al ŝi do reĝino parolas, dirante :

« Ako, fratino, mi forta eksestis : nun vundo kruela
 Min malfortigas; kaj ĉirkaŭ mi ĉio mallume nigriĝas.

Iru, kaj tiun ĉi lastan al Turno alportu sendaĵon : 825

Li anstataŭu min, kaj el remparoj forpelu Trojanojn.

Nun do, adiaŭ. » Ŝi tiel parolas, kaj, bridon lasinte,

Glitas senvole ĝis tero. Ŝi, malvarmigita de morto,

Korpajn forlasas ligilojn : dum iom post iom sur kolon

Kapo kliniĝas, ŝi fine rigida faligas armilojn : 830

Kaj indignanta animo ĝemante forkuris al Ombroj.

Tiam grandega kriado aliras ĝis astroj orataj.

Ĉirkaŭ Kamilo malviva batalo perforta fariĝas :

Dense de ĉie alkuras samtempe korpuso Trojanaj,

Ĉefoj Tirenaj, kaj skadroj Arkidaj de reĝo Evandro. 835

Sed gardistino Trivia, Opio, de longe sur alta

Monto starante, de fore rigardis trankvile batalon.

Kiam ŝi vidis, en mezo de batalantaroj kriantaj,

Belan Kamilon malvivan, frapitan de morto kruela,

Ŝi tuj ekĝemis; kaj tiuj paroloj eliris el koro : 840

« Ha! virgulino mizera, vi punon suferas kruelan;

Ĉar vi malsaĝe Trojanojn instingis al sanga batalo.

Ĉu vin utilis, en sanktaj arbaroj dezertaj, Diana

Kulto, kaj niaj sagetoj sur ŝultro belmove portitaj?

Tamen reĝino, en lasta momento de vivo, ne volis 845

Ke vi fariĝu senfama : ne estos sen gloro por gentoj

Via mortigo; kaj via pereco ne restos sen venĝo.

Tiu ĉar, kiu per vundo sanktegan difektis Kamilon,

- Morton ricevos ŝuldotan. » Piede de alta monteto,
 850 Tombo troviĝis de reĝo Laŭrenta, antikva Derceno,
 Tera amaso grandega, kovrita de densa kverkaro.
 Tien unue belega diino flugante rapide
 Malsupreniras; kaj ŝi el monteto rigardas Arunson.
 Kiam ŝi vidis lin brile armitan kaj fanfaronantan :
- 855 « Kial, ŝi diris, vi do vin deturnas? ĉi tien aliru;
 Venu por morton ricevi, salajron ŝuldotan al tiu,
 Kiu mortigis Kamilon. Vin same mortigos Dianaj
 Sagoj. » Ŝi diris : el ora sagujo tirinte flugilan
 Sagon, la nimfo Tracuja kolere pafarkon ekstreĉas,
 860 Kaj ĝin longtempe kurbigas, ĝis kiam la pintoj ektuŝis
 Unu alian, ĝis kiam, per mano maldekstra fiksinte
 Pintojn sagetan, ŝi kordon ĝis mamoj per dekstra altiris.
 Kiam Arunso ekaŭdis sibladon de sago, vibranta
 Tra aerblovoj, jam estis en korpo fiksita mortilo.
- 865 Mortas junulo, kaj lastan sed vanan ekpuŝas ĝemadon :
 Kaj forgesitan lin lasas kunuloj en polvo kampara.
 Tiam Opio reflugas, kaj altan reiras Olimpon.
 Kiam pereis reĝino, forkuris korpuso Kamila.
 Tiam Rutuloj senorde forkuras, forkuras Atino.
- 870 Ĉefoj ne plu obeitaj, soldatoj ne plu komanditaj,
 Celas rifuĝojn, kaj bridojn ĉevalajn direktas al muroj,
 Persekutitaj de Trojoj venkantaj, de morto minaca.
 Ili ne kontraŭbatali kuraĝas, ne fidas sagegojn,
 Sed malstreĉitajn sur ŝultroj tremantaj reportas pafarkojn.
- 875 Ufoj eksonas, kaj tremas kamparo de takta frapado.
 Nigra turniĝo de polvo kun ili ruliĝas al urbo.
 Bruston frapadas kolere patrinoj sur muro starantaj,
 Kaj ĝis astraro ĉiela virinajn irigas kriegojn.
 Tiuj ĉi, kiuj unuaj tra larĝaj eniris pordegoj,
 880 Estas premitaj en dorso de aro senorde miksitaj :
 Ili ne morton evitas mizeran; ĉar ili, sur sojlo,
 Meze de muroj patrujaj, interne de domaj rifuĝoj
 Blovas animojn, boritaj. Pordegojn ekfermas aliaj,
 Kaj ne kuraĝas malfermi eniron por urben akcepti
 885 Ĉiujn kunulojn preĝantajn. Komencas plorinda buĉado
 Inter gardantoj de pordoj kaj aro volanta eniri.

Antaŭ okuloj de patroj plorantaj, eksteren puŝitaj
 Kaj malantaŭe premitaj, unuaj en krutajn fosajojn
 Rulas; aliaj, kolere frenezaj kaj galopegantaj,
 Kiel ŝafviroj, sin rompas sur baron malmolan de pordoj. 890
 Sed, instigitaj de vera amego patruja, — ĉar ili
 Vidis Kamilon, — patrinoj sin armas por lasta batalo.
 Ili el muroj ekĵetas sagegojn : anstataŭ feriloj,
 Kverkon malmolan uzante kaj stangojn en fajro trempitajn,
 Ili batalas antaŭe kaj ardas pereis sur muroj. 895

Dume ĉi tion konigas al Turno, en densaj arbaroj,
 Ako : kruela kurjero, ŝi grandan sciigas malvenkon :
 « Volska armeo forkuras venkita; pereis Kamilo;
 Kaj malamikoj kun Marso favora atakis Latinojn,
 Venkis, kaj ĉion detruis : ĝis muroj allugas teruro. » 900
 Li furioza, — ĉar tion ordonas Jupitra volado, —
 Monton forlasas de li okupitan kaj densan arbaron.
 Sed li apenaŭ eliris el monto kaj trafis kamparon,
 Ĵus, enirinte en intermonteton nun liberigitan,
 Patro Eneo transiras montaron kaj lasas arbaron. 905
 Ambaŭ al muroj rapide aliras kun tutaj armeoj :
 Kaj interspaco mallonga nur ilin disigas sur vojo.
 Kampojn per polvo fumantajn samtempe rekonas Eneo;
 Kaj malproksime li vidas korpusojn de anoj Laŭrentaj.
 Turno samtempe ĉefanton timindan rekonas Eneon; 910
 Ĉar li ĉevalajn spirbruojn jam aŭdis kaj piedirantojn.
 Ili tuj neeviteblan komencus kaj provus baĵalon :
 Sed subakvigis en maron Iberan jam Febo rozeta
 Lacajn ĉevalojn; kaj tagon falantan forpelis la nokto.
 Ili tendarojn ĉe muro starigas kaj palisarigas. 915

KANTO DEKDUA

- Turno, vidinte ke anoj Latinaj sub batoj de Marso
 Falas venkitaj, ke ĉiuj rigardoj al li direktiĝas,
 Por al li rememorigi promeson, eksentas koleron,
 Kiu grandigas kuraĝon. Ĉar kiam, en kampoj Penujaj,
 5 Vundis leonon ĉasistoj per frapo danĝera, en brusto,
 Tiam nur besto preparas armilojn, sur kolon potencan
 Skuas hararon fiere, sen timo rompegas sagegon
 De perfidulo, kaj brue blekegas per sanga buŝego :
 Tiel en koro de Turno pli kaj pli grandiĝas kolero.
- 10 Tiam li reĝon aliras, kaj frenezigaŭte parolas :
 « Turno ne volas prokraston ; ĉar eble ĉi tiuj Eneaj
 Malkuraĝuloj reprenus parolon kaj ĝin malkonfesus.
 Mi ekbatalos. Ordonu piaĵojn kaj ĵuron preparu,
 Patro. Aŭ mi Dardanidon, Azian migranton, per mano
 15 Sendos Tartaren ; — kaj sidos Latinoj por tion rigardi :
 Tiam mi sola kulpigon de ĉiuj per fero detruos. —
 Aŭ li min venkos ; kaj lia edzino fariĝos Lavinjo. »
- Al li respondis trankvile Latino :
 « Juna heroo grandkora, ĵu pli vi kuraĝe kaj virte
 20 Virojn superas aliajn, des pli mi de saĝo konsilojn
 Devas aŭskulti kaj ŝancojn batalajn pli zorge pesadi.
 Regnon de Daŭno naskinto vi havas, kaj urbojn kaptitajn
 Iam de vi mem, kaj oron kaj koron de reĝo Latino :
 Kaj fianĉinojn enhavas Latujo kaj kampoj Laŭrentaj
 25 Tute ŝatindajn pri raso. Permesu ke al vi mi faros
 Malfacilegan konfeson ; kaj tion en koron enigu.
 Mian filinon kun iu ajn inter unuaj fianĉoj
 Min edzinigi permesis nek diaj nek homaj avertoj.
 Sed ve ! venkita de amo al vi mem, de ligoj parencaj,
 30 Fine de larmoj de kara edzino, mi rompis promesojn,

Kaj, rifuzinte edzigon, malpian mi provis militon.
 Vi nun ekvidas de kiaj bataloj, de kiaj suferoj,
 Turno, mi kaj vi mem estis, de tiu momento, premitaj.
 Grave venkitaj dufoje, ni pene en urbo konservas
 Lastan esperon Italian; fumiĝas ankoraŭ de sango 35
 Tibra rivero, kaj ostoj vastegan blankigas kamparon.
 Kial obstini; kaj kia frenezo min trompus pli longe?
 Se, post mortigo de Turno, mi devas akcepti Eneon,
 Kial mi, kvankam vi vivus, ne tiun ĉesigus militon?
 Kion do dirus Rutulaj parencoj kaj tuta Itala 40
 Lando, semi vin al morto dediĉus, — esperu ke mi nun
 Tute eraras, — ĉar vi por edziĝo ekpetis filinon?
 Ĉu vi militajn forgesis hazardojn? Kompatu grandaĝan
 Patron, ve! kiun de longe vi lasis malĝojan en urbo
 Patra Ardeo. » Sed tia parolo koleron de Turno 45
 Ne kvietigas; anstataŭ kuraci ĝi lin malsanigas.
 Tiam, tuj kiam li povas paroli, li tiel respondas :
 « Tiun zorgadon pro vivo, plej bona, forlasu; mi petas.
 Ĉar vi min amas, do lasu min famon per morto aĉeti,
 Patro : ni scias ĵetegi sagegojn kaj feron per mano 50
 Ne tro malforta; kaj ŝprucas sangfluo el niaj vundegoj.
 Kaj li ne havos patrinon diinan por lin forkurantan
 Kaŝi per nubo, dum ŝi malaperas en vanan vaporon. »
 Dume reĝino, tre terurigita per nova batalo,
 Ploris, kaj ŝian bofilon ardantan mortonta kisadis : 55
 « Turno, per tiuj larmegoj, per granda respekto per kiu
 Ĉiam vi ŝatis Amaton, de maljunulino mizera
 Sola espero, de gloro kaj regno Latina subteno
 Lasta, sur kiun ripozas la savo de domo falanta,
 Mi vin petegas, vi kontraŭ Trojanoj forlasu militon. 60
 Kia ajn estos la fino de tiu batalo, ĝi por mi
 Estos la sama ol por vi; mi vivon forlasos plorindan :
 Ĉar mi neniam vidados Eneon fariĝi bofilo. »
 Kiam Lavinjo ekaŭdis ĝemadon patrinan, tuj larmoj
 Fluis sur vangoj varmegaj; ardanta ruĝeco okupis 65
 Frunton fraŭlinan, kaj fajre trakuris tra bela vizaĝo.
 Kiel blankelefantoston sangigas Induja purpuro,
 Kiel flankigo de rozoj ruĝigas la blankan lilion,

Tiel do ruĝkoloriĝis vizaĝo de virga knabino.

- 70 Turnon tuj amo ardigas : li frunton admiras amatan,
Kaj, al batalo pli instingegita, mallonge respondas :
« Ne min malhelpu, mi petas, per signo malbona de larmoj,
Kara patrino, tuj kiam de Marso mi provas danĝerojn ;
Ĉar mi, eĉ kiam mi devus pereji, prokrasti ne povas.
- 75 Iru, Idmono ; al reĝo Friguja vi portos sendaĵon,
Kiu kredeble ne al li tre plaĉos. Do, morgaŭ matene,
Kiam Aŭroro ĉiela veturos sur rodoj purpuraj,
Li al Rutuloj ne sendu Trojanojn ; de ambaŭ nacio
Glavoj ripozu ; per nia sangverŝo ni finos militon ;
- 80 Estos gajnita per tiu batalo edziĝo Lavinja. »
Tiel li diris : kaj tuje li hejmen rapide reiras,
Poste venigas ĉevalojn, kaj ĝojas pri ardo ilia :
Oritio mem ilin donacis al avo Pilumno :
Neĝon ĉi tiuj blankece superis kaj venton kurece.
- 85 Ilin ĉirkaŭas zorgistoj, per mano karesa batetas
Brustojn fierajn, kaj kolajn hararojn kombadas atente.
Tiam sur ŝultrojn li metas kirason, brilantan per oro
Kaj per blanketaj kupraĵoj ; samtempe li glavon alligas,
Ŝildon kaj kaskon, sur kiu vidiĝas du ruĝaj plumfaskoj.
- 90 Fajra diaĵo potenca forĝadis por Daŭno la patro
Tiun ĉi glavon, kaj trempis ĝin ruĝan en Stiksan riveron.
Fine per mano fortika li pezan ekprenas sagegon,
Apogiĝantan sur granda kolono, en mezo de ĉambro,
Iam kaptitan el forta Aktoro Aŭrunca : ĝin svingas
- 95 Turno, kriante : « Ho lanco, vi kiu neniam min trompis,
Mi vin petegas ; alvenis momento : de forta Aktoro
Iam, de Turno nun, mano vin svingis : permesu do ke mi
Korpon renversu kaj boru kirason, per brako fortika,
De duonviro Friguja ; ke mi malpurigu en polvon
- 100 Harojn kombitajn fervarme, sorbitajn de mirha parfumo. »
Tiel li vomas koleron : sur tuta vizaĝo ardanta
Flamoj eklumas ; kaj ĵetas okuloj minacajn fajrerojn.
Tiel boviro, komence de sanga batalo, blekegojn
Puŝas terurajn : por provi fortecon de kornoj koleraj,
- 105 Trunkon de arbo ĝi frapas, per battoj senĉesaj traboras
Venton, kaj sablan per ufaj piedoj flugigas amason.

Sed siaflanke Eneo, armilon vestinte patrinan,
 Glave ne malpli timinda, de koro incitas koleron :
 Tamen li ĝojas; ĉar Turna propono ĉesigos militon.
 Li, por konsoli kunulojn kaj filon malĝojan Iulon, 110
 Rememorigas fatalojn, kaj sendas al reĝo Latino
 Virojn, por porti respondon, kaj leĝojn de paco konigi.

Tago sekvanta apenaŭ ekverŝis sur supron de montoj
 Helon; kaj sunaj ĉevaloj el mara profundo ĉielon
 Eksupreniris, por lumon el nazoj rivere blovadi, 115
 Kiam Trojanoj kaj viroj Rutulaj, ĉe urbaj remparoj,
 Kampon mezure preparas, por la dubatalo estonta.
 Staras fajrujoj kaj herbaj altaroj por dioj komunaj,
 Meze de loko : jen akvon jen fajron aliaj alportas :
 Ilin togetoj survestas, kaj kronas branĉetoj verbenaj. 120

Tiam aliras legio Aŭzona : dum ĝiaj korpusoj
 Sagoarmitaj transpaŝas pordegojn, de ĉie rapidas
 Skadrój Tirenaj kaj Trojaj, diversajn portante armilojn.
 Ĉiu, kovrita de fero, kredigas ke Marso lin vokis
 Por batalado kruela. En mezo de tiuj armeoj. 125

Ĉefoj flugetas, vestitaj purpure kaj ore brilantaj :
 Asaracido Mnesteo, kaj flanke Asilo kuraĝa,
 Poste la ĉevaldresanto Mesapo, Neptuna naskito.
 Estas donita signalo : tuj ĉiu, interne de limoj,
 Lancon enpuŝas en teron, kaj ŝildon malligas el brako. 130
 Tiam scivolaj patrinoj kaj tuta popolo senarma, [tojn,
 Kaj maljunuloj malfortaj, sur turojn, sur domajn tegmen-
 Are surrampas, dum staras aliaj ĉe altaj pordegoj.

Tamen Junono sur monton, hodiaŭ nomatan « Albano »
 (Tiam ĝi havis nek nomon nek gloron nek faman honoron,) 135
 Haltis : unue ŝi kampon rigardis militan, kaj poste
 Ambaŭ Laŭrentan kaj Trojan armeon, kaj urbon Latinan.
 Tiam diino subite parolas al Turna fratino,
 Kiu diine prizorgis pri marĉoj kaj bruaj riveroj :
 Pro virgineco rabita ĉi tiun honoron donacis 140
 Al ŝi potenca Jupitero, la reĝo de lokoj eteraj.

« Nimfo, glorego de fluoj riveraj, kaj al mi karega,
 Inter virinoj Latinaj, ve! kiujn Jupitero grandkora
 En malfidelan kuŝejon kondukis, vi scias ke ĉiam

- 145 Mi vin tre ŝatis, kaj vole loĝigis en domon ĉielan.
 Nun malfeliĉon ekkonu, Juturno, kaj ne min kulpigu.
 Ĉiam, dum ŝajnis toleri Fataloj, dum Parkoj permesis
 Ke prosperadu Latujo, mi Turnon kaj muron protektis.
 Sed nun mi vidas junulon kurantan al malaj Fataloj :
- 150 Malamikema potenco alvenis kaj tago de Parkoj.
 Tian duelon kaj ligan hontindan mi vidi ne povas.
 Se vi kuraĝas al frato kunhelpon alporti pli certan,
 Iru, klopodu : kaj eble pli bonaj alvenos aferoj. »
 Tion aŭdinte, Juturno ploregas ĉagrene, kaj poste
- 155 Bruston belegan trifoje kvarfoje ŝi frapas per pugno.
 « Tempo ne estas por ploroj, respondas Junono; rapidu;
 Fraton per kio ajn rimedo rapide eligu el morto;
 Ree militon naskigu prefere, kaj juron disrompu :
 Ĉion mi al vi permesas. » Ŝi, tiel dirinte, ŝin lasis
- 160 Tute necertan, en koro boritan de vundo malĝoja.
 Dume aliras la reĝoj : Latino, kun brila kortego,
 Sur kvarĉevala kaleŝo veturas; kaj zonas tempiojn
 Dekdu radioj orataj, sur krono lumantaj; de suno,
 Lia prapatro, emblemo. Sur dublankĉevala kaleŝo
- 165 Turno postiras, streĉante du sagojn de fero armitajn.
 Poste Eneo la patro, radiko de raso Romana,
 Lume brilanta sub ŝildo ĉiela kaj diaj armiloj;
 Flanke Askano, alia espero de Roma grandeco,
 Kune forlasas tendaron. Vestita de togo purega,
- 170 Pastro alportas porkidon kaj idon lanhavan de ŝafo;
 Kaj li kondukas brutaron al sanktaj altaroj brulantaj.
 Reĝoj direktas okulojn al loko leveja de suno,
 Salan tritikon disŝutas sur fruntojn de bestoj, malgrandan
 Tranĉas harfaskon, kaj verŝas trinkaĵojn sur sanktajn alta-
- 175 Tiam la pia Eneo eltiras ferglavon, kaj preĝas : [rojn.
 « Suno, mi vin atestigas; mi same vin kore alvokas,
 Tero, pro kiu mi tiom toleris da gravaj suferoj;
 Kaj vin, Jupitro potenca; vin same, idino Saturna,
 Nun pli favora, mi tion esperas; vin, Marso famega,
- 180 Kiu laŭ via volado direktas militojn : kaj same
 Mi vin alvokas, Riveroj kaj Fontoj, diaĵoj loĝantaj,
 Unuj en alta ĉielo, aliaj en maro lazura.

Tion ni ĵuras : se Turnon venkantan favoras Fataloj,
 Urbon Evandran ektrafos venkitoj por tien sin fiksi;
 Landon Aŭzonan lulo forlasos; neniam Trojanoj 185
 Glavon reprenos, nek tiun kamparon per fero rabados.
 Sed aliparte se Marso per venko favoras Trojanojn,
 — Tian esperon mi havas; ĝin dioj bonvolu certigi, —
 Mi ne intencas ke lando Itala obeu Trojanojn;
 Ne por mi sceptron mi petas : sed gentoj neniel venkitaj 190
 Ambaŭ, sub leĝoj egalaj, sin ligos per ĵuro eterna.
 Ritojn mi donos kaj diojn; armilojn kaj povon kutiman
 Mia bopatro Latino konservas; Trojanoj konstruos
 Miajn remparojn, sed nomon al urbo donados Lavinjo. »
 Tiel komencas Eneo kaj poste Latino daŭrigas; 195
 Li ekrigardas ĉielon kaj manojn prezentas al astroj :
 « Samajn diaĵojn mi prenas ateste, Eneo, vin, Tero,
 Marso kaj Astroj, Latonaj naskitoj, kaj Ĵano dufrunta,
 Kaj vin, diaĵoj Inferaj, sanktejo de Dito timinda :
 Patro, min aŭdu, vi, kiu per fulmo sankcias ĵuradojn; 200
 Mi atestigas ĉi tiujn altarojn, kaj ilin mantuŝas :
 Tiun ĉi pacon kaj ligon neniam ekrompos Italoj,
 Kio ajn povos alveni; nenia potenco fleksigos
 Mian voladon; ne! kiam eĉ teron faligus en maron
 Superakvego, eĉ kiam Tartaren ekfalus ĉielo; 205
 Tiel ja vere ke tiu ĉi scepro, (okaze li mane
 Portis ĝin,) donos neniam brancetojn, foliojn kaj ombron.
 Iam ĝi estis arbeto : sed kiam el trunko patrina
 Fero ĝin tranĉis, de tiu momento hararon kaj brakojn
 Tuŝtajn ĝi perdis : per kupro brilanta ĝin bele ornamis 210
 Mano artista, por ke ĝin portadu la reĝoj Latinaj. »
 Inter si ili per tiuj paroloj certigis ĵuradon,
 Antaŭ kaj meze de ĉefoj precipaj : kaj poste en flamojn
 Oni, laŭ rito, ekbuĉas brutaron, kaj aĵojn intestajn
 Vivajn elŝiras; dum karnoj en vazoj plenigas altarojn. 215
 Tamen ĉi tiu batalo de longe al anoj Rutulaj
 Ŝajnas malĵusta; kaj korojn agitas diversaj movadoj.
 Ili certigas ke fortoj de ambaŭ ne estas egalaj.
 Timo grandiĝas, tuj kiam aperas, marŝante silente,
 Turno : li, antaŭ altaroj preĝante, mallevas okulojn, 220

Montras palecon de vangoj kaj tremon de korpo junula.
Kiam Juturno fratino ekvidas ke anoj pli kaj pli
Laŭte murmuris, ke sentoj iliaj senĉese sanĝiĝas,
Mezen de aro ŝi iras, kaj ŝajnon ekvestas Kamertan.

- 225 Estis ĉi tiu tre glora per avoj, naskita de patro
Fame kuraĝa kaj virta, kaj li mem tre lerta batale.
Ŝi, artifika kaj ruza, sin ŝovas internen de vicoj,
Semas inside diversajn pripensojn, kaj tiel parolas :
« Ĉu vi ne hontas, Rutuloj, vidante ke unu nur riskas
230 Vivon por ĉiuj aliaj? Ĉu nombre kaj forte ni ĵus ne
Estas egalaj? Jen estas Trojanoj kaj viroj Arkidaj,
Kaj, insultitaj de Turno, Etruskoj, Fatalaj armeoj :
Kontraŭ du viroj Latinaj ĉi tiuj ja estas nur unu.
Gloro ĝis dioj aliros de tiu ĉi kiu por niaj
235 Sanktaj altaroj sin donos; kaj famo tra buŝoj flugados.
Ni, senigitaj je lando patruja, obeos humile
Estrojn potencajn; ĉar senenergiaj ĉi tie ni sidas. »
Koron de bravaj junuloj flamigas ĉi tiuj paroloj :
Pli kaj pli inter longvicoj glitiĝas murmuro konfuza :
240 Estas ŝanĝitaj Latinoj kaj same urbanoj Laŭrentaj :
Antaŭ nelonge ĉi tiuj deziris ripozon kaj finon
De bataladoj, nun ili ekpetas armilojn, postulas
Rompon de ĵuro, kaj sorton maljustan de Turno kompatas.
Sed al ĉi tiu trompaĵo aldonas alian Juturno.
245 Ŝi en ĉielo vidigas miraklon : devige ĝi devis
Korojn Italajn konfuzi, kaj trompi per signo mensoga.
Bruna birdego Jupitra flugadis tra ruĝa aero,
Persekutante birdetojn de bordo; plenfluge forflugis
Aro bruanta : subite, falinte sur ondon, rabisto
250 Cignon ekkaptas belegan per akraj piedoj ungegaj.
Tiun vidaĵon atentis Italoj : tuj tuta birdaro
Ne plu forkuras, sed haltas, kriadas, — mirinda vidaĵo! —
Kaj mallumigas per plumoj eteron, kaj, nubon farinte,
Al malamiko rapidas : sed aglo, venkita de multo,
255 Kaj lacigita de ŝarĝo, akiron el ungoj ellasas :
Ĝi en riveron refalas; dum aglo rapidas al nuboj.
Tiam Rutuloj miraklon salutas per krioj sennombraj :
Ili ekprenas armilojn; dum diris Tolumno diveno :

« Estas jen tiu ĉi signo, tre ofte de mi dezirita :
 Dion konitan mi kore akceptas; mi, mi vin kondamnos. 260
 Glavon ekprenu, venkitoj : similajn al birdoj malfortaj,
 Vin de milito minacas perfida fremdulo, kaj bordojn
 Niajn rabegas : li baldaŭ forkuros; lin veloj forportos
 Tre malproksimen sur maron. Vi unuanime densigu
 Viajn korpusojn, kaj reĝon kaptotan defendu batale. » 265

Tiel dirinte, li vicojn forlasas, kaj al malamikoj
 Kontraŭstarantaj li sagon ekĵetas : armilo bruanta
 Rekte traboras aeron. Samtempe altiĝas kriaro :
 Ĉiuj leviĝas armitoj, ĉar korojn flamigas tumulto.
 Staris kontraŭe naŭ korpoj de fratoj belegaj, kaj ilin 270
 Naskis fidela edzino Tirena de ano Arkida,
 Nome Gilipo. La sago fluganta aliras kaj frapas
 Unu el ili, en lokon ĉi kie glavzono kudrita
 Tuŝas la flankon, kaj kie zornandojn kunigas hoketo.
 Falas belforma junulo, vestita de brilaj armiloj, 275
 (Ripojn ĉar sago traboris,) kaj mortas sur sablo brunflava.
 Parto de fratoj kuraĝaj, premitaj de granda doloro,
 Glavon per mano svinginte, kaj parto, preninte sagegojn,
 Blinde rapidas. Kontraŭe alkuras korpusoj Laŭrentaj :
 Ilin per movo kontraŭa atakas denove Trojanoj, 280
 Anoj Agilaj, kaj viroj Arkidaj kun ŝildoj pentritaj.
 Sama deziro tuj ilin instigas : batali per fero.

Oni rabegas altarojn; tra tuta ĉielo sagegoj
 Flugas ventege; kaj fera pluvego sur teron ekfalas.
 Pastroj forportas kalikojn kaj fajrojn. Forkuras Latino, 285
 Kaj, insultitajn pro rompo de ĵuro, kunportas diaĵojn.
 Jungas ĉi tiuj kaleŝojn; per salto de korpo aliaj
 Rajdas ĉevalojn; kaj ĉiuj rapidas kun glavoj seningaj.

Ĉefon Tirenan Aŭleston, portantan insignojn de reĝoj,
 Trafas unue Mesapo, ardanta por ĵuron detruj, 290
 Per galopanta ĉevalo. Li reenirante elfalas,
 Malfeliĉulo, kaj inter altaroj kontraŭe starantaj
 Kapon kaj ŝultrojn enigas. Mesapo kolera kun lanco
 Sur lin alkuras, kaj tiam, de alte de sia ĉevalo,
 Malgraŭ preĝadoj, lin frapas kruele per sago, kaj diras : 295
 « Prenu : vi estas por dioj ofero pli multe agrabla. »

- Varman kadavron ĉirkaŭas Italoj kaj ĝin senvestigas.
 Nun sur altaro karbajon preninte brulantan, Koriso
 Flamon submetas sub buŝon krintan de forta Ebuso,
 300 Kiu por frapi alkuris : dum barbo tre longa flamiĝas,
 Malbonodore fumante, Koriso, per mano maldekstra,
 De surprizita Ebuso ekprenas hararon, kaj, bruston
 Lian genue premante, lin tenas senmova sur tero ;
 Poste li flankon per glavo traboras. Sed Podalirio
 305 Vidas ke Also paŝtisto klopodas en vico unua ;
 Li do lin sekvas kun glavo minaca kaj nuda : sed tiu
 Tuj sin returnas, hakilon sublevas, kaj frunton disrompas
 Ĝis la mentono, dum sanga rivero ruĝigas armilojn.
 Pezas sur tiaj palpebroj kruela ripozo kaj dormo
 310 Fera ; kaj fine fermiĝas okuloj por nokto eterna.
 Tamen la pia Eneo du manojn prezentis senarmajn,
 Kapon sen vesto, kaj siajn kunulojn alvokis per krioj :
 « Kien vi kuras? De kie devenas subita malamo?
 Ho! kvietigu kolerojn. Jam oni akceptis ĵuradon ;
 315 Oni redaktis kondiĉojn ; laŭ ĝi mi nur devas batali.
 Lasu min sola, kaj timon forpelu : mi forte per glavo
 Ĵuron sigelos ; ĉar Turnon nur al mi promesis divenoj. »
 Tiel li kriis : sed kiam li tiel parolis, ĵus sur lin
 Sago, fluganta per plumoj, siblante, sin rekte direktas.
 320 Kiu fortaĵo kaj mano ĝin jetis? Nu! oni ne scias.
 Kiu favoris Rutulojn per tia glorego? Ĉu dio?
 Eble hazardo? Sed famo silentis pri tia fariĝo :
 Kaj fanfaronis neniu pri vundo al granda Eneo.
 Turnon, tuj kiam li vidas ke kampon Eneo forlasis,
 325 Ke ŝanceliĝas la ĉefoj, ardigas espero subita.
 Tiam li petas armilojn kaj same ĉevalojn, per salto
 Ĉaron fiere eniras, kaj bridojn ekprenas en manoj.
 Multajn kaj fortajn armitojn flugante li sendas al morto,
 Virojn renversas sennombrajn, traboras per ĉaro korpusojn
 330 Tutajn, kaj al forkurantoj sagegojn resendas kaptitajn.
 Kiel sur bordoj glaciaj de Hebra rivero, Mavorso
 La sangavida rapidas ; sur ŝildo frapante, ardantajn
 Dio milita kondukas ĉevalojn tra kampo senfina :
 Pli ol Zetiro, ol Noto, ĉi tiuj forflugas : ĝemadas

Tracaj landlimoj sub ufoj frapantaj; dum Ruzoj, Koleraj, 335
 Timo je frunto palega, kunuloj de dio, kuniras.
 Tiel, en mezon batalan, ĉevalojn pro ŝvito fumantajn
 Turno timinda ekscitas : dum li malamikojn insultas
 Tere buĉitajn, sur ufojn rapidajn ŝprucadas fluado
 Ruĝa, kaj sablo piede premita de sango sorbiĝas. 340
 Jam li proksime Stenelon, Tamiron mortigis, kaj Falon
 De malproksime, kaj de malproksime du idojn Imbrasajn,
 Glaŭkon kaj Ladon. Ja ili, de patro Imbraso nutritaj
 Iam en lando Licuja, similajn survestis armilojn,
 Ĉu por batali, ĉu por preteriri per rajdo ventblovojn. 345
 Sed aliloke tra mezo batala trakuris Eŭmelo,
 Filo kuraĝa kaj fama batale de Dolo antikva.
 Havas li nomon de avo, sed koron kaj brakon de patro,
 Kiu, ĉar iam li volis Danaan spioni tendaron,
 Kiel premion, kaleŝon Aĥilan ekpeti kuraĝis. 350
 Tian por pagi pretendon, alian salajron Tidido
 Donis, kaj tiam ĉevalojn Aĥilajn li ne plu deziris.
 Turno, tuj kiam li de malproksime lin vidas en kampo,
 Sagon ekĵetas malpezan kaj viron negrave vundetis,
 Ĉarajn ĉevalojn haltigas, en ĉaron saltegas, kaj poste, 355
 Duonmortanton preminte kuŝantan, piedon sur kolon
 Forte apogas, el mano tiregas ferglavon, armilon
 Funden de gorĝo enpuŝas brilantan, kaj fine ekkrias :
 « Kiun batale vi rabis, Trojano, jen estas kamparo :
 Landon Hesperan nun korpo mezuru : jen kiel mi pagas 360
 Iun ajn kiu atakos min : tiel li muron konstruos. »
 Poste, per frapo de glavo, kunulon li buĉas Asbuton,
 Kaj Tersilokon, Klореon, Sibaron, Dareton, Timeton
 Rensversigintan sur kolon de lia ĉevalo falinta.
 Tiel do, kiam ventego Borea el alta Edono 365
 Blovas sur maron Egean, ondegoj rapidas al bordoj :
 Ilin puŝegas blovadoj; kaj nuboj ĉiele forkuras :
 Tiel por Turno : ĉar, kien ajn vojon li tranĉas, korpusoj
 Cedas, kaj skadroj rapidas returnen : dum movo forportas
 Ĉaron, venteto kontraŭa plumbaskon agitas flugantan. 370
 Sed, indignanta pri tia kuraĝo, Fegeo kolere
 Antaŭ kaleŝon sin ĵetas; kaj, bridon kaptinte, fortege

- Mano ĉevalojn rapidajn per buŝo ŝaŭmanta deturnas.
 Dum li trenita pendiĝas sur ledaj jungaĵoj, atingas
 375 Lanco lin malprotektitan, duoblan maŝaĵon kirasan
 Forte disŝiras, kaj supron de korpo malgrave tuŝetas.
 Tiam, de ŝildo kovrita, al Turno li sin ekreturnas,
 Pinton de glavo prezentas, kaj krie petegas helpadon.
 Sed li per rodoj kaj aksoj rapide turnantaj sur teron
 380 Estas ĵetita : li falas. Tuj Turno rapidas, lin frapas
 Inter malsupro de kasko kaj supro de fera kiraso,
 Kapon el ŝultroj ektranĉas, kaj trunkon forlasas sur sablo.
 Dume, dum Turno venkanta mortigojn disverŝas tra kam-
 Pian Eneon kuniras Mnesteo, fidela Akato, [poj,
 385 Juna Askano, kaj lin sangkovritan kondukas al tendoj,
 Dum li sur longan sagegon marŝadon apogas necertan.
 Malpacience li lignon de sago en vundo rompitan
 Penas tiregi, kaj helpon ekpetas rapidan, eĉ tujan :
 « Nu, plilarĝigu per glavo vundtruon ; kaŝejon de sago
 390 Zorge esploru profundan ; kaj min al batalo redonu. »
 Jam sin prezentis Japiso, pli kara al Febo ol ĉiuj,
 Filo de Jaso : ĉar tiun ĉi viron Apolo tre amis,
 Iam li al li plezure proponis donacon de artoj
 Siaj, ĉu divensciencan, ĉu citron, ĉu sagojn rapidajn.
 395 Sed li, volante de patro malsana daŭrigi vivadon,
 Koni pli amis potencon de herboj kaj arton kuracan,
 Kaj profesion sengloran senfame praktiki preferis.
 Sin apogante sur lancon staradis Eneo kolera,
 Ne kortuŝita de larmoj ; dum lin ĉirkaŭadis junula
 400 Aro kaj filo malĝoja lulo. Sed la maljunulo,
 Kiu, laŭ modo Peona, ĝis zono refaldis vestaĵon,
 Vane per mano, per povo kuraca de herboj Apolaj,
 Penas ekmovi sageton ; li vane per fingroj ŝancelas
 Feron, kaj provas ĝin tiri el vundo per forta prenilo.
 405 Estas trovata neniu rimedo ; ne donas Apolo
 Ian konsilon ; kaj tamen pli kaj pli grandiĝas en kampoj
 Granda teruro, kaj alproksimiĝas danĝero. Jam polvon
 Vidas Trojanoj ; rajdistoj alkuras en mezon de tendoj,
 Densan pluvigas sagaron ; ĝis nuboj aliras plendadoj
 410 De batalantaj junuloj, subfrapoj de Marso falantaj.

Tiam Venuso, tuŝita de filaj suferoj maljustaj,
 Tuj ekkolektas, sur Ida montaro de Kreto, diktamnon,
 Kiu prezentas kotunajn foliojn kaj floron purpuran.
 Tiun kreskaĵon tre konas sovaĝaj kaprinoj, tuj kiam
 Ilin vundegis en dorso pikiloj de sagoj flugilaj. 415
 Do, ĉirkaŭinte vizaĝon de nubo malluma, Venuso
 Ĝin tuj alportas, en akvon de vazo brilanta ĝin ŝutas,
 Poste, por en ĝin potencon sorbigi sekretan, ĝin miksas
 Kun Ambrozio saniga kaj kun panaceo odora.
 Vundon per tiu akvaĵo kuracas maljuna Japiso, 420
 Me ĝin konante : tuj akra doloro subite el korpo
 Tute forkuras; kaj haltas sangfluo el vundo profunda.
 Sago, per mano tirita eliras sen ia penado;
 Fine eksentas Eneo ke fortoj malnovaj revenis.
 « Donu armilojn al viro rapide; vi kion atendas? 425
 Krias Japiso, lin al malamiko unua puŝante :
 Tian sanigon nek homaj rimedoj nek arto kuraca
 Faris, Eneo; vin mia scienco neniel utilis :
 Dio nur povis; kaj li vin alsendas al grandaj agadoj. »
 De batalado avida, li krurojn enfermas en oron, 430
 Arde klopodas, malbenas prokrastojn kaj lancon ekprenas.
 Kiam al flanko li ŝildon alligis kaj vestis kirason,
 Tiam sur bruston per brakoj armitaj li premas Askanon,
 Kaj, lin kisinte per rando de lipo, pro kasko ĝenanta,
 Diras : « Nur virton kaj veran kuraĝon mi al vi konigos, 435
 Filo, aliaj sukceson. Hodiaŭ vin en bataladoj
 Tiu ĉi mano protektos, kaj donos premion de venko.
 Kaj, post nelonge, tuj kiam virigos vin aĝo matura,
 Tiujn memoru parolojn : kaj koron altigu ekzemple
 Patro Eneo kaj eble memoro de onklo Hektoro. » 440
 Tiel li diris : kaj poste li pordon fiere transpaŝas,
 Grandan sagegon en mano svingante : rapidas samtempe,
 Densajn korpusojn ĉefante, Anteo kaj brava Mnesteo.
 Tuta armeo eliras el tendoj : kaj polvo blindiga
 Kampon plenigas, dum tero frapita tremadas sub paŝoj. 445
 Turno, sur alta monteto, lin vidis kontraŭe venantan,
 Same lin anoj Aŭzonaj : glacia teruro profunde
 Ostojn trakuris. Sed, antaŭ aliaj Juturno Latinojn

- Aŭdis, rekonis bruegon, kaj terurigita forkuris.
- 450 Flugas Eneo, kaj skadrojn tra kampo rapide kondukas.
Kiel nubaro, vomanta ventegon, tra maroj rapidas,
Por sin ŝetegi sur teron; ĝin de malproksime vidinte,
Tremas plugistoj en koroj; ĉar ĝi ruinigos arbarojn,
Riĉajn detruos rikoltojn, kaj ĉion per frapo disŝetos :
- 455 Antaŭ ĝi ventoj flugegas kaj batas bruege marbordon.
Tiel la ĉefo Retea kondukas soldatojn al viroj
Kontraŭstarantaj : kaj ĉiuj armitoj sin dense kolektas.
Pezan Oziron Timbreo traboras per glavo kruela ;
Buĉas Arketon Mnesteo, Epulon kuraĝan Akato,
- 460 Poste Ufenson Giaso : pereas Tolumno mem pastro,
Kiu unua al kontraŭstarantoj ekŝetis sagegon.
Krioj sonadas tra vasta ĉielo : kaj vice Rutuloj
Repuŝegitaj forkuras tra polvo, kaj dorson prezentas.
Sed li malŝatas falintojn kaj ilin ne volas mortigi,
- 465 Nek persekuti, eĉ tiujn ĉi kiuj atendas kuraĝe,
Kaj sur lin ŝetas sagegojn ; ĉar Turnon, tra densa mallumo,
Li nur serĉadas, lin por batalado nur arde petegas.
- Tamen, frapita de timo, Juturno la virovirino,
Veturigiston de Turno, Metiskon, en mezon de bridoj
- 470 Ŝetas, kaj lin, el timono falintan, forlasas sur kampo.
Tiam ŝi lin austataŭsas, kaj, bridojn preninte lasitajn,
Voĉon de viro ŝajnigas, kaj korpon, kaj fine armilojn.
Kiel la nigra hirundo, tra domo de mastro riĉega,
Flugas, kaj murojn de korto profunda flugile tuŝetas,
- 475 Etajn nutraĵojn serĉante por idoj blekantaj en nesto :
Ĝia kriado sonigas ĉu larĝajn pordejojn, ĉu marĉojn,
En ĉirkaŭaĵoj kuŝantajn : do tiel Juturno ĉevalojn
Tra malamikoj kondukas : kaleŝo, rapide fluganta,
Ĉion premegas : ĉi tien ŝi fraton vidigas, kaj poste
- 480 Tien, batalon evitas, kaj kuras senvoje tra kampo.
- Dume Eneo, laŭ tordaj kurbigoj de vojo malrekta,
Turnon alsekvas, kaj, tra batalantoj lin persekutante,
Laŭte alvokas. Tuj kiam okulojn li al malamiko
Ŝetas, kaj penas haltigi forkuron de ĉaro rapida
- 485 Kaj de ĉevaloj, tuj ilin kontraŭen Juturno returnas.
Kion vel fari? Mil sentoj diversaj ŝancelas animon,

Kaj per mil zorgoj malsamaj li estas kontraŭen vokita.
 Tiam Mesapo, rapide kurante, en mano maldekstra
 Tenis okaze du sagojn flekseblajn, de fero armitajn :
 Unu el ili li svingas, kaj kontraŭ lin ĝin tuj direktas. 490
 Haltas Eneo, sin kurbas, kaj, ŝirmon de ŝildo petinte,
 Li genufleksas : sed sago rapida flugante tuŝetas
 Supron de kasko, kaj randon faligas de ruĝa plumfasko.
 Tiam lin tia perfido incitas : flamanta kolere,
 Kiam li vidas ke ĉaro de Turno forkuras kontraŭen, 495
 Atestiginte Jupitrajn altarojn pri ĵuro rompita,
 Mezen de batalantaroj li fine rapidas : ĉar Marso
 Lin favoregas, kruelan buĉadon li faras senorde,
 Tute timinda, kaj bridon ellasas al sia kolero.
 Kiu nun do min helpos por kanti, per tiuj versaĵoj, 500
 Tiom da sangaj mortigoj, da ĉefoj diverse buĉitaj,
 Kiujn jen Turno jen Troja heroo tra vasta kamparo
 Persekutadis? Ve! kial permesis Jupitero ke tiel
 Sin pereigu du gentoj vivontaj en paco eterna.
 Tiam Eneo Rutulon atakas Sukronon : Trojanojn 505
 Tiu unua batalo haltigas ardantajn : li tuj lin
 Frapas al flanko, en lokon rapide mortigan, kaj ripojn,
 Tiun ŝirmilon de brusto, traboras per glavo kruela.
 Turno, piede, Amikon falintan el lia ĉevalo
 Buĉas, kaj fraton Dionon, ĉi tiun per longa sagego, 510
 Tiun per glavo : li kapojn de ambaŭ tranĉitajn sur ĉaron
 Poste alligas, kaj ilin forportas de sango gutantajn.
 Buĉas Eneo Tanaon kaj Talon kaj fortan Cetegon,
 Kune, per unu nur frapo, kaj poste malĝojan Oniton,
 Filon de Ekionio kaj de Peridio patrino. 515
 Turno du fratojn Licujajn, senditajn de kampoj Apolaj,
 Buĉas, kaj junan Meneton : li vane malamis militon.
 Apud rivero fiŝhava de Lerno, ĉi tiu Arkido
 Lerte fiŝkaptis, malriĉe loĝante, neniam vidinte
 Belajn palacojn : kaj patro luitan kulturis bienon. 520
 Kiel, veninte de partoj diversaj, sekegan arbaron
 Flamoj bruligas kaj branĉojn de laŭroj per vento sonantaj ;
 Kiel ankoraŭ, rapide fluinte el montoj altegaj,
 Bruas ŝaŭmantaj riveroj, kaj tra ebenaĵoj rapidas,

- 525 Ruinigante kamparojn; do tiel, kun furiozeco,
 Ambaŭ Eneo kaj Turno rapidas tra sanga batalo.
 Koroj pli kaj pli flamiĝas kolere; kaj brustoj kuraĝe
 Ŝvelas; kaj ili nur vundojn mortigajn perforte frapegas.
 Ĉar fanfaronis Murano pri avoj kaj gloraj prapatroj,
- 530 Kiuj lin naskis post longa serio da reĝoj Latinaj,
 Lin elfaligas el ĉaro Eneo, per peza ŝtonego
 Turnadiĝanta, kaj teren kuŝigas : li inter timono
 Restas kaj bridoj : dum rodoj lin trenas, ardantaj ĉevaloj,
 Kiuj ne mastron rekonas, per ufoj lin sange premezas.
- 535 Turno sur Hilon venantan, kaj kore freneze koleran,
 Tuj rapidegas, kaj sagon ekĵetas tra oraj tempioj :
 Kaskon armilo traboras kaj haltas, fiksita en cerbo.
 Kreto, vi la plej kuraĝa el Grekoj, ne povis eviti
 Lancon de Turno : kaj dioj ne pastron protektis Kuppenkon.
- 540 Kiam Eneo alvenis, li, malfeliĉulo, prezentis
 Bruston; sed ŝildo el kupro malforta ne frapon haltigis.
 Same, Eolo, vin kampoj Laŭrentaj ekvidis malvivan,
 Dum vi sur teron etendis larĝecon de korpo vastega.
 Falas vi, kiun ne povis mortigi Argujaj armeoj,
- 545 Kaj detruisto de regno Priama, kruela Aĥilo.
 Tie vi trovis vivlimon : sur Ido, en urbo Lirnesa,
 Belajn vi havas palacojn; en tero Laŭrenta, tombejon.
 Inter si tiam armeoj kuniĝas, kaj ĉiuj Latinoj,
 Ĉiuj Trojanoj, Mnesteo, Seresto kuraĝa, kaj poste
- 550 Ĉevaldresanto Mesapo, kaj forta Asilo, kaj fine
 Skadroj Etruskaj, korpusoj Arkidaj de reĝo Evandro :
 Ĉiu armito batalas per tutaj rimedoj kaj fortoj;
 Kaj, sen prokrasto, sen halto, batalo perforta fariĝas.
 Tiam belega patrino ideon en cerbon Enean
- 555 Sendas : « Li murojn aliru; al urbo direktu armeon
 Tuj, por ke li per subita atako timigu Latinojn. »
 Ĉar li, dum Turnon li persekutadis tra skadroj vagantaj,
 Dum li rigardojn ĉi tien kaj tien direktis, ekvidas
 Urbon, en mezo de tiaj bataloj senpune kvietan.
- 560 Tiam li tuje ĝin forte deziras pli grave ataki;
 Kaj, alvokinte Mnesteon, Sergeston kaj fortan Sereston,
 Ĉefojn armeajn, li trafas monteton : kaj tien Trojana

Tuta legio lin sekvas amase, nek ŝildojn, nek sagojn
 Tamen lasinte. Sur alta supraĵo starante, li diras :
 « Miajn ordonojn nenio prokrastu : Jupitero nin helpas. 565
 De entrepreno tujeco ne devas haltigi kuraĝon.
 Kaŭzis militon ĉi tiu ĉefurbo de regno Latina.
 Do, se venkitoj ne volas obei kaj jugon akcepti,
 Mi ĝin detruos : kaj teron surkovros ruinoj fumantaj.
 Nun mi atendas ke plaĉos al Turno kun mi bataladi, 570
 Se li bonvolas, post tiu malvenko, daŭrigi militon.
 Estas ĝi kapo kaj fonto de tiu milito malpia.
 Torĉojn ekprenu rapide, kaj ĵuron postulu per flamoj. »
 Tiel li diris; kaj ĉiuj, egale ardantaj, ordigas
 Sin triangule; kaj dense al urbo sin aro direktas. 575
 Tuj ŝtupetaroj stariĝas; tuj flamoj montriĝas sur muroj.
 Trafas pordegojn aliaj rapide, kaj buĉas gardistojn :
 Ĵetas ceteraj sagegojn; kaj ili nigrigas ĉielon.
 Inter unuaj, piede de muroj, Eneo direktas
 Manon al urbo, kaj laŭte li reĝon kulpigas Latinon. 580
 Diojn li prenas ateste : li certe ne vole batalas;
 Sed lin atakis Latinoj, rompinte dufoje du ĵurojn.
 Inter urbanoj timantaj rapide malamo naskiĝas.
 Pordojn malfermi ordonas ĉi tiuj, kaj urbon redoni
 Al Dardanidoj, kaj reĝon mem trenas sur altajn remparojn. 585
 Prenas armilojn aliaj, kaj penas por urbon defendi.
 Tiel do, kiam abelojn loĝantaj en kavo ŝtonega
 Trovis paŝtisto, li neston plenigas je fumo pikanta.
 Ili timantaj tra vaska loĝejo tumulte trakuras,
 Kaj pligrandigas kolerojn per zumoj senĉese bruantaj : 590
 Ĉirkaŭ tegmento volviĝas vaporo; interne de kavo,
 Bruas mallaŭta murmuro, kaj fumo disiĝas tra ventoj.
 Nova fariĝo samtempe lacegajn ekfrapas Latinojn;
 Kaj ĝi tra tuta ĉefurbo plendadojn dissemas kaj ĝemojn.
 Kiam reĝino ekvidis ke malamikaro alvenis, 595
 Murojn sieĝis, kaj flamojn enĵetis sur urbajn tegmentojn,
 Ke kontraŭstaris nek Turno, nek ia armeo Rutula,
 Kredis malfeliĉulino ke Turno en sanga batalo
 Estis buĉita : doloron subitan ŝi sentas en koro,
 Diras ke estas ŝi kaŭzo kaj fonto de tiaj malbonoj : 600

- Poste, tuj kiam ŝi kriis ĉagrenon per diroj malsaĝaj,
 Vestojn purpurajn ŝi ŝiras per mano, kaj ŝnuron, mortonta,
 Ilon de morto hontinda, alligas sur altan trabajon.
 Tiun mortigon tuj kiam ekkonis virinoj Latinaj,
- 605 Blondan hararon unue tiregas flino Lavinjo,
 Vangojn rozetajn vundinte : ĉirkaŭe anaĝo virina
 Tuta rapidas, kaj altan palacon per ploroj sonigas.
 Poste vastiĝas tra urbo, kaj korojn faligas, ĉi tiu
 Famo plorinda : forkuras Latino kaj veston disŝiras;
- 610 Terurigita de morto edzina, de urba ruino,
 Blankan hararon li tiam difektas per polvo malpura,
 Kaj sin kulpigas : ĉar estas li kiu ne volis akcepti
 Idon Dardanano Eneon, kaj kiel bofilon alpreni. [raŭ
- Dume sed Turno malmutajn armitojn tremantajn anko-
- 615 Persekutetas, ĉe rando de kampo, sed malpli kuraĝe :
 Pli kaj pli malpligrandiĝas fervoro de ĉaraj ĉevaloj.
 Vento subite alportas bruadon miksitajn kun krioj
 Terurigantaj : li levas orelojn kaj aŭdas konfuze
 Sonon venantan de urbo kaj malfeliĉigan murmuron.
- 620 « Kia funebro plorinda remparojn nun malkvietigas?
 Kia bruego altiĝas en partoj diversaj de urbo? »
 Tiel li diras, kaj, bridon tirante, ĉevalojn haltigas.
 Lia fratino, — ŝi ĉaron, ĉevalojn kaj bridojn direktis,
 Ĉar ŝi de veturigisto Metisko surmetis figuron, —
- 625 Tiujn respondas parolojn : « Nu, ni persekutu Trojanojn,
 Turno, je flanko ĉi, kie jam venko sin montris favora.
 Estas aliaj sufiĉe multnombraj por urbon defendi.
 Anojn Italajn atakas Eneo, kaj semas mortigojn :
 Same Trojanojn al morto ni sendu per mano maltima.
- 630 Ju pli da viroj vi buĉos, vi des pli da gloro forportos. »
 Turno respondis :
 « Mi vin, fratino, rekonis, tuj kiam ŭnua per ruzoj
 Ĵuron vi rompis, kaj poste vin ĵetis tra sanga batalo.
 Vane vi provas min trompi, diino. Sed kiu Olimpon
 635 Vin forlasigis, kaj tiajn laborojn vin fari devigis?
 Ĉu por ekvidi kruelan mortigon de frato mizera?
 Kion ve! fari? kaj kiun esperon rezervas Fatalo?
 Mian plej karan amikon, Muranon, ekvidis okuloj

Miaj, dum vanan per voĉo mortanta li petis helpadon :
 Tiun heroon mi vidis venkitan per vundo profunda. 640
 Kaj malfeliĉa Ufenso, por mian ne vidi malgloron,
 Same pereis; kaj kaptis Trojanoj armilon kaj korpon.
 Ĉu mi toleros ke — kia hontego! — detruos Trojanoj
 Miajn loĝejojn? Drancesajn parolojn ĉu mi ne refutos?
 Dorson mi montrus; kaj vidus Latujo forkuron de Turno! 645
 Morto ne estas por mi malfeliĉo. Vi, dioj Inferaj,
 Estu favoraj, ĉar dioj Superaj nun Turnon malamas.
 Al vi mi malsupreniros, senkulpa, kun pura animo,
 Kaj mi ne estos malinda je gloro de famaj prapatroj. »
 Sed li apenaŭ parolis, jen Saco aliras, flugante 650
 Tra malamikoj, ĉevalon rajdante ŝaŭmantan : lin sago
 Vundis en buŝo : li Turnon rapidas, kaj vokas per nomo :
 « Turno, vi estas nun sola espero; kompatu amikojn.
 Kontraŭ remparojn ektondras Eneo, kaj diras minace :
 « Mi fortikaĵon detruos Italian kaj ĝin ruinigos. » 655
 Torĉoj jam flugas sur domojn : okulojn kaj buŝojn Latinoj
 Al vi direktas : mallaŭte sin reĝo demandas Latino :
 « Kiun bofilon akcepti? al kiu ligado min turni? »
 Plie reĝino, al vi amikino fervora, mortigis
 Sin mem per mano, kaj terurigita ŝi lumon forkuris. 660
 Kontraŭstarantaj Mesapo kaj forta Atino nur frapojn,
 Antaŭ pordegoj, suferas; sed densaj korpusoj ĉirkaŭas
 Ilin; ĉi tie kaj tie vidiĝas da pintoj sagegaj
 Fera rikolto : vi ĉaron kondukas tra lando dezerta. »
 Turno miregas : mil pensoj konfuzaj trakuras tra cerbo; 665
 Kaj li longtempe silentas senmova. Profunde de koro,
 Honto kaj lasta espero trompita miksiĝas, kun sento
 De kuraĝego kaj de furiozo pro amo perdita.
 Tamen tuj kiam eliris mallumo, kaj lumo revenis
 Funden de cerbo, okulojn kolerajn li turnas al muroj, 670
 Kaj, sur kaleŝo starante, li grandan rigardas ĉefurbon.
 Tiam li vidas ke flamoj aliras ĝis alta ĉielo,
 Inter etaĝoj de turo brulanta volvante turniĝojn.
 Turno mem tiun ĉi turon per dikaj trabaĵoj konstruis :
 Li ĝin provizis je pontoj altegaj kaj metis sur rodojn. 675
 « Estas Fataloj plej fortaj, fratino; do ne min prokrastu.

- Kien min sorto kaj dioj alvokas mi iros senplende.
 Tuje mi volas batali Eneon kaj morton suferi
 Eĉ kruelegan : pli longe vi Turnon ne vidos malnobla,
 680 Kara fratino. Min lasu, mi petas, satigi koléron. »
 Tiel dirinte, el ĉaro per salto li kampon aliras,
 Tra malamikoj, tra sagoj rapidas, lasinte fratinoŝ
 Tute malĝojan, kaj tranĉas vojiron tra batalantaroj.
 Kiel ŝtonego, falanta el alta supraĵo de montoj,
 685 Kiun ĉu ventoj ĉu pluvoj senĉesaj el kava kuŝujo
 Elradikigis, ĉu ĝin dispecigis longeco da jaroj ;
 Maso pezega, per movo mem forte malsupren tiritita,
 Teren saltegas, kaj kune arbarojn, brutarojn kaj homojn
 Kun si forportas : do tiel, tra skadroj senorde kurantaj,
 690 Turno rapidas al muroj de urbo, sur tero de sango
 Ensoŝbigita, dum bruas aero pro sagoj siblantaj.
 Signon li faras per mano, kaj poste li laŭte ekkrias :
 « Haltu, Rutuloj ; kaj feron en ingon remetetu, Latinoj :
 Kia ajn estos batalo, nun ĝi min koncernas : pli juste
 695 Unu nur pagos pro rompo de ĵuro : nu ! glavo decidu. »
 Ĉiuj, estantaj en mezo, eliras, kaj lokon forlasas.
 Tamen Eneo la patro, tuj kiam li nomon de Turno
 Aŭdis, forlasas muregojn, kaj turojn forlasas altegajn.
 Li sen prokrasto rapidas kaj ĉiun haltigas laboron,
 700 Dum, saltigante pro ĝojo, li tondre sonigas armilojn.
 Lia altresko similas Atoŝon, similas Erikson,
 Kaj Apeninon la patron mem, kiam ĝi kverkojn tremantaj
 Igas, kaj neĝan supraĵon plezure ĝis nuboj altigas.
 Vete Rutuloj, Trojanoj kaj ĉiuj okuloj Italaj
 705 Same konverĝas al ili : kaj tiuj ĉi kiuj okupis
 Altajn remparojn, aŭ kiuj ŝafvire bategis muregojn,
 Ŝildojn demetas el ŝultroj. Miregas Latino, vidante
 Virojn grandfamajn, venintajn el randoj ekstremaj del'mon-
 Kiuj sin baldaŭ batalos por rajtojn per glavo decidi. [do,
 710 Tamen, tuj kiam vastega kamparo senhoma fariĝis,
 De malproksime, post kuro rapida, ĵetinte sagegojn,
 Ili batalas, kaj kupron frapigas de ŝildoj sonoraj.
 Tero ĝemadas ; dum ili, per batoj senĉesaj de glavoj,
 Forte sin frapas, hazardo kaj virto samtempe miksiĝas.

Kiel en vasta arbaro de Silo, en alta Taburno, 715
 Kiam bovviroj, malame puŝitaj al sanga batalo,
 Fruntojn antaŭen frapigas, eliras paŝtistoj tremantaj :
 Muta pro timo staradas brutaro ; murmuras bovinoj :
 « Kiu komandos potence ? al kiu ni ĉiuj obeos ? »
 Inter si ili sin vundas per frapoj danĝeraj kaj multaj ; 720
 Vete per kornoj sin ili disŝiras ; kaj larĝa sangfluo
 Kolojn kaj ŝultrojn ruĝigas : pro krioj muĝadas arbaro.
 Tiel Trojana Eneo kaj filo de Daŭno heroo
 Inter si ŝildojn frapigas : aeron plenigas bruego.
 Mane tenante pesilon je pletoj egalaj, Jupitro 725
 Metas sur ilin Fatalojn kontraŭajn de ambaŭ, por scii
 Kiun kondamnos batalo, al kiu kliniĝos la Morto.
 Turno rapidas, kaj, venki kredante, li korpon starigas,
 Glavon altigas minacan, kaj forte Eneon sur kaskon
 Frapas. Trojanoj kaj anoj Latinaj ekkrias, kaj kune 730
 Staras senmovaj pro maltrankvileco. Sed glavo perfida
 Tuje rompiĝas kaj trompas esperon de Turno ardanta.
 Estas nur ebla forkuro. Li flugas pli forte ol Eŭro,
 Kiam li vidas tenilon sen glavo kaj manon senarman.
 Oni rakontas ke, kiam komencis batalo, el ĉaro 735
 Eksalteginte rapide, li patran forgesis ferglavon,
 Sed, kolerante, trompiĝis kaj ilon manprenis Metiskan.
 Tiu longtempe sufiĉis, dum dorson prezentis Trojanoj
 Palaj : sed kiam li frapis sur dian armilon Vulkanan,
 Kiel glacieron rompeblan ĉi tiun morteman ferilon 740
 Rompis frapego ; kaj brilas pecetoj sur sablo brunruĝa.
 Turno freneze trakuras tra lokoj diversaj de kampo,
 Kaj mil kurbiĝojn necertajn ĉi tien kaj tien konfuzas.
 Ĉar unuflanke lin ĉie enfermas anaro Trojana,
 Dum lin alie haltigas marĉejo kaj altaj remparoj. 745
 Lin persekutas Eneo : kaj kvankam genuoj fleksiĝas,
 Malfortigitaj pro vundo tro nova, kaj malrapidigas
 Kuron ardantan, de Turno tremanta li tuŝas piedon.
 Kiam ĉashundo Umbria surprizas cervinon tremantan,
 Kiun haltigis rivero aŭ ruĝtimigilo plumhava, 750
 Besto ĉasanta senĉese ĝin sekvas, kurante, bojante :
 Terurigita pro bordo krutega, pro ruĝa insido,

- Ĝi tra mil vojoj diversaj forkuras, revenas; dum hundo -
 Per malfermita buŝego ĝin kaptas, ne, kredas ĝin kapti :
 755 Tiam aŭdiĝas krakado de dentoj mordantaj aeron.
 Krio subite eksonas; kaj al ĝi respondas samtempe
 Bordo kaj lago; dum tondras ĉielo pro tiu tumulto.
 Turno kuranta al ĉia Rutulo riproĉas senhelpon,
 Ĉiun per nomo alvokas, kaj glavon postulas kutiman.
 760 Dume Eneo minacas de morto, de tuja pereo,
 Kaj; por timigi urbanojn, eĉ de ruinigo de urbo,
 Iun ajn kiu sin movus, kaj kvankam vundita, daŭrigas.
 Ili kvinoble plenumis kamprandon, kvinoble revenis
 Tien kaj tien : ĉar ili ne petas premion malgravan,
 765 Monan donacon : sed vivo ludiĝas kaj sango de Turno.
 Iam branĉaro de olivujtrunko ĉi tie troviĝis.
 Ĝin dediĉitan al Faŭno multege respektis maristoj,
 Kiuj, savitaj el ondoj, kutimis al dio Laŭrenta
 Donojn prezenti, kaj sur ĝin vestaĵojn alligi oferajn.
 770 Sed ĝin Trojanoj, sen ia respekto, detruis, por lasi
 Al dueloj liberan aliron tra kampo senbara.
 Staris ĉi tie Enea ŝagego; ĝin, per ĵetmovado
 Iam senditan, nun fiksas flekseblaj radikoj de arbo.
 Tiam sin klinas, kaj penas tiregi per mano armilon
 775 Ido Dardana, por trafi per sago kuranton, per kuro
 Ne atingeblan. Sed Turno, premita de timo freneza :
 « Faŭno, li diris, mi preĝas, kompatu : vi, tero bonega,
 Feron detenu : ĉar viajn altarojn mi ĉiam honoris :
 Ilin kontraŭe detruis Trojanoj kaj malrespektesis. »
 780 Diris li : voĉo preĝanta tre prave dihelpon petegis.
 Kvankam Eneo penadas, flekseblan radikon li vane
 Provas ŝanceli : neniu forteco el arba mordego
 Povas eltiri sagegon. Sed, dum li kuraĝe daŭrigas,
 Re vestinte vizaĝon de veturigisto Metisko,
 785 Daŭna filino revenas, kaj glavon redonas al frato.
 Sed, furioza pri tia maltimo de Nimfo, Venuso
 Vice aliras, kaj sagon tiregas el fundo radika.
 Ambaŭ fieraj samtempe retrovis armilon kaj ardon.
 Tiu ĉi, glavon lidante, kaj tiu, svingante sagegon,
 790 Kontraŭeniras, por provi batalon de Marso mortiga.

Dume la reĝo de ĉiopotenca Olimpo, Junonon,
 Kiu sur nubo flavruĝa rigardis batalon, ekdiras :
 « Kiam do finos milito, edzino? Vi kion deziras?
 Estos Eneo diaĵo nacia, loĝonte ĉielon;
 Plie vi scias ke iam ĝis astroj lin portos Fataloj. 795
 Kion vi revas? Pro kia espero vi restas en nuboj?
 Diru : ĉu decas ke vundu diaĵon armilo mortema?
 Kial al Turno, — ĉar sen vi Juturno neniel valorus, —
 Glavon redoni, kaj tiel venkitajn renaski esperojn?
 Fine do ĉesu; kaj vian koleron fleksu do preĝadoj. 800
 Tia doloro ne tiel vin manĝu silente; nenian
 Markon de tiaj ĉagrenoj mi vidu sur dolĉa vizaĝo.
 Lasta momento alvenis. Sur teroj, sur ondoj, vi povis
 Persekutadi Trojanojn, malpian flamigi militon,
 Hejmon detruu, kaj miksi larmegojn kun festoj edziĝaj : 805
 Plion ne faru; ĉar mi malpermesas. » Silentis Jupitero.
 Tiam, venkita, idino Saturna respondis mallaŭte :
 « Granda Jupitero, ĉar vian voladon mi konis tre bone,
 Turnon pro tio kaj teron mi tute nevole forlasis.
 Sola alie vi ne min ekvidus, sidanta sur nubo, 810
 Kaj tolerantanta insultojn : de flamoj zonita, mi starus
 Meze de skadroj, puŝante Trojanojn al sanga batalo.
 Jes, mi Juturnon konsilis ke fraton ŝi helpu mizeran;
 Jes, mi permesis ke ĉion ŝi provu por vivon konservi;
 Sed ne ke iu ajn uzu sageton kaj streĉu pafarkon. 815
 Tion mi ĵuras per kapo de Stikso, sanktega rivero,
 Sola ĵurego reale timinda por dioj Superaj.
 Fine mi cedas, kaj lasas batalojn de mi malamitajn.
 Tamen, ĉar tion per leĝo nenia Fataloj malhelpas,
 Mi por Latujo vin petas, por gloro de viaj genepoj : 820
 Kiam, ĉar tion vi volas, edziĝo feliĉa starigos
 Pacon eternan, kaj gentojn kunligos per ĵuro kaj leĝoj,
 Ne malpermesu ke nomon patrujan konservu Latinoj,
 Kaj ne ordonu ke ili fariĝu Trojanoj, nomiĝu
 Trojoj, kaj lingvon forgesu, kaj veston forlasu nacian. 825
 Vivu Latujo kaj Albaj prapatroj tra centoj da jaroj!
 Restu do ecoj Italaj sidejo de Roma potenco.
 Trojo pereis : permesu ke ĉiam eĉ nomo pereu. »

- Patro de dioj kaj homoj ridetis, kaj tiel respondis :
- 830 « Kial, fratino Jupitra kaj sekve idino Saturna,
Kial en koro vi volvas turniĝojn de tia kolero?
Nu, kvietigu doloron, kaj vanan haltigu timadon :
Vian deziron volonte mi, tute venkita, plenumos.
Anoj Aŭzonaj konservos kutimojn kaj lingvon de patroj ;
- 835 Nomo sen ŝanĝoj restados : Trojanoj kun tiu korpego
Nur sin miksados, nur Trojajn kutimojn kaj ritojn aldo-
Unu popolo fariĝos Latinoj kun unu nur lingvo : [nos.
Kaj de miksado kun sango Aŭzona naskiĝos nacio,
Kiun vi vidis piece superan al dioj kaj homoj.
- 840 Viajn altarojn nenia popolo pli pie honoros. »
Edzon aplaŭdis Junono ; kaj ĝojo penetris en koron :
Poste ŝi nubon forlasis, kaj trafis ĉielan Olimpon.
Tion dirinte, alian projekton Kreinto meditas,
Por ke Juturno forlasu samtempe militon kaj fraton.
- 845 Oni rakontas ke estas du pestoj nomitaj Furioj.
Ilin, kaj kune Meĝeron Tartaran, per unu nur nasko
Naskis la Nokto malluma, sur kapoj serpentajn volvaĵojn
Samajn alligis, kaj ilin provizis je ventaj flugiloj.
Ili sur sojlo, sub trono de reĝo timinda Jupitro,
- 850 Sidas, kaj timon alportas al homoj mizere mortemaj,
Kiam pereon, plorindan malsanon, eksendas direĝo,
Kiam sur urbojn punindajn teruran li ĵetas militon.
Unu el tiuj kurjeroj, el alta etero, Jupitro
Sendis, por ke al Juturno ĝi, kiel averto, sin montru.
- 855 Flugas la monstro ; kaj teren ĝin portas rapida turniĝo.
Kiel, tra nubo, ĵetita de kordo pafarka, sageto,
Kiun sorbigis je galo, timinda veneno, soldato
Kreta aŭ Parta : nebulon siblante traflugas armilo
Venenigita ; kaj ĝi nevidata trairas ombraron :
- 860 Tiel flugadis idino de Nokto kaj teron aliris.
Kiam ŝi vidis Iliajn korpusojn kaj Turnan armeon,
Ŝi sin densigas kaj formon ekvestas de birdo malgranda,
Kiu sur tomboj kaj altaj tegmentoj de domoj dezertaj
Nokte sidiĝas, kaj kanton malĝojan daŭrigas tra ombroj.
- 865 Tiun preninte figuron, ĝi iras kaj ree revenas
Antaŭ vizaĝo de Turno, kaj ŝildon de flugo tuŝetas.

Tuj nekonita laceco en membrojn tremantajn glitiĝas;
Harojn teruro starigas, kaj voĉo ekhaltas en gorĝo.

Tamen tuj kiam, per siblo flugila, rekonis Furion
La malfeliĉa Juturno, ŝi harojn disŝiras falantajn. 870

Vundas fratino vizaĝon per ungoj kaj bruston per pugnoj :

« Kian helpadon, ho Turno, nun povas ekprovi fratino?

Kio nun restas al mizerulino? Ĉu ia rimedo

Povas vin savi? Ĉu kontraŭbatali mi monstron kuraĝus?

Ne : mi forlasas militon. Ne mian grandigu teruron, 875

Birdoj funebraj : batadon mortigan de bruaj flugiloj

Mi tro rekonas : de granda Jupitro min ne erarigas

Volo potenca. Jen de virgineco rabita salajro!

Kial mi ĝuas vivadon eternan : Ve! kial min morto

Preni ne povas? De tiaj doloroj mi finon ekvidus; 880

Kaj nun almenaŭ mi fraton ĉe Ombrojn kunule kunirus.

Senmortulino! Ĉu estas do eble ke io agrabla

Sen vi ekzistu, ho frato? Ĉu tero malfermos sufiĉan

Profundegaĵon, por sendi diinon al Manoj inferaj? »

Tiel dirinte, kaj kapon zoniinte de verda vualo, 885

Multe ĝemante, en ondon riveran sin ĵetas diino.

Turnon samtempe Eneo atakas, balancas sagegon

Grandan, al arbo similan, kaj diras per voĉo timinda :

« Kio vin, Turno, haltigas; kaj kio vin tiel ŝancelas?

Nun ni batalas ne kure, sed tuŝe, per iloj mortigaj. 890

Kian ajn ŝajnon ekvestu, ajn kian elpensu rimedon,

Kiu naskiĝos en cerbo : deziru flugilojn, por trafi

Astrojn eterajn, aŭ teran abismon por tien vin kaŝi. »

Kapon skuinte, li diras : « Ne vortoj insultaj, kruela,

Min terurigas, sed dioj, sed nuna malamo Jupitra. » 895

Tiel li diris, kaj ne pli; ĉar grandan li vidas ŝtonegon,

Ŝtonon antikvan, grandegan, sur kampo okaze kuŝantan,

Limon bienan, ĉi tie metitan por kampon limigi.

Porti sur ŝultroj apenaŭ ĝin povus dekduo da viroj,

Viroj similaj al tiuj ĉi kiujn nun tero produktas. 900

Turno per mano rapide ĝin prenas, kaj, sin starigante,

Penas al kontraŭstaranta Eneo ĝin forte ĵetegi.

Sed fortikecon kutiman li perdis por marŝi, por kuri,

Kaj por sublevi ŝtonegon, kaj por ĝin movadi per mano.

- 905 Liaj genuoj fleksiĝas, kaj sango frostiĝas en vejnoj.
 Ŝtono, malforte ĵetita, ruliĝas tra vento maldensa,
 Sed interspacon ne povas trairi, nek igi frapadon.
 Kiel en nokto, tuj kiam ripozo kaj dormo profunda
 Fermis okulojn, ni sonĝas ke kuron ardantan ni vane
- 910 Penas daŭrigi, kaj, meze de penoj, ni falas lacegaj :
 Lango fariĝis senmova, kaj niaj fortecoj kutimaj
 Ne plu sufiĉas : parolo kaj voĉo rifuzas obeon :
 Tiel nun Turno. Aĵn kion li provas por venki, diino
 Tion kolere rifuzas. Mil pensoj diversaj en koro
- 915 Tiam moviĝas : li urbon rigardas kaj same Rutulojn :
 Ĉar li sagegon timegas minacan, lin tremo ŝancelas :
 Veturigisto-fratinon kaj ĉaron li ne plu ekvidas :
 Kien forkuri? aŭ kiel senriske ataki Eneon?
- Tiu ĉi ŝanceliĝanton minacas per sago Fatala,
- 920 Serĉas okule momenton favoran kaj de malproksime
 Li ĝin perforte ĵetegas. Ĵetita per mura maŝino,
 Tiel neniam bruegis ŝtonego; kaj fulmo neniam
 Tiel tondregis. Simila al nigra turnigo, forflugas
 Sago, portanta mortigon, kirason malsupre trairas,
- 925 Ŝildon traboras kaj dikan tavolon el sepo da ledoj,
 Fine en mezan femuron siblante penetras. Tuj fleksas
 Turno vundita genuojn, kaj teren faligas korpegon.
 Puŝas Rutuloj ĉagrenan kriegon, kaj tuta montaro
 Muĝas, dum tre malproksimen bruadon dissendas arbaroj.
- 930 Turno humila okulojn kaj manon prezentas preĝantajn :
 « Certe mi morton meritis, li diras; kaj mi ne vin preĝas.
 Venkon profitu. Sed tamen se sorto de patro mizera,
 — Tia ĉar estis la patro Anĥizo — vin povas kortuŝi,
 Daŭnon maljunan kompatu, kaj ĉu mi, ĉu, se vi pli amas,
- 935 Korpon, je lumo de vi senigitan, al miaj parencoj
 Vole redonu. Vi venkis : kaj vidis Latinoj ke Turno
 Manon prezentis al sia venkanto : nun estas Lavinjo
 Via edzino : vi pli malproksimen ne portu malamon. »
 Sin moderigas Eneo kolera; li rulas okulojn,
- 940 Brakon haltigas : jam koron ŝancelas paroloj preĝantaj.
 Sed malfeliĉe li, supre de ŝultro, ekvidas globetojn
 Orajn de skarpo, de glava portilo tro bone konita,

lam portita de juna Palaso : lin Turno mortigis,
Kaj, post triumfo, li ŝultrojn ornamis per riĉa akiro.
Kiam Eneo insignon ekvidas, ĉar ĝi memorigas 945
Grandan doloron, subite, kaptita de akra kolero,
furioze : « Vin vestas ankoraŭ akiro de miaj ;
Mi mi kompatas ! Ne. Estas Palaso mem kiu vin buĉas ;
Estas Palaso mem kiu per sango nun petas punegon. »
Tiel dirinte, en bruston de Turno Eneo kolere 950
Glavon trapuŝas. Tuj membrojn malstreĉas glacia bloveto ;
Kaj indignanta animo ĝemante forkuris al Ombroj.

ENHAVO

ANTAŬPAROLO	Pa
KANTO I. — Eneo estas puŝita de la ventego al la Afrikaj marbordoj.	
— II. — Rabado kaj ruinigo de Trojurbo.	1
— III. — Eneo forlasas Trojurbon kaj vagadas sur la maroj.	49
— IV. — Dido.	1
— V. — Funebraj ludoj por honori Anhizon.	7
— VI. — Malsupreniro de Eneo en la Inferojn.	10
— VII. — Eneo alvenas en Latujon.	1
— VIII. — Eneo ĉe Evandro. — Ŝildo de Eneo.	
— IX. — Atako al la Trojana tendaro. — Niso kaj Eurialo.	
— X. — Heroaĵoj kaj morto de Palaso, de Laŭzo kaj de Mezenko.	
— XI. — Enterigo de militistoj. — Kamilo.	
— XII. — Rompo de ĵuro. — Dubatalo inter Eneo kaj Turno.	